IKU 61

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

61a sesio

Roterdamo, Nederlando
19 – 26 julio 2008

Redaktis: José Antonio Vergara

Universala Esperanto-Asocio

Enhavo

Enkonduko 1

La rektoro 2

IKU 1 Hans Michael Maitzen: De la centro de la universo ĝis la spacoŝipo Tero: kiaj konsekvencoj por tuthomara etiko? 3

IKU 2 Bengt-Arne Wickström: Ekonomiko kaj lingvo 13

IKU 3 John Wells: La mirinda mondo de la parolsonoj 25

IKU 4 Keyhan Sayadpour: Denaskaj kor-malsanoj 32

IKU 5 Jukka Pietiäinen: Publika opinio pri la utilaj lingvoj en Eŭropo 40

IKU 6 Geoffrey Greatrex: Prokopio de Cezareo, enigma historiisto de la epoko de Justiniano 56

IKU 7 Maritza Gutiérrez González: Kuba metodo de alfabetigo: sociaj sekvoj en Latinameriko kaj rolo de la amaskomunikiloj 73

IKU 8 Maŭro La Torre: Kiel savi lingvo-variecon per interlingva eduko? 82

IKU 9 Probal Dasgupta: Popola kaj malpopola posedo de la lingva riĉo: la dunormeco sub kogna lupeo 96

IKU 10 Baldur Ragnarsson: Verki poezion en Esperanto 107

Enkonduko

Jen IKU denove, unu el la plej firme establitaj kaj prifierindaj tradicioj de la pinta kolektiva manifestacio de nia movado/komunumo, nome la Universala Kongreso de Esperanto.

Okaze de la 100-jariĝa Jubileo de UEA, estas inspire konstati ke la klopodado starigi tiun ĉi altklerigan instancon, por apliki la lingvon laŭ la rigoraj postuloj de la diversaj sciencoj kaj artoj, estas kerne ligita al la historia itinero de la Asocio. Edmond Privat, tiama UEA-prezidanto kaj unu el la plej gravaj gvidantoj de la E-movado, jam en 1925 sukcesis aranĝi Someran Universitaton kadre de la 17-a UK, kiu okazis ĝuste en Ĝenevo, la sidejo de UEA en ties svisa periodo.

Tuj post la Dua Mondmilito kaj ĝia tragedia, multflanka efiko – ankaŭ sur la E-movadon, la 33-a UK en Malmö (1948) estis la scenejo por la lanĉo de la Internacia Somera Universitato, kiu fariĝos ĉiujara lingvokultiva evento ne plu haltonta, kies 61-an sesion ni ĝuos en Roterdamo 2008. Indas mencii ke, ju pli UEA kaj la movado tutmondiĝas, des pli universala ankaŭ ĝia IKU, kiu ekde la 66-a UK en Brazilo 1981 paradas sub tiu sezone sendependa nomo.

Ĉi-jare ni havas aparte riĉan rikolton. Oni faris multajn, tre indajn proponojn, kio estas fakto vere entuziasmiga pro la vigleco de la intelekta vivo de Esperantujo, sed kiu samtempe malfaciligis la taskon de la IKU-komisiono selekti laŭ eksplicitaj kriterioj pro la alta kvalito de ĉiuj prelegoj. La membroj tre kontentige plenumis sian devon, kiun kunordigis la nova sekretario Amri Wandel. Kiel kutime, tri IKU-prelegoj el la aro samtempe ekigas unuopajn AIS-kursojn.

Mi volas aparte danki al mia estrara kolego Claude Nourmont, kiu denove prizorgis la tradukojn de la prelegoresumoj, kaj al la voluntuloj kiuj translingvigis ilin al la angla (Edmund Grimley Evans, reviziis Brian Moon), franca (Jeanine kaj Yannick Dumoulin, reviziis Claude Nourmont) kaj nederlanda (Gerrit Berveling). La IKU-libro, cetere grava E-kultura atingo de la lastaj jaroj kiun ni neniam plu malhavu, iel simbolas per tiuj tradukoj la aspiron al lingva demokratio ankaŭ sur la scienca kampo. La esperantistoj ne nur strebas al dialogo inter la kulturoj, sed ankaŭ inter la sciodisciplinoj.

José Antonio Vergara, redaktinto
estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado

La Rektoro

Wim Jansen (1948) estas inĝeniero kaj magistro pri kompara lingvistiko kun specialiĝo pri la eŭska lingvo. Li verkis la unuan nederlandan vortaron de la eŭska (1996). Jansen laboris ĉe la Eŭropa Kosma Agentejo (ESA) pri eksperimentoj en sengravita medio 1989-1998. En 2007 li doktoriĝis ĉe la Universitato de Amsterdamo pri teoria lingvistiko per disertacio pri la vortordo en Esperanto. Selektitaj temoj el la disertacio aperis resume en *Naturaj vortordoj en Esperanto* (2008). Nome de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) li okupas la specialan katedron pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo ekde 2002.

De la centro de la universo ĝis la spacoŝipo tero: Kiaj konsekvencoj por tuthomara etiko?

Hans Michael Maitzen
Aŭstro, nask. 1943 en Graz. Profesoro en la instituto por astronomio de la Universitato de Vieno. Studis kaj doktoriĝis en la Universitato de Graz en 1967. Scienca kunlaboranto en la astronomia instituto de la Universitato de Bochum (1969-1976). Tiukadre kaj poste multfoja restado en la Eŭropa Suda Observatorio (ESO) en Ĉilio. Post Bochum scienca kariero ĝis la grado de eksterordinara profesoro en la Universitato de Vieno. Membro de Internacia Astronomia Unuiĝo (IAU), de Eŭropa Astronomia Societo (EAS) kaj de Astronomia Societo centrita en Germanio. Orda profesoro kaj senatano de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. En pli ol 160 publicaĵoj li ĉefe okupiĝis pri stela astrofiziko (aparte la magnetaj steloj) kaj pri la strukturo de nia galaksio. Esperantisto ekde 1961. Prezidaj funkcioj en la aŭstra movado (ekde 1965), en TEJO (1968-73), prezidanto de la IJK en Graz (1970), estrarano de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (1972-75), iniciatinto kaj organizanto de la simpozio “Esperanto centjara” en la Universitato de Vieno (1987), prezidanto de LKK de la 77a UK en Vieno 1992, reprezentanto de UEA ĉe la sidejo de UN en Vieno, akreditita ekde 1978, sekretario de la IKU-komisiono de UEA ekde 1994.

Resumo

La sinkompreno de la homo de nia terglobo ĉiam estis influata de perceptado de la mondo "super ni", do Suno, Luno, planedoj kaj steloj. Estis longa vojo de la ekkono, ke nia Tero estas parto de la Universo, kaj ne ties centro. Sojle de la Internacia Jaro de Astronomio, proklamita de UN/UNESKO por 2009 la grava ŝtupo de la homaro en la scienca esploro de la kosma spaco per la enkonduko de la astronomia teleskopo antaŭ 400 jaroj estos omaĝata en la prelego, sed ankaŭ ties sekvoj en la mondkonceptado prilumigataj. La nova pozicio de la Tero kiel grandega spacoŝipo en nia Universo kaj la futura rolo de la homaro sur ĝi en la solvado de la tutglobaj problemoj, interalie de la energiprovizado kaj la klimata ŝanĝo, provokas la demandon pri neceso de tuthomara etiko.

From the centre of the universe to spaceship Earth: what consequences for an ethics for all mankind?

Abstract

The self-perception of mankind on our planet has always been influenced by a view of the world "above us": the Sun, the Moon, the planets and the stars. It was a long journey to the realisation that our Earth is part of the Universe, not its centre. On the threshold of the International Year of Astronomy, proclaimed by UN/UNESCO for 2009, homage is paid in the lecture to mankind’s great step forwards in the scientific exploration of space with the introduction of the astronomical telescope 400 years ago, but light is also thrown on the consequences for our world view. The new position of the Earth as a huge spaceship in our Universe and the future role of mankind on it in solving global problems, among them energy supplies and climate change, raises the question of the need for an ethics for all mankind.

Du centre de l'univers au vaisseau spatial Terre: quelles conséquences pour une éthique globale de l'humanité ?

Résumé

La compréhension par l'homme de notre globe terrestre a toujours été influencée par la perception du monde « au-dessus de nous », c'est-à-dire le Soleil, la Lune, les planètes et les étoiles. Que de chemin parcouru depuis que l'homme a pris conscience que notre Terre est une partie de l'Univers, et non son centre. Au seuil de l'Année Internationale de l'Astronomie, proclamée par l'ONU et l'UNESCO pour 2009, il sera rendu hommage, dans cette conférence, au grand pas accompli par l'humanité dans la recherche scientifique sur l'espace cosmique grâce à l'introduction du télescope astronomique il y a 400 ans, mais seront également mises en lumière ses conséquences sur la conception du monde. La nouvelle position de la Terre comme gigantesque vaisseau spatial dans notre Univers et le rôle futur de l'humanité qui l'habite dans la résolution des problèmes mondiaux, entre autres l'approvisionnement en énergie et le changement climatique, conduisent à la question de la nécessité d'une éthique globale de l'humanité.

Van centrum van het universum tot ruimteschip Aarde: welke consequenties voor algemeen-menselijke ethiek?

Samenvatting

Hoe de mens zichzelf op onze planeet verstond, werd altijd beïnvloed door de beleving van de wereld « boven ons »: zon, maan, planeten en sterren. Het was een lange weg van de bewustwording dat onze aarde een onderdeel is van het universum en niet het centrum. Op de drempel van het Internationale Jaar van de Astronomie, uitgeroepen door UNESCO voor 2009, zal in deze lezing de grote stap voor de mensheid in het wetenschappelijk onderzoek van de kosmische ruimte geëerd worden, die 400 jaar geleden bereikt werd via de invoering van de astronomische telescoop, maar belicht worden ook de gevolgen voor het wereldbeeld. De nieuwe positie van de aarde als zeer groot ruimteschip in ons universum en de toekomstige rol daarop van de mensheid bij ´t oplossen van mondiale problemen, o.a. dat van energievoorziening en klimaatsveranderingen, roepen de vraag op betreffende de noodzaak van een wereldethiek.

De la centro de la universo ĝis la spacoŝipo tero: Kiaj konsekvencoj por tuthomara etiko?

La fenomenoj de la tagnokta ĉielo kiel tuthomara sperto

Jam la neolitikaj homoj postlasis spurojn de siaj rilatoj al la „supra duono de la naturo“. Kalendaraj konstruaĵoj kiel la 7000jaraj gigantaj „cirklaj fosaĵoj“ (malkovritaj nur antaŭ du jardekoj en vasta regiono de Eŭropo) kaj la iom pli juna, mondkonata monumento de Stonehenge, sed ankaŭ la preferataj direktoj de neolitikaj tomboj atestas la kapablon de ĉielobservado kaj la aplikadon de la astronomiaj scioj al la elformado de homaj vivoritmoj en la pratempo.

La elstara signifo de la ĉefastro, la Suno, tra la tuta mondo respeguliĝas en religia adorado kaj kultoj de plej diversaj tipoj. En la ĝermana lingvosfero la Suno estas ligita al la kulmina tago de la semajno, la dimanĉo. Ekstremaj formoj de sunkultoj implicis eĉ la oferon de homaj vivoj.

La suna apero kaj la moviĝo sur la ĉiela sfero donas la takton al nia homa vivo difinante la ritmon de vekeco kaj dormado (hela – malhela), do la tagnokton, sed ankaŭ la jaran ritmon kun ties sinsekvo de sezonoj (varma – malvarma, certaregione ankaŭ: pluva – seka).

Inter tiuj ritmoj mallonga kaj longa viciĝas la ritmo difinita per nia najbara astro, la Luno, kies rondiro ĉirkaŭ la Tero enkondukigis la monaton, kiu lingve enhavas la ĝermanan vorton por Luno. La jaro ne estas entjera oblo de lunaj periodoj (de la daŭro de plenluno al plenluno), kaj tio kaŭzas komplikajn kalendarajn rilatojn, kiujn diversaj kulturoj traktas malsame.

Ekzemplo estas la varieco de la pasko-dato de jaro al jaro, depende de la unua printempa plenluno, kies sekva dimanĉo difinas la daton de la paska festo. Jen bele montriĝas la kunludado de la suna ĉielmigrado kun la luna moviĝo kaj ties fazoj – plenluno, unua duonluno, novluno, lasta duonlono, plenluno. Ja la astronomia komenco de la printempo okazas kiam la Suno trapasas dum sia (ŝajna) vojaĝo el la suda ĉielsfero la ĉielekvatoron kaj eniras la nordan duonon de la ĉielo. Ĉar la unua printempa plenluno povas okazi en intervalo de ĉirkaŭ 4 semajnoj post la printempa komenco (preskaŭ precize je la 21a de marto) kaj ĉar tiu tempo de la jaro distingiĝas per forta ŝanĝo de temperaturo kaj florado en la naturo, la paska dato koincidas dum la jaroj kun sufiĉe malsimilaj klimataj kaj naturaj cirkonstancoj.

Necesas tiurilate atentigi, ke la astronomia difino de la printempa komenco originas el la „norda“ hemisfero tera, por la sudsferaj homoj samtempe ja okazas la komenco de aŭtuno laŭ la biosfera evoluo dum la jaro. Vivado sur globo signifas akcepti ke ekzistas nur unu globo, sed ke laŭ ties ŝanĝema pozicio al Suno kaj Luno la diversaj regionoj surteraj ne povas havi samtempe ekzakte la samajn kondiĉojn. Tuthomara etiko devas inkludi la rekonon kaj respekton de la malsamaj vivkondiĉoj implicantaj la riĉecon de ekzistoformoj sur nia terglobo.

Grava tempintervalo estas la semajno, kiu korespondas al kvarono de la luna periodo, aŭ alivorte al duono de la tempodaŭro inter novluno kaj plenluno, aŭ finfine al la intervalo inter la novluna (plenluna) fazo kaj la sekva duonluno.

Por la tuta homaro la nombro de tagnoktoj dum unu semajno, sep, aperis kiel elstara. Ĝi estas „natura“ nombro, tamen en ne-matematika senco. La Franca Revolucio kontraŭis tiun „universalecon“ pro ĝia religia (biblia) rilateco kaj enkondukis semajnon de 10 tagoj. Tiu novordigo estas unu el la kreaĵoj de la Franca Revolucio, kiuj ne postvivis ĝin.

Kontraste al la semajno, ligita al du elstaraj sinsekvaj lunfazoj, la tempointervalo de horo ne havas astronomian pravigon aŭ instigon. Ankaŭ la komenco de la hornombrado ne estas deviga, sed korespondas al certaj viv- aŭ aktivecbezonoj.

Analoge al la lumfazocikla divido de la tago en 4 intervaloj sugestiĝas tute nature: mateno – tagmezo – vespero kaj duonvoje al la venonta mateno la noktomezo. Astronomie difinita estas nur la tagmezo kaj la noktomezo: la unua korespondas al la supra kulminacio de la Suno, do al

ĝia plej alta pozicio dum la tago (ne aplikebla al la polusaj regionoj, kie dum unu tagnokto la astroj rondiras, sed ne ŝanĝas sian altecon sur la ĉielo). Tagmezo estas ne nur astronomia dividilo de la tagnokto, sed ankaŭ (ligita al ĝi) dividilo de la homa tagaktivado kun necesa paŭzo pro la bezono de refreŝiĝo kaj evito de la pleja sunbrilado por la mezaj kaj sudaj latitudoj (komenco de la t.n. siesto!). La noktomezo aliflanke korespondas al la duono de la tagnokta intervalo post aŭ antaŭ la tagmezo. Cetere, noktomezo estas ankaŭ markita per la momento de la kulminacio de la plenluno.

Kiel nun subdividi tiujn 4 intervalojn per konvena tempunuo? Temas evidente pri maksimumiga tasko: nek tro alta nombro (do proksimume 10 kaj pli), nek tro eta nombro (3 aŭ du). Pro praktikeco la solvo devus esti trovata inter 5 kaj 7. 5 estus praktika, ĉar por la nombrado oni povas uzi la fingrojn. 7 estus analoga al la nombro de la tagoj en semajno (do analogeco al la luna ciklo!). Kial do elektiĝis la nombro 6 (aŭ 4 oble 6 = 24) finfine por la difino de la horo-intervalo? 5 kaj 7 estas primoj, kio malhelpas ilian subdividon en pli malgrandaj entjeroj. 6 horoj povas konsisti el du oble 3, aŭ tri oble 2 horojn, do tri diversaj labordaŭroj (po skipo) tiamaniere estas organizeblaj dum duona tago.

La pli fajna subdivido de la tempo per minutoj kaj sekundoj enkondukis la dekadan nombrosistemon manenmane kun la heksada uzata por la hordifino (1 horo = 6 oble 10 minutoj, 1 minuto = 6 oble 10 sekundoj).

Tiu sistemo de la temposubdivido je horoj, minutoj kaj sekundoj estis kreita de la babilona kulturo antaŭ proksimume 4000 jaroj. Ekzistas aliaj historiaj kalendaroj, eĉ pli antikvaj, sed la komuna bazo, kiu tra ĉiuj kontinentoj videblas tiurilate, estas la du ĉefaj astroj, Suno kaj Luno, ankaŭ en rilato al certaj steloj aŭ stelkonstelacioj.

Konklude, la ĉielaj fenomenoj estas pli komunaj al la homoj de tiu ĉi mondo ol la surteraj. La nokta ĉielo plej komplete videblas dum la paso de la jaro en la ekvatora zono, dum la polusaj regionoj ebligas spekti nur hemisferon, aŭ la nordan aŭ la sudan. Sed neniu regiono malhavas dum la jaro la aperojn de Suno kaj Luno. Tiuj viv-esencaj faktoroj ne mirinde eniris la desegnadon de multaj naciaj flagoj.

Pro tio, ke ekzistas spuroj de astronomia scio kaj ties apliko al kalendaraj atestaĵoj ĝis antaŭ dudek mil jaroj, oni devas rigardi astronomion kaj kiel ligilon diakronan (komunaĵo tra la tempoj) kaj kiel sinkronan (komunaĵo tergloba nuntempe). Ni diskutu tion tiuaspekte komencante per la homara ĉefastro.

La Suno kiel patrino de la klimato

Ni menciis la periodajn fenomenojn, kiujn ni homoj spertas per la tagnokta kaj la sezona (do dumjara) variado de la sunapero, kiuj ja estas fakte kaŭzataj de nia Tero mem per ĝia rotacio unuflanke, sed ankaŭ per ĝia jara rondflugo ĉirkaŭ la Suno (cetere per rapideco de proks. 100 mil kilometroj hore!).

Tamen ekzistas ankaŭ ciklo kiu originas en la Suno mem, la 11-jara periodo de la sunaktiveco markata per la aperado de sunmakuloj kaj lokaj ekfulmoj kun materielĵetoj (protuberancoj) en la kulmina fazo. La tiamaniere produktata „sunvento“ trablovas la tutan planedan sistemon kaj estas kreanto de la t.n. „(kosmo)spaca vetero“. La magneta kampo de nia Tero protektas nin certagrade kontraŭ la suna vento, sed la plej fortaj sursunaj eksplodoj, aparte se ili okazas direkte al ni (do kiam ili originas el regionoj momente videblaj), povas kaŭzi damaĝojn al surteraj kaj tersatelitaj instalaĵoj kaj influas ankaŭ la biosferon. Pli alta sunaktiveco signifas ankaŭ pli fortan sunradiadon, do sunlumon.

El la historio ni scias, ke la aktiveco de la Suno ne nur variadas dum 11 jaroj, sed ke ekzistas ankaŭ pli longtempaj modifoj de tiu variado. Ekzemplo estas la plurjardeka „dormado“ de la Suno en la 17a jarcento, kiam ne plu videblis sunmakuloj kaj regis speco de eta glaciepoko. Tiu minimumo de sunaktiveco okazis ironie ĝuste dum la regado de Ludoviko 14-a de Francio, konata kiel la „sunoreĝo“. La frosteco de la tiama klimato estas divinebla ekz. el la

pentraĵoj Breughel-aj kiuj montras kamparanajn vizaĝojn ruĝnazajn kaj glaciiĝintajn lagojn, kiuj nuntempe mankegas al la Nederlandanoj, kies historie nacia sporto (unu el) estas glitkurado.

Ke la Suno dominas la evoluon de la surtera klimata sfero, estas nepridubebla fakto. Profundegaj elboraĵoj en polusaj glaciotavoloj liveris indikojn pri tre signifaj klimatoŝanĝoj dum la historio de la Tero. Apud tiu intrinseka (do memdevena) variado de la suna radiado ekzistas aparta teorio kiu atribuas la ŝanĝon de la klimato, aparte la konatajn glaciepokojn al ŝanĝoj de la suna prilumado de la Tero kaŭze de variado de la parametroj de la tera orbitado ĉirkaŭ la Suno. La beograda astronomo Milutin Milankovich en sia teorio el la jaro 1920 alvokis la kunefikon de periodaj variadoj de la elipseco de la tera orbito kun la variado de la oblikveco de la rotacia akso de la Tero (respondeca por la ekzisto de sezonoj) kaj de la longeco de la „Platona jaro“ (proks. 26000 jaroj), kiu estas la periodo en kiu la tera akso, respektive ties ĉielaj polusoj plenumas kompletan rondiron surĉielan.

Nesunaj kaj galaksiaj influoj

Antaŭ nelonge rezultiĝis el koncerna mezurserio, ke la intenseco de la kosma radiado (malkovrita antaŭ preskaŭ jarcento de la aŭstra nobelpremiito Viktor F. Hess) korelacias pozitive kun la nubdenseco. La kolizio de tiu radiado konsistanta el altenergiaj korpuskloj (elektronoj, protonoj k.a. kun preskaŭ lumrapideco) kun la teratmosfero sekve kontribuas al la ĝenerala nubformado surtera. La kosma radiado esence produktiĝas per supernovaoj, ekstremaj steleksplodoj kiel fina vivofazo de iuj steloj. Tio signifas, ke steloj ne nur aperas kiel feblaj lumpunktetoj sur la nokta ĉielo, sed ke kelkaj el ili influas la tutan galaksian ekologion kaj tute specife ankaŭ nian surteran vetersituacion.

Supernova-eksplodoj povas havi eĉ katastrofan efikon se ili okazas tro proksime al nia Tero. Tio estas tre malofta okazo, sed almenaŭ unufoje realiĝis dum la ekzisto de nia Tero, ĉar oni trovis koncernan eksplodmaterialon sur la grundo de oceano. Momente ne troviĝas kandidatstelo por tia eksplodego en la senpera najbareco de la Tero (do malpli ol 50 lumjaroj).

Pli probabla estas alia katastrofeca scenejo: la surteriĝo de planedetoj (asteroidoj) aŭ kometoj per rapidecoj de 20 respektive 50 Km sekunde (korespondas al 72 kaj 180 mil Km hore!) povas lanĉi depende de la grandeco de la flugobjekto eĉ mondkatastrofon kiel tian, kiu okazis antaŭ 65 milionoj da jaroj, fine de la kretaceo kaj komence de la terciaro, kies plej konata sekvo estas la malapero de la dinosaŭroj. Sed ankaŭ malpli grandaj objektoj, t.n. meteoritoj povas kaŭzi damaĝegon, demonstreblan ekz. per la „tunguska“– meteorito falinta en Siberio precize antaŭ 100 jaroj (1908). La detruoj de la natura ĉirkaŭaĵo trovita dum ekspedicio 20 jarojn poste estis enormaj, feliĉe la perdoj de homvivoj kaj gregoj relative malgrandaj pro la eta loĝodenso en la regiono. Kiaj teruraj konsekvencoj devus registriĝi, se tia evento okazus ekzemple en meza Europo en ĉefurba ĉirkaŭaĵo, kaj por akrigi la situacion, en la tempo de la „malvarma milito“!

Homkaŭzata (antropogena) kontribuo al la klimata evoluo

Unu de la plej gravaj problemoj por la tuta homaro estas, kiel ni en la nuntempo ĉie ajn diskutas, la influo de la homo je la klimata evoluo tutgloba. Etmezure tia influo jam ekzistis en historiaj tempoj, aparte per senarbarigoj cele al gigantaj konstruprojektoj (ekz. de la urbo Venecio), sed ili estas kvante liliputaj kompare al la nuna situacio de la enorme kreskinta mondloĝantaro, kies civiliza kaj industria evoluo kaŭzis enorman altiĝon de la energibezonoj kaj tial ankaŭ de konsumo de nafto (nedaŭropova energiofonto) kun sekva eligo de karbodioksido (CO_2) en la atmosferon. Tiu pliiĝo de CO_2 en la atmosfero resendas parton de la varmradiado de la tera surfaco – kiun la radiado de la Suno efikas – kaj do plialtigas la varmecon de la tera surfaco kaj ties proksimaj tavoloj atmosferaj, kiuj ĉefrespondecas pri la veteraj okazoj.

Oni konsciu ke certa tia „forceja“ (varmdoma) efiko nepre necesas por havi biosferon teran. Se ni ne havus atmosferon simile al la Luno, nia meza temperaturo surtera egalus al tiu de la Luno, do -18 gradoj, precize la temperaturo de niaj endomaj frostujoj, cetere. La natura forceja efiko de nia atmosfero altigas tiun temperaturon al +15 gradoj.

Porkompare: la planedo Venuso havas multe pli fortan forcejan situacion, respondecan por 400-grada varmigo, dum Marso pro sia maldensa atmosfero (kiu liveras nur duonan percenton de la atmosfera premo surtera) varmiĝas forceje nur je 6 gradoj.

Krom do la okaza plifortiĝo de la sunbrilado pro la variado de la fizikaj cirkonstancoj de la eksteraj suntavoloj (kiuj estas atesteblaj per terhistoriaj spuroj) ankaŭ pliigo de la forceja efiko fare de homa aktivado, ĉefe produktado de CO_2, povas kontribui al ĝenerala varmiĝo de la Tero kun la konsekvencaj klimataj fenomenoj (grandskala degelado de la glaciotavoloj, plisekiĝo grandregiona kaj ĝenerale plimultiĝo de veteraj ekstremoj ĉiuspecaj).

La internacia komunumo de ŝtatoj per intensigitaj interkonsiliĝoj kaj kunlaboraj projektoj celas haltigi tiun malfavoran evoluon aŭ almenaŭ bremsi ĝin. Estas imperative, konsideri tiun demandon kiel parton de tuthomara etika sinteno. La solvo de la problemo nur eblas, se ŝtataj kaj regionaj limoj malfermiĝas tiucele. Tiu etoso devas inkluzivi la konscion, ke la neregenereblaj energifontoj, speciale karbo kaj nafto – fosiliaj energiportantoj de la sunradiado – ne disponeblas en senfina kvanto. Tion draste ilustras la fakto ke Usono jam de kelka tempo transiris la limon de t.n. „peak oil“, la maksimumon de energiprovizado el propra naftoproduktado, do frontas kreskantan dependecon de energiprovizado eksterlanda. Konsiderante la pliiĝantan energibezonon de aliaj landoj kaj regionoj de la mondo, kun aparta atento de la industriigantaj landoj de la Tria Mondo, la naftobezono kreas gravegajn zorgojn pri la potencialo de internaciaj konfliktoj kiuj rezultiĝus el daŭra samnivela evoluo tiuspeca. Ĉiu el ni scias dum la tempo de la nuna Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, ke la internacia merkatprezo de krudnafto altiĝis dum unu jaro je la duoblo! Eĉ se tio estas kaŭzata de la mekanismoj de la internacia kapitalmerkato, la „Menetekelo“ de la energisituacio estas evidenta.

Germana profesoro Elmar Altvater antaŭ nelonge temigis, ke la tergloba energisituacio postulas, rezigni pri la gvidlinio de la „fosilikapitalisma erao“, karakterizata per postulo je nebridata kresko supozante senliman haveblecon de fosilia energio, kaj transiri al la principo de „solidareca ekonomio“, kiu i.a. devas apogi sin al renovigeblaj energifontoj kaj rekte al sunenergio.

Astrofiziko kiel proponanto por energiproduktado ekzemple de la Suno

La Suno por ni estas unuflanke la rekta ĉefliveranto de energio (ĝia radiado en unu horo alportas al ni tiom da energio, kiom la homaro konsumas dum tuta jaro!), aliflanke ĝi estas ekzemplo por noveca energiteknologio, kiu gajnas energion per la kunfando de 4 hidrogenaj atomoj al unu heliuma, ĝuste tio, kio okazas en la centro de la Suno. Pro la malkovro (1937/38) de tiu ĉi astrofizika procezo la Nobelpremio por fiziko estis atribuita al la germano Hans Bethe. Stranga fakto estas, ke la kuna malkovrinto Carl Friedrich von Weizsäcker estis ignorita de la Nobelkomitato. Mi mencias Weizsäcker, ĉar li ne nur estis fizikisto kaj astronomo, sed ankaŭ filozofo kaj forte engaĝita en aktivado por paca uzado de sciencaj ekkonoj. Li kunlaboris post la Dua Mondmilito en la projekto de „Packoncilio de Eklezioj“ kaj kunaŭtoris la „Deklaracion de Göttingen“, per kiu 18 atomfizikistoj en 1957 publike rifuzis la nuklean armigon de la germana armeo.

La malkovro de la Bethe-Weizsäcker-ciklo lanĉis du evoludirektojn: unue la teorian kaj sciencan kadre de la astrofiziko, kiu ebligis esplori la internan strukturon de la steloj kaj ties evoluon surbaze de modelkalkuloj, due la praktikan kaj teknikan, ĉar nun ekis la aŭdaca projekto imiti la sunan energigeneradon pere de nuklefandado ĉi tie surtere kaj pluevoluigi ĝin por ĝenerala energiprovizado.

En la jaro 1969 aperis la libro „Homoj en la jaro 2000“ eldonita de la konata filozofo Robert Jungk. Prave tie antaŭvidiĝis, ke la mobiltelefonado realiĝos, sed kontraste al tio la supozo pri havebleco de nuklefanda energio en la jaro 2000 estis ege anticipa, ja mankas ankoraŭ jardekoj por industriigo de tiu energifonto.

Tutmondeca konscio kaj etiko por la kosmoŝipo Tero

La energi-estonteco estas kiel jam montrite sekurigebla nur per etoso de tutglobeco, per la scio kaj la rezultanta etika sinteno, ke sur tiu nia Tero ĉiuj interdependas kaj ni do krozas en komuna ŝipo kun sama destino.

La koncepto de kosmoŝipo estis intense publikigata de Heinz Kaminski post la lanĉo de la soveta „Sputnik“, la unua homfarita tersatelito (1957), kies signalojn li sola ekster Sovetunio ricevadis pere de sia radioinstalaĵo en la popolobservatorio de Bochum (FR Germanio). Motivis lin la rusa vorto „Kunvojaĝanto“ transigi la koncepton de vojaĝado al la tuta terglobo kiun li metafore vidis kiel ŝipon kun la homaro kiel pasaĝeroj. Grava konsekvenco de tiu metaforo estas la akcento je la neceso pri solidareca kunvivado en komuna konscio pri la limigiteco de la ŝipo kaj ĝiaj provizoj. Aliaj sekvis tiun ideon, ekz. la usonano Richard Buckminster Fuller, kiu en 1963 eldonis libron kun la titolo „Manlibro por la funkciado de la kosmoŝipo Tero“.

Simbolis Sputniko ankaŭ en tio, ke ĝi orbitis ĉirkaŭ la tuta Tero, implicante la futuran eblecon de komuna kosmoŝipado, kiu ja fakte efektiviĝis jardekojn poste per la projekto de la Internacia Spaco-Stacio (ISS), kiu daŭre funkcias kun partopreno kaj ĉiuspeca kunlaboro de diversaj nacioj.

Oni ne forgesu, ke tio estas la pozitiva kaj paca alternativo al la uzado de satelitoj por militaj celoj (spionado ktp.).

La pozicio de la homo kaj lia Tero en la kosmo kiel bazo de mondkonscia etiko

En la antaŭaj ĉapitroj ni unuavice traktis la ekzistorilatan starpunkton de la futura evoluo de la homaro precipe en ligo al la energiproviza problemo, prilumante la konkretan rilataron de la homoj kaj ilia tera planedo al ilia kosma najbareco, unuavice Suno kaj Luno.

Nun ni rigardu la pli vastajn kosmospacojn kaj la historion de ties malkovrado, por ekscii la evoluon de la astronomia mondkoncepto kaj ĝian influon al la pensado de la homoj.

Astronomio estas la plej antikva naturscienco en la mondo, flankita de la matematiko. Tiel jam la babilonaj pastroj sukcesis prognozi la misteran fenomenon de la eklipsoj sunaj kaj lunaj surbaze de ampleksa observado kaj ties matematika interpretado. La divido de la ĉielo je parceloj korespondantaj al pli malpli okulfrapaj konstelacioj okazis en diversaj kulturoj malsame. La hodiaŭaj 88 oficialaj astronomiaj konstelacioj devenas parte el la babilona epoko.

La ĉina parceligo de la ĉielo antaŭvidis „asterismojn“, kiuj estis ĝenerale signife pli malgrandaj ol la konstelacioj, kaj sekve pli multnombraj. Tio fariĝis avantaĝo por la nuna astrofiziko, ĉar per tiuj malgrandaj areoj kaj per la intensa kaj daŭra observado de la imperiestra astronomaro (cele al trovado de ĉielaj mesaĝoj por estontaj projektoj de la imperiestro) oni povas nuntempe relative facile trovi la ĉielajn poziciojn de la „gaststeloj“, do de dumtempe lumantaj astroj, kaj esplori ilian lumevoluon, ekz. tiun de la astrofizike ege interesaj supernovaoj. Tion kompreneble ebligis la zorgema ĉina arkivado de la astronomiaj observoj.

Necesas ĉi tie mencii, ke la okcidenta („eŭropa“) astronomio apenaŭ interesiĝis pri la fenomenoj, kiujn serĉis la ĉinaj kolegoj. La pensado greka, precipe de Aristotelo kaj Platono, malhelpis serĉi fenomenojn de transira karaktero, ĉar laŭ ili la kosmo estas „orda“, do senŝanĝa aŭ periodeca.

Pri la formo de la Tero la grekaj filozofoj post unuaj provoj kun disko kaj cilindro koincidis en la supozo de globo, unue Pitagoro, poste Platono kaj Aristotelo, fine ankaŭ Ptolemajo kaj Hiparko. La ekleziaj patroj ne forte interesiĝis pri tiu demando, tamen ili kun kelkaj esceptoj ne anatemis la globformon. Sankta Augusteno neis pro teologiaj kaŭzoj sole la ekziston de

antipodoj, li ilin evitis per la argumento, ke la dorsa flanko de la terglobo estas kovrita per marego (se oni konsideras, ke pli ol 7 dekonoj de la tergloba surfaco estas oceanoj, li ne tro malpravis siatempe en la argumentado). En la frua mezepoko Eŭropo estis tro okupata per la nestabilaj politikaj strukturoj sekve de la popolmigrado, tiel ke scienco kaj astronomia observado apenaŭ estis flegataj.

Tute male la araba mondo elstaris per sia gvida rolo en astronomio kaj matematiko, pri kio atestas eĉ hodiaŭ la arabaj nomoj de multaj helaj steloj.

Fine de la mezepoko la ne ĉiam paca interŝanĝo kun la araba mondo kondukis al difuzo de tiuj scioj al Eŭropo, pro kio profitis ekzemple la matematika-astronomia skolo en la universitato de Vieno fondita en 1365.

La nomoj Peuerbach kaj Regiomontanus estas ligitaj al la enkonduko de la trigonometriaj funkcioj.

Koperniko kaj lia „revolucio“: caeli solisque stator – terrae motor

Komence de la novepoko okazis la Kopernika revolucio (aŭ turno), kiu transformis la geocentrismon de Aristotelo kaj Ptolemajo al heliocentra mondkoncepto. La Tero perdis sian statuson kiel centro de la mondo aŭ de la universo, ĉar tio estis pli konvena por la matematiko, esprimita en la antaŭparolo de la kopernika verko „De revolutionibus orbium caelestium libri VI“ per la frazeto „Mathemata mathematicis scribuntur“. Tiamaniere okazis alia detronigo, kiel oni tiam sentis: Romo perdis la statuson esti centro de la centro.

La ideo, ke la Tero nun rondiru la lumilon menciitan en la libro Genezo de la Biblio, estis provoko ne nur por la katolika, sed ankaŭ por la protestanta komunumo. Daŭris tamen sufiĉe da jaroj ĝis kiam la konflikto estis afero de la inkvizicio, okaze de la fama proceso de Galileo Galilei.

La teknologia revolucio: enkonduko de la astronomia teleskopo

Venontjare, 2009, okazas la „Internacia Jaro de Astronomio“ proklamita de UN kaj Unesko por memorado de la 400 jara datreveno de la enkonduko de la astronomia teleskopo fare de Galilei, kiu markas la komencon de la teleskopa erao.

Kvankam Galilei mem ne inventis la teleskopon – tion faris la nederlandano Jan Lipershey en la jaro 1608 – li faris ĝin publika kaj demonstris ekz. la movadon de lumaj akompanantoj (efektive lunoj) ĉirkaŭ la planedo Jupitero, malpermesita laŭ geocentrismo ĉar ĉiuj astroj devas moviĝi ĉirkaŭ la Tero.

Galilei plue klarigis per sia teleskopo la naturon de la Lakta Vojo, ne kiel kosman fluidaĵon, sed kiel sistemon de sennombraj foraj steloj, li ankaŭ povis demonstri la ekziston de luma ringo ĉirkaŭ la planedo Saturno kaj la fazoŝanĝon de la planedo Venuso, simile al tiu de la Luno.

Galilei dementis en 1633 la esencon de siaj konstatoj pro kiuj lin akuzis la inkvizicio. Per la formulado ke temas nur pri matematika modelo li eskapis la brulekzekutiĝon. En 1992 oni lin rehabilitis per Vatikana decido kaj en 2009 – do efektive lia jubilea jaro – je lia honoro estos starigita busto en la Vatikanaj ĝardenoj (iniciatis tion la Papa Akademio de la Sciencoj).

La 17a jarcento, ekipita per la nova teknologio, estis brila epoko de astronomiaj malkovroj kaj ekkonoj. Ĝin stampis Isaac Newton (Njutono) kaj per konstruado de instrumentoj (spegulteleskopo anstataŭ lensteleskopo, spektroskopo) kaj per observado (kometo de Halley), aliflanke kaj plej grave tamen en la jaro 1687 per la publikigo de sia gravitleĝo. Tiu leĝo montris sin valida ne nur surtere, sed ankaŭ en la kosmospaco, kaj tial ĝi fariĝis la bazo por la esplorado de la universo.

Universaleco en la kosmo, sed ankaŭ en la surtera-homa sfero

En la 18a jarcento okazis preterpaso („transito“) de la planedo Venus (videbla kiel nigra punkto) antaŭ la lumdisko de la Suno (en la jaroj 1761 kaj 1769). Tiu evento povas esti taksata kiel unua grandstila ekzemplo de tutgloba kunlaborado astronomia. El laŭeble vasta distribuo de observlokoj laŭ geografia latitudo rezultas malsamaj preterpaso-vojoj sur la sundisko, el kiuj eblas kalkuli la distancon (la fundamenta „astronomia unuo“) de la Tero al la Suno (150 milionoj da kilometroj). Astronomoj laboris en tiu projekto de la Norda Kabo ĝis la Bonespera Kabo, sed ankaŭ sur plej diversaj longitudoj.

Tre rimarkinda estas la fakto, ke Anglujo kaj Francujo tiam militantaj unu kontraŭ la alia ratifis kontrakton, laŭ kiu ambaŭ flankoj devigas sin ne ataki ŝipojn, kiuj veturis en la servo de la Venusa observkampanjo internacia.

Tion oni prave povas nomi burĝonan formon de interŝtata scienca kunlaborорganizo (hodiaŭ ekzemple la Eŭropa Spacagentejo ESA aŭ la Eŭropa Suda Observatorio ESO).

Nia pozicio en la loka stelsistemo (galaksio) La Lakta Vojo:
Ankaŭ la Suno ne plu estas centro!

Apud Carl Friedrich Gauss („princeps mathematicorum“), kiu havigis al la astronomoj kaj aliaj natursciencistoj la matematikajn ilojn por la plej taŭga elvalorigo de iliaj observdatenoj menciendas samtempulo William Herschel (1738-1822) pro tio, ke li starigis gigantan spegulteleskopon (diametro 1,22 m, longeco 12 m!) kaj per ĝi nombradis la stelojn en la Lakta Vojo, surbaze de tio li kreis en 1785 la unuan modelon de la formo de la Lakta Vojo. Mankis al li tiutempe tamen grava parametro: la distancoj de la unuopaj steloj por establi la tridimensian strukturon de la Lakta Vojo, nia Galaksio. Pasis duona jarcento ĝis kiam Friedrich Wilhelm Bessel, astronomo kaj matematikisto el Königsberg (nuna Kaliningrad) publikigis la unuan rezulton de distancmezurado por stelo, kaj tio estis la duobla stelo 61 Cygni, kies ŝajna ŝanĝo de ĉielpozicio pro la jara rondirado de la Tero ĉirkaŭ la Suno sumas je 0.3136 arkosekundoj, kio korespondas al distanco de 10.28 lumjaroj aŭ ĉirkaŭ 100 mil miliardoj Km.

La fama filozofo Immanuel Kant (ankaŭ el Königsberg) koincide kun la angla astronomo Thomas Wright jam antaŭe estis veninta per intuicia spekulacio al la konstato ke nia Lakta Vojo estas sferoida sistemo de steloj, en kies ekvatora ebeno troviĝas nia sunsistemo, tamen klare ekster ĝia centro. Tiaj sistemoj (nomataj „mondinsuloj“) devus ekzisti grandnombre en la universo.

De tiu spekulacia rezonado, kiu esence estis ĝusta, ĝis la kvanta pruvo estis ankoraŭ longa kaj obstakloriĉa vojo!

Ĝis la fino de la 19a jarcento estis observitaj en vastega internacia projekto granda nombro da elektitaj ĉielparceloj per nova astronomia observteknologio, kiu baziĝis je fotografado. Rezultis spaca distribuo de la steloj, kiu ariĝis ĉirkaŭ la Suno, tiel ke aperis la impreso kvazaŭ la Suno estas la centro de la galaksia stelsistemo. Tiun rezulton multaj astronomoj konsideris „antaŭkopernika“, aliaj akceptis ĝin manke de kontraŭpruvo, kaj do dum kelkaj jardekoj estis debatoj kaj necerteco pri la naturo de la loka stelsistemo.

Nur en la jaro 1930 la svisdevena usona astronomo Robert Trumpler trovis la solvon de la problemo kaj do la kontraŭpruvon. La malhelpa faktoro en la rekono de la vera strukturo de nia Galaksio, la Laktvoja stelsistemo, estis la ignorado de la ekzisto de ĝenerala interstela medio, kies polva komponanto absorbas (forglutas) parton de la stela lumo survoje al ni teraj observantoj.

La pli distancaj steloj tiamaniere ŝajne fariĝas ankoraŭ pli distancaj tiel ke la proksimaj steloj apenaŭ tuŝitaj de la absorba efiko elmontras la plej grandan densecon de la steldistribuo kaj pretekstas formi la centron de la stelsistemo.

Jam du jardekojn antaŭ Trumpler la usona astronomo Harlow Shapley konkludis el la koncentriĝo de la globformaj stelamasoj (stelaj sistemoj kun dek ĝis cent mil membroj) en la

konstelacio Sagittarius (Pafulo), ke la gravita centro de la Lakta Vojo devus koincidi kun tiu de la globamasoj, kiu laŭ la mezuritaj helecoj de standardaj steloj, identigeblaj per siaj lumvariadaj periodoj, laŭ hodiaŭa scio situas en distanco de 24 mil lumjaroj. Nia sunsistemo kun la planedo Tero ĉirkaŭiras la centron de nia Galaksio unufoje en kvarona jarmiliardo, kune kun multegaj aliaj steloj (kelkaj eĉ kun planedo aŭ planeda sistemo, sed ankoraŭ sen pruvo de ekzisto de biosfero!) el sia senpera najbareco. Tion ni scias el la mezurado de iliaj spacrapidecoj relative al la sistemo de globamasoj, kiu apenaŭ havas sistemrotacion ĉirkaŭ la centro de nia Galaksio.

La Laktavoja galaksio, do la nia, konsistanta el rapidrotacia disko kaj preskaŭ ne rotacianta sfereca sistemo de globamasoj fariĝis en la pasinta jarcento nia kosma hejmregiono en kiu tre multaj eventoj okazas, ekz. la naskiĝo de steloj, sed ankaŭ ilia morto. Kelkcent miliardoj da steloj troviĝas tie, sed ankaŭ interstela medio, kies maso korespondas al dekono de la suma stelmaso kaj kiu estas la materia bazo por la estiĝo de novaj steloj.

Per la transiro de la siatempe tiom forte disputata heliocentra mondkoncepto al la galaksia koncepto antaŭ preskaŭ 80 jaroj la metafora priskribo de nia situacio per veturado en kosmoŝipo Tero estas perfekte pravigebla.

Science ni hodiaŭ alfrontas la demandon pri la estonto de nia universo, kiu estiĝis en la praeksplodo antaŭ 14 miliardoj da jaroj. Tio implicas la demandon pri la naturo de la t. n. malluma materio kaj malluma energio, la unua proklamita 1976 kiel ekzistanta, la dua fine de la lasta jarcento, sed pli pridisputata. Ambaŭ nocioj estas ekstremaj defioj al la fundamenta fiziko kaj produktoj de astronomia observkapablo kaj alta teknologia nivelo. Estas pripensa tasko al ĉiuj el ni teranoj konsideri la gigantajn intelektajn plenumojn de la naturscienco, aparte bone demonstreblaj per la kazo de astronomio, kiuj ebligis al ni pasaĝeroj de naneca kosmoŝipo, al kiu la lumo de la Suno vojaĝas en 8 minutoj, konkludi pri universo kies plej foraj objektoj elsendis sian lumon al ni antaŭ pli ol 10 miliardoj da jaroj, do kiam nia ŝipo ankoraŭ ne ekzistis.

La sento pri la komuneco de nia sorto kiel homaro devus helpi al ni solvi la ekzistantajn problemojn tutglobajn. Espereble vastiĝas la kosmoŝipa sento kaj tiel ankaŭ etiko de tutglobeco.

Ekonomiko kaj lingvo

Bengt-Arne Wickström
Profesoro pri la ekonomiko de la publika sektoro ĉe Humboldt-Universität en Berlino kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Antaŭe li estris kadedrojn ĉe Johannes-Kepler-Universitato en Linz, Aŭstrio, kaj la Universitato de Bergen, Norvegio. Doktoriĝis en State University of New York en Stony Brook, Usono. En sia esplorlaboro li pritraktis la teorion de bonfarto, la ekonomikan teorion de politiko, la interrilatojn inter ekonomiko, lingvo kaj socio. Krome, li interesiĝas pri la estiĝo kaj evoluo de sociaj normoj kaj ilia rilato al la socia evoluo. Lastatempe liaj laboraĵoj aperis i.a. en Rationality and Society, European Journal of Political Economy, Homo oeconomicus, Journal of Economics/Zeitschrift für Nationalökonomie, kaj Public Choice.

Resumo

Lingvo havas multajn funkciojn en la mondo. Unuj de la ĉefaj estas kiel komunikilo kaj kiel portanto de identeco. En tiuj funkcioj ekzistas multaj konektoj inter lingvouzo, ekonomiko, ekonomio kaj sociologio.

En tiu ĉi prelego kaj la sekvanta AIS-kurso ni analizos kelkajn flankojn de tiu interrilato.

Ni pritraktos kaj pozitivajn – priskribajn – kaj normativajn – preskribajn – aspektojn de lingvouzo.

Elirpunkto de nia priskriba analizo estas la komunikila valoro kaj la uzo de lingvo. Se lingvo nur funkcias kiel komunikilo, oni facile povas fari kosto-utilo-analizon de ĝia uzo. Homoj ricevas utilon pere de la kontakto kun aliaj homoj. Do, la utilo de certa lingvo kreskas, kiam kreskas la nombro de parolantoj, kiujn oni povas alparoli pere de tiu lingvo. Aliflanke la kostoj de la komunikado ĝenerale kreskas kun la distanco inter la interparolantoj aŭ pli ĝenerale kun la malfaciloj atingi ilin; tio estas la kostoflanko.

Ni do havas du flankojn de komunikado: la valoron – ”postulon” –, kiu dependas de la nombro da homoj, kun kiuj oni sukcesas interkomuniki, kaj la koston – ”oferton” – de komunikado, kiu dependas de la atingebleco de la homoj, kun kiuj oni volas komuniki. Ĉar la faktoroj influantaj tiujn du rilatojn estas malsamaj, ni bezonas trian rilaton, kiu priskribas, kiel la nombro da atingeblaj homoj por iu parolanto rilatas al la strukturo de la komunikado kaj al la socia strukturo ĝenerale.

Uzante tian modelon, ni povas analizi la lingvolernadon kaj lingvouzon de tipa individuo kaj la evoluon de la individua kaj socia lingvouzo. Ĝenerale, por individuo indas lerni la plej grandan lingvon uzatan en sia ĉirkaŭaĵo, kaj la uzo de malgrandaj lingvoj tiel reduktiĝas en la komunumo. La tutmondiĝon sekvas pligrandiĝo de la komunika komunumo kaj tiel povas sekvi plifortiĝo de kelkaj fortaj mondolingvoj kaj la malaperado de aliaj malfortaj lingvoj. Aliflanke, la malpligrandiĝo de komunikaj kostoj ekzemple pere de la interreto povas fortigi malgrandajn lingvojn.

Enkondukante la identeckrean econ de lingvo, ni vidos, ke tiu kontraŭagas al tiuj tendencoj, kaj multlingveco povas daŭre travivi.

La supran priskriban analizon ni uzos kiel elirpunkton por la preskriba analizo. La (mal)justeco de nacia lingvopolitiko kaj de lingvorajtoj de naciaj malplimultoj estos pritraktataj. Ni ankaŭ normative analizos la lingvouzon de organizoj kiel la Eŭropa Unio kaj aliaj internaciaj organizoj.

Economics and language

Abstract

Language serves many functions in the world. Some of the most important are as a means of communication and as a carrier of cultural identity. In those functions, there are many connections between language use, economics, the economy, and sociology. In this lecture and in the subsequent AIS course, we will analyze some aspects of this relationship.

We will treat both positive – descriptive – and normative – prescriptive – aspects of language use.

The point of departure of our descriptive analysis is the communicative value of language use. If a language functions only as a means of communication, it is easy to make a cost-benefit analysis of its use. Individuals derive benefit through contact with other people. Hence, the benefit of a certain language increases as the number of speakers grows with whom one can communicate in that language. On the other hand, the costs of communication generally increase with the distance between the interlocutors or – more generally – with the difficulties of reaching them; this is the cost side of the problem.

There are thus two sides to communication: the value – demand – which depends on the number of people with whom one succeeds in communicating, and the costs – supply – of communicating, which depend on the accessability of the individuals with whom one wants to communicate.

Since the factors influencing those two relationships are different, a third relationship is needed, one that tells us how the the number of individuals within reach of any speaker is related to the structure of communication and to the social structure in general.

Using such a model, we can analyze the language learning and use of a typical individual and the evolution of individual and societal language use. In general, it pays for an individual to learn the biggest language used in his or her surroundings and as a consequence the use of smaller languages in the community is gradually reduced. Globalization leads to an increase in the communication community and hence can lead to a strengthening of a few strong world languages and the disappearance of other, weaker, languages. On the other hand, the reduction of communication costs, for example through the Internet, can strengthen smaller languages.

The introduction of the cultural identity role of language, as we will see, counteracts those tendencies, and multilingualism can permanently survive.

The descriptive analysis above will be used as the point of departure for the prescriptive analysis. We will analyze the (in)justice of national language policies and of the language rights of national minorities. We will also look at the normative aspects of the language use of organizations such as the European Union and other international organizations.

Économie et langue

Résumé

Une langue a de multiples fonctions. Parmi les principales, on peut citer celles de moyen de communication et de porteur d'identité. Dans ces fonctions, il existe de nombreuses connexions entre l'utilisation de la langue, l'économie, la science économique et la sociologie. Lors de cette conférence et du cours de l'AIS qui suivra, nous analyserons quelques aspects de cette interrelation.

Nous traiterons les aspects positifs –descriptifs– et normatifs –prescriptifs– de l'usage de la langue.

Le point de départ de notre analyse descriptive est la valeur communicative de l'usage de la langue. Si une langue ne fonctionne que comme outil de communication, on peut facilement

faire une analyse du rapport coût/profit de son utilisation. On tire un profit du contact avec d'autres personnes. Donc l'utilité d'une langue donnée s'accroît quand s'accroît le nombre de locuteurs à qui on peut parler en utilisant cette langue. D'un autre côté, les coûts de la communication s'accroissent en général avec la distance qui sépare les interlocuteurs ou plus généralement avec les difficultés pour atteindre ces derniers; c'est là l'aspect coût du problème.

Nous avons donc deux aspects de la communication: la valeur –demande– qui dépend du nombre de gens avec qui on réussit à communiquer, et le coût –offre– de la communication, qui dépend de l'accessibilité des gens avec qui l'on veut communiquer.

Comme les facteurs qui influencent ces deux relations sont différents, il nous faut une troisième relation qui décrive comment le nombre de personnes qu'un locuteur peut atteindre est lié à la structure de la communication et à la structure sociale en général.

En utilisant un tel modèle, nous pouvons analyser l'apprentissage et l'utilisation de la langue par un individu type et l'évolution de l'usage de la langue du point de vue individuel et social. En général, pour un individu, il vaut la peine d'apprendre la langue la plus utilisée dans son entourage, et l'utilisation de langues moins importantes se réduit ainsi progressivement dans la communauté. La mondialisation entraîne un agrandissement de la communauté de communication et peut ainsi entraîner le renforcement de quelques langues mondiales fortes et la disparition d'autres langues plus faibles. Au contraire, la diminution des coûts de communication, par exemple au moyen d'Internet, peut renforcer les langues faibles.

En introduisant l'aspect créateur d'identité de la langue, nous verrons que celui-ci contrebalance ces tendances et que le multilinguisme peut continuer à survivre.

Nous utiliserons l'analyse descriptive ci-dessus comme point de départ de l'analyse prescriptive. Nous traiterons la justice (ou l'injustice) des politiques linguistiques nationales et des droits linguistiques des minorités nationales. Nous analyserons aussi de façon normative l'utilisation de la langue par des organisations comme l'Union Européenne et autres organisations internationales.

Economie en Taal

Samenvatting

Taal vervult vele functies in onze wereld. De belangrijkste zijn communicatiemiddel en drager van culturele identiteit. In deze functies zijn er vele verbindingen tussen taalgebruik, economie en sociologie. In deze lezing en in de volgende AIS-cursus zullen we enkele aspecten hiervan analyseren.

Wij betrekken hierbij zowel positieve – descriptieve – als ook normatieve – prescriptieve – aspekten van taalgebruik.

Het vertrekpunt van onze descriptieve analyse is de communicatieve waarde van taalgebruik. Als een taal uitsluitend functioneert als communicatiemiddel, is het eenvoudig een kosten-baten-analyse te maken. Individuen hebben nut uit het contact met anderen. De waarde van een bepaalde taal neemt dus toe, zodra het aantal mensen toeneemt met wie men kan communiceren in die taal. Anderzijds nemen de communicatiekosten over 't algemeen toe met de groeiende afstand tussen de sprekers of – algemener – met de groeiende moeilijkheid hen te bereiken; dit is de kosten-zijde van het probleem.

Communicatie heeft dus twee zijden: de waarde – vraag – die afhangt van het aantal personen met wie men tot communicatie komt en de communicatiekosten – aanbod – die afhangen van de bereikbaarheid der individuen, met wie men wil communiceren.

Daar de factoren, die deze beide relaties beïnvloeden verschillend zijn, is er een derde relatie nodig: één die ons zegt, hoe het aantal individuen dat binnen bereik is van de spreker, samenhangt met de communicatiestructuur en de sociale structuur in het algemeen.

Als we dit model benutten, kunnen we zowel een analyse maken van taalverwerving en taalgebruik van een typisch individu, alsook van de ontwikkeling van individueel en sociaal taalgebruik. In het algemeen is het voor een individu voordelig de grootste taal te leren, die in zijn / haar omgeving gebruikt wordt, en bijgevolg neemt het gebruik van kleinere talen in de samenleving langzamerhand af. Globalisatie leidt tot vergroting van de communicatiegemeenschap en kan dus leiden tot versterking van enkele krachtige wereldtalen en tot het verdwijnen van andere, zwakkere talen. Anderzijds kan de reductie van communicatiekosten, bv via Internet, kleinere talen versterken.

Hierbij de rol betrekken van talen voor de culturele identiteit, geeft, zoals we zien, een tegenwicht aan deze tendenties, en zo kan multilinguisme permanent blijven bestaan.

Bovenstaande descriptieve analyse zullen we gebruiken als uitgangspunt voor een prescriptieve analyse. We zullen de (on)rechtvaardigheid analyseren van nationale taalpolitiek evenals de taalrechten van nationale minderheden. We zullen ook kijken naar de normatieve aspecten van taalgebruik binnen de Europese Unie en andere internationale organisaties.

Ekonomiko kaj lingvo

Bengt-Arne Wickström
Institut für Finanzwissenschaft
Humboldt-Universität zu Berlin
wickstr@wiwi.hu-berlin.de

1 Enkonduko

Ekzistas en la literaturo multaj ekonomikaj kaj sociologiaj analizoj de lingvo kaj lingvouzo. Unuj rigardas la pozitivajn – priskribajn – aspektojn de lingvouzo.[1] Aliaj interesiĝas pri normativaj – preskribaj – flankoj.[2] Krome ekzistas multaj analizoj de lingva politiko kaj de ekonomikaj aspektoj de lingvistiko; tiujn ni ne pitraktos ĉi-tie.

Elirpunkto de nia priskriba analizo estas la komunikila valoro de la uzo de lingvo. Se lingvo nur funkcias kiel komunikilo, oni facile povas fari kosto-utilo-analizon de ĝia uzo. Homoj ricevas utilon pere de la kontakto kun aliaj homoj. Do, la utilo de certa lingvo kreskas, kiam kreskas la nombro de parolantoj, kiujn oni povas alparoli pere de tiu lingvo. Aliflanke oni havas lernokostojn. Kiun lingvon homo lernas do dependas inter alie de le diferencoj inter la utilo de la scipovo de la ligvo kaj la kostos por lerni ĝin.

Uzante tian modelon, ni povas analizi la lingvolernadon kaj lingvouzon de tipa individuo kaj la evoluon de la individua kaj socia lingvouzo. Ĝenerale, por individuo indas lerni la plej grandan lingvon uzatan en sia ĉirkaŭaĵo, kaj la uzo de malgrandaj lingvoj tiel reduktiĝas en la komunumo. Enkondukante la identeckrean econ de lingvo kaj la pludonadon de ĝi pere de la familio, ni vidos, ke tiu kontraŭagas al tiuj tendencoj, kaj multlingveco povas daŭre travivi.

La saman individuan elirpunkton ni ankaŭ uzos por la preskriba analizo. La (mal)justeco de nacia lingvopolitiko kaj de lingvorajtoj de naciaj malplimultoj estas analizitaj komparante la valoron de propra lingvo al individuo kun la kostoj por rajtigi al individuo ĝian uzon.

2 Pozitiva analizo

La elirpunkto de la analizo estas la individuo. Ni klopodas modeli la situacion de tipa individuo kaj ties decidojn kaj agojn en tia situacio. La individuo simple rigardas sian ĉirkaŭaĵon kiel donitaĵon kaj decidas, kion fari, komparante utilon kaj kostojn de la eblaj elektoj. Sur pli alta analiza ebeno la agoj de la individuoj adicias al kolektivaj ecoj de la socio. Tiuj ecoj denove influas la sindetenon de la indviduoj. Ni do havas proceson rilatantan la indiviuajn elektojn kaj la sociajn kondiĉojn. La ekvilibro de tiu proceso finfine estas la stabila socia strukturo, kiu interesas al ni kaj kiun ni volas ekspliki.

Parolante pri lingvouzo, la individua elekto de lingvo dependas de la lingvoj ĝenerale uzataj en la socio, sed aliflanke la lingvoj uzataj estas funkcio de la individuaj elektoj. La ekvilibrio do estas socia situacio kun stabila lingvouzo.

[1] Kelkajn superrigardojn oni trovas en ekzemple [1], [2], [6], [7], [15], [19] kaj [31].
[2] Vidu ekzemple [11], [16], [18], [25] kaj [34]

2.1 Simpla dinamika proceso

2.1.1 Lingvo nur kiel komunikilo

Ni imagu, ke en socio ekzistas du lingvoj, A kaj B, kaj tri lingvogrupoj, la uzantoj de lingvo A la uzantoj de lingvo B kaj la dulingvanoj, kiuj regas ambaŭ lingvojn. La grandeco de la tri grupoj estu N_A, N_B kaj N_C, kaj sume N individuoj vivas en la socio:

$$N_A + N_B + N_{AB} = N. \tag{2.1}$$

Utilo Nia unua elirpunkto estas, ke lingvo nur servas kiel komunikilo. Do, la utilo de iu lingvo al individuo dependas de kun kiom da inividuoj ĝi povas komuniki pere de tiu lingvo. Formale ni skribas:

$$u_L = f(n_L), \tag{2.2}$$

kie u_L estas la valoro al individuo de la kono de lingvo L, kaj n_L estas la nombro de individuoj, kiuj scipovas komuniki en la lingvo L. La funkcio f estas konkava kaj kreskanta.

Lernokostoj La lernokostoj de la lingvoj estu c_A, c_B kaj c_{AB} por fariĝi dulingvano. Ĉi tie ni supozu, ke

$$c_A = c_B < c_{AB}. \tag{2.3}$$

En aliaj vortoj: la lernado de ĉiu de la du lingvoj estas same facila, kaj la lernado de ambaŭ estas pli kosta ol la lernado de unu sola.

Dinamiko Ni starigu la demandon, kiun elekton de lingvoj faras individuo enirante tiun socion. Se ĝi komparas kostojn kaj utilon, ĝi trovas la sekvan netan utilon, v_L de lernado de unu aŭ ambaŭ de la lingvoj:

$$v_A = f(N_A + N_{AB}) - c_A \tag{2.4}$$
$$v_B = f(N_B + N_{AB}) - c_B \tag{2.5}$$
$$v_{AB} = f(N) - c_{AB} \tag{2.6}$$

Se unu de la unulingvanaj grupoj estas pli granda ol la alia, diru $N_A > N_B$, $v_A > v_B$ kaj neniu entranta individuo eklernos la lingvon B. Tiu signifas, ke post iom da tempo, kiam formortis la malnovaj generacioj, ni ne plu havos unulingvanoj en la lingvo B. En tia situacio $N = N_A + N_{AB}$. Ĉar la kostoj c_{AB} pli grandas ol la kostoj c_A, v_A estas pli granda ol v_{AB}, kaj neniu noventranto nun fariĝos dulingva. Post sufiĉa tempo ĉiuj dulingvanoj formortintos, kaj la socio estos unulingva en la lingvo A.

Do, nur du ekvilibroj povas ekzisti en tia socio: aŭ ĉiuj homoj estas unulingvaj en lingvo A aŭ ĉiuj estas unulingvaj en lingvo B.

2.1.2 Influo de gepatroj: identeca valoro de lingvo

La supera rezulto ŝanĝiĝas, se ni pripensas la faktojn, ke la lernokostoj dependas de la lingvo(j) de la gepatroj kaj ke la gepatroj ricevas utilon de tio, ke ilian lingvon uzas la infanoj kaj postaj generacioj. Tio signifas, ke la lernokostoj kaj la utilo dependas de la lingvo de la gepatroj: se unu aŭ ambaŭ gepatro(j) estas A-lingvano(j), la lernokostoj de la lingvo A estas pli malgrandaj ol de la lingvo B kaj inverse en la mala kazo:

$$c_A(A, A) = c_A(A, B) < c_B(A, A) \tag{2.7}$$
$$c_A(B, B) > c_B(A, B) = c_B(B, B) \tag{2.8}$$

Simile, ni devas aldoni kroman utilon, b_L – la identecan valoron – se la infanoj lernas la lingvon de (unu de) la gepatroj. Tiam ni povas por tipa familio havi la sekvan situacion, se N_A kaj N_B ambaŭ estas sufiĉe grandaj kaj $N_A > N_B$:

$$\begin{aligned} v_A(A,A) &= f(N_A + N_{AB}) - c_A(A,A) + 2b_A && (2.9)\\ &> v_B(A,A) = f(N_B + N_{AB}) - c_B(A,A) && (2.10)\\ v_B(B,B) &= f(N_B + N_{AB}) - c_B(B,B) + 2b_B && (2.11)\\ &> v_A(B,B) = f(N_A + N_{AB}) - c_A(B,B) && (2.12)\\ v_A(A,B) &= f(N_A + N_{AB}) - c_A(A,B) + b_A && (2.13)\\ &> v_B(A,B) = f(N_B + N_{AB}) - c_B(A,B) + b_B && (2.14) \end{aligned}$$

Por la A-familioj indas eduki la infanojn kiel A-lingvanoj, kaj la B-familioj elektas la lingvon B por siaj infanoj. Tamen la miksitaj familioj preferus la lingvon A al la lingvo B por siaj infanoj, se $b_A = b_B$. Tio signifas, ke ankaŭ ĉi-tie post sufiĉe da tempo la B-lingvanoj malaperos pere de la miksitaj familioj, kiuj elektas la lingvon de la plejmulto por siaj infanoj. Tiu formortigo de la minoritata lingvo nur povas haltiĝi, se sufiĉe da infanoj estas edukataj kiel dulingvanoj; tio estas, se por sufiĉe da familioj

$$v_{AB}(A,B) = f(N) - c_{AB}(A,B) + b_A + b_B > v_A(A,B) = f(N_A + N_{AB}) - c_A(A,B) + b_A \qquad (2.15)$$

kaj simile por familioj kun dulingvaj gepatroj.

2.2 Ekvilibroj

Tiu ĉi problemo estas detale analizita en [33]. La analizo montras, ke la sindeteno de la dulingvaj familioj plej gravas por la daŭra pluekzisto de dulingva socio. Ĉefe kvar tipoj da daŭraj ekvilibroj povas ekzisti:

- unulingvaj socioj (ekzemple Islando)
- socioj de unulingvanoj en unu lingvo kaj dulingvanoj (ekzemple Kimrio)
- socioj de unulingvanoj en ambaŭ lingvoj kaj dulingvanoj (ekzemple Bruselo)
- socioj de nur dulingvanoj (ekzemple germanlingva Svisio)

3 Normativa analizo

Normativa analizo – kiel pozitiva analizo – baziĝu sur individuoj kaj individuaj deziroj aŭ preferoj. La elirpunkto do devas baziĝi sur la deziroj de ĉiuj individuoj de la socio. Tio nomiĝas metodologia individueco. Kroma postulo de teorio de justeco estas ia formo de baza egaleco de ĉiuj homoj. Por ni ĉi-tie tio signifas ke ili havu la samajn rajtojn. Tio estos ankaŭ nia elirpunkto por analizi justajn distribuojn de lingvaj rajtoj. Krome, ni akceptu libervolajn interŝanĝojn. Se homoj libervole konsentas al interŝanĝo unu kun la aliaj, tio devas signifi, ke ĉiu partoprenanto en la interŝanĝo plibonigas sian propran situacion. Alivorte ni diras, ke individuoj scias siajn proprajn interesojn kaj povas kalkuli la resultojn de siaj agoj.[3]

Surbaze de tiuj postuloj – metodologia individueco kaj baza egaleco – oni povas trovi kriteriojn por justeco kaj uzi tiujn por taksi sociajn situaciojn. Ofte tiaj kriterioj estas prezentataj en formo de "bonfartofunkcio". Maksimumante bonfartofunkcion komparante ĉiujn eblajn sociajn statojn, oni trovas socian optimumon, kiu do estas la plej justa ebla stato de la socio.

[3]Por ĝenerala analizo de ekonomikaj teorioj de justeco vidu ekzemple [32]

3.1 Mallongtempa kaj dinamika analizoj

La unua prolemo, kiun ni renkontas, estas, ke en dinamika analizo la individuoj ŝanĝiĝas. Maljunaj homoj forlasas la socion kaj junaj homoj eniras ĝin. La lingvaj preferoj de la individuoj estas fiksitaj pere de la edukado, kiun grandparte determinas la gepatroj surbaze de la lingvouzo de la socio, kiel ni vidis en la supra, priskriba analizo. Tio tamen signifas, ke optimuma lingva politiko en la nuno nenecese estas optimuma el dinamika vidpunkto.

Pripensu simplan ekzemplon: Se lingvo nur havas komunikan valoron, optimuma situacio en la socio devas esti, ke nur unu lingvo ekzistas, kiun ĉiuj uzas. Tiel komunikaj kostoj estas minimumaj. En socio kun multaj lingvogrupoj la optimuma mallongtempa politiko povas esti subteno de malgrandaj lingvoj kaj helpo al ties parolantoj, tiel ke ili ne havu grandajn komunikajn kostojn. Tiu tamen malhelpas la ŝanĝiĝon kaj evoluon de la socio en la direkto de unulingveco, kiu estus longtempe optimuma, se lingvo nur havas komunikan valoron. Do, la probemo estas trovi optimuman vojon al unulingveco komparante la netajn utilojn de malsamaj generacioj. Serĉante tian vojon, optimuma politiko estus la influado de la lingvoelekto de gepatroj por siaj infanoj en la direkto de la plej granda lingvo.

Similan, sed iom pli gravan, problemon ni havas, se lingvouzo havas valoron en si mem aldone al la komunika valoro kaj tiu valoro devenas de la alta taksado de la propra lingvo pere de la uzantoj. Tiam multaj dinamike stabilaj situacioj povas esti optimumaj. En socio kun nur unu lingvo la uzantoj alte taksas nur ĝin kaj ne havas kialon deziri alian situacion. En multlingva socio en dinamika ekvilibro evaluita laŭ la samaj kriterioj la normativa analizo povas konkludi, ke ankaŭ tiu situacio estas optimuma. Kio estas optimuma dependas de la preferoj de la individuoj kaj multaj malsimilaj situacioj povas esti optimumaj, ĉar la preferoj dependas de la ekvilibra lingvouzo. La kriterioj uzendaj por la taksado ne estas eksteraj, sed dependas de la situacio kaj ŝanĝiĝas, kiam ŝanĝiĝas la situacio. Oni povas diri, ke klasika normativa analizo ĉi-tie estas serĉo de stabila ekvilibro en la distribuo de preferoj, kiu dependas de la ekvilibro en lingvouzo.

Por la longtempa optimumo ni tamen povas trovi kelkajn konkludojn. Do, longtempe optimuma situacio, se lingvo havas nur komunikan valoron, estas unulingva socio. Se lingvo havas ankaŭ identeckrean, emocian valoron por ĝiaj uzantoj, povas ekzisti multaj longtempe optimumaj situacioj: unulingva kaj multlingva socioj povas ĉiuj esti optimumaj. Se krome la individuoj havas preferojn por lingve miksita ĉirkaŭaĵo, tio estas, se por individuoj multlingva socio havas valoron en si mem, unulingva socio ne necese povas esti optimuma kaj nur multlingva mondo estas la plej bona mondo.

Tiuj resultoj tamen dependas de la kostoj de multlingveco. En la normativa analizo oni devas kompari la kostojn de multlingveco kun la preteco de la individuoj por pagi por ĝi. Situacio nur estas optimuma, se ne eblas organizi libervolan interŝanĝon, tiel ke la individuoj estas kompensataj pere de la malpliigitaj kostoj pro la perdo de iu lingvo en la socio.

3.2 Lingvaj rajtoj

Ni nun limigu nin al statika situacio de socio kun grupoj de parolantoj de malsamaj lingvoj. Por faciligi la analizon ni imagu socion de du grupoj: la parolantoj de plimulta lingvo A kaj la parolantoj de minoritata lingvo B. La grandeco de la du grupoj estu N_A kaj N_B. Ni konsideru la rajton uzi la lingvon sur specifa socia kampo. Ekzemploj de tiaj kampoj estas:

- kortumoj
- stratsignoj
- edukado
- oficialaj informoj

Nun supozu, ke tipa individuo pretas pagi sumon p_L^k por la rajto uzi sian lingvon L sur kampo k. La kostoj por la socio, kiujn kaŭzas la rajto uzi lingvon L sur kampo k, estu c_L^k.

3.2.1 Du elirpunktoj

Ni povas pritrakti du polusajn elirpunktojn por nia analizo.

Liberala vidpunkto La liberala vidpunkto estas, ke ĉiu homo rajtas uzi sian lingvon sur ĉiuj sociaj kampoj. Samtempe la individuoj principe povas libervole forvendi tiujn rajtojn. Tiu signifas, ke se por iu lingvo sur iu kampo tiu rajto ne estas realigata, la parolantoj de la lingvo devas esti tiom kompensataj, ke tipa individuo ricevu minimume sian pagpretecon p. Tiel ĝi preferus la novan situacion sen rajto al la origina kun la rajto.

Absolutista vidpunkto El absolutista vidpunkto praaj rajtoj ne ekzistas. La individuoj devas aĉeti ilin. Alie dirite, por la estigo de la rajto uzi lingvon L sur kampo k tipa individuo devas pagi minimume sian parton de la kostoj. Se tiu pago malsuperas la pagpretecon p, tio estus libervola ŝanĝo en la socia situacio, kaj la rajto estus enkondukita.

3.2.2 (Kompens)pagoj kaj lingvaj rajtoj

Por trovi la optimuman asignadon de lingvaj rajtoj, ni devas eltrovi, ĉu eblas libervola ŝanĝo for de la origina stato. Ni simple devas kompari la pagpretecojn kun la kostoj. Se en la liberala kazo la suma pagpreteco de la parolantoj de lingvo L por la rajto uzi ĝin sur kampo k superas la sociajn kostojn, libervola ŝanĝo ne eblas kaj la rajto restu. En la mala kazo oni forigu la rajton kaj kompensu la homojn per minimume la suma pagpreteco entute.

La suma pagpreteco por la rajto uzi L sur kampo k estas $N_L p_L^k$, kaj la ŝparitaj kostoj c_L^k. Do, la rajton oni realigu, se

$$p_L^k > \frac{c_L^k}{N_L}, \tag{3.1}$$

kaj se

$$p_L^k < \frac{c_L^k}{N_L}, \tag{3.2}$$

oni ne religu la rajton. Oni pagu averaĝan kompenson s_L^k,

$$p_L^k < s_L^k < \frac{c_L^k}{N_L}, \tag{3.3}$$

al la parolantoj de L. Tio estas, por ke ĉiuj en la socio gajnu de la ŝanĝo, la kompenso devas kuŝi inter la pagpreteco kaj la ŝparitaj kostoj de la socio.

En la absolutista kazo oni enkonduku rajton, se

$$p_L^k > \frac{c_L^k}{N_L}, \tag{3.4}$$

kaj ne, se

$$p_L^k < \frac{c_L^k}{N_L}. \tag{3.5}$$

Denove, se ĉiuj en la socio gajnu de la ŝanĝo, se la rajto enkondukitas, la L-lingvanoj averaĝe pagu por ĝi t_L^k,

$$\frac{c_L^k}{N_L} < t_L^k < p_L^k. \tag{3.6}$$

Oni do pagu minimume la kostojn por la socio de la enkonduko de la rajto kaj maximume sian pagpretecon. Tiel ĉiuj gajnas kompare al la origina stato.

3.2.3 Optimumaj lingvaj rajtoj

La kondiĉo por realigo de rajto estas, kiel ni vidis,

$$p_L^k > \frac{c_L^k}{N_L}. \tag{3.7}$$

Por scii, kiujn rajtojn oni realigu, ni devas analizi tion esprimon. Ni povas supozi, ke p ne tro ŝanĝiĝas, kiam N ŝanĝiĝas, do la interesa demando estas, kio okazas al c, kiam ŝanĝiĝas N.

En kelkaj kazoj la kostoj ne dependas de la nombro de parolantoj. Tipan tian situacion ni trovas en publikaj servoj, kie ekzemple bezonatas en ĉiu oficino unu persono parolanta la lingvon sendepende de tio, ĉu unu aŭ dek aŭ cent personoj deziras interagi en la lingvo. La situacio samas koncerne ekzemple ŝildojn kun stratnomoj aŭ oficialajn eldonaĵojn. En tiaj situacioj la kondiĉo por realigo de rajto estas plenumita se la nombro de parolantoj estas sufiĉe granda. Ekzistas kritika grandeco N_L^{k*}, tiel ke, se N_L superas N_L^{k*}, la rajto uzi lingvon L sur kampo k estu realigita.

En multaj aliaj kazoj c estas pli malpli proporcia al N. Tiam la dekstra flanko de la malegaleco ne dependas de N, kaj ni povas supozi, ke la kondiĉo estas sendependa de lingvo, se la pagpreteco de la lingvogrupoj ne tro malsamas. Ekzemplo de tio estas edukado. Se ekzistas sufiĉe da parolantoj por plenigi la minimuman grandecon de lernejaj klasoj ĉiujare, la kostoj de la lernejo estas pli malpli proporciaj al la nombro de lernantoj. Do, en la kazo de edukado ni povas konkludi, ke ĉiuj lingvogrupoj havu la samajn rajtojn sendepende de ilia grandeco.

4 Konkludoj

En tiu-ĉi prelego ni nur tuŝis malmultajn flankojn de la ekonomika analizo de lingvouzo. La celo simple estis prezenti kelkaj ekzemploj de la interkonektoj inter ekonomiko kaj lingvouzo en socio.

Alia interesa kampo estas la analizo de interkonektoj inter ekonomio kaj lingvo. Ekzemple la influo de lingvo sur la labormerkato estas abunde analizita en la literaturo.[4]

Tre interesa temo estas ankaŭ la ekonomika analizo en la lingvistiko. Tio estas analizo de la strukturo kaj interna evoluo de lingvoj pere de ekonomika metodologio. Al tio ankaŭ apartenas la konstruado kaj kurposa kaj struktura planado de la lingvo mem. Unu demando estas, ĉu oni povas konstrui optimuman lingvon, kaj, se jes, kiel ĝi aspektu.[5]

Tio tamen estas temo por alia prelego.

Citaĵoj

[1] Bourdieu, Pierre: *Ce que parler veut dire : L'économie des échanges linguistiques.* Librairie Arthème Fayard, Paris, 1982.

[2] Breton, Albert (redaktoro): *Economic approaches to language and bilingualism.* New Canadian Perspectives. Department of Canadian Heritage, Ottawa, 1998.

[3] Chiswick, Barry R. kaj Paul W. Miller: *The endogeneity between language and earnings : International analyses.* Journal of Labor Economics, 13 :246–288, 1995.

[4] Chiswick, Barry R. kaj Paul W. Miller: *English language fluency among immigrants in the United States.* Working paper, 1997.

[4] Vidu ekzemple [3], [5], [4], [8], [9], [10], [12], [13], [14], [17], [22], [23], [26], [28], [29], [30] aŭ [35].

[5] Tiajn analizojn oni trovas en ekzemple [20], [21], [24] kaj [27].

[5] Chiswick, Barry R. kaj Gaston Repetto: *Immigrant adjustment in Israel : Literacy and fluency in Hebrew and earnings.* En Djajic, Slobodan (redaktoro) : *International migration : Trends, policy and economic impact*, paĝoj 204–228. Routledge, New York, 2001.

[6] Church, Jeffrey kaj Ian King: *Bilingualism and network externalities.* Canadian Journal of Economics/Revue canadienne d'économique, 26 :337–345, 1993.

[7] Dalmazzone, Silvana: *Economics of language : A network externalities approach.* En Breton, Albert (redaktoro) : *Exploring the economics of language*, In the series *New Canadian Perspectives.*, paĝoj 63–87. Department of Canadian Heritage, Ottawa, 1999.

[8] Drinkwater, S. J. kaj N. C. O'Leary: *Unemployment in Wales : Does language matter ?* Regional Studies, 31 :583–591, 1997.

[9] Dustmann, Christian kaj Francesca Fabbri: *Language proficiency and labour market performance of immigrants in the UK.* IZA Discussion Paper No. 156, 2000.

[10] Dustmann, Christian kaj Arthur Van Soest: *Language fluency and earnings : Estimation with misclassified language indicators.* Review of Economics and Statistics, 83 :663–674, 2001.

[11] Fidrmuc, Jan kaj Victor Ginsburgh: *Languages in the European Union : The quest for equality and its cost.* European Economic Review, 51 :1351–1369, 2007.

[12] Ginsburgh, Victor kaj Juan Prieto-Rodriguez: *Returns to languages in EU labor markets.* Working Paper, 2006.

[13] Grenier, Gilles: *The effect of language characteristics on the wages of Hispano-American males.* The Journal of Human Resources, 19(1) :35–52, Winter 1984.

[14] Grenier, Gilles: *Earnings by language group in Quebec in 1980 and emigration from Quebec between 1976 and 1981.* The Canadian Journal of Economics, 20(4) :774–791, November 1987.

[15] Grin, François: *The economics of language : Survey, assessment, and prospects.* International Journal of Sociology of Language, 121 :17–44, 1996.

[16] Kontra, Miklós, Robert Phillipson, Tove Skutnabb-Kangas kaj Tibor Várady (redaktoroj): *Language : a right and a resource : Approaching linguistic human rights.* Central European University Press, Budapest, 1999.

[17] Kossoudji, Sherrie A.: *English language ability and the labor market opportunities of Hispanic and East Asian immigrant men.* Journal of Labor Economics, 6(2) :205–228, April 1988.

[18] Kymlicka, Will kaj Alan Patten (redaktoroj): *Language rights and political theory.* Oxford University Press, Oxford, 2003.

[19] Lamberton, Donald M. (redaktoro): *The economics of language.* Edward Elgar, Cheltenham, 2002.

[20] Lo Jacomo, François: *Optimization in language planning.* En Schubert, Klaus (redaktoro) : *Interlinguistics : Aspects of the science of planned languages*, paĝoj 121–128. Mouton de Gruyter, Berlin, 1989.

[21] Martinet, André: *Économie des changements phonétiques.* A. Francke AG Verlag, Bern, 1955.

[22] McManus, Walter, William Gould kaj Finis Welch: *Earnings of Hispanic men : The role of English language proficiency.* Journal of Labor Economics, 1(2) :101–130, April 1983.

[23] McManus, Walter S.: *Labor market costs of language disparity : An interpretation of Hispanic earnings differences.* The American Economic Review, 75(4) :818–827, September 1985.

[24] Pool, Jonathan: *The economics of artificial languages : Thoughts on the problem of cost minimization.* En Hartig, M. (redaktoro) : *Angewandte Soziolinguistik*, paĝoj 155–164. Gunter Narr Verlag, Tübingen, 1981.

[25] Pool, Jonathan: *Optimal language regimes for the European Union.* International Journal of the Sociology of Language, 121 :159–179, 1996.

[26] Rendon, Sílvio: *The Catalan premium : Language and employment in Catalonia.* Journal of Population Economics, 20 :669–686, 2007.

[27] Schubert, Klaus: *Optimumigo de la internacia komunikado : Interlingvistika rigardo al la nova industria lingvokonstruado.* En Fiedler, Sabine kaj Haitao Liu (redaktoroj) : *Studoj pri interlingvistiko*, paĝoj 172–183. Kava-Pech, Dobřichovice, 2001.

[28] Shapiro, Daniel M. kaj Morton Stelcner: *Male-female earnings differentials and the role of language in Canada, Ontario, and Quebec, 1970.* The Canadian Journal of Economics, 14(2) :341–348, May 1981.

[29] Sproull, Alan: *Regional economic development and minority language use : The case of Gaelic Scotland.* International Journal of Sociology of Language, 121 :93–117, 1966.

[30] Tainer, Evelina: *English language proficiency and the determination of earnings among foreign-born men.* The Journal of Human Resources, 23(1) :108–122, Winter 1988.

[31] Vaillancourt, François (redaktoro): *Économie et langue : Recueil de texte.* Éditeur officiel du Québec, Québec, 1985.

[32] Wickström, Bengt-Arne: *Ekonomiaj teorioj pri justeco.* Scienca revuo, 39:3–16, 1988.

[33] Wickström, Bengt-Arne: *Can bilingualism be dynamically stable ? A simple model of language choice.* Rationality and Society, 17(1) :81–115, 2005.

[34] Wickström, Bengt-Arne: *Fairness, rights, and language rights: On the fair treatment of linguistic minorities.* En Baake, Pio kaj Rainald Borck (redaktoroj): *Public Economics and Public Choice*, paĝoj 81–101. Springer, Berlin, 2007.

[35] Williams, Donald R.: *The economic returns to multiple language usage in Western Europe.* IRISS Working Paper 2006-07, CEPS/INSTEAD, 2006.

La mirinda mondo de la parolsonoj

John Wells
Emerita profesoro de fonetiko en UCL (Universitato de Londono). Inter liaj verkoj estas *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary* kaj *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* kaj, en la angla, *Accents of English*, *Longman Pronunciation Dictionary* kaj *English Intonation: an Introduction*. Li estas prezidanto de la Akademio de Esperanto, membro de la Brita Akademio, kaj eksprezidanto de UEA.

Resumo

La parolsonoj de la lingvoj de la mondo prezentas riĉan mozaikon. Kelkaj sonoj troviĝas en ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu lingvo, ekzemple [m, a, s]; aliaj en multaj lingvoj sed ne ĉiuj, ekz-e [ɓ, ɠ, ʃ]; ankoraŭ aliaj en nur malmultaj lingvoj, ekz-e [ʘ, ǥ, ɕʷ].

Oni klasifikas la konsonantojn laŭ tri ĉefaj dimensioj: voĉeco, estiĝloko, kaj estiĝmaniero. La du th-sonojn de la angla [θ, ð] havas malsaman voĉecon. La gl-sono de la itala, [ʎ], havas interesan estiĝlokon, kiel ankaŭ la sj-sono de la sveda, [ɧ]. La ř-sono de la ĉeĥa havas nekutiman estiĝmanieron.

Ekzistas diversaj manieroj krei la aerfluon necesan por la parolo. Ne nur la pulmoj povas fari tion (kiel por ĉiuj sonoj de Esperanto), sed ankaŭ la faringo aŭ la buŝo mem. Tiel estas farataj la ejektivoj de la kartvela, la injektivoj de la haŭsa, kaj la klakoj de la zulua.

Vokalojn oni klasifikas laŭ vasteco, antaŭeco, kaj rondeco. Oftaj en Eŭropo, sed maloftaj en la mondo, estas rondaj antaŭaj vokaloj, ekz-e la [ø] de la franca kaj germana. Nerondaj malantaŭaj vokaloj estas eĉ pli maloftaj, ekz-e la [ɯ] de la korea. Nazaj vokaloj estas specialaĵo de i.a. la franca kaj la pola.

La preleganto mem demonstros ĉiujn menciitajn sontipojn.

The wonderful world of speech sounds

Abstract

The sounds found in languages around the world are a complex mosaic. Some sounds are to be found in all, or almost all, languages, for example [m, a, s]; others in many languages but not in all, e.g. [ɓ, ɠ, ʃ]; others again in only a small number of languages, e.g. [ʘ, ǥ, ɕʷ].

Consonants are classified along three principal dimensions: voicing, place of articulation, and manner of articulation. The two th sounds of English, [θ, ð], differ in voicing. The Italian gl sound, [ʎ], has an interesting place of articulation, as does the Swedish sj sound, [ɧ]. The Czech ř sound has an unusual manner of articulation.

There are various ways of initiating the airstream needed for speech. This can be done not only by the lungs (as is the case with all the speech sounds of English and Esperanto), but also by the pharynx or the oral cavity itself. This is the explanation for the ejectives of Georgian, the implosives of Hausa, and the clicks of Zulu.

Vowels are classified in terms of tongue height, tongue advancement, and lip rounding. Front rounded vowels such as French and German [ø] are found in several European languages but are otherwise rather rare. Back unrounded vowels, such as Korean [ɯ], are even rarer. In a few languages, for example French and Polish, there are nasalized vowels.

The lecturer will give a live demonstration of all the sound types discussed.

Le monde merveilleux des sons

Résumé

Les sons des différentes langues du monde présentent une riche mosaïque. Certains sons se trouvent dans toutes les langues ou presque, par exemple [m, a, s]; d'autres dans de très nombreuses langues, mais pas dans toutes, par exemple [ɓ, ɠ, ʃ]; d'autres encore dans seulement quelques langues, par exemple [ʘ, ɠ, ɕʷ].

On classe les consonnes selon trois dimensions principales: le voisement, le lieu d'articulation et le mode d'articulation. Les deux sons th de l'anglais [θ, ð] ont un voisement différent. Le son gl de l'italien, [ʎ], a un lieu d'articulation intéressant, comme également le son sj du suédois [ɧ]. Le son ř du tchèque a un mode d'articulation inhabituel.

Il existe différentes façons de créer le flux d'air nécessaire à la parole. Ce ne sont pas seulement les poumons qui peuvent le produire (comme pour tous les sons de l'espéranto) mais également le pharynx ou la bouche elle-même. C'est ainsi que sont produits les éjectives du géorgien, les injectives du haoussa et les clics du zoulou.

On classe les voyelles selon l'aperture, l'antériorité et l'arrondissement. Fréquentes en Europe mais rares dans le reste du monde sont les voyelles arrondies antérieures, par exemple le [ø] du français et de l'allemand. Les voyelles non arrondies postérieures sont encore plus rares, par exemple le [ɯ] du coréen. Les voyelles nasales sont une spécialité, entre autres, du français et du polonais.

Le conférencier démontrera lui-même tous les types de sons mentionnés.

De wondere wereld der klanken

Samenvatting

De klanken van de talen der wereld vormen een rijk mozaïek. Sommige klanken komen in elke of bijna elke taal voor, bijvoorbeeld [m, a, s]; andere in vele maar niet in alle talen, bv [ɓ, ɠ, ʃ]; weer andere in slechts weinig talen, bv [ʘ, ɠ, ɕʷ].

Men classificeert de medeklinkers volgens de drie belangrijkste dimensies: zijn ze stemhebbend of stemloos, waar en hoe worden ze gevormd. De beide th-klanken in het Engels [θ, ð] verschillen in het eerste. De gl-klank van het Italiaans, [ʎ], heft een interessante plaats waar hij gevormd wordt, evenals de sj-klank in het Zweeds, [ɧ]. De Tsjechische ř-klank heeft een ongebruikelijk wijze van vorming.

Er bestaan allerlei manieren om de luchtstroom te creeëren die noodzakelijk is om te spreken. Niet alleen de longen kunnen dat bepalen (zoals bij alle klanken van het Esperanto), maar ook de keelholte en de mond zelf. Zo ontstaan de ejektieven (plofferklanken) van het Georgisch, de injektieven van het Hausa en de klakgeluiden van de Zulutaal.

Vocalen classificeert men naar lengte, naar plaats van ontstaan en naar rondheid. In Europa vaak, maar in de wereld als geheel minder vaak voortkomend zijn ronde vooraan gevormde vocalen, bv de [ø] van het Frans en het Duits. Niet-ronde achter gevormde vocalen

zijn nog zeldzamer, bv de [ɯ] van het Koreaans. Neusklinkers zijn eigen aan o.a. het Frans en het Pools.

De spreker zal zelf alle genoemde klanktypes demonstreren.

La mirinda mondo de la parolsonoj

La parolsonoj de la lingvoj de la mondo prezentas riĉan mozaikon. En ĝenerala fonetiko oni studas principe ĉiujn parolsonojn de ĉiuj lingvoj de la homaro. Kvankam iuj sonoj povas ŝajni al ni strangaj aŭ ekzotikaj, per praktika studado oni povas lerni rekoni kaj reprodukti ilin.

Ni konsideru la homajn parolsonojn el la vidpunkto de la universalaĵoj de lingvo. Ekzistas parolsonoj, kiuj troviĝas en ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu lingvo, ekzemple [m, a, s]. Ekzistas aliaj sonoj, kiuj troviĝas en multaj lingvoj sed ne ĉiuj, ekz-e [b, g, ʃ] (la lasta prezentas la *ŝ* de Esperanto). Ankoraŭ aliaj sonoj troviĝas en nur malmultaj lingvoj. Ili estas la "maloftaj sonoj". Inter ili troviĝas

- la klakoj, ekzemple [ʘ]
- la lipvelaj sonoj, ekzemple [k͡p]
- la faringosonoj, ekzemple [ħ]
- la *th*-sonoj, ekzemple [θ]
- la ejektivoj kaj injektivoj, ekzemple [k', ɓ]
- kaj amaso da sonoj kun duobla aŭ duaranga artikulacio, ekzemple [ɕʷ].

La mapo (el *World Atlas of Linguistic Structures,* http://wals.info) montras kie troviĝas lingvoj kun iuj el tiaj maloftaj sonoj.

○ neniuj

◆ klakoj
■ faringaj sonoj
● *th*-sonoj

Tamen, antaŭ ol diskuti tiujn sonojn pli detale, ni devas konatiĝi kun la fonetika klasado de la sonoj de la homa parolo.

La konsonantojn oni klasas laŭ tri ĉefaj dimensioj: **voĉeco**, **loko** de artikulacio, kaj **maniero** de artikulacio.

Voĉa konsonanto estas prononcata kun vibrantaj voĉkordoj. Ekzemple, la difereno inter [f] kaj [v] estas jena, ke kiam oni prononcas [f] la voĉkordoj ne vibras sed lasas la aeron pasi seninterrompe; sed kiam oni prononcas [v] la voĉkordoj vibras. Vibrado de la voĉkordoj estas rapida fermiĝado/malfermiĝado, el kiu estiĝas la voĉo.

Konante la diferencon inter voĉa kaj senvoĉa kaj akirinte la kapablon ŝalti kaj malŝalti voĉecon laŭbezone, oni povas facile ekposedi diversajn novajn sonojn.
La du *th*-sonojn de la angla [θ, ð] havas malsaman voĉecon. Se oni kapablas fari [θ], estas facile per aldono de voĉeco fari [ð]. Se oni kapablas fari [x] (la sonon de *ĥ* en Esperanto), oni povas lerni [ɣ], kiel en la greka vorto ['ɣala] ‘lakto’.

Inter la konataj **lokoj** de articulacio estas la lipaj sonoj [p, b, m]; la dentaj aŭ alveolaj [t, d, n]; kaj la velaj [k, g, ŋ]. (Tiu [ŋ], vela naza sono, estas la lasta konsonanto en la angla vorto *thing* [θɪŋ] kaj unu el la eblaj sonoj en la esperanta vorto *dankon* ['daŋkon].)

Sed ekzistas diversaj aliaj eblaj lokoj de artikulacio. La Esperanta *j* estas palata. Multaj lingvoj havas nazan sonon kun la sama loko, kiel la hispana *ñ*, fonetika simbolo [ɲ]. La *gl*-sono de la itala, [ʎ], estas palata lateralo (flanksono), kaj tiu sono estas relative malofta en la mondo. Alian interesan lokon de artikulacio havas la *sj*-sono de la sveda, [ɧ], kiu kombinas velan, alveolan kaj eĉ lipan lokojn.

La **maniero** de artikulacio indikas kiel la aerfluo estas obstrukcata en la buŝo. Ĉe eksploda sono (plozivo) iu artikulacia organo plene baras dum momento la aerfluon. Ekzemploj estas [p, b, t, d, k, g]. Ĉe naza sono estas same en la buŝo, sed la velo lasas la aeron flui libere tra la nazo: [m, n, ŋ]. Ĉe frota sono (frikativo) la artikulacia organo mallarĝigas la spacon tra kiu la aerfluo devas pasi, tiel estigante kirlan aŭ ĥaosan (turbulan) fluon. Ekzemploj estas [f, v, s, z, ʃ, ʒ, x] (ĉi lastaj respondas al la Esperantaj *ŝ, ĵ, ĥ*). Eksploda-frota sono (afrikato) komenciĝas per plena baro, sed poste transformiĝas en nura frotiga mallarĝigo. Ĉe vokaloj kaj ‘duonvokaloj’ (aproksimantoj) la mallarĝigo ne sufiĉas por estigi kirlecon: la *j* de Esperanto estas plej ofte tiel prononcata, kaj same la kutima *r* de la angla. Ĉe flanka sono (lateralo) la aerfluo pasas seninterrompe laŭ la flanko de la artikulacianta organo. Ĉe vibra sono la artikulacianta organo vibras (tuŝas momente, ofte ripete), kiel en la *r*-sonoj de multaj lingvoj.

Mi mencias du sonojn kun interesa kaj malofta maniero de artikulacio. La *ll*-sono de la kimra, kun fonetika simbolo [ɬ], estas senvoĉa, samtempe flanka kaj frota sono. Tiu sono troviĝas ankaŭ en la zulua, same kiel la responda voĉa sono. La *ř*-sono de la ĉeĥa estas samtempe frota kaj vibra: tiu sono, en voĉa kaj senvoĉa versioj, kredeble troviĝas en neniu alia lingvo.

Por krei kiun ajn parolsonon, necesas iel krei aerfluon. Por la plimulto de sonoj en la plimulto de lingvoj, tiu aerfluo estas la spirblovo elpuŝata de la pulmoj. Tamen ekzistas diversaj aliaj manieroj krei la aerfluon (faka esprimo: **iniciati** la sonon). Ne nur la pulmoj povas iniciati la aerfluon (kiel por ĉiuj sonoj de Esperanto), sed ankaŭ la faringo aŭ la buŝo mem.

Ankaŭ la direkto de la aerfluo povas varii. La ordinara spirblovo de la pulmoj estas elpuŝata eksteren, sed eblas fari parolsonojn ankaŭ suĉante la aeron enen. Tiel ni distingas inter aer**puŝ**aj sonoj kaj aer**suĉ**aj sonoj.

Por krei faringan aerpremon oni uzas la gloton (la spacon inter la voĉkordoj). Pozitivan premon — aerpuŝon — oni kreas levante la fermitan gloton abrupte kaj tiel premante la aeron en la

faringo kaj buŝo. Sono iniciatata per tiu mekanismo (glota, puŝa) nomiĝas **ejektivo**. Ejektivojn oni trovas ekzemple en la kartvela, la amhara kaj en diversaj amerikindianaj lingvoj.

Se anstataŭ por puŝi oni uzas la gloton por suĉi — do per glota, suĉa mekanismo — la rezulto nomiĝas **injektivo**. Injektivojn oni trovas ĉefe en afrikaj kaj sudorientaziaj lingvoj (ekzemple la haŭsa de Niĝerio).

Por iniciati aerfluon interne de la buŝo oni uzas precipe la muskolojn de la lango, kiu estas premata firme kontraŭ la velo same kiel en la sono [k]. En la homaj lingvoj tiaj sonoj estas ĉiam suĉaj, ne puŝaj. Sono iniciatata per vela, suĉa mekanismo nomiĝas **klako**. Klakoj troviĝas nur en lingvoj de la suda parto de Afriko.

La klaka mekanismo postulas, ke samtempe oni kreu pulme (aŭ faringe) iniciatatan konsonanton. Tio ne necese estas [k]: ĝi povas esti [g], estigante voĉan klakon, aŭ [ŋ], estigante nazan klakon, ktp.

La zulua kaj la kosa, sudbantuaj lingvoj, prezentas al ni ĉiun el tiu nekutimaj aermekanismojn. En ili troviĝas ejektivoj, injektivoj, kaj klakoj. Enkalkulante voĉajn kaj nazajn, la zulua havas entute dek kvin diversajn klakojn.

Vokalojn oni klasas laŭ vasteco, antaŭeco, kaj rondeco. **Vasta** vokalo estas tiu, en kiu la spaco inter la lango kaj la buŝosupro estas granda, ekzemple [a]. Malvasta estas tiu, en kiu la spaco estas malgranda, do ekzemple [i, u]. Mezvastaj estas [e, o]. **Antaŭa** vokalo estas tia, ke la antaŭa parto de la langodorso proksimiĝas al la palato, ekzemple [i, e]. Malantaŭa estas, tia, ke la malantaŭa parto de la langodorso proksimiĝas al la velo aŭ uvulo. Por **ronda** vokalo la lipoj estas rondigitaj kaj antaŭenpuŝitaj, ekzemple [u, o]. Por neronda vokalo la lipoj estas neŭtralaj aŭ nerondigitaj, ekzemple [i, e, a].

En la plimulto de lingvoj la plimulto de antaŭaj kaj vastaj vokaloj estas nerondaj kaj la plimulto de nevastaj malantaŭaj vokaloj estas rondaj. Tiel estas ĉe la vokaloj de Esperanto, [i, e, a, o, u].

Rondaj antaŭaj vokaloj troviĝas nur en malmultaj lingvoj, preskaŭ ĉiuj en Eŭropo aŭ Azio. Bone konataj ekzemploj estas la germana kaj la franca. Ekzemploj en la germana estas la [yː] de *müde* (laca) kaj la [øː] de *schön* (bela), en la franca la [y] de *rue* (strato) kaj la [ø] de *deux* (du).

La kontraŭa ebleco estas vokaloj nerondaj kaj malantaŭaj. Tiaj troviĝas en ekzemple la korea, en kiu necesas distingi inter [u] kaj [ɯ].

En la plimulto de vokaloj en la plimulto de lingvoj la aerfluo ne pasas samtempe tra la nazo: la vokaloj estas **buŝaj**. Tamen en iuj lingvoj troviĝas ankaŭ vokaloj **nazaj**, en kiuj la aerfluo ja eliras samtempe tra la buŝo kaj la nazo. Ekzemploj en la franca aŭdiĝas en la esprimo *un bon vin blanc* [œ̃ bɔ̃ vɛ̃ blɑ̃]. En la pola la nazaj vokaloj estas foje diftongaj, kiel ekzemple [sɔ̃w̃] *są* (ili estas), [jɛ̃w̃zɬk] *język* (lingvo).

Centra vokalo estas nek antaŭa nek malantaŭa. Meza vokalo estas nek vasta nek malvasta. Meza centra vokalo, nomiĝas **ŝvao**, simbolata [ə], kaj troviĝas en ekzemple la angla [bəˈnɑːnə] *banana* (banano) kaj la rusa [ˈkomnətə] *комната* (ĉambro). Plej ofte ŝvao estas senakcenta kaj mallonga. Tamen en la kimra kaj la bulgara ŝvao povas esti akcentita, ekz-e en la kimra

[ˈmənɪð] *mynydd* (monto). En la angla troviĝas longa akcentitaj ŝvao, kiel en [nɜːs] *nurse* (flegistino) (en tipa brita prononco).

Tre malofte ŝvao povas esti **ro-igita**, t.e. havi samtempan r-koloron, faratan per malantaŭenturno de la langopinto. Tia estas la lasta vokalo de la usonangla [ˈfɑːðɚ] *father* (patro). Same por la usona varianto de *nurse*, [nɜ˞ːs]. Longa roigita ŝvao estas tute malofta en la lingvoj de la mondo, sed ja troviĝas en du vaste parolataj kaj influaj lingvoj: ne nur en la usonangla sed ankaŭ en la ĉina.

Denaskaj kor-malsanoj

Keyhan Sayadpour
Iranano (1967), kuracisto, specialisto pri infanmedicino kaj pediatria kardiologio. Laboras kiel asistanta profesoro en Teherana Universitato de Medicinaj Sciencoj (Infana Medicina Centro). Komitatano de Irana E-Asocio, ekskomitatano de TEJO. Kontribuanto de Monato, Esperanto, Medicina Internacia Revuo, Medicina Heroldo, Literatura Foiro, Fonto, Irana Esperantisto kaj Juna Amiko. Membro de UEA, UMEA, Amikeca Reto kaj ITRE. Ĉefdelegito de UEA en Irano kaj vicprezidanto kaj landa delegito de UMEA. En la Belartaj Konkursoj en 2004 gajnis la premion "Nova Talento".

Resumo

Ĝenerale la publiko estas multe pli informita pri la kormalsanoj de plenkreskuloj ol tiuj de infanoj. El mil novnaskitoj, po ok estas trafitaj de ia denaska kormalsano. La procento estas malpli dum la sekvaj vivojaroj, ĉar kelkaj malsanoj ne kongruas kun longa vivo kaj aliflanke kelkaj aliaj malaperas spontane, ekzemple malgrandaj ventriklaj septodifektoj.

Kelkaj denaskaj kormalsanoj kaŭzas tiom da problemoj ke la gepatroj devas serĉi kuracon. Sed bedaŭrinde multaj estas silentaj kaj la kuracisto povas diagnozi ilin nur dum rutina ekzameno. Kaj se oni ne diagnozas ilin frutempe, venos la tempo kiam la malsano jam ne estas facile kuracebla. Tio montras la gravecon de rutina ekzameno de infanoj, eĉ se ili ŝajnas senproblemaj.

Dum la prelego mi prezentos informojn pri la strukturo de la normala koro, plej oftaj denaskaj kormalsanoj kaj iliaj kuracmetodoj.

Congenital heart diseases

Summary

Generally the public is much more informed about the heart diseases of adults than those of children. Out of every thousand newborns, eight are affected by some kind of congenital heart disease. The percentage is lower during the next years of life as some diseases are not compatible with long life and others disappear spontaneously, for example small ventricular septal defects.

A few congenital heart diseases cause so many problems that the parents should seek medical treatment. Unfortunately most are silent, and only the physician can diagnose them during routine examination. If nobody diagnoses them early, there will come the time when the disease is no longer easily curable. It shows the importance of the routine examination of children, even if they seem healthy.

During the lecture I will present information about the structure of the normal heart, most frequent congenital heart diseases and their methods of therapy.

Maladies cardiaques congénitales

Résumé

Le public est généralement beaucoup mieux informé sur les maladies cardiaques des adultes que sur celles des enfants. Sur mille nouveau-nés, huit sont frappés d'une maladie cardiaque congénitale. Le pourcentage est inférieur pendant les années qui suivent, car certaines maladies ne sont pas compatibles avec une longue durée de vie et par ailleurs, certaines autres disparaissent spontanément, comme par exemple les problèmes de petite communication interventriculaire.

Certaines maladies cardiaques congénitales causent tant de problèmes que les parents doivent chercher un traitement médical. Malheureusement la plupart sont silencieuses et le docteur ne peut les diagnostiquer qu'à l'occasion d'un examen de routine. Si on ne les diagnostique pas assez tôt, viendra un temps où la maladie ne sera plus facilement curable. Cela montre l'importance de l'examen de routine des enfants, même s'ils semblent en bonne santé.

Pendant la conférence je présenterai des informations sur la structure du coeur normal, les maladies cardiaques congénitales les plus fréquentes et leurs traitements.

Aangeboren hartkwalen

Samenvatting

Over ´t algemeen is het publiek beter geïnformeerd over hartkwalen van volwassenen dan over die van kinderen. Ongeveer acht promille van de baby's wordt getroffen door een aangeboren hartkwaal. Het percentage neemt af tijdens de volgende levensjaren, want sommige kwalen komen niet voor bij een langere levensduur en andere verdwijnen spontaan, bv kleine tussenschotsdefecten in de hartkamers.

Sommige aangeboren hartkwalen veroorzaken zoveel problemen, dat de ouders een arts moeten zoeken. Maar helaas zijn vele kwalen geruisloos en kan een arts ze slechts op 't spoor komen via een routine-onderzoek. En als men ze niet tijdig diagnosticeert, komt het moment dat de kwaal niet meer eenvoudig te genezen is. Dit toont het belang van routinematig onderzoek van kinderen, zelfs als ze probleemloos lijken.

Tijdens de lezing geef ik informatie over de structuur van een normaal hart, van de meest voorkomende aangeboren hartkwalen en hun behandeling.

Denaskaj kor-malsanoj

La normala koro

La normala koro konsistas el dekstra kaj maldekstra flankoj, el kiuj ĉiu havas atrion kaj ventriklon (Fig. 1). La dekstra atrio kolektas sangon de la korpo pasigante tion al la dekstra ventriklo por ĵeti ĝi en la pulmojn por oksigenado. En preskaŭ la sama vojo, la maldekstra atrio kolektas sangon pasive de la pulmoj, trapasigante al la maldekstra ventriklo por cirkuligi la oksigenitan sangon tra la korpo.

Sango fluas unudirekte tra la kvar ĉambroj dank' al la kvar korvalvoj. Tiuj kvar valvoj estas trikuspida, pulma, mitrala, kaj aorta valvoj.



Fig.1: La normala koro (Ao=Aorto, PA=pulmarterio, DA=dekstra atrio, DV=dekstra ventriklo, MA=maldekstra atrio, MV=maldekstra ventriklo)

La normala cirkulado

La sango revenas al la koro tra du grandaj vejnoj, la supra kaj malsupra vejnoj kavaj (SVK kaj MVK). La blua, aŭ oksigen-malriĉa, sango eniras la dekstran atrion (DA), kiu malplenigas sangon tra la trikuspida valvo en la dekstran ventriklon (DV). La dekstra ventriklo elĵetas tiun oksigen-malriĉan sangon tra la pulma valvo kaj pulma arterio en la pulmojn por oksigenado. Tiu oksigenriĉa, aŭ ruĝa sango tiam revenas de la pulmaj vejnoj en la maldekstran atrion (MA), kaj tra la mitrala valvo en la maldekstran ventriklon (MV). De tie la sango estas pumpata tra la aorta valvo en la aorton, kiu disdonas oksigenriĉan sangon al la korpo.

Sencianozaj kormalsanoj

En tiuj malsanoj ne ekzistas cianozo aŭ blueco. La plej gravaj malsanoj en tiu ĉi kategorio estas jenaj.

Malferma Dukto Arteria (MDA)


Fig. 2: MDA

MDA estas persista konekto inter la aorto kaj la pulmarterio (Fig. 2). Ni diras "persista" ĉar arteria dukto estas normala kaj bezonata organo en utero. En la utero, la bebo dependas de la arteria dukto por pluvivi, ĉar la bebo ne povas enspiri en-utere kaj la pulmoj ne akceptas sangon, do la sango venanta de la dekstra ventriklo devas trapasi arterian dukton por eniri en la aorton. Kiam la bebo estas naskiĝinta, estas hormonaj ŝanĝoj tiel ke normale fermiĝas la arteria dukto. Ĉar la novnaskito nun spiras, li aŭ ŝi jam ne plu bezonas la dukton.

MDA estas la malsano de nenormala nefermiĝo de la arteria dukto. MDA povas kaŭzi troon da sango iranta al la pulmoj. Laŭ la

grandeco de MDA kaj la kondiĉoj sur la pulmoj, la bebo povas esti sensimptoma, aŭ esti en severa kornesufiĉo. Kornesufiĉo en bebo estas plej ofte montrata de malbonaj manĝ-kutimoj kaj nesufiĉa pez-akiro. Tamen, preskaŭ ĉiuj MDA devas esti fermitaj, eĉ se ili estas tre malgrandaj, ĉar estas vera risko de endokardito, aŭ kor-infekto, dum la vivdaŭro.

MDA estas nun ofte kuracata en kateterad-laboratorio, per la enmeto de specialaj iloj kiel risortoj kaj ombreloj. Tiuj iloj sidas en MDA, kaj malfermas ĝin per siaj mekanikaj efikoj kaj per promocio de sango-koaguliĝo. La tradicia metodo por fermi MDA-on estas operacio kaj fermo sub rekta vido, kvankam tiu metodo nun estas rezervita por malgrandaj beboj kun grandaj duktoj. Fermado de MDA per kateterado aŭ operacio estas sekura kaj ne portas konsiderindajn konsekvencojn aŭ morton.

Atria Septa Difekto (ASD)



Fig. 3: ASD

Inter la dekstra kaj maldekstra atrioj estas muro nomata interatria septo. Normale ĝi malpermesas trairo de la sango inter la atrioj. Truo en la muro estas malsano nomita atria septa difekto, aŭ ASD (Fig. 3). Tiu estas unu el la plej simplaj formoj de denaskaj kormalsanoj. ASD kaŭzas ke iom da oksigeno-riĉa sango venanta en la maldekstran atrion iras al la dekstra anstataŭ iri al la maldekstra ventriklo. Ĝi tiam revenas al la pulmoj malgraŭ tio, ke ĝi estas jam riĉa en oksigeno. Tiele estas konsiderinda pliiĝo en la sango iranta en la pulmoj. Dum jaroj tio povas difekti la funkcion kaj de la koro kaj de la pulmoj, mallongigante la vivdaŭron. ASD povas kuraciĝi per operacio aŭ per transkatetera malfermo per ombrelaj iloj.

Ventrikula Septum-Difekto (VSD)

VSD estas la plej ofta speco de denaska kormalsano. Tion multaj nomas la truo. La interventrikula septo estas la muro kiu apartigas la dekstran kaj maldekstran flankojn de la koro. Truo en la muro inter la du ĉambroj estas nomata VSD (Fig. 4).

Kiel en okazo de ASD, oksigen-riĉa sango iras al la dekstra flanko de la koro (ĉi-foje de la maldekstra ventriklo al la dekstra) kaj tiel kvanto da sango jam riĉa je osigeno refoje iras al la pulmoj. La diferenco estas ke en VSD, la pli granda premo en MV kaŭzas pliiĝon de la premo en DV, afero kio ne okazas en ASD ĉar la sangopremoj en MA kaj DA estas preskaŭ samaj.

La plej oftaj signoj kaj simptomoj estas problemo pri manĝado kaj pezo-akiro, spiromanko kaj facila laciĝo. Bebo kun granda VSD laciĝas rapide manĝinte malmulte, ekdormas, kaj vekiĝas frue pro malsato, kaj la ciklo estas ripetata. Ĉar la koro devas pumpi ekstran sangon, ĝi povas grandiĝi. Ankaŭ, pro la plia sango iranta al la pulmoj, kaj alta premo en la pulmaj angioj, VSD povas kaŭzi konstantan difekton en la muroj de la pulmangioj post iom da tempo.



Fig. 4: VSD

Multaj VSD-oj fermiĝos mem. Tiuj kiuj fermiĝas mem estas kutime malgrandaj kaj fermiĝo okazas dum la unuaj du jaroj de la vivo. Estas malgranda procento de VSD-oj kiuj nek mem fermiĝas nek bezonas fermiĝon per ia kuracmetodo. Aliaj VSD-oj bezonas fermiĝon. Tio estas farebla per operacio sed por kelkaj cirkonstancoj, ekzistas specialaj ombrelaj iloj kiuj povas fermi VSD-on per kateterado.

Atrio-Ventrikula Septum-Difekto (AVSD)

La meza parto de la koro formiĝas per fetaj organoj nomitaj endokardaj kusenoj. Per difektita evoluo de tiuj kusenoj rezultas manko de apartiĝo de la atrioj kaj ventrikloj al apartaj ĉambroj, kaj manko de apartiĝo de la mitrala kaj trikuspida valvoj en du apartaj valvoj. Sekve estas granda konekto inter la du atrioj, inter la du ventrikloj, kaj unu atrioventrikula (aŭ AV) valvo, dum devus esti apartaj mitrala kaj trikuspida valvoj (Fig. 5). Malnovaj nomoj por tiu manko estas atrioventrikula kanal-difekto, aŭ difekto de la endokardaj kusenoj.

AVSD havas diversajn formojn. En la kompleta formo ĉiuj partoj ekzistas. En la parta formo nur unu aŭ kelkaj difektoj (ASD, VSD, difektita mitrala aŭ trikuspida valvoj) sed ne ĉiuj troveblas. En la kompleta formo sango povas iri de ĉiu kora ĉambro al la aliaj sed ĉefe iras de la maldekstra parto al la dekstra. Ĝi ankaŭ povas retroiri de la ventrikloj al la atrioj.



Fig. 5: AVSD

La malsano similas al VSD pro alta sango-premo en la pulmaj arterioj kaj plia sango-fluo en la pulmoj. Sed la kvanto kaj efikoj de tiuj perturboj estas multe pli ol simpla VSD. Pro tio, AVSD bezonas kutime operacian korekton. Kirurgia riparo konsistas el apartigo de la komuna AV valvo al du valvoj, kune kun fermo de la VSD kaj ASD. La operacio do estas pli malfacila ol simpla fermo de VSD aŭ ASD. Pro tio, kelkaj infanoj komence operaciiĝas per pulmarteria bando. Tiu bando malpliigas sang-fluon al la pulmoj kaj reduktas la altan premon en la pulmarterioj. Kiam la infano estas pli granda, la bando estos forigita kaj la difektoj riparitaj per malferma koroperacio.

Aorta Stenozo (AS)

Stenozo signifas mallarĝiĝon. Aorta stenozo estas mallarĝigo de la aorta valvo aŭ mallarĝigo de la aorto rekte supre (supravalva) aŭ malsupre (subvalva) de la aorta valvo. Normale, oksigeno-riĉa sango estas pumpita de la maldekstra ventriklo, tra la aorta valvo en la aorton. La aorto estas la ĉefa arterio sendanta oksigeno-riĉan sangon al la korpo. Aorta Stenozo malhelpas sango-pumpadon al la korpo. Laŭ la severeco de la stenozo, oni devas korekti la situacion. Eblecoj estas operacio (riparo aŭ ŝanĝo de la valvo kun artefarita metala valvo) aŭ balona valvoplastio. Tiu procedo estas farata en kora kateterad-laboratorio.

Koarktacio de la Aorto (KA)

La aorto estas la ĉefa arterio kiu gvidas oksigeno-riĉan sangon de la koro al la korpo. Koarktacio de la aorto estas stenoza parto de la aorto tiel ke ĝi malhelpas sango-fluon al la malsupraj partoj de la korpo (Fig. 6). La maldekstra ventriklo devas pumpi pli rigore ĉar la sango-premo estas alta. Tial la koro povas grandiĝi. KA tipe okazas sola, sed ĝi povas okazi kun VSD, subaorta stenozo, aŭ kompleksaj denaskaj kormalsanoj. Tri variaj metodoj ekzistas por kuraci KA-on: operacio, enmeto de stento kaj balona angioplastio. En diversaj aĝoj kaj diversaj cirkonstancoj la kuracisto elektas inter tiuj eblecoj kaj ofte dum la vivo la malsano bezonas kelkfoje kuraciĝi.



Fig. 6: KA

Pulma Stenozo (PS)

Pulma stenozo estas mallarĝiĝo de la pulma valvo. Normale la pulma valvo gvidas oksigeno-malriĉan sangon de la dekstra ventriklo al la pulmoj kie la sango ricevas oksigenon. Pro la stenozo, la dekstra ventriklo devas pumpi pli malfacile por gvidi la sangon tra la stenoza valvo.

Se la stenozo estos severa, ĝi devas kuraciĝi. La preferata metodo estas per balono en la kateterad-laboratorio. Se tio ne eblas aŭ ne sukcesas, oni faras operacion.

Cianozaj kormalsanoj

Tiuj malsanoj kaŭzas cianozon aŭ bluecon pro tio ke parto de la oksigeno-malriĉa sango iras al la korpo. Estas multaj varioj de kormalsanoj kiuj kaŭzas cianozon, sed pulmaj kaj sangaj malsanoj ankaŭ povas tion fari.

Tetralogio de Fallot

Tetralogio de Fallot (TF) estas la plej ofta formo de kompleksaj denaskaj kormalsanoj kaŭzantaj cianozon, aŭ bluan bebon. TF konsistas el kvar apartaj eroj (Fig. 7). La unua estas Ventrikula Septa Difekto (VSD). La dua estas pulm-valva stenozo (PS). La tria ero temas pri dekstra ventrikula hipertrofio, kiu estas pliigo de la grandeco de la dekstra ventriklo. La fina ero estas sur-rajdado de aorto (Ao), kiu signifas ke la aorto restas rekte super la VSD. La VSD estas kutime granda kaj sango fluas de la dekstra ventriklo tra tiu VSD en la maldekstran ventriklon. Tio okazas pro la rezisto al sango-fluo tra la pulma valvo. Post eniro en la maldekstran ventriklon, la oksigeno-malriĉa sango estas elĵetita en la aorton kaj disiras tra la korpo. Pro tio ĉi tiuj beboj iĝas cianozaj, aŭ "bluaj". Tiu cianozo povas pliiĝi kun ploro, angoro aŭ fekado. Malferma kor-operacio estas la necesa kaj ununura kuracmetodo por TF.



Fig. 7: TF

Transpozicio de la Grandaj Arterioj (TGA)

En tiu denaska kormalsano, la aorto (la ĉefa arterio kiu portas sangon al la korpo) devenas de la dekstra ventriklo anstataŭ de la maldekstra, kaj la pulma arterio (la arterio kiu portas sangon al la pulmoj) devenas de la maldekstra ventriklo anstataŭ de la dekstra (Fig. 8). La rezulto estas du apartaj cirkul-sistemoj. La oksigeno-riĉa sango venas de la pulmoj al MA, MV kaj ree en la pulma arterio. Male la oksigeno-malriĉa sango venas de la korpo al DA, DV, la aorto kaj ree la korpo. Por ke la bebo naskiĝinta kun transpozicio de la grandaj arterioj postvivu, oni devas havi komunikon inter la dekstra kaj la maldekstra flankoj de la koro, kiu permesu miksiĝon de la sango en la du flankoj. Nur tiel la korpo ricevos sangon kun iom da oksigeno bezonata por vivado. Tiu miksado de sango estas ebla tra iu ajn el inter ASD, VSD aŭ MDA. Malgraŭ tio, la nivelo de oksigeno en la sango estas ofte ne adekvata por longdaŭra vivo. Bebo kun transpozicio estas ekstreme blua ekde sia naskiĝo.

La plej ofta kirurgia procedo korekti tiun malsanon estas nomata ‘arterian transmeton’. Dum tio oni konektas la aorton al MV. Tio permesas oksigeno-riĉan sangon esti pumpita al la korpo. La pulman arterion oni konektas al DV. Tio permesas oksigeno-malriĉan sangon iri al la pulmoj por ricevi oksigenon. Alia kirurgia metodo estas fari kanalojn en la atrioj tiel ke la sango el MA iru al DV kaj de tie al la aorto, kaj la sango el DA iru al MV kaj de tie al la pulmarterio (Atria Transmeto). Tiel la sango-cirkulado ricevos sian fiziologian kondiĉon kaj nur la loko de la ventrikloj estas ŝanĝita.



Fig. 8: TGA

Tuta Nenormala Pulm-Vejna Konekto (TNPVK)

Pulmaj vejnoj normale alportas oksigenitan sangon de la pulmoj al MA. En TNPVK, ĉiuj pulmaj vejnoj konektiĝas kun DA (Fig. 9). Por ke la bebo postvivu, devas ekzisti komuniko inter la dekstra kaj maldekstra flankoj de la koro por permesi oksigeno-riĉan sangon atingi la korpon. Tio ofte estas ASD, kvankam ankaŭ VSD povas esti. Ĉar tiu sango estas tiel diluita, la bebo povas aspekti blue aŭ "cianoze". Estas tri ĉefaj specoj de TNPVK, laŭ tio kie la pulmaj vejnoj konektiĝas. Estas nome suprakora, kora, kaj malsuprakora variaĵoj. Ankaŭ estas miksita formo, en kiu kelkaj el kvar vejnoj konektiĝas al iu nenormala loko kaj la aliaj al alia nenormala loko. Malferma kor-operacio estas bezonata frue. La operacio inkluzivas forigon de la pulmaj vejnoj de la dekstra atrio kaj rekonekton al la maldekstra. La ASD ankaŭ fermiĝas.



Fig. 9: TNPVK (suprakora formo)

Persista Trunko Arteria (PTA)



En tiu malsano, nur unu arterio devenas de la koro kiu formas kaj la aorton kaj la pulman arterion (Fig. 10). La trunko estas super VSD (ĉiam parto de la malsano). La trunko ricevas oksigeno-malriĉan sangon de la dekstra ventriklo kaj oksigeno-riĉan sangon de la maldekstra ventriklo. Tiu miksaĵo de sangoj estas dissendata kaj al la korpo kaj al la pulmoj. Malferm kor-operacio frua estas necesa. La operacio inkluzivas fermon de VSD kaj fortranĉo de la pulmaj arterioj de la trunko. La pulmaj arterioj estas poste konektitaj al la dekstra ventriklo kun artefarita tubo. Tiu tubo kutime devas anstataŭiĝi per la beba kresko.

Fig. 10: PTA

Trikuspida Atrezio (TA)

Trikuspida atrezio signifas ke la trikuspida valvo ne evoluis normale (Fig. 11). Rezulte, la dekstra ventriklo ankaŭ ne evoluas, kaj tial estas kutime nur unu ventriklo. Ĉar mankas trikuspida valvo, blua sango revenanta al la koro de la korpo ne povas eniri ien ajn krom trapasi ASD (necesa por TA) kaj iri al la maldekstra atrio, kaj miksiĝi kun la ruĝa sango revenanta de la pulmoj. La miksaĵo de blua kaj ruĝa sangoj en la maldekstra atrio eniras en la ununuran ventriklon, kaj de tie estas elĵetata kaj en la aorton kaj en la pulman arterion.

Ĉar en TA ekzistas nur duono de la koro, oni povas ŝanĝi nur la situacion al unuventrikula cirkulado. Por tio, oni faras aŭ du apartajn operaciojn aŭ ambaŭ samtempe: Glenn kaj Fontan operaciojn. La dudirekta Glenn-operacio estas konekto de SVK al pulma arterio. Do la blua sango de la supra parto de la korpo rekte iras al la pulmo sen trapasi la koron. Ĝi estas farata en la aĝo de preskaŭ ses monatoj. La Fontan-operacio estas la fina etapo. Dum tio, la kirurgo konektas MVK al la pulmaj arterioj. Do la tuta blua sango revenanta de la korpo rekte iras al la pulmoj. Tiel la koro pumpas nur la ruĝan sangon de la pulmoj al la aorto. Neniu funkcias kiel la dekstra ventriklo (unu-ventrikula cirkulado). Fontan-operacio estas farata ĉirkaŭ la aĝo de 2 jaroj. Se oni ne povos ĝustatempe fari Glenn-operacion, oni povas poste fari ambaŭ samtempe.



Fig. 11: TA

Hipoplazia Maldekstra-Kora Sindromo (HMKS)

HMKS signifas ke la tuta maldekstra flanko de la koro ne evoluis normale (Fig. 12). Sekve la mitrala kaj aorta valvoj estas etaj aŭ mankaj, kiel ankaŭ la maldekstra ventriklo kaj la unua parto de la aorto. HMKS ne estas postvivebla malsano sen kor-operacio. Estas du elektoj: unu estas kora transplantado, en kiu la tuta koro estas anstataŭita per donacita koro, kaj la alia estas Norwood-operacio. La Norwood-operacio estas farita tre baldaŭ post naskiĝo, kaj transformas la dekstran ventriklon kiel la ĉefa. Tiel la koro similiĝas al la situacio en TA. Poste oni povas fari dudirektan Glenn-operacion, kaj la Fontan-operacion (unu-ventrikula cirkulado).



Fig. 12: HMKS

Publika opinio pri utilaj lingvoj en Eŭropo

Jukka Pietiläinen
Doktoro pri sociaj sciencoj (2002, Universitato de Tampereo, Finnlando). Lia esplorado temas pri la ruslandaj socio kaj amaskomunikiloj, amaskomunikiloj en socio ĝenerale, internaciaj novaĵ-fluoj, kvantaj esplormetodoj en sociaj sciencoj, sociolingvistiko kaj esperantologio. Laboras en Aleksanteri-Instituto (pri esplorado de Ruslando kaj Mez-Orienta Eŭropo) en Universitato de Helsinko; docento pri ĵurnalistiko en Universitato de Tampereo.

Resumo

EU enketas eŭropanojn (ne nur en EU-landoj sed ankaŭ en kandidat-landoj kaj en aliaj orienteŭropaj landoj) regule pri plej diversaj temoj. Ne malofte enketoj havis demandojn pri lingvoj. La prelego analizas respondojn al demando pri du utilaj fremdaj lingvoj por lerni en la jaroj 1997, 1998, 2000 kaj 2005. Plejparto el la eŭropanoj opinias, ke la plej utilaj fremdaj lingvoj estas la angla, la franca kaj la germana. Lastatempa evoluo plifortigis la opinion pri la utileco de la angla super la germana kaj la franca. Tamen la opinio pri la utileco de la hispana, la rusa kaj iu alia (ofte lingvo de najbara lando aŭ oficiala lingvo de la loĝlando) restis en antaŭa nivelo aŭ eĉ ricevis pli da subteno.

La opinio pri la utileco de lingvoj varias i.a. surbaze de lingvoscio, eduko kaj profesio. Tiuj, kiuj scipovas iun lingvon kutime opinias ĝin pli utila ol tiuj, kiuj ĝin ne scipovas. La pli alte edukitaj ankaŭ tendencas opinii utilaj aliajn lingvojn ol malpli alte edukitaj. Divers-aĝaj personoj ankaŭ opinias malsamajn lingvojn utilaj. La prelego analizas kaj klarigas tiujn diferencojn kaj diskutas ilian signifon por vera lingvolernado kaj estonteco de kono de fremdaj lingvoj en Eŭropo.

Public opinion on useful languages in Europe

Summary

The EU regularly carries out opinion polls among Europeans on different topics. These Eurobarometer surveys, are conducted not only in EU Member States but also in candidate countries. Quite often Eurobarometer surveys also have questions about languages. The lecture analyses the results of Eurobarometer surveys on the most useful languages to know in 1997, 1998, 2000 and 2005. Most Europeans have the opinion that English is the most useful language, followed by French and German. During the last decade the popularity of French and German as useful languages has been decreasing, while English has become even more universally accepted as a useful language. Also Spanish, Russian and other languages (often these include languages of neighbouring countries, minority languages or an official language of the country in question) have kept their former level of usefulness and even increased their popularity.

The opinion about useful languages varies on the basis of knowledge of languages, education and profession. Those who already know another language tend to regard it as more

useful than others who do not know the language. Better-educated people tend to have a higher opinion of the usefulness of some languages than those with less education. Also people of different ages have different opinions on useful languages, in particular the young prefer English more than older people. The lecture analyses these differences and discusses their impact on the study of foreign languages and the future of foreign–language knowledge in Europe.

L'opinion publique à propos des langues utiles en Europe

Résumé

L'UE effectue régulièrement des sondages auprès des Européens (non seulement dans les pays de l'UE mais aussi dans les pays candidats et dans d'autres pays d'Europe de l'Est) sur les sujets les plus divers. Il n'est pas rare que ces sondages comportent des questions sur les langues. La conférence analyse les réponses à la question des deux langues étrangères utiles à apprendre en 1997, 1998, 2000 et 2005. La plupart des Européens pensent, que les langues étrangères les plus utiles sont l'anglais, le français et l'allemand. Une évolution récente a renforcé l'opinion selon laquelle l'anglais est plus utile que l'allemand et le français.

Toutefois l'opinion sur l'utilité de l'espagnol, du russe et d'une autre langue (souvent la langue d'un pays voisin ou la langue officielle du pays où l'on vit) est restée dans l'état antérieur ou même a reçu plus de soutien. L'opinion sur l'utilité des langues varie entre autres en fonction de la connaissance des langues, de l'instruction et de la profession. Ceux qui connaissent une langue pensent généralement que celle-ci est plus utile que celles qu'ils ne connaissent pas. Ceux qui ont le plus haut niveau d'instruction ont aussi davantage tendance à penser que les autres langues sont utiles que ceux qui ont un moindre niveau d'instruction. De même, des gens d'âges différents pensent utiles des langues différentes. La conférence analyse et explique ces différences et discute de leur signification pour un véritable apprentissage des langues et pour l'avenir de la connaissance des langues étrangères en Europe.

Publieke opinie in Europa betreffende nuttige talen

Samenvatting

De EU ondervraagt Europeanen (niet alleen EU-burgers maar ook in kandidaat-lidstaten en andere Oost-Europese landen) regelmatig over allerlei thema's. Niet zelden zaten in dergelijke enquêtes ook vragen over talen. Deze lezing analyseert antwoorden op de vraag over het leren van twee nuttige talen, in de jaren 1995, 2000 en 2005. De meeste Europeanen vinden dat de nuttigste vreemde talen in Europa Engels, Frans en Duits zijn. De laatste tijd neemt de opvatting toe dat nut van Engels groter is dan dat van Duits en Frans. Toch bleef de mening betreffende het nut van Spaans, Russisch of een andere taal (vaak die van een naburig land of de officiele taal van het land waar men woonde) op het vroegere niveau, dan wel kreeg deze mening iets meer steun.

De mening over het nut van talen varieert o.a. op grond van taalkennis, opleiding en beroep. Wie vreemde talen kennen, vinden dergelijk kennis doorgaans belangrijker dan wie geen vreemde taal kent. De hoogst opgeleiden neigen ertoe andere talen eerder nuttig te vinden dan minder hoog opgeleiden. Personen van verschillende leeftijd vinden soms andere talen nuttig. De lezing analyseert en verklaart deze verschillen en bespreekt hun belang voor het werkelijk leren van talen en voor kennis van vreemde talen in het toekomstige Europa.

Publika opinio pri utilaj lingvoj en Eŭropo

Enkonduko

Eŭropa Unio regule enketas siajn civitanojn pri plej diversaj temoj. La enketoj, kiuj nomiĝas eŭrobarometroj, kelkfoje havas ankaŭ lingvajn temojn. Demandoj pri lingvoscio estis inkluzivigitaj en la enketo en 1976, 1987, 1990, 1994, 1995, 1998, 1999, 2000, 2001 kaj 2005 (eĉ dufoje). Aparta prilingva enketo estis farita en la jaro 2000 por kolekti materialon por la Eŭropa lingvojaro. Eŭrobarometroj estas farataj ankaŭ en kandidatlandoj, pli frue aparte, sed nuntempe samtempe kun la ordinaraj eŭrobarometroj. (Pli pri eŭrobarometroj kaj demandoj en diversaj enketoj vidu ĉe GESIS).[1]

Kutime eŭrobarometro-enketoj temis pri lingvoscio, sed foje aperis ankaŭ demandoj pri tio kiuj lingvoj estas la plej utilaj, kiujn lingvojn indus lerni, kaj kiujn lingvojn la infanoj lernu en lernejo. Opinio pri **du utilaj lingvoj por scii** (krom sia gepatra lingvo) estis demandita unuafoje en 1997 (Eŭrobarometro 47.0). Poste simila demando estis inkluzigivita en 1998 (Eŭrobarometro 50.0), en prilingva eŭrobarometro en 2000 (Eŭrobarometro 54LAN) kaj en 2005 (Eŭrobarometro 64.3). En 2005 la demando estis iomete malsama: temis pri du utilaj lingvoj **por via persona evoluo kaj kariero.**

La formulado de prilingvaj demandoj atestas pri la evoluo de la lingvopolitikaj prioritatoj en EU kaj de la opinio pri lingvoj ĝenerale. En 1976 la ĉefa intereso estis la kompreno de fremdaj lingvoj kaj gravis nur la oficialaj lingvoj de EU, kaj tiam, ekzemple, la leceburga ne estis rekonata kiel lingvo. En la 1990-aj jaroj la leceburga aperis kiel plenrajta lingvo. Krome la diskutkapablo en la fremda lingvo fariĝis pli grava ol nura kompreno, ĉar ekde 1987 la enketistoj interesiĝas pri lingvoscio, kiu ebligas partopreni diskuton. En 2000 kaj 2005 eblis elekti du aŭ plurajn gepatrajn lingvojn, kaj ankaŭ gestolingvo estis inter la alternativoj en 2000. En 2005 ankaŭ la plej grandaj minoritataj lingvoj estis listigitaj aparte.

Tiu ĉi prelego uzas kiel fonton plejparte la eŭrobarometro-enketon 64.3, kies intervjuoj estis faritaj en novembro kaj decembro 2005. La intervjuoj estis faritaj en ĉiuj EU-landoj (inkluzive Bulgarion kaj Rumanion, aliĝintajn en 2007) kaj ankaŭ en kandidatlandoj Turkio kaj Kroatio. Tamen por tiu ĉi artikolo estas uzata nur datumaro por 27 EU-landoj. La nombro de enketitoj estas proksimume 1 000 en ĉiu lando (krom 1 300 en Britio, el kiuj 300 en Norda Irlando, 1 500 en Germanio, el kiu 500 en orienta parto, kaj 500 en Luksemburgio, Malto kaj Kipro).

Lingvoscio de eŭropanoj

Komence estas utile prezenti iom da faktoj pri la lingvoscio de eŭropanoj (pli detale vidu Pietiläinen 2007). En la jaro 2005 el loĝantoj de Eŭrop-uniaj landoj (tiutempaj ŝtatoj-membroj plus poste aliĝintaj Bulgario kaj Rumanio) proksimume duono (55%) scipovis almenaŭ unu fremdan lingvon. Du fremdajn lingvojn scipovis 18% kaj tri fremdajn lingvojn 10%. Entute 2.1% havis du gepatrajn lingvojn.

La plej ofte parolataj fremdaj lingvoj en Eŭropa Unio de 27 landoj estas la angla, kiun parolas kiel fremda 37% el loĝantoj, la franca 14%, la germana 13%, la rusa 6%, la hispana 6% kaj la itala 2%. Iun alian fremdan lingvon parolas 13% el loĝantoj, do la lingvoscio de eŭropanoj ne estas unuflanka, sed la lingvoscio varias laŭ landoj, kaj eĉ laŭ regionoj, tiel ke ankaŭ lokaj minoritataj lingvoj kaj lingvoj de najbaraj landoj aperas kiel parolataj fremdaj lingvoj. Kompare kun enketoj faritaj pli frue la lingvoscio ĝenerale kreskis, sed aparte kreskis la scio de la angla lingvo kiel fremda lingvo.

[1] La datumaron de eŭrobarometro 64.3 liveris por tiu ĉi studo Finnlanda Sociscienca Datum-Arkivo (fsd.uta.fi). La aliaj eŭrobarometraj materialoj estas akiritaj el GESIS.

Tabelo 1. Oficialaj lingvoj de EU kaj kelkaj plej grandaj aliaj lingvoj en novembro-decembro 2005 (27 landoj)

	Denaskaj parolantoj %	**Fremdlingvaj parolantoj %**	**Uzas tiun fremdan lingvon (almenaŭ porokaze) %**
angla	12.5	37.0	38.2
germana	16.9	13.2	12.8
franca	11.5	14.0	13.3
itala	12.3	2.6	3.3
hispana	8.4	5.6	7.6
pola	8.3	0.6	0.7
rusa	0.9	6.3	3.7
nederlanda	4.5	0.7	0.9
rumana	4.5	0.3	0.4
hungara	2.5	0.3	0.3
greka	2.4	0.4	0.5
ĉeĥa	2.2	0.5	0.5
sveda	1.9	0.8	0.7
portugala	2.2	0.4	0.6
bulgara	1.6	0.2	0.4
slovaka	1.0	0.6	0.5
dana	1.1	0.3	0.4
kataluna	0.9	0.5	0.6
finna	1.1	0.2	0.2
litova	0.7	0.1	0.1
araba	0.4	0.4	0.8
turka	0.5	0.2	0.3
slovena	0.5	0.1	0.2
galega	0.4	0.2	0.2
latva	0.3	0.1	0.2
kroata	0.1	0.3	0.5
estona	0.2	0.1	0.1
irlanda	0.1	0.1	0.1
eŭska	0.2	0.1	0.2
leceburga	0.1	0	0.1
malta	0.1	0	0.1
ĉina	0	0	0.1
iu alia	1.6	6.6	6.4
neniu	--	44.8	43.3

En la enketo estis ankaŭ demando pri ofteco de uzo de fremdaj lingvoj. Ĉiutage uzas iun fremdan lingvon 22% el loĝantoj de EU-landoj, ofte kromaj 13% kaj nur okaze (ekzemple dum vojaĝoj) 22%.

Relative multaj, kiuj respondis, ke ili ne parolas iun lingvon, tamen respondis, ke ili uzas tiun lingvon. Entute 9% el eŭropanoj uzas iun fremdan lingvon, kvankam ili ne scipovas ĝin en nivelo de diskutado kaj aliaj 7% scipovas iun fremdan lingvon, sed neniam uzas ĝin. Aparte multaj estis tiuj, kiuj scipovis la rusan, sed neniam uzis ĝin (proksimume duono el tiuj, kiuj indikis, ke ili scipovas la rusan), sed ankaŭ relative multaj el tiuj, kiuj scipovis la francan kaj la svedan respondis tiel. Entute nur 36% kaj ne scipovas fremdajn lingvojn kaj ne uzas ilin iam ajn. Do, por eŭropanoj fremdaj lingvoj estas gravaj, kvankam nur relative malmultaj uzas ilin ĉiutage.

Utilas scii fremdajn lingvojn

En 2005 la kapablon scipovi paroli fremdajn lingvojn opiniis “tre utila” 54% el loĝantoj de EU, “sufiĉe utila” 29%, “ne tre utila” 8% kaj “tute ne utila” nur 8% el eŭropanoj. Kompare al la jaro 2000 (kiam la demando estis farita nur en tiutempaj ŝtatoj-membroj de EU) la opinio pri la

utileco de fremdaj lingvoj la nombro de tiuj, kiuj opinias la lingvoscion “tre utila” kreskis de 45% ĝis 54%. Plej forta la kresko estis en Germanio, Italio kaj Nederlando, dum la opinio pri utileco de scio de fremdaj lingvoj malkreskis en Grekio. En diversaj aĝgrupoj la kresko estis relative simila, dum inter la la plej junaj opinio pri utileco de scio de fremdaj lingvoj praktike ne kreskis (ĉar ĝi estis jam en alta nivelo).

La opinio pri la utilo de lingvoscio estis plej pozitiva ĉe junuloj ol ĉe maljunuloj, ĉe tiuj, kiuj jam scipovas lingvojn kaj kiuj uzas regule fremdajn lingvojn. Profesio, aŭ pli ĝuste, la situo en manaĝera hierarkio havas gravan influon al tio, ĉu la persono opinias lingvoscion tre utila. Ĉe manaĝeroj 70% opinias lingvoscion tre utila, dum ĉe simplaj laboristoj nur 53% opinias lingvoscion tre utila.

Gepatra lingvo influas ankaŭ al la opinio pri utilo de fremdaj lingvoj. Se la gepatra lingvo estas la angla nur 47% opinias scion de fremdaj lingvoj tre utila, el germanlingvanoj, hispanlingvanoj, franclingvanoj kaj pollingvanoj proksimume duono opinias lingvocion tre utila, sed el gepatraj parolantoj de la nederlanda 67% opinias lingvoscion tre utila, el parolantoj de la finna 62%, el parolantoj de la hungara 57% kaj el parolantoj de la bulgara eĉ 79% opinis scion de fremdaj lingvoj tre utila. Kutime gepatraj parolantoj de pli malgrandaj lingvoj opinias lingvoscion pli utila ol gepatraj parolantoj de la pli grandaj lingvoj. Aparte la anglalingvanoj ne opinias lingvoscion tiom ofte “tre utila”, tamen plej multaj, kiuj opinias lingvoscion “tute ne utila” estas inter gepatraj parolantoj de la portugala (15%) kaj la greka (16%) kaj ankaŭ inter gepatraj parolantoj de la franca kaj de la hispana (ĉirkaŭ 10% el gepatraj parolantoj de tiuj lingvoj) tia opinio estas ofta.

Nature tiuj, kiuj jam scipovis lingvojn opiniis utile scipovi ilin. El tiuj, kiuj parolis minimume unu fremdan lingvon 67% opiniis tre utila scipovi fremdajn lingvojn, kaj el tiuj, kiuj scipovis minimume tri fremdajn lingvojn eĉ 80% opiniis tre utile scipovi ilin. Tamen preskaŭ 40% el tiuj, kiuj ne parolis fremdajn lingvojn opiniis tre utila scipovi ilin. Tiel estis aparte ofte en malgrandaj landoj, dum en Germanio, Francio, Italio, Hispanio kaj anglalingvaj landoj la plimulto el tiuj, kiuj ne scipovis lingvojn ne opiniis lingvoscion tre utila.

La jam akirita kono de fremdaj lingvoj havis plej multe da influo al la opinio pri utileco de lingvoscio en sociaj grupoj, en kiuj fremdaj lingvoj ne estis tiom ofte konataj: senlaboruloj, pensiuloj kaj dommastroj opiniis lingvoscion multe pli ofte utila, se ili jam scipovis fremdajn lingvojn. Tamen, en ĉiuj sociaj grupoj tiuj, kiuj jam scipovis fremdajn lingvojn, opiniis pli ofte utila scipovi ilin ol tiuj, kiuj ne scipovis fremdajn lingvojn.

La plej utilaj lingvoj

La plej utila fremda lingvo laŭ la opinio de loĝantoj de Eŭropa Unio estas la angla. Tiel opinias 78% el tiuj, kiuj ne parolas la anglan kiel gepatran lingvon. Post la angla sekvas la franca kaj la germana, kiuj ricevas preskaŭ egalan subtenon. La kvara plej utila lingvo estas la hispana: tiel opinias sesono el la loĝantoj de EU-landoj. Post ili malgrandan subtenon ricevas la itala kaj la rusa, sed ankaŭ aliaj lingvoj (Tabelo 2). El tiuj, kiuj nomis nur unu utilan lingvon (22% el ĉiuj), la anglan elektis 75%, la francan 7%, la germanan 7%, la hispanan 4%, la rusan 2%, la italan 1% kaj iun alian lingvon 5%.

En novaj ŝtatoj-membroj la angla, la franca kaj la hispana estis malpli ofte popularaj ol en malnovaj ŝtatoj-membroj, dum la germana kaj la rusa estis pli popularaj.

Inter la aliaj lingvoj, kiujn eŭropanoj opiniis utilaj, pintis la ĉina (1,6%), la nederlanda (0,8%, aparte en Belgio) kaj la araba (0,7%, plej ofte en Italio kaj Britio).

Tabelo 2. Du plej utilaj lingvoj en 2005, % el tuta loĝantaro (inter krampoj % el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran).

	Entute en EU	**Malnovaj Ŝ-M**	**Novaj Ŝ-M**
La angla	68 (78)	68 (81)	69
La franca	25 (28)	29 (34)	12
La germana	22 (27)	18 (22)	40
La hispana	15 (17)	19 (21)	3
La itala	3 (4)	3 (4)	4
La rusa	3	2	9
iu alia	7	11	5
neniu	10	9	15
sen respondo	6	6	6

Fonto: Eŭrobarometro 64.3 (2005).

La opinio pri utilaj lingvoj ne multe ŝanĝiĝis inter 1997 kaj 2005, kiam la enketoj estis faritaj (tabelo 3). Tamen inter la jaroj 1997 kaj 2005 la opinio pri la utileco de la germana sufiĉe forte malkreskis kaj en malnovaj ŝtatoj-membroj la hispana estas jam pli populara ol la germana. Ankaŭ la subteno de la angla malkreskis, sed plejparte pro la kresko de tiuj, kiuj ne diris sian opinion aŭ opiniis, ke neniu fremda lingvo estas utila.

Tabelo 3. Lingvoj, kiujn la respondintoj opinias utilaj por lerni krom sia gepatra lingvo, % el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran (eblis elekti maksimume du lingvojn)

En malnovaj 15 ŝtatoj-membroj

Lingvo	**1997***	**1998**	**2000**	**2005**
angla	93	83	90	81
franca	54	44	47	34
germana	46	34	30	22
hispana	16	16	20	21
rusa	2.2	1.8	--	1.9
itala	3.1	2.4	3.5	3.5
nederlanda	1.0	0.9	1.1	1.1
ĉina	1.3	0.9	1.3	2.0
japana	1.6	1.0	--	--
araba	0.6	0.3	0.6	0.9
gestolingvo	--	--	1.0	--
iu alia	2.0	2.2	3.9	7.7
neniu	--	--	--	9
sen respondo	3	14	9	6

Fontoj: Eŭrobarometroj 47.0, 50.0, 54LAN, 64.3.

***** Geparta lingvo ne estis demandita. Kalkulita post estimado de kvanto de gepatra-lingvanoj.

En novaj 12 ŝtatoj-membroj

	2001	**2002**	**2005**
angla	89	89	69
franca	17	19	12
germana	62	59	40
hispana	3	3	3
rusa	8	8	9
itala	3	4	3
ĉina	0.2	0.2	0.1
araba	0.3	0.1	0
japana	0.2	0.2	--
iu alia	5	5	5
neniu	--	--	15
sen respondo	1	1	6

Fontoj: Eŭrobarometroj en kandidatlandoj 2001:1 kaj 2002:2, kaj eŭrobarometro 64.3.

En 2005 la necerteco iom kreskis, ĉar la demando estis formulita malsame, temis pri utileco de iu lingvo “por persona evoluo kaj kariero” kaj estis donita kroma alternativo “neniu”. La malkresko de populareco de tri ĉefaj lingvoj okazis eble pro tio, ke pli frue la enketantoj kvazaŭ devigis al ia respondo kaj necerteco ne estis same facile akceptata. En tiu kazo la plej oftaj respondoj, do, estis tiuj lingvoj, kiuj estas plej popularaj en socio.

Tamen la ordo de lingvoj restis simila, nur la tri ĉefaj lingvoj iom perdis sian subtenon. Rimarkinde estas, ke la germana kaj la franca perdis sian subtenon kiel utilaj lingvoj pli ol la angla. Pli da subteno ricevis la hispana kaj aliaj lingvoj, ekzemple la ĉina kaj la araba. Ankaŭ forte kreskis la utileco de “iu alia lingvo”. En multaj kazoj temis pri “alia regiona lingvo” aŭ “iu alia lingvo”, eventuale eĉ esperanto, sed individuaj lingvoj ne estas indikitaj en la datumaro.

Kiel videblas el tabelo 4 la populareco de la franca kaj la germana lingvoj malkreskis preskaŭ ĉie, sed aparte en landoj, kie ilia pozicio jam pli frue estis duaranga. En Svedio, Finnlando, Grekio, Portugalio, Italio, Britio kaj Irlando la opinio pri utileco de la germana kaj la franca, ambaŭ, malkreskis signife. En la germanlingvaj landoj la opinio pri la utileco de la franca forte malkreskis, dum en Francio kaj Belgio la opinio pri utileco de la germana malkreskis.

Tabelo 4. La franca, la germana kaj la hispana kiel utilaj lingvoj en malnovaj Ŝtatoj-Membroj (%)

	franca	**franca**	**germana**	**germana**	**hispana**	**hispana**
	1997	2005	1997	2005	1997	2005
Britio	83	62	66	27	22	34
Irlando	81	58	73	37	10	34
Luksemburgio	80	81	25	60	8	1
Portugalio	65	35	17	6	9	6
Germanio	56	28	1	5	11	12
Aŭstrio	52	16	0	3	8	8
Belgio	51	53	21	8	10	6
Hispanio	50	33	28	11	2	5
Italio	38	24	40	13	8	15
Grekio	33	21	47	30	2	4
Nederlando	30	19	42	47	18	16
Svedio	24	13	53	37	14	22
Danio	23	8	59	55	13	10
Finnlando	21	8	48	19	2	4
Francio	5	2	51	20	31	37

Fonto: Eŭrobarometroj 47.0 kaj 64.3

Geografio de utilaj lingvoj

La opinio pri utilaj lingvoj varias multe en diversaj partoj de Eŭropo. Do, estas ja nature, ke en diversaj partoj de Eŭropo diversaj lingvoj estas utilaj.

Laŭ enketo en 2005 en la malnovaj ŝtatoj-membroj kutime inter 70 % kaj 97 % opinias la anglan unu el du plej utilaj lingvoj en landoj, kie ĝi ne estis la ĉefa gepatra lingvo. En Luksemburgio la anglan opinias utila nur 37 %, pro la fakto, ke tie la franca kaj la germana jam plenigas la du eblajn alternativojn ĉe multaj respondintoj. En anglalingvaj landoj la plej utila lingvo estas kutime la franca. En novaj ŝtatoj-membroj la allogo de la angla estis eĉ pli alta ol la kvanto de parolantoj de la angla kiel fremda lingvo. Inter 60 % kaj 90 % opinias la anglan unu el du plej utilaj lingvoj en ĉiuj novaj ŝtatoj-membroj.

Tabelo 5. La tri plej utilaj lingvoj laŭ landoj en 2005 (lingvoj kaj % kiuj opinias ilin unu el du plej utilaj lingvoj)

lando	**la plej utila lingvo**	**la dua plej utila lingvo**	**la tria plej utila lingvo**	**la kvara plej utila lingvo (se pli ol 5 %)**
Kipro	angla 94	franca 35	germana 19	turka 10
Belgio, nederland-lingvaj	angla 89	franca 86	germana 8	
Belgio, franclingvaj	angla 79	nederlanda 56	germana 10	hispana 7
Germanio	angla 81	franca 28	hispana 13	rusa 5
Italio	angla 80	franca 24	hispana 15	germana 13
Hispanio	angla 73	franca 33	germana 11	hispana 5
Aŭstrio	angla 72	franca 16	itala 9	hispana 8
Rumanio	angla 64	franca 34	germana 18	itala 8
Portugalio	angla 59	franca 35	hispana 6	germana 6
Svedio	angla 97	germana 37	hispana 22	franca 13
Danlando	angla 94	germana 55	hispana 10	
Nederlando	angla 94	germana 47	franca 19	hispana 16
Turkio	angla 84	germana 40	franca 10	araba 8
Slovenio	angla 78	germana 61	itala 12	kroata 8
Kroatio	angla 77	germana 54	itala 12	
Grekio	angla 74	germana 30	franca 21	itala 6
Slovakio	angla 72	germana 61	rusa 6	
Pollando	angla 72	germana 46	rusa 9	franca 5
Ĉeĥio	angla 70	germana 55	rusa 7	franca 6
Bulgario	angla 65	germana 34	rusa 11	franca 11
Hungario	angla 62	germana 55	franca 4	
Francio	angla 82	hispana 37	germana 20	itala 7
Malto	angla 91	itala 64	franca 12	germana 6
Litovio	angla 88	rusa 50	germana 28	litova 5
Estonio, estonlingvaj	angla 76	rusa 58	germana 15	finna 11
Estonio, ruslingvaj	angla 81	estona 66	germana 14	finna 7
Latvio, latva-lingvaj	angla 74	rusa 72	germana 18	
Latvio, ruslingvaj	angla 78	latva 69	germana 15	
Finnlando, finnlingvaj	angla 88	sveda 32	germana 19	rusa 10
Finnlando, svedlingvaj	angla 85	finna 59	germana 17	franca 15
Luksemburgio	franca 81	germana 60	angla 37	leceburga 10
Irlando	franca 58	germana 37	hispana 34	irlanda 7
Britio	franca 62	hispana 34	germana 27	

Kutime post la angla la plej utila lingvo estas la franca en suda kaj okcidenta Eŭropo kaj en germanlingvaj landoj (tabelo 5). La germana estas la dua en norda kaj orienta Eŭropo. Poste sekvas la hispana en okcidenta Eŭropo kaj regione gravaj lingvoj aŭ oficialaj lingvoj de la lando: la itala, rusa, sveda, nederlanda, finna, estona kaj latva. La opinio pri la utileco de la franca estas en novaj ŝtatoj-membroj averaĝe malpli granda ol en malnovaj ŝtatoj-membroj, dum la pozicioj de la germana kaj la rusa estas pli altaj.

Rifuzis respondi aŭ neniun lingvon povis nomi utila 35% en Portugalio, 27% en Hungario, 25% en Rumanio, 24% en Bulgario, 24% en Aŭstrio, 20% en Hispanio, 20% en Pollando. La plej malgranda kvanto da tiuj, kiuj ne havis opinion pri utilaj lingvoj en Litovio (1%), en Svedio, Nederlando kaj Luksemburgio (en ĉiuj 2%) kaj en Latvio (3%).

Aparte interesa estas la rilato de malplimultoj al plimulta lingvo kaj inverse. En Estonio kaj Latvio la du ĉefaj lingvogrupoj opinias la lingvon de alia grupo utila preskaŭ komplete samkvante. Tamen ĉar parto el la ruslingvanoj estis eksludata, povas esti, ke ekskludataj estis ĝuste tiuj, kiuj negative rilatis al la estona kaj la latva lingvoj. En 2001 kiam la ruslingvanoj estis plene reprezentitaj en enketo, nur 54% el ili en Latvio opiniis la latvan unu el utilaj lingvoj, dum en Estonio 69% el ruslingvanoj opiniis la estonan utila.

En Finnlando kaj Belgio aperas ia malsimetrio: en Finnlando la svedlingva minoritato sentas la utilon de la finna multe pli alta ol la finnlingvaj la utilon de la sveda. En Belgio la

nederlandlingvanoj estas preskaŭ unuanimaj pri la utilo de la franca, sed la franclingvanoj ne same unuanime aprezas la nederlandan. En Finnlando la malgrandeco de svedlingva minoritato (6% el loĝantaro) klarigas la malsimetrion, dum en Belgio la historie malpli alta pozicio de la nederlanda estas eventuale la kialo por ĝia malpli alta populareco.

Kialoj por lerni lingvojn

Laŭ la enketo la ĉefaj kialoj, por ke infanoj lernu lingvojn en lernejo estas la plibonigado de laboreblecoj, vasta uzebleco de lernota lingvo kaj feriumado.

Tabelo 6. Kial infanoj lernu lingvojn en lernejo

Por plibonigi laboreblecojn	73%
Ĉar tiu lingvo estas vaste parolata en la mondo	38%
Por povi pli boni feriumi en regiono kie la lingvo estas parolata	29%
Ĉar tiu lingvo estas vaste parolata en Eŭropo	28%
Por kompreni kia estas la vivo por homoj en aliaj landoj	27%
Por esti plurlingva	27%
Por esti pli tolerema kaj akceptema al homoj el aliaj kulturoj	22%
Por povi komuniki kun la familio aŭ kun amikoj en regiono, kie la lingvo estas parolata	18%
Ĉar kulturo estas ligita kun la lingvo	14%
Por senti sin pli eŭropeca	13%
Ne estas grave lerni fremdajn lingvojn	0,4%
alia kialo	1%
sen repondo	1%

Praktikaj kialoj estas plej gravaj, sed kelkaj ankaŭ mencias kialojn kiuj havas pli idean rolon: por kompreni homojn el aliaj landoj, por iĝi pli tolerema, por esti plurlingva aŭ por senti sin pli eŭropeca.

La opinio pri kialoj por lerni lingvojn videblas ankaŭ en la populareco de unuopaj lingvoj. La anglan opinias aparte utila tiuj, kiuj emfazas ke lingvoscio estas utila en laboro aŭ ke ĝi estas parolata vaste en la mondo, tiuj, kiuj opinias la germanan unu el plej utilaj lingvoj emfazas ĝian uzeblecon en EU kaj utilon esti plurlingva. La francan opinias pli ofte utila aparte tiuj, kiuj emfazas uzon de la lingvo por toleremo, por esti plurlingva kaj ankaŭ tiuj, kiuj emfazas lalernadon de lingvoj por senti sin pli eŭropeca. La hispanan sentas pli utila tiuj, kiuj emfazas la gravecon de lingvoscio por toleremo kaj por ferioj eksterlande, sed ankaŭ ĝian vastan uzon en la mondo.

"Utilas la lingvo, kiun mi jam scipovas"

Ĝenerale la opinio pri la utilo de la lingvo kongruas kun la nombro de fremdlingvaj parolantoj de tiu lingvo. Tamen la diferencoj estas ankaŭ klaraj: la rusan parolas multaj, sed malmultaj opinias ĝin utila en novaj ŝtatoj-membroj. Rimarkindas, ke apartajn lingvojn opinias utilaj tiuj, kiuj scipovas tiujn lingvojn kaj la kono de la lingvo en iu membro-ŝtato influas ankaŭ al ĝia perceptata utilo. Tiel, ekzemple, la francan oni ne opinias utila en landoj, kie ĝi ne estas multe parolata kiel fremda lingvo. Ankaŭ la hispanan opinias utila aparte tiuj, kiuj ĝin jam lernis (tabelo 7).

Tabelo 7. Opinias la lingvon utila (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

	scipovas la lingvon	**ne scipovas la lingvon**	**entute**
angla	94%	69%	78%
germana	62%	23%	29%
franca	59%	21%	26%
hispana	61%	12%	15%
rusa	31%	2%	3%
itala	35%	2%	3%

ĉina	73%	2%	2%
nederlanda	47%	0,5%	0,8%
araba	32%	0,6%	0,7%
sveda	36%	0,3%	0,5%
pola	28%	0,3%	0,5%
portugala	26%	0,3%	0,4%
greka	26%	0,3%	0,4%
turka	22%	0,2%	0,3%
ĉeĥa	10%	0,1%	0,2%
hungara	35%	0,1%	0,2%
rumana	29%	0,1%	0,2%
kataluna	21%	0,1%	0,2%
dana	36%	0,1%	0,1%
finna	27%	0,1%	0,1%
latva	48%	0%	0,1%
slovaka	15%	0%	0,1%
slovena	25%	0%	0,1%
bulgara	33%	0%	0,1%
kroata	20%	0%	0,1%
irlanda	22%	0,1%	0,1%
leceburga	40%	0%	0,0%
estona	54%	0%	0,0%
litova	48%	0%	0,0%

Fonto: Eŭrobarometro 64.3

La anglan opinias utila preskaŭ ĉiu el tiuj, kiuj ĝin scipovas kaj ankaŭ tre granda parto el tiuj, kiuj ne parolas ĝin kiel gepatran. Ankaŭ granda parto el tiuj, kiuj scipovas la francan, germanan kaj hispanan, opinias tiujn lingvojn utilaj, sed inter tiuj, kiuj ne scipovas ilin, la nombro estas malpli granda. La ĉina estas tre interea kazo: la ĉinan opinias utila tre granda parto el tiuj, kiuj ĝin scipovas kaj ankaŭ relative multaj el tiuj, kiuj ĝin ne scipovas.

Aliaj lingvoj ne estas konsiderataj utilaj de tiuj, kiuj ilin ne konas, kaj kelkaj lingvoj, ekzemple la ĉeĥa, la slovaka kaj la kroata ne ricevas grandan subtenon eĉ inter tiuj, kiuj parolas tiujn lingvojn. Ili estas klare aldonaj lingvoj al la du plej utilaj. La aferon klarigas tio, ke la ĉeĥa estas parolata kiel fremda lingvo plejparte en Slovakio, la slovaka en Slovakio kaj Ĉeĥio kaj la kroata en Slovenio, kie la plej utilaj lingvoj estas kutime la angla kaj la germana.

La relative granda utileco de la nederlanda, la sveda, la estona, la latva kaj la litova lingvoj aperas pro la fakto, ke ili estas oficialaj lingvoj en landoj, kie ili estas parolataj kiel fremda lingvo.

El tiuj, kiuj ne scipovis eĉ unu fremdan lingvon, opiniis utilaj la anglan 66% (el tiuj, kiuj ne parolis ĝin kiel denaskan), 28% la francan, 21% la germanan kaj 15% la hispanan. Al iliaj opinioj influas ne la propraj spertoj pri utileco, sed ĝenerale en socio ekzistanta ideo pri utilaj lingvoj.

En plilarĝiĝinta EU la pozicio de la angla kiel “utila lingvo” estas senprecedence alta kaj la germana kaj la franca estas egale en la dua pozicio, tiel ke la francan oni opinias utila en suda kaj okcidenta Eŭropo kaj la germanan en norda kaj orienta Eŭropo. La kredo pri la utila lingvo estas evidente forta faktoro en decido pri la lernota lingvo, ankaŭ tial la pozicio de la angla restos forta. Tamen tiaj kredoj povas ŝanĝiĝi multe pli rapide ol la aktualaj lingvoscioj.

Fakte, la populareco de la germana kaj la franca falis ĝuste pro tio, ke ilia populareco falis inter tiuj, kiuj ne scipovis tiujn lingvojn. En 1998 eĉ 42% el tiuj, kiuj ne scipovis la francan opiniis ĝin populara en la tiamaj EU-landoj, dum la sama nombro estis nur 28% en tiuj landoj en 2005.

Populareco de lingvoj en diversaj sociaj grupoj

Socia klaso

Laŭ socia klaso la angla lingvo estas pli ofte perceptata utila inter pli altaj sociaj klasoj. El manaĝeroj pli ol 90% opinias la anglan utila, dum el laboristoj nur 81% opinias tiel. Same la franca kaj la hispana havas pli da subteno kiel utila lingvo en pli altaj sociaj klasoj, dum la germana havas pli-malpli la saman popularecoin en ĉiuj sociaj grupoj (krom hejmmastroj)

Tabelo 8. Utileco de lingvoj laŭ sociaj grupoj (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

Socia grupo	**angla**	**germana**	**franca**	**hispana**	**itala**	**rusa**	**alia**	**neniu**
Entreprenistoj	81	27	29	17	4	4	11	8
Manaĝeroj	92	31	36	22	4	5	13	2
Aliaj oficistoj	89	28	31	21	4	3	11	3
Laboristoj	81	28	27	16	4	3	10	9
Hejmmastr(in)oj	72	19	26	16	4	3	6	15
Studentoj	94	33	34	20	3	4	8	1
Pensiuloj	58	24	25	12	3	4	8	20
Senlaboruloj	77	28	24	14	4	4	11	9

Eduko

Tiuj, kiuj edukiĝis pli longe opinias lingvoscion pli utila ol tiuj, kiuj finis sian lernejon en pli frua aĝo. Eŭrobarometroj dividas edukon laŭ aĝo kiam la edukado finiĝis. Tiel

Tabelo 9. Utileco de lingvoj laŭ eduko (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

Aĝo kiam edukado finiĝis	**angla**	**germana**	**franca**	**hispana**	**itala**	**rusa**	**alia**	**neniu**	**sen resp ondo**
-15 jaroj	57	18	25	12	3	2	7	23	11
16-19 jaroj	80	29	28	16	4	4	10	8	5
pli ol 20 jaroj	90	30	31	20	4	5	11	3	2
ankoraŭ studas	94	33	34	20	3	4	8	1	2

Tamen la malpli alta populareco de la angla en malpli edukitaj grupoj aperas pro la fakto ke relative multaj ne havas opinion pri utila lingvo aŭ ne respondis al la demando. Se kalkulita el tiuj, kiuj nomis iun utilan lingvon, la anglan opinias utila eĉ 86% ankaŭ en plej malalte edukita grupo. Estas des pli rimarkinde, ke la populareco de la franca, hispana, itala kaj iu alia lingvo ne multe kreskas kun la eduko: sekve se kalkulita nur inter tiuj, kiuj nomis iun lingvon utila, ilia populareco fakte restas senŝanĝa aŭ eĉ malkreskas kun pli alta eduko.

Lingvoscio

Ju pli da lingvoj persono scipovas des pli ofte li aŭ ŝi opinias ke la angla estas unu el du plej utilaj lingvoj, same estas ĉe la franca. Tiuj, kiuj scipovas tri lingvojn opinias ke iu alia lingvo, ofte iu regione grava lingvo estas fakte pli utila ol iu el grandaj lingvoj, kiujn ili scipovas.

Tabelo 10. Utileco de lingvoj laŭ nombro de scipovataj lingvoj (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

Lingvo	**ne fremdaj lingvoj**	**1 f. l.**	**2 f. l.**	**3 f. l.**
angla	58%	**78%**	**82%**	**83%**
franca	22%	23%	26%	**31%**
germana	21%	23%	**32%**	30%
hispana	11%	16%	**17%**	14%
rusa	2%	4%	6%	5%
itala	2%	3%	3%	4%
iu alia	8%	12%	11%	**18%**
neniu	**16%**	4%	2%	2%
sen respondo	**10%**	3%	1%	1%

Tamen la plej forta indikilo pri la opinio, ke la angla estas utila lingvo estas la scipovo de la angla lingvo. Se ni observas aparte iujn, kiuj ne scipovas la anglan, inter ili la scio de pluraj lingvoj fakte maloftigas la elekton de la angla kiel unu el du plej utilaj lingvoj. Tamen 60% el tiuj, kiuj scipovas tri aliajn fremdajn lingvojn sed ne la anglan, opinias la anglan unu el du plej utilaj lingvoj. Ĝenerale la scipovo de iu lingvo forte influas al tio, ĉu tiu aŭ alia lingvo estas opiniata utila aŭ ne.

Loĝloko

Tiuj, kiuj loĝas en grandaj urboj opinias la anglan pli ofte utila lingvo ol tiuj, kiuj loĝas en kamparo. Tamen la loĝloko havas relative malgrandan signifon al opinio pri utilaj lingvoj. Ankaŭ la franca kaj “iu alia” estas pli popularaj en grandaj urboj, dum ĉe aliaj lingvoj la diferencoj estas tre malgrandaj. Tiuj, kiuj loĝas en grandaj urboj pli ofte havas opinion pri utilaj lingvoj, dum en kamparo pli multaj opinias, ke neniu lingvo estas utila.

Tabelo 11. Utileco de lingvoj laŭ loĝloko (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

Lingvo	kamparo	malgrandaj, mezaj urboj	grandaj urboj
angla	73	80	81
franca	27	28	31
germana	27	27	26
hispana	15	17	17
rusa	3	4	4
itala	4	3	4
iu alia	8	10	11
neniu	13	9	8
sen respondo	6	5	5

Aĝo

Pli junaj opinias la anglan utila pli ofte ol malpli junaj personoj. La samo estas vera ankaŭ kiam temas pri la franca, la germana kaj la hispana, sed la diferencoj estas pli fortaj ĉe la angla.

Tabelo 12. Utileco de lingvoj laŭ aĝo (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

Lingvo	15-24	25-34	35-44	45-54	55-64	65-
angla	91	89	84	79	72	54
franca	33	29	30	28	29	23
germana	32	28	29	27	23	22
hispana	20	19	19	16	15	12
rusa	3	3	3	4	4	3
itala	3	4	4	4	3	3
iu alia	9	11	10	11	10	7
neniu	2	4	6	11	13	23
sen respondo	4	3	4	4	7	12

La aktuala lingvoscio influas en diversaj aĝgrupoj malsimile. Junuloj, kiuj ne scipovas la anglan tamen opinias la anglan pli utila ol malpli junaj. Fakte la diferenco inter la scipovo de la angla kaj la opinio ke la angla estas unu el la plej utilaj lingvoj estas la plej granda ĉe la plej maljunaj eŭropanoj. Ĉe la franca la lingvoscio influas male: junuloj, kiuj opinias la francan utila, ofte ankaŭ parolas la francan. Ĉe la germana tia influo ne videblas: la scipovo de la germana havas proksimume similan efikon al la opinio pri la utileco de la germana en diversaj aĝgrupoj.

Ankaŭ kiam temas pri la aĝo al la rimarkitaj diferencoj influas grandparte la fakto ke pli maljunaj pli ofte ne respondis al la demando aŭ ne povis nomi iun utilan lingvon.

Opinioj pri lingvoj

En la jaro 2000 al iom provoka demando, ĉu ĉiuj eŭropanoj devus koni la anglan, pli ol du trionoj (69 %) el loĝantoj de malnovaj ŝtatoj-membroj respondis jese. La plej populara tiu argumento estis en Nederlando, Luksemburgio kaj Svedio, kie 78-82 % samopiniis.

El tiuj, kiuj scipovis la anglan denaske 70 % opiniis la konon de la angla necesa por ĉiu eŭropano, dum el tiuj, kiuj scipovis la anglan kiel fremdan lingvon 81 % opiniis tiel. Do, la denaskaj anglalingvanoj ne subtenas la ideon tiom forte kiel tiuj, kiuj jam penis por lerni ĝin. Tamen eĉ el tiuj, kiuj ne scipovis la anglan 58 % opiniis, ke necesus scipovi ĝin.

Inter tiuj denaskaj anglalingvanoj, kiuj scipovis iun fremdan lingvon, la opinio, ke ĉiu eŭropano devus scipovi la anglan estis fakte iomete malpli forta (66% kompare al 72%). Same efikis la scipovo de iu alia fremda lingvo, sed ne la angla, ĉe tiuj, kiuj ne parolis la anglan kiel denaskan lingvon. Tamen, tiuj kiuj scipovas la anglan kaj ankaŭ iun alian fremdan lingvon, estas eĉ pli firmaj subtenantoj de la deviga angla ol tiuj, kiuj scipovas nur la anglan kiel fremdan lingvon.

En Finnlando la deviga angla estas la plej malpopulara, kvankam la kono de la angla estas relative vasta. Nur 58 % subtenis, dum 39 % kontraŭstaris. En Finnlando la lastatempa lingvopolitika diskuto temis grandparte pri la forigo de la deviga lernado de la sveda, kaj tio eventuale influis ankaŭ ĝenerale kontraŭ deviga lernado de iu aparta lingvo.

En la jaro 2000 estis ankaŭ demandite, ĉu la plivastigo de EU signifos, ke ni ĉiuj devas komenci paroli la komunan lingvon. Nur 38% samopiniis kaj 15% ne sciis respondi, dum 47% malsamopiniis. El tiuj, kiuj samopiniis 87% opiniis, ke ĉiuj devas scipovi la anglan, sed ankaŭ el tiuj, kiuj malsamopiniis pri komuna lingvo, 60% opiniis, ke ĉiuj devus scipovi la anglan.

Tabelo 13. Opinio pri deviga angla kaj neceso de komuna lingvo, % el ĉiuj respondintoj (malnovaj 15 ŝtatoj-membroj)

		ĉiuj devas komenci paroli komunan lingvon		
		jes	ne	sen respondo
Ĉiuj devas scipovi la anglan	jes	33	28	9
	ne	4	16	2
	sen respondo	1	3	15

Do, triono el la respondintoj opiniis ke ĉiuj devas scipovi la anglan kaj ke ĉiuj devas komenci paroli komunan lingvon (kiu evidente estu tiam la angla). Interese estas, ke 4% estas por komuna lingvo, sed ne opinias ke ĉiuj devus scipovi la anglan. Ili estas eventuale potencialaj esperantistoj aŭ subtenantoj de neŭtrala lingvo. Pli ol kvarono tamen kontraŭas komunan lingvon, sed subtenas ĉiukaze la anglan. Tiaj “malkongruaj” respondoj, same kiel relative granda kvanto da personoj sen respondo, indikas, ke multaj respondintoj ne havas klaran ideon pri lingvopolitiko.

Kiujn lingvojn la infanoj lernu?

Fine indas rigardi la opiniojn pri la lingvoj, kiujn la infanoj lernu en lernejo. Tiu demando estis inkluzivig ita en Eŭrobarometro en 2005. Eĉ pli ol la utilo de la lingvo por personoj mem, la angla ricevis popularecon kiel lingvo, kiun la infanoj lernu en lernejo. Preskaŭ ĉiuj el tiuj, kiuj respondis al la demando elektis la anglan kiel unu el du lernindaj lingvoj. La pozicio kaj la ordo de aliaj lingvoj estis relative simila ol ĉe la utilaj lingvoj. Gravis ankaŭ ke la infanoj lernu plejparte tiujn lingvojn, kiujn la respondinto jam scipovis.

Tabelo 14. Kiujn du lingvojn la infanoj lernu en lernejo surbaze de propra lingvoscio de respondinto (% el tiuj, kiuj ne parolas la lingvon kiel gepatran)

	scipovas la lingvon	**ne scipovas la lingvon**	**entute**
angla	91	82	85
germana	55	33	36
franca	58	30	34
hispana	54	15	17
rusa	24	2	3
itala	23	2	3
ĉina	36	2	2
araba	32	1,3	1,5
nederlanda	45	0,5	0,8
sveda	27	0,2	0,4
turka	21	0,2	0,4
portugala	9	0,3	0,3
dana	23	0,1	0,2
finna	11	0,1	0,2
greka	11	0,2	0,2
pola	6	0,2	0,2
hungara	26	0,1	0,2
irlanda	33	0,2	0,2
eŭska	49	0,1	0,2
ĉeĥa	7	0,1	0,1
latva	38	0	0,1
slovaka	3	0	0,1
slovena	11	0,1	0,1
rumana	24	0,1	0,1
bulgara	17	0	0,1
kataluna	16	0	0,1
estona	36	0	0
litova	30	0	0
kroata	2	0	0
leceburga	20	0	0
galega	14	0	0
iu alia	--	--	2,9
neniu	--	--	2,4
sen respondo	--	--	4,2

Tre multaj opiniis, ke la infanoj lernu lingvojn en lernejo. Nur entute 7% el respondintoj ne povis nomi eĉ unu lingvon, kiujn la infanoj lernu aŭ rifuzis respondi. Eĉ tiuj, kiuj ne scipovis nomi iun utilan lingvon por si mem persone, opiniis ke la infanoj tamen lernu la anglan (78% el tiuj, kiuj ne parolis la anglan denaske), francan (29%), germanan (29%), la hispanan (9%), aŭ la rusan (3%).

Se realiĝas la opinio pri tio, kiujn lingvojn la infanoj lernu, la scipovo de la angla kreskos ankaŭ estontece. Ankaŭ la scipovo de la franca, la germana kaj la hispana havas eblecojn kreski, ĉar ili plu havas pli da subtenantoj ol fremdlingvajn parolantojn. Inter la pli grandaj fremdaj lingvoj nur la rusa estas pli ofta kiel parolata fremda lingvo ol kiel lingvo, kiun indas lerni.

Konkludoj

La opinio, ke la angla lingvo estas unu el la du plej utilaj lingvoj, fortiĝas kun eduko, pli juna aĝo, pli alta socia tavolo kaj urbeco. La samo validas ankaŭ por scipovo de la angla lingvo. Do, la scipovo de la angla lingvo fortigas la popularecon de la angla, sed ne nur inter tiuj, kiuj ĝin scipovas, sed ankaŭ inter aliaj.

Dum la lasta jardeko la germana kaj la franca perdis sian popularecon kiel utilaj lingvoj. Tio okazis aparte en landoj, kie ilia pozicio kiel lernataj lingvoj estis duaranga, sed ankaŭ en preskaŭ ĉiu lando la opinio pri la utileco de tiuj lingvoj malkreskis. La hispana tamen konservis sian pozicion kiel utila lingvo kaj eĉ plifortigis ĝin. La popularecо de la hispana kreskas eventuale pro la utilo de tiu lingvo dum ferioj en hispanlingvaj landoj kaj pro ĝia globe pligraviĝanta rolo (tio tamen ne influas ĉe la franca lingvo). Ankaŭ kreskis la popularecо de aliaj monde gravaj lingvoj, nome la ĉina kaj la araba, kvankam ilia popularecо daŭre estas tre malalta. Iu alia lingvo, kiu ofte temas pri oficiala lingvo de la loĝlando (se alia ol la gepatra), ankaŭ konservis sian popularecon relative bone.

La popularecо de la angla, kiun infanoj lernu en lernejo, estas eĉ pli alta ol la opinio pri la utilo de tiu lingvo por la respondintoj persone. La angla lingvo estas kvazaŭ facila respondo, kiun oni diras, eĉ sen havi klaran ideon pri la temo. Tion indikas ankaŭ la relative forta pozicio de la angla en kazoj kiam la kvanto de necertaj respondintoj estis malpli granda.

La respondoj al la eŭrobarometraj demandoj pri utilaj lingvoj konfirmas, ke la opinio, ke la angla estas unu el la plej utilaj lingvoj, estas vaste disvastiĝinta kaj tre verŝajne ankaŭ fortos en estonteco. La angla estas populara ne nur inter tiuj, kiuj ĝin scipovas, sed ankaŭ inter tiuj, kiuj ĝin ne lernis, kaj eĉ pli inter tiuj, kiuj ne povas nomi iun utilan lingvon por si mem sed tamen preferas la anglan por infanoj.

Tamen relative multaj agnoskas la gravecon de lingvo de sia lando aŭ regiono eĉ se tiu lingvo estas malgranda en internacia nivelo. Ŝajnas, ke “la mezaj lingvoj” kiuj ne estas la angla kaj ne la lokaj lingvoj, suferas pro la kresko de popularecо de la angla unuavice kaj alie pro la kresko de popularecо de lokaj lingvoj. Krome inter la franca, la germana kaj la hispana estas konkurado inter si pri la graveco, kaj en tiu konkurado la hispana lastatempe sukcesis pli bone ol la la franca kaj la germana.

La plivastiĝo de Eŭropa Unio fakte malplialtigis la proporcion de angleparolantoj inter la loĝantoj, sed ĝi samtempe plifortigis la pozicion de la angla, ĉar la angla tamen estas pli ofte parolata (kaj, kio estas tre grava, pli ofte konsiderata kiel utila lingvo) ol la franca aŭ la germana.

Por multaj la praktika uzebleco de lingvoj estas la plej grava faktoro, kiu influas al opinio pri utileco de unuopaj lingvoj. La praktika uzebleco ofte favoras la plej grandajn lingvojn, aparte la anglan, sed ankaŭ pluraj aliaj lingvoj povas esti gravaj en iuj landoj aŭ regionoj. La anglan parolas, kiel denaskan aŭ fremdan, preskaŭ duono el la loĝantoj de EU, dum la germanan parolas nur 30% kaj la francan proksimume 25%. Al la popularecо de la angla influas tio, ke ĝi estas tiom vaste parolata, kaj la kredo pri popularecо de la angla fortigos ĝian pozicion eĉ pli.

La lingvopolitikaj celoj de la esperanto-movado povas progresi se la lingvoscio de eŭropanoj fariĝos pli plurflanka, ankaŭ se denaskaj parolantoj de grandaj lingvoj lernus aliajn lingvojn, kaj aparte se ili lernus aliajn lingvojn ol la anglan. La lernado de fremdaj lingvoj havas ankaŭ pozitivan infuon ĉe anglalingvanoj: tiam ili malpli ofte opinias ke ĉiuj devus lerni la anglan. Eventuale eblus diri, ke la lernado de fremdaj lingvoj havas pozitivan rolon en la evoluo de lingvopolitika sinteno.

Ĉu popularecо de unu komuna lingvo povas influi pozitive al la popularecо de esperanto? La forta rolo de unu lingvo estas io senpredecenca en nuntempa Eŭropo. Nur antaŭ kelkaj jardekoj la opinio pri utilaj lingvoj estis pli varia, kvankam jam en la 1990-aj jaroj la pozicio de la angla estis supera. La popularecо de la angla kiel lernata fremda lingvo fortigas ĝian sukceson kiel utila lingvo, tamen ankaŭ aliaj lingvoj ne perdis sian popularecon. Se ni rigardas la situacion ekster la rega rolo de la angla, la statuso de malpli grandaj lingvoj fakte fortiĝis, dum la pozicio de la franca kaj la germana malfortiĝis. Eventuale la reganta rolo de la angla kiel la internacia lingvo, donas pli da eblecoj por malpli grandaj lingvoj, dum la grandaj lingvoj, kiuj perdis la konkuradon kun la angla, eventuale perdos. Tio ke la ideo pri komuna lingvo estas relative vaste akceptata favoras nuntempe la anglan, sed eventuale eblus anstataŭi la nuna lokon

de la angla per iu alia lingvo: nur necesus influi al homoj, ke tiu lingvo estu perceptata kiel utila, kaj al tio influus unuavice la uzebloj de tiuj lingvo en laboro, sed eventuale ankaŭ la ideaj kialoj por lerni fremdajn lingvojn.

Bibliografio

Eŭrobarometro 47. 1997. Eurobarometer 47.0, January-February 1997 (elektronika materialo).
Eŭrobarometro 50. 1998. Eurobarometer 50.0, October-November 1998 (elektronika materialo).
Eŭrobarometro 54LAN. 2000. Eurobarometer 54LAN: Special Survey on Language, December 2000 (elektronika materialo).
Eŭrobarometro 64.3. 2005. European Commission. Eurobarometer 64.3: November-December 2005 (elektronika materialo).
Eŭrobarometro en kandidatlandoj en 2001. European Commission, Directorate-General Press and Communication, Public Opinion Analysis Sector. Candidate Countries Eurobarometer 2001.1, October 2001 (elektronika materialo).
Eŭrobarometro en kandidatlandoj en 2002. European Commission, Directorate-General Press and Communication, Public Opinion Analysis Sector. Candidate Countries Eurobarometer 2002.2, September-October 2002 (elektronika materialo).
GESIS (Gesellschaft Sozialwissenschaftlicher Infrastruktureinrichtungen / German Social Science Infrastructure Services) http://www.gesis.org
Pietiläinen, J. 2007. Evoluo de lingvoscio en Eŭropa Unio. Al nur-angla aŭ plurlingva Eŭropo. *Language Problems and Language Planning* 31: 3, 257-279.

Prokopio de Cezareo, enigma historiisto de la epoko de Justiniano (sesa jarcento p.K.)

Geoffrey Greatrex
Profesoro pri klasikaj studoj en la Universitato de Otavo (Ottawa), Kanado, ekde 2001. Esperantistiĝis en 1986 kaj aktivis en JEB kaj EAB en Britio antaŭ ol transloĝiĝi al Kanado en 1998. Tie li estas estrarano de KEA kaj prezidis ĝin dum du jaroj (2004-5); li ankaŭ redaktis ĝian revuon *Lumo* inter 1999 kaj 2004. Profesie li diplomitiĝis kaj doktoriĝis en Oksfordo (1986-1994) kaj verkas pri Prokopio k.a. frubizancaj historiistoj, same kiel pri la orienta limo de la romia kaj bizanca imperioj kaj rilatoj inter romianoj kaj persoj.

Resumo

La aŭtoro proponas unue skizan historion de la sesa jarcento, aparte de la regado de Justiniano. Li analizas kaj la pozitivajn flankojn de ĉi tiu periodo kaj la malpozitivajn, ekz. la naturajn katastrofojn. Ĉio ĉi funkcias kiel enkonduko al pritrakto de la verkoj de la ĉefa historiisto de la epoko, Prokopio de Cezareo. Oni priskribas la vivon kaj karieron de la historiisto kaj pli detale diskutas pri lia fama verko, la Sekreta historio. Ĝian fidindecon li defendas kontraŭ iuj modernaj kritikoj, proponante modernajn paralelojn, kiuj lumigas ĝian estiĝon kaj unu epizodon en ĝi.

Procopius of Caesarea, enigmatic historian in the Age of Justinian (6th century AD)

Summary

The author offers a brief survey of the history of the sixth century, and in particular of the reign of Justinian. He analyses both the positive and negative aspects of the period, e.g. natural disasters in the latter category. All of this serves as an introduction to a discussion of the works of the principal historian of the period, Procopius of Caesarea. The life and career of the historian are discussed, followed by a more detailed analysis of his well-known work, the Secret History (or Anecdota). The author defends its trustworthiness against some modern critics and offers modern parallels for how it came to be written and for one episode in it.

Procope de Césarée, historien énigmatique de l'époque de Justinien (VIe siècle ap.J.C.)

Résumé

L'auteur propose d'abord une brève analyse du VIe siècle, en particulier du règne de Justinien. Il étudie les aspects positifs et négatifs de la période, par exemple les catastrophes naturelles. Tout cela sert d'introduction à une présentation des œuvres de l'historien le plus important de

cette époque, Procope de Césarée. Suit une évocation de la vie et de la carrière de cet historien ainsi qu'une analyse plus élaborée de son œuvre la plus connue, l'Histoire secrète (Anecdota). L'auteur défend la fiabilité de l'œuvre contre les critiques de certains auteurs modernes et propose des parallèles modernes qui éclairent sa genèse et l'un des épisodes qu'elle relate.

Procopius van Caesarea, raadselachtige historicus uit de tijd van Justinianus (6^{e} eeuw na Chr.)

Samenvatting

De auteur geeft eerst een schets van de geschiedenis van de zesde eeuw, in het bijzonder van de regering van Justinianus. Hij analyseert zowel positieve als negatieve aspekten van de periode, bv de natuurrampen. Dit alles als inleiding tot de bespreking van het werk van de belangrijkste historicus van die tijd, Procopius van Caesarea. Leven en levensloop van de historicus worden besproken, en meer gedetailleerd zijn bekendste werk, de Geheime Geschiedenis (of Anecdota). De betrouwbaarheid daarvan wordt verdedigd tegen sommige moderne kritici; gewezen wordt op moderne parallellen, die licht werpen op het ontstaan ervan en op één bepaalde episode.

Prokopio de Cezareo, enigma historiisto de la epoko de Justiniano

Enkonduko

La celo de ĉi tiu prelego estas prezenti nesufiĉe bone konatan historiiston, Prokopio, kiu rimarkinde lumigas la epokon de la imperiestro Justiniano. Por pli bone kompreni la historiiston kaj lian kuntekston, ni diskutos unue pri la epoko mem, pri ĝiaj trajtoj kaj la politiko de Justiniano; due, ni priparolos Prokopion mem kaj liajn plurĝenrajn verkojn; kaj finfine ni konsideras ĉu ni devas akcepti la verecon de unu el liaj verkoj, la akre kritikema kaj skandalplena *Sekreta historio*. Estas mia espero ne nur konigi al vi gravan verkiston sed ankaŭ persvadi vin ke liaj asertoj pri lia vivperiodo ĝenerale pravas kaj fidindas.

Estas bone konate, ke la romia imperio kreskis kaj malkreskis. Dum pli ol jarcento daŭradas debato koncerne la kaŭzojn de tiu malkresko; oni eĉ hezitas nun paroli pri 'malkresko', definitive rifuzas 'dekadencon', kaj ĝenerale preferas 'transformon'. Laŭ tiu interpreto, barbaraj gentoj[2] iom post iom enfiltriĝis en la (ĉefe) okcidentan imperion kaj hejmiĝis tie; la imperiestroj senpotencaj devis akcepti tiun evoluon. Laŭ iuj esploristoj, la falo de la okcidenta imperio neniel tiom brutalis, kiom oni antaŭe ĝin supozis; la plimulto de la enloĝantaro probable apenaŭ konstatis la ŝanĝon de registaro. Tamen notindas, ke tia optimisma, eble eĉ naiva, vidpunkto ne akceptiĝas de ĉiuj esploristoj, kaj vigla debato sendube daŭros longe.[3]

Ĉu oni akceptas nociojn de transformo aŭ ne, oni ĝenerale akceptas, ke la okcidenta romia imperio, post longdaŭra ŝrumpado, malaperis en 476 p.K., jaro, en kiu la armeo en Italio, kiun tiam konsistigis ĉefe barbaraj kontingentoj, mortigis sian estron, Oresto, kaj pensiigis lian junan filon, la imperiestron Romulo (kiun oni kromnomis 'Aŭgusteto', latine *Augustulus*). Jam pasis antaŭe monatoj, estas vere, eĉ kelkaj jaroj, sen imperiestro en la okcidento, sed ĉi-foje neniu sin anoncis (aŭ anoncigis) por anstataŭi Romulon. La nova ĉefo en Italio, Odovakar (*Odoacer*), barbaro laŭsange, regis kiel reĝo, ne imperiestro; lin anstataŭis post milito en 490 la ostrogota reĝo Teodoriko (*Theodericus*).[4]

Substrekendas ke dum la 470-aj jaroj ankaŭ la orientan imperion minacis pluraj danĝeroj: en la jaro 474 mortis la imperiestro Leono (la unua), kiun sekvis sur la trono la knabo Leono la dua. La potenca generalo Zenono tial regentis kaj, post la morto de la juna Leono, heredis la imperion. Tuj estiĝis komploto kontraŭ li, organizita de Ariadno, la vidvino de Leono la unua, kaj la nova imperiestro devis haste forlasi Konstantinopolon kaj rifuĝi en Isaŭrio, t.e. montara regiono en la sudorienta hodiaŭa Turkio, kie li naskiĝis. La frato de Ariadno, Bazilisko (*Basiliscus*) uzurpis la tronon. Gravan rolon ludis gota ĉefo Teodoriko, kromnomita 'la strabulo'; ankaŭ ĉefrolis isaŭraj trupoj kaj estroj. Tamen, post nur unu jaro kaj duono sur la trono, Bazilisko estis kaptita de Zenono kaj liaj aliancanoj. Eĉ tiam daŭre mankis stabileco en la imperio, aparte pro la ĉeesto de la du Teodorikoj en la Balkanoj, kiuj foje kontraŭis unu la alian, kaj foje unuiĝis kontraŭ la romianoj. Post la morto de la strabulo, tamen, kaj la genia propono de Zenono al la ostrogotestro Teodoriko, ke li ekokupu Italion nome de la imperio, la situacio finfine iom stabiliĝis.

Mankas tempo por eniri ĉiujn detalojn de ĉi tiuj eventoplenaj jaroj, sed devas esti klare, ke similan sorton povus suferi la orienta imperio dum tiu jardeko. Dominis ankaŭ tie barbarestroj; okazis ŝtatrenversoj; sed travivis la imperio pro diversaj kialoj, inter kiuj estis pli forta financa bazo kaj la potencaj muroj de Konstantinopolo mem, kiuj malebligis kaj la falon de la ĉefurbo

---

[2] Bv. noti, ke mi uzas la terminon 'barbaro' teknike, t.e. tutsimple por 'ne-romianoj'. Mi ŝuldas grandan dankon al Simon Davies pro lia aglokula kontrolado de mia teksto; li ne respondecas pro la eraroj, kiuj restas.

[3] Vidu ekzemple Cameron 1993, 4-7, Cameron 2000, 972-81; por konvinka rebato de la ideo de 'transformo', vidu (ekzemple) Ward-Perkins 2005.

[4] Por baza rakonto de ĉi tiuj eventoj en Italio, vidu (ekz.) Stein 1959, 395-399, O'Flynn 1983, 129-49, Cameron 1993, 33-36, Bellen 2003, 250-251.

kaj la penetron de eŭropaj barbaroj en Malgrandan Azion.[5] Necesas cetere indiki, ke la orienta imperio suferis, malkiel la okcidenta, de gravaj internaj religioj disputoj: en 451 okazis la kvara ekumena koncilio en Kalcedono, je kiu oni deklaris, ke Kristo posedas du naturojn, homan kaj dian, kvankam li mem estas nur unu persono. La decido ekigis grandan kontroversion, ĉar en multaj orientaj provincoj, ĉefe Egiptio kaj Sirio, la granda plimulto taksis, ke la decido dividis Kriston en du personojn. Sekvis tumultoj, murdoj kaj persekutoj.[6]

La regado de Justiniano: pozitivaj aspektoj

Ni nun eksaltu jarcentduonon por atingi la jarojn 520 kaj trovi tre ŝanĝitan situacion. En 518 mortis la maljuna (orienta) imperiestro Anastazio. Kvankam li havis tri nevojn, kiuj spertis sukcesajn politikajn karierojn sub lia regado, neniu el ili heredis la tronon. Anstataŭe elektiĝis en la palaco la maljuna generalo Justino, konata kiel komandanto kompetenta sed ne tre klera. Baldaŭ evidentiĝis ke lia nevo, Justiniano, zorgas pri multaj aspektoj de la registarotaskoj, eĉ se oni ne devas troigi lian influon dum ĉi tiuj jaroj.[7] En 527 malsaniĝis Justino. La unuan de aprilo li nomumis sian nevon imperiestro; la du viroj regis kune ĝis la morto de Justino la unuan de aŭgusto de la sama jaro. Justiniano okupis la tronon ĝis sia morto en novembro 565.

La epoko de Justiniano fame konatas pro pluraj kialoj. Ĝian gravecon atestas la konstanta fluo da libroj pri la imperiestro kaj pri la tuta jarcento. Biografioj abundas, ĉu popularaj, ĉu pli sciencaj. Ekzistas televidprogramoj, filmoj.[8] Kial do oni tiom atentas aparte ĉi tiun epokon? Kiuj estas la ĉefaj atingoj de la regado de Justiniano? Eblas distingi kelkajn kampojn, en kiuj la imperiestro lasis palpeblan spuron al la posteularo.

(1) Ni komencu per la jura kampo: la imperiestro patronis grandiozan projekton por kodigi ĉiujn romiajn leĝojn. En fulmrapida periodo je la komenco de lia regno, komitatoj de fakuloj, gvidataj ĝenerale de la rimarkinda kvestoro de la sankta palaco (*quaestor sacri palatii*) Triboniano, aperigis serion da leĝokolektoj.

• La justiniana kodo, kiu aperis en 529 (la versio, kiun ni posedas, estas la dua eldono de 534) kaj kunigas ĉiujn leĝojn eldonitajn de imperiestroj inter Hadriano (117-138) kaj Justiniano mem. Ĝi ordigas ilin laŭ temoj kaj la kompilantoj forigis erojn, kiuj ne plu aktualis.

• La 'Digesto' (ankaŭ nomita en la helena lingvo 'Pandektai', kiu signifas 'ĉion indikanta') resumas leĝojn, kiuj datiĝas de la romia respubliko ĝis la kvara jarcento p.K. Ĝi eldoniĝis en decembro 533 post tri jaroj da laboro, dum kiuj la anoj de la komisiono, kiu traktis la projekton, trairis 1500 jurajn verkojn kaj tri milionojn da tekstolinioj.

• En novembro de la sama jaro aperis la 'Institutoj' de Justiniano, manlibro pri juro kiu celis tiujn, kiuj komencis jurajn studojn.

• Laste menciendas la novaj leĝoj de Justiniano (*novellae* latine), ĉar la imperiestro neniel rezignis pri leĝofarado post la apero de siaj grandiozaj kolektoj: temas pri proksimume 150 leĝoj, kiujn li faris sekve de la apero de la dua eldono de la kodo justiniana en 534.

---

[5] Por rakonto de ĉi tiuj orientaj okazaĵoj, vidu (ekz.) Stein 1959, 361-364, 1949, 7-10, Heather 1991, 272-308, Treadgold 1997, 156-64, Bellen 2003, 265-7.

[6] Tiuj, kiuj kontraŭas Kalcedonon nomiĝis kutime monofizitoj, vidu *NPIV*, 754, sed nuntempe oni ĝenerale preferas la terminojn 'kontraŭ-kalcedonanoj' aŭ 'miafizitoj'. Pri la eklezia politiko vidu (ekz.) Winkelmann 1994, 86-97, Stein 1959, 312-315, Maraval 1999, Allen 2000, 814-818, Gray 2005, 215-225.

[7] Vidu Vasiliev 1950, 92-6, Haarer 2006, 246-50.

[8] Biografioj: en la franca, ekz. Maraval 1999 (bona), Tate 2004 kaj Gauthier 1998 (pli popularaj), en la germana, Mazal 2003, Meier 2004 (scienca, ne vere biografio) kaj 2005, en la angla Evans 1996; notu ankaŭ Moorhead 1994, Barker 1966 kaj Ure 1951 daŭre valoras. Aperis populara (sed ne fidinda) angla libro de Rosen en 2007 pri la periodo; multe pli valoras la esearo redaktita de Maas 2005. 50-minuta programo pri Justiniano en la brita serio 'I Caesar' (Mi, Cezaro) en 1997; ankaŭ ekzistas filmo 'La lukto por Romo' aperigita en la 1970-aj jaroj, pri kiu vidu www.peplums.info/pep29.htm.

La kvar verkoj kune nuntempe konatas sub la titolo ‘Korpuso de civila juro’ (*Corpus Iuris Civilis*).

De ĉi tiu aspekto de la justiniana epoko ni substreku du elementojn.[9]

Unue, estas dank’ al la projekto de Justiniano, ke la romia juro konserviĝis ĝis hodiaŭ, kaj ke ĝi tiom influis plurajn eŭropajn jursistemojn. Kiel rimarkis la fama angla historiisto Eduardo Gibbon, ‘La vanaj titoloj de la venkoj de Justiniano jam polviĝis; sed la nomo de leĝofaristo enskribiĝas en bela kaj eterne daŭra monumento’.[10]

Due, notindas kaj la memfido de Justiniano kaj la fido je Dio. Ambaŭ klare atestiĝas en la alparolo al la senato (de 528), per kiu li lanĉis la kompilon de la kodo: ‘La aferojn, kiujn antaŭaj imperiestroj taksis korektendaj, sed kiujn neniuj sukcesis efektivigi, Ni decidis fari nun kun la helpo de ĉiopova Dio’.[11] La jura historiisto Tony Honoré taŭge rimarkigis, ke, eĉ frue dum sia regno, Justiniano jam konscias vivi dum la epoko de Justiniano: li dotis per sia nomo ne nur la kodon, sed ankaŭ urbojn, magistratojn, eĉ studentojn.[12]

(2) En la arkitektura (kaj arta) kampo oni eĉ hodiaŭ povas admiri la energion kaj ambicion, kiuj karakterizas la fruajn jarojn de lia regado. Sufiĉas vojaĝo al Istanbulo, la bizanca Konstantinopolo, por tie admiri ne nur la rimarkindan preĝejon ‘Sankta Saĝeco’ (*Hagia Sofia*, helene), sed ankaŭ aliajn preĝejojn, kiuj datiĝas de la sama periodo, ekz. tiun de la sanktuloj Sergio kaj Bakĥo aŭ de Sankta Paco (*Hagia Eirene*, helene). Prokopio, en sia verko *Pri la konstruaĵoj*, donas longan kaj laŭdan priskribon de ĉi tiuj preĝejoj, kie li emfazas la aktivan partoprenon de la imperiestro en la projektoj.

Sed Justiniano neniel sin limigis al la konstruado de sanktaj konstruaĵoj: li respondecas pri pluraj monumentoj de la ĉefurbo, ekz. akvujoj, partoj de la palaco, statuoj k.s.[13] Tra la tuta imperio la imperiestro entreprenis vastan kampanjon de konstruado kaj rekonstruado, ĉefe de preĝejoj, monaĥejoj kaj fortikaĵoj. La spuroj de tiu agado observeblas ankoraŭ nuntage en norda Afriko, en la Balkanoj, en Turkio, Sirio kaj Egiptio.[14] En Italio turistoj daŭre povas rigardi la rimarkindajn mozaikojn konservitajn en la preĝejoj de Raveno; iuj preĝejoj fakte datiĝas de la ostrogota regno, sed Justiniano (aŭ lia reprezentanto) zorge refaris la mozaikojn, por ke ili reprezentu la imperiestran amparon, ne ostrogotojn.[15]

(3) En la kampo imperia, aŭ eble pli precize, imperiisma, Justiniano vaste pligrandigis la orientan romian imperion. Denove dankendas Prokopio pro nia kompreno de la maniero, laŭ kiu la rekonkerado de la okcidenta imperio progresis. En 532 la imperiestro konkludis definitivan pactraktaton kun la persoj, popolo kontraŭ kiu daŭris intermita milito de post 502; necesis pagi 11 000 funtojn da oro por akceptigi la traktaton, sed kompense ĉi tio nomiĝis, iom ambicie, ‘eterna paco’ kaj permesis al la imperiestro reloki siajn soldatojn, kiuj ĝis tiam devis militservi je la orienta flanko de la imperio. Jam la sekvan jaron li forsendis armeon de 15 000

---

[9] Vidu Humfress 2005 por bona enkonduko al la jura flanko de la regno de Justiniano; ankaŭ Honoré 1978, 1-39, Stein 1949, 402-417, Evans 1996, 202-7, Corcoran 2006, 436-7, Herrin 2008, 70-74.

[10] Gibbon-Bury 1906, 470, mia traduko.

[11] *Const. Haec* en Krueger 1967, 1, cf. Humfress 2005, 163; mia traduko (iom simpligita).

[12] Honoré 1978, 16-17, mia traduko. Pazdernik 2005 lerte skizas la etoson de la regado de Justiniano kaj la reagojn de samtempuloj (kiaj Prokopio kaj Johano la lidiano).

[13] Pri la konstruaĵoj de la ĉefurbo, vidu (ekz.) Evans 2005, 49-55, Croke 2005a, Alchermes 2005, 361-5, Herrin 2008, 50-60.

[14] Vidu Moorhead 1994, 52-60, Evans 1996, 218-25, Evans 2005, 55-9, Feissel 2000 (utila komparo de la konstruaĵoj atestitaj de Prokopio kaj de tiuj indikitaj per epigrafoj).

[15] Pri Raveno vidu Evans 1996, 224-5, kiu prave atentigas ke pro du preĝejoj konstruitaj dum la regado de Justiniano, tiuj de sankta Vitalo (*Vitalis*) kaj de sankta Apolinaro (*Apollinaris*) in Classe respondecis iu Julio Argentario (*Julius Argentarius*), ne la imperiestro mem. Vidu ankaŭ Alchermes 2005, 346-8, von Simson 1987, Herrin 2008, 61-9.

soldatoj, sub la generalo Belizaro[16], al norda Afriko, kiu, preskaŭ mirakle, post kelkaj sukcesaj bataloj, komplete detruis la regnon de la vandaloj. Tiu ĝermana popolo estis okupinta la prosperajn teritoriojn de norda Afriko jam unu jarcenton, sed la bizanca armeo forbalais ĝin rimarkinde facile.[17]

Tiel ĝermis en Justiniano la ideo daŭrigi sian rekonkeran programon, kredante, ke dio montris sian aprobon de la projekto per la facileco de la venko, kaj jam en 535 Belizaro invadis sudan Italion. Post kvin jaroj da milito kaj gota sieĝo de Romo, kiu daŭris pli ol unu jaro, Belizaro kapitulaciigis la ostrogotojn.[18] Italio kaj norda Afriko do fariĝis denove partoj de la romia imperio, eĉ se temas pri tre malsamaspekta imperio de tiu, kiu ekzistis antaŭe. La rekonkero de ĉi tiuj kernaj provincoj de la frua romia imperio ja konsistigas rimarkindan atingon, sed la ambicio de Justiniano superis eĉ tion. Jam en 536 li deklaris en sia trideka nova leĝo (*Novella* 30.11.2) 'ni posedas grandan esperon, ke Dio ebligos al ni regi la ceteron de tio regita de la fruaj romianoj ĝis la limoj de ambaŭ maroj, kion ili poste perdis per siaj maldiligentaj kutimoj.'

En la 550-aj jaroj bizancaj soldatoj ekokupis partojn de suda Hispanio, profitante de disputoj inter la visigotoj.[19] Je la orienta flanko de la imperio, fortiĝis la bizanca kontrolo de Laziko (t.e. la antikva Kolĥido/Kolĉido, la tero de la ora ŝaflano), kaj ĝia influo etendiĝis orienten, en la kaŭkazan regionon.[20]

Ĝenerale, tamen, Justiniano preferis pacan kunvivon kun la persoj, almenaŭ tiom, kiom eblis, kaj li agis nur diplomate je ĉi tiu flanko. Bonaj rilatoj estiĝis kun iuj arabaj triboj, ekzemple, kaj alia tribo en Egiptio konvertiĝis al kristanismo, ofta maniero aliancanigi fremdan popolon.[21]

Konklude, Justiniano vaste pligrandigis la surfacon de la orienta imperio, tiel revigligante ĝiajn memfidon kaj potencon. Oni povintus preskaŭ kredi je la reveno de la gloraj tagoj de la frua imperio: ne koincide festis Belizaro triumfon formalan en Konstantinopolo en 534 pro la venko de la vandaloj. Montriĝis amaso da rabaĵoj, kaptitaj de la vandaloj (kiuj fifamis pro siaj rabaj tendencoj), inkluzive eĉ la trezorojn de la templo de Jerusalemo forprenitajn al Romo en 70 p.K. Kiel rimarkigas Prokopio, dum longega tempo neniam vidiĝis tia spektaklo; la lasta fojo kiam tiel triumfis nemembro de la familio imperiestra, estis en 19 a.K.![22]

La regado de Justiniano: la negativaj aspektoj

Baldaŭ ni atingos la kernon de nia artikolo, la verkaron de Prokopio de Cezareo. Sed necesas antaŭe skizi la alian flankon de la regado de Justiniano. Dum longa tempo li profitis de tre alta reputacio – la poeto Dante lokis lin en paradizo – sed modernaj historiistoj sin montras multe pli prudentaj, kiam ili proponas bilancon de lia estrado de la imperio. Iuj komparas lin eĉ al

[16] Mi uzas la nomon en la formo donita de *NPIV*, 149. Mi tamen preferus 'Belizarion', ĉar la helena nomo estas 'Belisarios'. Mi konjektas, ke la posta slava nomo 'Velizar' influis la esperantan version.
[17] Pri la rekonkero de norda Afriko, vidu (ekz.) Stein 1949, 311-318, Evans 1996, 126-136, Bellen 2003, 302-304, Mitchell 2007, 140-142.
[18] Pri la milito en Italio ĝis 540 vidu (ekz.) Stein 1949, 328-368, Evans 1996, 136-151, Bellen 2003, 305-312, Mitchell 2007, 142-147.
[19] Pri la hispana interveno vidu Stein 1949, 560-564, Evans 1996, 160-1.
[20] Vidu Evans 1996, 114-15, 166-8, Greatrex 2005a, 493-8.
[21] Vidu Stein 1949, 300-302, Fowden 1993, 114-20, Greatrex 2005a, 490-3; temas pri la tribo de Nobatoj en Egiptio.
[22] La triumfanto de 19 a.K. estis Lucio Kornelio Balbo. Pri la triumfo de Belizaro vidu Prok. *Militoj* 4.9.1-16 kun Stein 1949, 320, Evans 1996, 132-3. Akompanis Belizaron la venkita kaj katenita vandala reĝo Gelimero, kiu konstante citis la verson de la Predikanto, 'Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo' (1.2, traduko de Zamenhof).

Stalino kaj Hitlero.[23] Same kiel ni listigis la pintojn de lia regado, ni sube prezentos aron da punktoj pli negativaj.

(1) Tio, kion oni povas difini preskaŭ kiel 'kulturajn militojn.' Justiniano firme kredis, ke estis lia devo elimini ĉiujn malortodoksulojn de la romia imperio. Evidente pluvivis daŭre multaj paganaj elementoj en la romia imperio – temploj, festoj, paganoj mem. Kiel rimarkigis lastatempe diversaj esploristoj, aparte kavalirino Averil Cameron, dum la regado de Justiniano observeblas transformo de la romia kulturo: malaperadas la malnovaj, laikaj romiaj kulturo kaj literaturo – li eĉ ĉesis nomumi konsulojn, kiuj ekzistis po du jare de post 509 a.K. – kiun anstataŭas multe pli malferme kristana kulturo, en kiu dominas piaj tekstoj kaj doktrinaj aferoj.[24] Iuj verkistoj, kiel nia Prokopio, sed ankaŭ (ekzemple) Johano la lidiano, daŭre verkis tradicistilajn verkojn, sed tia paganeca literaturo fariĝis danĝera afero. Jam je la komenco de sia regno, en 528-529, Justiniano akre persekutis herezulojn, paganojn kaj samseksemulojn: necesis, laŭ lia opinio, regi tute ortodoksan imperion por ricevi la subtenon de Dio. Sekvis tra lia regado aliaj pogromoj kontraŭ tiuj grupoj, ofte post naturaj katastrofoj, kiuj evidente interpretiĝis kiel la kolero de Dio; ili okazis ĉirkaŭ 546 kaj 562 p.K., kaj eĉ altaj funkciuloj pereis kadre de tiuj persekutoj.[25]

Egale grava laŭ historia vidpunkto estas la fermo de la fama akademio filozofia en Ateno, tiu fondita de Platono mem, kaj kiu travivis jam du jarcentojn de kristanaj imperiestroj. Justiniano tamen malpermesis, ke nekristanoj instruu, kaj en Ateno, kvankam la akademio estis esence privata instituto, la juraj obstakloj enkondukitaj de la imperiestro fine forpelis la filozofojn de la romia imperio: ili ŝajne vojaĝis al Persio, kie ilin bonvenigis la persa reĝo Kosro la unua (531-579).[26] Tiel la regado de Justiniano apenaŭ estas apogeo de la vivo intelekta en la romia imperio.

(2) Eble ne senrilate al la unua punkto, ni priparolas sangan regadon.[27] Ni jam aludis la multajn militojn, kiujn ekigis la imperiestro por rekonkeri antaŭajn provincojn de la romia imperio. Veras, ke norda Afriko kaj Italio relative rapide subjugiĝis: multaj indiĝenoj apogis la revenon de la romianoj. La alveno de la senkompataj impoŝtistoj ŝanĝis iliajn perspektivojn. En norda Afriko okazis gravaj ribeloj; kiam oni finfine ilin subpremis, necesis ankaŭ pritrakti atakojn de tamaziĥtaj triboj. Nur fine de la 540-aj jaroj stabiliĝis ĉi tiuj provincoj.[28]

La sorto de Italio pli malbonis: la duoninsulo ja sufiĉe bone traktiĝis sub la regado de la ostrogota reĝo Teodoriko, kiu strebis daŭrigi la romian sistemon, kaj kiun konsilis multaj aristokratoj romiaj, kiel Boecio (*Boethius* latine) kaj Kasiodoro (*Cassiodorus* latine). Daŭre kunsidis la senato en Romo; iuj monumentoj eĉ riparigis de la reĝo. Dudek jaroj de militoj tamen multe damaĝis la duoninsulon, ĉar post la kapitulaco de la ostrogotoj en 540 aperis nova, pli vigla, ĉefo, Totilo, kiu rapide reprenis la kontrolon kaj multfoje venkis la malbone kunordigitajn bizancajn militestrojn. Nur en 551 kapablis lin decidige subpremi la generalo (kaj eŭnuko) Narseso, kiu finfine kondukis adekvatan armeon en Italion por fini la militon; tamen, necesis ankoraŭ du jaroj por finvenki la ostrogotojn kaj forpeli invadantajn frankojn. Narseso tiel okupis provincon ruinigitan de konstanta milito; la urbo Romo en 546-7 preskaŭ tute malpleniĝis de enloĝantoj, tiom ĝi suferis pro sieĝoj, malsatego k.s.[29]

---

[23] Notinde Honoré 1978, 18, 28-30. La paraleloj kun Stalino (ekz. pri la manio doni sian nomon al lokoj) estas rimarkindaj. Dante, *Paradizo*, kanto 6, 10-27.
[24] Vidu aparte Cameron 1979, komparu Cameron 1993, 128-144, Maas 1992, 38-52, Scott 1985.
[25] Pri la unuaj persekutoj, vidu Honoré 1978, 14-15. Pri la serio da persekutoj, vidu Maas 1992, 67-82, Evans 1996, 66-70, 198, 251 (kun komparoj al Usono en la kvindekaj jaroj, kiam ĉefrolis McCarthy), Greatrex 2005b.
[26] Pri la epizodo vidu Evans 1996, 67-9, Wildberg 2005, 330-333, Watts 2004.
[27] Kiel insistas Prokopio, *Sekreta Historio* (ekde nun *Sek. hist.*) 11.4.
[28] Vidu (ekz.) Cameron 1993, 115-117, Evans 1996, 151-3, 170-1 kaj Prok., *Militojn*, 4.28.52.
[29] Pri la evoluo de la milito en Italio post 540 vidu Stein 1949, 564-611, Evans 1996, 153-4, 171-80. Pri la mizera kondiĉo de la duoninsulo poste vidu Cameron 1993, 121-2, komparu Mitchell 2007, 384-386.

Ankaŭ la oriento grave suferis dum la regado de Justiniano, aparte dum la sukcesa invado de Kosro la unua en 540, en kiu li kaptis plurajn urbojn kaj ĉion forrabis, inkluzive de la enloĝantaro. Falis Antioĥio, ĉefurbo de la orientaj provincoj, kiel ankaŭ Suro (*Sura*) kaj Beroeo, dum kapitulacis Apameo.[30] Necesas mencii ankaŭ la fulmrapidajn rabekskursojn de arabaj triboj aliancitaj al la persoj, kiuj ofte afliktis la orientan limon de la imperio sed foje eĉ penetris preskaŭ ĝis Antioĥio.[31]

Preter eksteraj militoj, skuis la imperion internaj luktoj: du kvazaŭ-partioj, esence aroj da fanatikuloj pri ĉarkonkursoj en hipodromoj (ĉevalkurejoj), nomitaj laŭ la koloro de la teamoj, verduloj kaj bluuloj, sange interbatalis en ĉiuj grandaj urboj de la orienta imperio. La plej fama tumulto okazis en Konstantinopolo en januaro 532 kiam la du grupoj unuiĝis post fuŝekzekuto de unu verdulo kaj unu bluulo: post kiam Justiniano rifuzis pardoni al ili la vivon, la partianoj manifestaciis kaj fine nomumis novan imperiestron, Hipation, kiu je la fina tago de la ribelo ekokupis la imperiestran loĝion en la hipodromo. Laŭ Prokopio, nur la kuraĝo obstina de Teodora, la edzino de Justiniano, persvadis lin resti en la palaco kaj ne fuĝi. Anstataŭe li ordonis al siaj soldatoj lanĉi brutalan atakon kontraŭ la fanatikuloj, kiuj ariĝis en la hipodromo, kaj tie ili subpremis la ribelon per la morto de ĉirkaŭ 30 000 partianoj.[32]

(3) Laste, kaj ne malpli grave, abundis naturaj katastrofoj dum la sesa jarcento.[33] Evidente, ne kulpas Justiniano pro ili, kvankam li, kiel preskaŭ ĉiuj romianoj, sendube kredis, ke la katastrofoj indikis la malkontenton de Dio. Ili do iasence ligiĝas al la unua punkto, ĉar ili inspiris la imperiestron ekagi kontraŭ malortodoksuloj kaj aliaj, kiuj povintus provoki la koleron de dio.

La plej granda katastrofo, sen ajna dubo, estis la ekapero de la pesto en 541, kiu rapide disvastiĝis tra la tuta imperio (kaj preter ĝi). Ni ne povas mencii ĉiujn detalojn de ĉi tiu epizodo, sed sufiĉas noti, ke ja temas pri la unua certa ekapero de la pesto en la historio, kaj ke ĝi grave malpligrandigis la enloĝantaron de la imperio: eble eĉ triono de la enloĝantaro mortis. Pli suferis la urboj ol la kamparo. En Konstantinopolo, kiam plej aktivis la pesto, mortis ĉiutage 5000 homoj, eble eĉ 10 000. Egale serioze, post ĉi tiu unua mortiga ondo, regule reekaperis la pesto, pli-malpli ĉiun dek-kvinan jaron, kio malebligis efikan restabiliĝon de la enloĝantaro. Kortuŝajn priskribojn de la pesto kaj ĝiaj sekvoj por la homoj liveras Prokopio kaj la miafizita misiisto Johano de Efezo.[34]

Sed la katalogo de katastrofoj ne limiĝas nur al la pesto. En 536-7 okazis ‘polvnuba evento’, kiel ĝi nun nomiĝas, kaŭzita probable de erupciego apud Indonezio; ĝi ĵetis ĉielen tiom da polvo, ke ĝi kaŝis la sunon, tiel ŝanĝante la klimaton tra multaj mondopartoj, inkluzive de la mediteranea regiono. Pluraj fontoj aludas gravajn problemojn pri la rikoltoj en tiuj jaroj; en Italio okazis malsatego.[35] Post tiaj eksterordinaraj katastrofoj ŝajnas kvazaŭ banale mencii tertremojn: tamen Antioĥion faligis tertremoj en 526 kaj 528, kaj pluraj aliaj urboj suferis pro tiaj seismoj.[36]

[30] Pri ĉi tiu kampanjo vidu Evans 1996, 154-8, Greatrex kaj Lieu 2002, 102-8, Boerm 2006.
[31] Vidu (ekz.) Greatrex 1998, 26-31, Greatrex kaj Lieu 2002, 84-7. Notindas, ke la romianoj utiligis siajn proprajn arabajn aliancanojn, kiuj finfine sukcese rebatis la persajn arabojn.
[32] Pri ĉi tiu fama ribelo, nomita ‘Nika’ (‘Venku!’, ofta krio de la partianoj) vidu Moorhead 1994, 40-52, Evans 1996, 119-25, Greatrex 1997, Meier 2003b (sed lia konspira teorio ŝajnas al mi malprobabla).
[33] Por statistika pruvo vidu Stathakopoulos 2004, 23, kiu notas (ekz.) 37 noticojn pri malsategoj en tiu jarcento kaj 52 de pesto, sume 89; la sumo por la kvina jarcento estas 53, por la sepa jarcento 42.
[34] Elstaran analizon de la pesto proponas Horden 2005, sed vidu ankaŭ Evans 1996, 160-165, Sarris 2002, Meier 2003a, 321-340, Mitchell 2007, 372-374. Horden kaj Evans donas la referencojn al Prokopio kaj Johano.
[35] Vidu Koder 1996, Keys 1999, Horden 2005, 152-3 (iom skeptike), Arjava 2005, Mitchell 2007, 375-377.
[36] Vidu (ekz.) Stein 1949, 242-243, 420 (kiu notas aliajn katastrofojn), Meiera 2003, 345-356.

Literaturo de la epoko

Neniu, mi esperas, dubos, ke eventoplenas la regado de Justiniano. Sen verkistoj, tamen, eventoj kvazaŭ ne ekzistas: ni bezonas konkretajn priskribojn por certiĝi pri tio, kio okazis, kiam ktp. Ja arkeologio povas provizi nin per iuj ĝeneralaj detaloj, sed literaturaj fontoj ludas la plej gravan rolon. Tial bonŝancas, ke ankaŭ ili aparte abundas dum ĉi tiu jarcento.

Ni nun koncentriĝos pri la verkoj de Prokopio, jam plurfoje aludita, sed antaŭe indas mallonge insisti pri la relativa abundeco da samtempaj verkistoj. Inter ili troviĝas aliaj historiistoj, kiel Agatio de Mirino (en Lidio), kiu daŭrigis la verkon de Prokopio, sed ankaŭ verkis poeziaĵojn, kaj Menandro la gardisto. Same menciindas la du ekleziaj historiistoj, kiuj verkis fine de la jarcento, unuflanke la kalcedona verkisto Evagrio, aliflanke la miafizito Johano de Efezo, kiu verkis en la siria lingvo. La ĝenro de kronikoj pli kaj pli populariĝis je ĉi tiu epoko: ties reprezentantoj dum la jarcento estas la grafo (latine, *comes*) Marcelino, kiu verkis latine, Johano Malalaso, kaj alia siria verkisto nuntempe konata kiel pseŭdo-Zakario la oratoro.[37] Sed evidente ne nur historiistoj verkis dum ĉi tiu epoko: ekzistas ankaŭ verkoj de Johano la lidiano (pri aŭguroj, ekz., kaj pri oficoj), platonstila filozofia dialogo, liturgiaj verkoj, aktoj de ekleziaj diskutoj kaj (evidente) leĝoj.[38] Jen la kunteksto de la preparado de la verkoj de Prokopio.

La vivo kaj verkoj de Prokopio

Venas la momento – jam temp' está, oni eble riproĉetos – por priparoli Prokopion mem. Kiel la plimulto da antikvaj historiistoj, li diras tre malmulton pri si. Li naskiĝis en Palestino en la urbo Cezareo, hejmurbo egale de la fama eklezia historiisto Eŭsebio (ĉ. 260-339), impona kaj floranta metropolo en la sesa jarcento.[39] Oni rajtas supozi, ke li estis ano de nobla aŭ nobleta familio, ĉar li evidente ricevis altgradan edukadon, kio poste ebligis al li la komponadon de liaj verkoj. Eble li edukiĝis parte eb la fama skolo de Gazao; ne estas certe.

En siaj dudekaj jaroj li nomiĝis (jura) konsilisto de la generalo Belizaro, kaj li akompanis lin en ĉiuj liaj kampanjoj ĝis 540. Tiel li povas proponi proprokulajn atestaĵojn pri gravaj eventoj, ekz. la rimarkinda venko de Belizaro kontraŭ la persoj apud Dara en 530, pri liaj sukcesoj kontraŭ la vandaloj, kaj poste en Italio kontraŭ la gotoj. Samtempe li skizas la antaŭan historion de la koncernaj popoloj kaj regionoj, minante pli fruajn fontojn, sed modifante iliajn informojn ofte por distri sian legantaron; certe liaj eldiroj ne tiom fidindas por fruaj eventoj kiel por tiuj de lia propra vivtempo. Dum la 540-aj jaroj li vivis en Konstantinopolo; probable li ne plu volis (aŭ povis) sekvi Belizaron, kies kariero stagnis kaj eĉ malprosperis ekde tiam. Tiel li vidatestas la suferadon de la enloĝantoj de la ĉefurbo, kiam frapis ilin la pesto en 542.

En 551 li eldonigis la sep unuajn librojn de siaj *Militoj*, t.e. estas la militoj, kiujn faris Justiniano okcidente kaj oriente; la du unuaj pritraktis tiujn, kiuj okazis en la oriento, kontraŭ la persoj, la du sekvaj tiujn, kiujn oni faris en norda Afriko, kaj la tri lastaj tiujn, kiuj okazis en Italio. Probable en 554 aperis oka libro, en kiu Prokopio daŭrigis sian rakonton de la militoj; ĉi-foje, tamen, li traktis ĉiujn militojn, orientajn kaj okcidentajn, en la sama libro, kaj samtempe

[37] Ĉiuj aŭtoroj supre listigitaj verkis helene, se ne indikite alie. Pri ili ĉiuj vidu la utilan lastatempe eldonitan libron de Treadgold 2007. Vidu ankaŭ Rapp 2005 ĝenerale; pri Malalaso, Jeffreys kaj aliaj 1990, Beaucamp 2004, Beaucamp kaj aliaj 2006, pri Marcelino, Croke 2004, pri pseŭdo-Zakario, Greatrex 2006a kaj 2006b. Pri posteuloj de Prokopio vidu ankaŭ Whitby 1995.

[38] Pri Johano la lidiano vidu aparte Maas 1992. Pri la dialogo vidu lastatempe O'Meara 2003, 171-87, Boerm 2007, 283-91. Pri aliaj literaturaĵoj vidu Rapp 2005, komparu Cameron 1985, 19-32, kiu mencias aliajn interesajn verkistojn, kiel Kosmason, kiu ricevis la kromnomon 'tiu kiu al Indio vojaĝis', ĉar li priskribas siajn vojaĝojn en la oriento kaj kiu kredis firme je la biblia versio de la estiĝo de la mondo.

[39] Vidu Holum 2005, 91-2.

kaptis la okazon korekti kelkajn erarojn en la antaŭa verko (kies jaman popularecon li cetere notas kun fiero).[40]

La radikoj de klasikstila historio

Antaŭ ol pridiskuti la aliajn du verkojn de Prokopio, taŭgus klarigeto pri la ĝenro de la *Militoj*. Por kompreni la naturon de la ĝenro, necesas retroiri mil jarojn ĝis la patro de la historio, Herodoto. Efektive, la prefaco de lia verko multe similas al tiu de Prokopio: ambaŭ deklaras, ke li rakontas militojn por konservi la memoron de gloraj agoj. Evidente gloro kaj milito kuniras laŭ ĉi tiu vidpunkto. La saman opinion posedis la sekvanto de Herodoto, Tucidido, kiu ankaŭ rakontis la historion de milito, ĉi-kaze la peloponeza milito inter la atenanoj kaj la spartanoj (431-404 a.K.). Estis Tucidido pli ol Herodoto, kiu influis postajn historiistojn en la helena (kaj iagrade la latina) lingvo: oni ekde tiam koncentriĝis pri milito, sed normale pri aktualaj militoj – Herodoto ja raportas militon, sed tiu, kiun li priskribas, la granda kampanjo de Kserkso kontraŭ la helenaj ŝtatoj, okazis kvindek jaroj antaŭ la momento, kiam li verkis. Plie, sekvante la prozan stilon de Tucidido, oni preferis uzi la atikan dialekton de la helena lingvo.

Jen, grandskale, la tradicio kiun heredis, mil jarojn poste, Prokopio. Li imitas ambaŭ korifeajn antaŭulojn, disĵetante herodotecajn anekdotojn tra siaj verkoj, aparte kiam li traktas pli fruan historion, sed adoptante pli seriozan kaj ordoplenan tucididecan stilon, kiam li detale raportas la kampanjojn de Belizaro. Li ankaŭ utiligas la atikan helenan lingvaĵon de Tucidido, granda defio, ĉar de jarcentoj neniu plu parolis tiun lingvon; indas aldoni ke bizancaj historiistoj daŭre preferis tiun stilon ĝis la fino de la imperio (kaj preter ĝi), t.e. ĝis la 15-a jarcento p.K.[41]

Kiel jam devas esti klare, ĉefrolis en tiaj historioj militoj; gravis poluritaj alparoloj de generaloj, normale verkitaj, eĉ inventitaj, de la aŭtoro mem; la stilo iagrade pli gravis ol la vereco, kvankam la historiistoj ĉiam insistis pri la precizeco kaj fidindeco de siaj verkoj. Temas pri gloraj kaj grandiozaj eventoj, ne personaj kaj skandalecaj detaloj, sed evidente ĉiam ludis ian rolon distraj anekdotoj: necesis allogi sian publikon! Sub imperiestroj, historiistoj kiel Tacito kaj Amiano Marcelino (*Ammianus Marcellinus* latine), ambaŭ latinlingvaj verkistoj, kutime preferis silenti la plej aktualajn eventojn kaj regadon: tro danĝeris esprimi sin malferme pri la tiama imperiestro. Tacito priskribas publikan librobruladon en la unua jarcento p.K.: historio ja estis danĝera metio kaj povis sekvigi la morton de tro kritikema verkisto.[42] Aliflanke, ju pli la imperiestro dominis la romian socion, des pli la historiistoj koncentriĝis pri liaj faroj; kaj ofte ili sin montris tre kritikemaj, almenaŭ kiam ili traktis antaŭajn imperiestrojn.[43]

La verkoj ‘Pri la konstruaĵoj’ kaj ‘Sekreta historio’

Malkiel ĉiuj aliaj historiistoj de la tuta antikva mondo, tamen, Prokopio postlasis al ni du aliajn tre malsimilajn verkojn. Temas, unuflanke, pri lia verko *Pri la konstruaĵoj* (de la imperiestro Justiniano) kaj aliflanke, pri la *Sekreta historio*, kiu kaŝiĝis tuj post ĝia verkado kaj malaperis dum duonjarmilo.

---

[40] Pri la kariero de Prokopio vidu nun Treadgold 2007, 176-92, Cameron 1985, 1-18, Kaldellis 2004 (ĝenerale), Evans 1996, 2-5, Greatrex 1996. Detalaj argumentoj pri la datoj de eldonoj troviĝas en Greatrex 1994, Greatrex 2003 (ne akceptitaj de ĉiuj). Pri la taskoj de jura konsilisto vidu Greatrex 1998b (en Esperanto).

[41] Pri ĉi tiu ĝenro, vidu Cameron 1985, 37-46, Treadgold 2007, 1-9. Bonan enkondukon proponas Fornara 1983. La bibliografio pri Tucidido kaj Herodoto abundegas. La 15-a jarcenta historiisto estas Kritobulo de Imbro (*Kritoboulos*, *Imbros*, helene).

[42] Treadgold 2007, 1-9, diskutas ĉi tiujn aspektojn de Tucidido kaj Herodoto; vidu ankaŭ Fornara 1983, 91-141. Tacito prirakontas la periodon 14-96 p.K., kvankam li verkis ĉefe je la komenco de la dua jarcento. En sia ‘Agrikolo’ li priskribas la bruladon de libroj, je ĉapitro 2, komparu ĉapitron 45. Amiano Marcelino daŭrigis la verkon de Tacito, traktante la periodon de 96 ĝis 378, sed nur libroj 14 ĝis 31 konserviĝis ĝis hodiaŭ, kiuj raportas la jarojn 353 ĝis 378; li verkis dum la posta periodo, tamen, sub alia imperiestro; vidu (ekz.) Matthews 1989 kaj Drijvers kaj Hunt 1999 pri Amiano.

[43] Vidu Greatrex 2000, 217-18.

La unua verko estas panegiro, t.e. laŭda verko, kies celo estas la glorado de la atingoj de la imperiestro, ĉi-okaze la amaso da konstruaĵoj, pri kiuj li respondecas, ĉefe preĝejoj kaj fortikaĵoj. Ĝi trairas la imperion geografie, preterlasante (sen evidenta kialo) Italion, detalante la laboron iniciatitan de la imperiestro; foje li longe priskribas apartan konstruaĵon, foje li nur listigas fuortojn. Probable li eldonis la verkon en 554, sed iuj esploristoj daŭre subtenas la alternativan daton 559. Ĉu ĝi estas cinika klopodo altiri la favoron (kaj rekompencon) de la imperiestro? Aŭ ĉu ĝi estas sincera danka laboro de verkisto, kiu finfine konstatis la gravecon de la atingoj de Justiniano? La debato daŭras.[44] Probable Prokopio mortis baldaŭ post ĝia apero, kio povus klarigi, kial ĝi aspektas iom nefinite.[45]

Sed estas lia tria verko, la *Sekreta historio*, kiu stimulis la plej grandan debaton: ĝi estas tute senparalela. Ĝi estas, dekomence ĝisfine, akre kritika priskribo de la regado de Justiniano, proponante tutan liston de ĉiuj fiagoj de la imperiestro kaj lia edzino, Belizaro kaj lia edzino, kaj multaj aliaj altaj funkciuloj. Ĝi kritikas ĉiujn aspektojn de la regado de Justiniano – financajn, religiajn, personajn, militajn. La imperiestron li reprezentas kiel konscian malbonulon, kies celo estas la ruinigo de la imperio kaj lia popolo; Teodora, lia edzino, montriĝas kiel aktorino – vere, prostituitino – kiu kunlaboris kun li por humiligi aristokratojn kaj apogi siajn geamikojn. Du citaĵetoj donos la guston de la verko:

> Kiel iu kapablus kapti la trajtojn de Justiniano per vortoj? Li ŝajnis posedi ĉi tiujn trajtojn [diskutitajn supre en la verko] kaj multajn aliajn pli terurajn kaj kontraŭhomajn. La naturo ŝajnis forpreni la trajtaĉaron de la aliaj homoj kaj ĝin enmeti en lian animon. Krom siaj aliaj (trajtoj) li ege facile bonvenigis kalumniojn kaj estis tre akra pri punoj. Neniam li profunde esploris ion antaŭ ol juĝi, sed tuj, aŭdinte la akuzon, li decidis kaj eldonigis la decidon. Sen ajna hezito li skribis leterojn, kiuj ordonis senkiale la kapton de urbetoj, la bruladon de urboj kaj la malliberigon de tutaj gentoj. Sekve, se iu mezurus ĉiujn spertojn romiajn ekde la komenco kaj volus ilin kompari al ĉi tiuj (de hodiaŭ), ŝajnas al mi, ke li trovus pli grandan masakron de homoj okazintan fare de ĉi tiu viro ol okazis en ĉiu alia epoko.[46]

> Siajn amantojn ŝi mokis kaj indulgis, kaj per novaj teknikoj de sekskuniĝoj ŝi koketis kaj ĉiam aligis al si sendisciplinajn homojn, ĉar ŝi ne opiniis, ke la viro, inter tiuj, kiuj apudis, devas klopodi (flirti), sed prefere ŝi komike kaj klaŭne koksosvinge tentis ĉiujn preterpasantojn, aparte la adoleskantojn. Neniam ekzistis persono pli sub la influo de ĉiuj plezuroj: ofte ŝi ĉeestis bankedon, al kiu ĉiu alportis ion, kun dek junuloj aŭ pli, ĉiuj je sia pinto korpe kaj forte kaj spertaj pri voluptado, kaj ŝi kuŝis kun ĉiuj sambakedanoj dum la tuta nokto. Kiam ili ĉiuj rezignis pri ĉi tiu agado, ŝi iradis al iliaj servistoj, eble trideko da ili, kaj pariĝis kun ĉiu el ili, sed eĉ tiam ŝi ne satiĝis de ĉi tia voluptado.[47]

Kiam elfosiĝis ĉi tiu verko en la vatikana biblioteko en la 17-a jarcento, la unuaj fakuloj rifuzis akcepti ke ĝin aŭtoris Prokopio, ĉar ĝi tiom konstrastis al la du aliaj konataj verkoj. Detalaj filologiaj esploroj tamen klare pruvis, ke la stilo samas, kaj cetere abundas en la *Sekreta historio* aludoj al la du aliaj verkoj. La demando tamen restas: kiel ĝin interpreti? Ĉu ĝi estas serioza verko? Citendas la antaŭparolo de la verko:

---

[44] Aparta numero de la franca revuo *Antiquité Tardive* 8 (2000), dediĉiĝis al ĉi tiu grava verko; vidu ankaŭ Cameron 1985, 84-112. Treadgold 2007, 191-2, kredas je la sincero de Prokopio; la plimulto pli dubas. Pri la dato de verkado vidu Greatrex 1994, Greatrex 2003, 49-52: mi preferas la pli fruan daton.

[45] Vidu Cameron 1985, 14-15, Treadgold 2007, 191.

[46] *Sek. hist.* 8.27-30 (mia traduko).

[47] *Sek. hist.* 9.15-16 (mia traduko).

> Ĉion, kio okazis al la raso de la romianoj en la militoj, ĝis nun mi rakontis laŭ metodo, per kiu eblis kunigi ĉiujn rakontojn de la agoj laŭ iliaj kronologia ordo kaj loko. Ekde nun ne plu konvenas al mi rakonti tiel, ĉar raportiĝos ĉi tie ĉio, kio okazis ĉie en la romia imperio. La kaŭzo estas, ke mi ne povis priskribi (la eventojn) laŭ taŭga maniero, dum ankoraŭ vivis tiuj, kiuj ilin kaŭzis. Ne eblis eviti la amason da spionoj nek, se oni eltroviĝis, la plej kompatindan morton. Mi ne fidis (eĉ) la plej intimajn de miaj parencoj...[48]

Ekde la unua fojo, kiam mi legis tiujn vortojn, mi ekscitiĝis: jen kuraĝa homo, kiu riskis ĉion por senvualigi la malglorajn flankojn de la regado de Justiniano. Necesis, laŭ Prokopio, rakonti la hontindaĵojn de personoj, kiujn li bone konas: tion li asertas ne nur en la *Sekreta historio*, sed eĉ en (supozeble kaŝa) aludo je la komenco de la *Militoj*.[49]

Tamen lastatempe estiĝis tendenco, kiu dubindigas la sinceron de Prokopio kaj pretendas, ke liaj diraĵoj en la *Sekreta historio* ne meritas seriozan atenton. Mi citos (tradukitan) elĉerpaĵon el tia verko: 'La *Sekreta historio* estas sukcesa fikciaĵo, brila parodio de imperia panegiro. Ĝi diras nenion pri Justiniano kaj Teodora.' La aŭtorino, Leslie Brubaker, tamen pretendas, ke ĝi multon diras pri tio, kiel oni 'konstruas genron' en la sesa jarcento.[50] Mi devas konfesi, ke tia skeptika sinteno profunde ŝokas min: oni povus adopti similan alirmanieron al la teruraj eventoj de la dudeka jarcento. La masakroj kaj genocidoj okazintaj ŝajnas tiom teruraj kaj malprobablaj, ke estontaj historiistoj eble pridubos ilin. Ironie, Prokopio anticipis tian sintenon, kiel li diras mem, denove en la komenco de la verko:

> Sed nun mi aliras alian defion, danĝeran kaj terure netrakteblan – tiun de la vivoj de Justiniano kaj Teodora. Klakas miaj dentoj kaj, kiam mi intencas rakonti tion, mi tre hezitas, ĉar (mi timas) ke la aferoj, kiujn mi rakontos, ŝajnos al tiuj, kiuj naskiĝos poste, nek fidindaj nek probablaj; aparte kiam granda tempofluo igos la rakonton pli malnova, mi timas, ke mi akiros reputacion de mitologo kaj klasiĝos inter la tragediistoj.[51]

Li tamen persistis kaj liveris al ni verukplenan portreton de la imperiestra kortego; lia celo, li insistas, estas, ke oni evitu tiajn monstrajn estrojn en la estonteco. Necesas, por la posteuloj, ne prisilenti tiranajn regadojn (*Sek. Hist.* 1.5-10).

La *Sekreta historio* estas longa verko kaj probable neniam finredaktiĝis: laŭ la plimulto de esploristoj ĝi ne aludas ian ajn eventon post 550. Plurfoje ĝi parolas pri tridekdujara regado de Justiniano; ĉar li tre influis dum la regado de lia onklo, kiel cetere Prokopio insistas en la verko, oni do povas kalkuli lian regadon ekde 518. Komence li vigle atakas la personajn karakterojn de Belizaro, Antonina (lia edzino), Justiniano kaj Teodora; poste li pli koncentriĝas pri la administro de la imperio, kaj finfine eniras pli detalajn punktojn pri maljustaj leĝoj k.s.[52]

Neniu aŭtoro aludas ĝin ĝis la deka jarcento p.K. Oni rajtas supozi, ke Prokopio ĝin pretigis, esperante, ke mortos baldaŭ Justiniano, kiu en 550 estis 65-jara. Sub la sekva imperiestro estos pli sekure aperigi kritikojn de la antaŭa; probable li estus dispersinta la kritikojn tra la *Militoj*, ĉar, kiel mi jam notis aliloke, ekzistas tre personaj kritikoj de individuoj eĉ en tiu 'klasikstila' verko. Temas pri personaj atakoj kontraŭ korteganoj malfavoriĝintaj, ekzemple la prefekto pretoria Johano de Kapadocio: evidente Prokopio nenion riskis per kritiko

---

[48] *Sek. hist.* 1.1-2 (mia traduko). Treadgold 2007, 188, vidas aludon al la familio de la edzino de Prokopio en la lasta frazo.

[49] *Sek. hist.* 1.10, komparu *Militojn* 1.1.5 kun Scott 1981, 74, Greatrex 2000, 216.

[50] Brubaker 2004, 101, 'The *Secret History* is a successful piece of fiction, a brilliant parody on the imperial panegyric. It tells us nothing about Justinian and Theodora.' Ŝi esprimas similan opinion en Brubaker 2005, 432-436. Kaldellis 2004 reprezentas la saman tendencon.

[51] *Sek. hist.* 1.4 (mia traduko).

[52] Vidu Greatrex 1994 pri la dato; Croke 2005b preferas tamen 559. Pri la eco de la verko vidu Cameron 1985, 49-67, Adshead 1993, Rapp 2005, 386, Treadgold 2007, 205-13.

de tiaj homoj. Tial evidentiĝas cetere, ke nek necesas nek eblas klarigi la ekziston de tri tiom malsimilaj verkoj per aludo al 'ĝenraj faktoroj'.[53]

Interesa dudekjarcenta parelelulo por Prokopio estas la altranga historiisto Dmitri Volkogonov (1921-1997), kiu multe esploris pri la soveta sistemo kaj ĝia sangoplena historio, dum li laboris por la komunista partio kiel armea propagandisto. Li ekigis siajn esplorojn jam en la 50-aj jaroj kaj pretigis biografion de Stalino, kiu eldoniĝis nur en 1991. En ĉi tiu verko, kiel en aliaj, kiuj poste aperis, li montris sin arda kritikanto de la reĝimo. Pro sia aliro al la koncernaj dokumentoj li povis lumigi malhelajn kaj malimponajn flankojn de Sovetunio; tamen necesis en 1985, ke li eksiĝu de sia posteno en la burokratio, ĉar eĉ tiam liaj kritikoj ŝajnis netolereblaj. Kiam ni konsideras tion, kion oni nomis 'la prokopia problemo', t.e. la komponado de tri malsamvidpunktajn verkojn, necesas memori Volkogonov kaj liajn samtempulojn. Harold Shukman esprimas la defion, kiun alfrontis pluraj homoj en tiu lando dum tiu tempo: 'Volkogonov konfesis publike ke, kiel multaj altgradaj sovetaj funkciuloj, li vivis du mensajn vivojn, ĉiam pli altiĝante en sia kariero sed samtempe tunelante pli profunden en la arkivoj, kvazaŭ simbole subfosante la sistemon, kiu lin nutris.' Paralele, ju pli Prokopio pripensis la reĝimon de Justiniano, des pli li malkontentis kaj esploris; sed ĉar plej probable li mortis jam ĉirkaŭ 554/5, li neniam havis la eblon aperigi siajn kritikojn.[54]

Ĉu kredi la 'Sekretan historion'?

Ne sufiĉas tempo por eniri la viglan debaton, kiu ĉirkaŭas ankoraŭ Prokopion kaj liajn verkojn, aparte la *Sekretan historion*. Mi tamen volas aldoni novan eron al tiu debato, ĉar unu epizodo en la verko, kiun oni eble taksos neprobabla kaj troiga, malmulte atentiĝis ĝis nun.

Antaŭ ol pridiskuti ĉi tiun epizodon, notindas, ke jam en 1923 la fama irlanda historiisto J. B. Bury klare esprimis sian vidpunkton: 'Ni trovas, ke en granda nombro da kazoj liajn faktojn konfirmas aliaj fontoj, dum en neniu kazo eblas lin kondamni pro aserto, kiu neniel baziĝas sur fakto.'[55] La pretendo de Prokopio, ekzemple, ke la edzino de Justiniano, Teodora, estis prostituitino kaj, antaŭ ol imperiestriniĝi, regule senvestiĝis sursceneje, povas ŝajni nekredebla. Sed eĉ Johano de Efezo, aŭtoro kiu favoras ŝin, nomas ŝin 'Teodora de la bordelo': evidente estis bone konata fakto. Mi pretas kompreneble cedi, ke Prokopio eventuale troigas, kiam li rakontas ĉiujn amoraventurojn ŝiajn; probable li ja estis, kiel multaj samtempuloj, kerne kontraŭvirina. Sammaniere li raportas onidirojn de iuj, kiuj pretendis esti observintaj la imperiestron promeni tra la palaco senkape k.s.[56]

Paralelo napoleona

La koncerna epizodo koncernas kampanjon entreprenitan de Belizaro en 541. Normale akompanis lin eĉ dumkampanje lia edzino Antonina, sed ĉi-foje ŝi restis en Konstantinopolo.

---

[53] Mi donas pli detalajn argumentojn pri ĉi tiuj punktoj en Greatrex 2000. Treadgold 2007, 192, pretendas, ke la verko cirkuliĝis post la morto de Justiniano, sed mankas pruvo. Pri Johano kaj similecoj inter la *Militoj* kaj la *Sek. hist.* vidu Greatrex 1995.

[54] Mi kaptu la okazon danki Gregory Thwaite de Aŭklando, Novzelando, kiu jam antaŭ kvin jaroj menciis ĉi tiun paralelon al mi. La citaĵo venas de Shukman 1998, antaŭparolo al lia traduko de Volkogonov 1998, xiii: 'Volkogonov admitted publicly that, like many senior Soviet officials, he had lived two mental lives, rising higher and higher in his career while burrowing deeper in the archives, as if symbolically undermining the system that nurtured him.' Pri lia vivo, vidu Shukman 1998, xii-xvi, Remnick 1993, 401-11.

[55] Bury 1923 (reeldonita 1958 kaj ofte poste), 426-7, 'For we find that in a large number of cases his facts are borne out by other contemporary sources, while in no instance can we convict him of a statement which has no basis in fact.' La kontraŭan opinion esprimas klare Brubaker 2004, 100 (sen tamen konsideri la argumentojn de Bury). Vidu ankaŭ Scott 1985, kiu lerte montras kiel Prokopio reagas al pluraj leĝoj kaj asertoj de Justiniano; komparu Kaldellis 2004, 223-9, utilan analizon de la lasta parto de la verko.

[56] Por la referenco de Johano vidu Foss 2002, 143; la tuta artikolo tre utilas. Vidu ankaŭ Evans 2002, 19 kaj la tutan libron (pri Teodora); Vasiliev 1950, 96-9. *Sek. hist.* 12 por la onidiroj pri Justiniano, 9 pri Teodora.

Prokopio raportas, ke ŝi tion decidis por profiti de la ĉeesto de sia amanto, Teodozio. Samtempe ŝi ĉion faris por damaĝi sian propran filon Fotion, la vicfilon de Belizaro, kiu akompanis la generalon, ĉar ŝi timis lian influon kaj tion, ke li bone sciis pri ŝiaj amaferoj. Dum Belizaro troviĝis je la orienta limo de la imperio, raporto atingis lin, dank' al la interveno de Fotio, pri la amaferoj de lia edzino. Ili promesis kune agi por kontraŭi ŝin; ŝia potenco estis granda, cetere, pro ŝia granda amikeco kun Teodora. Belizaro sukcesis kapti la persan fuorton Sisaŭranon, dum Antonina forlasis la ĉefurbon kaj vojaĝis ĝis la fronto (kun sia amanto).

Tuj kiam Belizaro aŭdis tiun novaĵon, laŭ Prokopio, li taksis ĉion alian malpli grava kaj haste rekondukis sian armeon ĝis romia teritorio. La historiisto agnoskas, ke aliaj kialoj, kiujn li raportis en la *Militoj*, ankaŭ decidigis lin tiel, sed li insistas, ke li ĉi tie malkaŝas la veran motivon. Li aldonas, ke multaj romianoj akuzis lin pro tio, ke li subigis militajn konsiderojn al siaj personaj interesoj kaj multe malpli vigle agis, ol se li ne tiom atentus sian edzinon kaj ŝian konduton. Kvankam li gardigis ŝin de soldatoj kaj hontigis ŝin, li ne kondamnis ŝin; kiam Teodora aŭdis pri la situacio, ŝi alvokis ilin al Konstantinopolo kaj devigis lin repaciĝi kun ŝi.[57]

Konfesendas, ke la supra raporto ŝajnas romaneca, apenaŭ kredebla. Belizaro certe retretis, sed sufiĉas la militaj klarigoj de Prokopio en la *Militoj*, ĉefe zorgoj pri eventualaj arabaj rabekskursoj. Malgraŭ tio, mi opinias, ke la versio de la *Sekreta historio* meritas seriozan konsideron. Mi argumentu tion per analogia epizodo, multe pli bone dokumentita.

En la printempo de 1796 invadis Italion franca armeo sub la ordono de Napoleono. Per rapidaj marŝoj kaj brilaj taktikoj li plurfoje surprizis kaj venkis la aŭstrajn armeojn. La urbo Mantuo kaptiĝis en marto 1797 kaj pactraktato favorega al la francoj subskribiĝis kun la aŭstroj en oktobro de la sama jaro. Ne necesas pridiskuti la militajn detalojn. Daŭre ekzistas la leteroj verkitaj de la generalo mem al sia edzino, Jozefino de Beauharnais. Klare evidentiĝas de tiuj leteroj, kiom li ŝin amis, kaj kiom lin torturis ŝia foresto de li kaj liaj duboj pri ŝia fideleco: oni devigis ŝin resti en Parizo je la komenco de la kampanjo, kaj nur fine de junio ŝi ricevis permeson vojaĝi al Italio. Tamen ŝi havis nenian entuziasmon por la vojaĝo: ŝi preferus resti en Parizo kun siaj amikoj. Akompanis ŝin dum la vojaĝo grupo da amikoj, inter kiuj estis S-ro Hippolyte Charles, probable ŝia amanto. Kiam ŝi atingis Milanon meze de julio Napoleono tuj vizitis ŝin, forlasante sian kampanjon; du tagojn poste li reiris al la milito. Dum la cetero de la kampanjo ŝia ĉeesto kaŭzis problemojn, ĉar aŭstraj atakoj kelkfoje minacis urbojn, kie ŝi restis. Samtempe ŝi ofte asociiĝis kun Charles, kiu militservis, same kiel kun la generaloj Murat kaj Junot. Iam, kiam Jozefino kaj Junot kartludis, Napoleono enŝteliĝis en la ĉambron kaj tiom forte forŝiris la hararon de tiu lasta ke remalfermiĝis antaŭa vundo, plenigante liajn manojn per sango.[58]

Konkludo

Modernaj esploristoj ĝenerale malatentas la amrilatojn de individuoj en siaj verkoj; tial, kvankam abundas verkoj pri Napoleono, estas malfacile trovi utilan analizon, kiu pritraktas la militajn kampanjojn kaj la personajn rilatojn de la generalo. Sed estas klare, ke (ekzemple) meze de julio 1796 la milito kontraŭ la aŭstroj daŭre progresis; ĝuste tiam, efektive, la francoj komencis la sieĝon de Mantuo; sed ĝuste tiam foriris la generalo por renkontiĝi kun sia edzino

[57] Mi resumas *Sek. hist.* 2-3. La kampanjon kontraŭ la persoj rakontas Prok. en *Militoj* 2.16-19, komparu Greatrex kaj Lieu 2002, 109-111.

[58] Mi dependas de la verkoj de Laing 1973, 60-88, kiu citas plurajn leterojn, de Dwyer 2007, 238-245. Iom popularecan priskribon proponas Gallo 1997, 256-273, komparu Delderfield 1959, 57-8 (kiu dubas ĉu la rilato inter Jozefino kaj Charles estis pli ol amikeca). Adekvatan militan analizon proponas Connelly 2006a, 19-46, komparu Connelly 2006b, 77-96.

en Milano. Ne eblas do ne konkludi, ke la foresto de la armeestro je kritika momento necese malhelpis la militon, eĉ se, bonŝance por la francoj, la aŭstroj ne sukcesis ekspluati la okazon.[59] Espereble ĉi tiu paralelo kredindigas iom la verkon de Prokopio: ne eblas, evidente, pruvi, ke liaj asertoj (en ĉi tiu kazo) pravas. Sed mi esperas, ke mi montris, ke defendeblas epizodoj eĉ unuavide romanecaspektaj.[60] Estus firapide forĵeti la asertojn de la historiisto pro tio, ke li ilin esprimas tiom fervore kaj ja troige en iuj cirkonstancoj: male, ni devas lin danki, ke li riskis sian vivon, por ke postaj generacioj komprenu, kiom suferis tiom da homoj dum tiu epoko

Bibliografio

La verkoj de Prokopio ekzistas en pluraj tradukoj. Bonan anglan tradukon proponas H. B. Dewing en la serio Loeb, eldonitann de Harvard-universitato, 7 volumoj (Kembriĝo, Masaĉuseco, 1914-1940); aperas ankaŭ kontraŭpaĝe la helena teksto. Pluraj anglalingvaj tradukoj de la *Sekreta historio* ekzistas, ekzemple en la serio Penguin (ankaŭ rete), sed la *Militoj* kaj *Pri la konstruaĵoj* ne tiom popularas, kvankam tiu sama traduko de Dewing konsulteblas rete en vikio. Ekzistas lastatempa franca traduko de la *Vandalaj militoj* de D. Roques (Parizo, 2004); en la germanan la tutan verkaron tradukis O. Veh (Munkeno, 1961-1977), sed ne tre fidinde. M. Meier kaj H. Leppin redaktis kaj aldonis notojn al la traduko de Veh por la *Sekreta historio* (Duseldorfo-Zuriko, 2005); en la hispana ekzistas lastatempa traduko, kun bonaj notoj, de J. Signes Codoñer (Madrido, 2000). Notu ankaŭ rusan tradukon de A. Ĉekalova de la kvar unuaj libroj de la *Militoj* kaj de la *Sekreta historio* (Sankt-Peterburgo, 2001). Informoj pri aliaj aŭtoroj kaj tekstoj de la periodoj haveblas en (ekz.) Maas 2005, Evans 1996 (notitaj sube). Mi donas kelkajn utilajn ligojn je mia retejo (ekz. al retaj tradukoj), same kiel elŝutebla versio de mia Powerpoint-prezentaĵo: vidu http://aix1.uottawa.ca/~greatrex/prok.html

Adshead, K. 1993. 'The Secret History of Procopius', *Byzantion* 63: 5-28.

Alchermes, J. 2005. 'Art and Architecture in the Age of Justinian' en Maas, red.: 343-375.

Allen, P. 2000. 'The definition and enforcement of orthodoxy' en Cameron, Ward-Perkins kaj Whitby, red.: 811-34.

Arjava, A. 2005. 'The Mystery Cloud of 536 CE in the Mediterranean Sources', *Dumbarton Oaks Papers* 59: 73-94.

Barker, J.W. 1966. *Justinian and the Later Roman Empire*. Madison.

Beaucamp, J., kaj aliaj, red. 2004-6. *Recherches sur la Chronique de Jean Malalas*, 2 volumoj. Parizo.

Bellen, H. 2003. *Grundzüge der römischen Geschichte III. Die Spätantike von Constantin bis Justinian*. Darmstadt.

Börm, H. 2006. 'Der Perserkönig im Imperium Romanum. Chosroes I. und der sasanidische Einfall in das Oströmische Reich 540 n. Chr.', *Chiron* 36: 299-328.

Börm, H. 2007. *Prokop und die Perser*. Stuttgart.

Brubaker, L. 2004. 'Sex, lies, and intertextuality: the *Secret History* of Prokopios and the rhetoric of gender in sixth-century Byzantium' en Brubaker, L. kaj Smith, J.M.H. red., *Gender in the Early Medieval World, East and West, 300-900*. Kembriĝo: 83-101.

Brubaker, L. 2005. 'The Age of Justinian: Gender and Society' en Maas, red.: 427-447.

Bury, J.B. 1923. *History of the Later Roman Empire*, 2 volumoj. Londono.

Cameron, A. 1979. 'Images of Authority: Elites and Icons in Late Sixth-Century Byzantium', *Past and Present* 84: 3-35.

Cameron, A. 1985. *Procopius and the sixth century*. Londono.

[59] Connelly 2006a, 27, notas, ke la sieĝo ekiĝis la 15-an de julio. Jozefino atingis Milanon la 10-an de julio; Napoleono tiam troviĝis ĉe Verono, sed estis ordoninta, ke heroldo tuj liveru al li novaĵojn de ŝia alveno. Jam la la 13-an li atingis Milanon, sed foriris la 15-an al Mantuo, vidu Dwyer 2007, 242-3.

[60] Mi ŝuldas al D-ino Kel Parsons alian eventualan paralelon, tiun de Mark-Antonio: kvankam la biografo Plutarko pretendas, ke Kleopatro konvinkis lin batali mare anstataŭ tere (*Vivo de Mark-Antonio*, 63-64), modernaj esploristoj atribuas al li militajn motivojn pro la decido ataki Oktavion ŝipe. Vidu (ekzemple) Roddaz 2000, 902-903.

Cameron, A. 1993. *The Mediterranean World in Late Antiquity, A.D. 395-600*. Londono.
Cameron, A. 2000. 'Conclusion' en Cameron, Ward-Perkins kaj Whitby, red.: 972-81.
Cameron, A., Ward-Perkins, B., Whitby, M., red. 2000. *The Cambridge Ancient History*, vol.14, *Late Antiquity: Empire and Successors, A.D. 425-600*. Kembriĝo.
Connelly, O. 2006a. *Blundering to Glory. Napoleon's Military Campaigns*, 3-a eldono. Lanham (Usono).
Connelly, O. 2006b. *The Wars of the French Revolution and Napoleon, 1792-1815*. Londono.
Corcoran, S. 2006. 'Latin Legal Texts' en Bispham, E., Harrison, T. kaj Sparkes, B.A., red., *The Edinburgh Companion to Ancient Greece and Rome*. Edinburgo: 434-438.
Croke, B. 2001. *Count Marcellinus and his Chronicle*. Oksfordo.
Croke, B. 2005a. 'Justinian's Constantinople' en Maas, red.: 60-86.
Croke, B. 2005b. 'Procopius' *Secret History*: Rethinking the Date', *Greek, Roman and Byzantine Studies* 45: 405-31.
Delderfield, R.F. 1959. *Napoleon in Love*. Londono.
Drijvers, J.W. kaj Hunt, E.D., red. 1999. *The Late Roman World and its Historian*. Londono.
Dwyer, P. 2007. *Napoleon. The Path to Power, 1769-1799*. Londono.
Evans, J.A.S. 1996. *The Age of Justinian. The Circumstances of Imperial Power*. Londono.
Evans, J.A.S. 2002. *The Empress Theodora*. Austin.
Evans, J.A.S. 2005. *The Emperor Justinian and the Byzantine Empire*. Westport (Usono).
Feissel, D. 2000. 'Les édifices de Justinien au témoignage de Procope et de l'épigraphie', *Antiquité tardive* 8: 81-104.
Fornara, C. 1983. *The Nature of History in Ancient Greece and Rome*. Berkeley.
Foss, C. 2002. 'The Empress Theodora', *Byzantion* 72: 141-176.
Gallo, M. 1997. *Napoléon. Le Chant du départ – Le Soleil d'Austerlitz*. Parizo.
Gauthier, G. 1998. *Justinien. Le rêve impérial.* Parizo.
Gibbon, E., red. Bury, J.B. 1896. *The Decline and Fall of the Roman Empire*, vol.4. Londono.
Gray, P. 2005. 'The Legacy of Chalcedon: Christological Problems and their Significance' en Maas, red.: 215-238.
Greatrex, G. 1994. 'The dates of Procopius' works', *Byzantine and Modern Greek Studies* 18: 101-114.
Greatrex, G. 1995. 'The composition of Procopius' *Persian Wars* and John the Cappadocian', *Prudentia* 27:1-13.
Greatrex, G. 1996. 'Stephanus, the father of Procopius of Caesarea?', *Medieval Prosopography* 17: 125-45.
Greatrex, G. 1997. 'The Nika riot: a reappraisal', *Journal of Hellenic Studies* 117: 60-86.
Greatrex, G. 1998a. *Rome and Persia at War, A.D. 502-532*. Leeds.
Greatrex, G. 1998b. '*Assessores* kaj historiistoj en la malfrua romia imperio', *Jura Tribuno Internacia* 2: 33-50.
Greatrex, G. 2000. 'Procopius the Outsider?' en D. Smythe, red., *Strangers to Themselves. The Byzantine Outsider*. Aldershot: 215-28.
Greatrex, G. 2001. 'Lawyers and historians in late antiquity' en R. Mathisen, red., *Law, Society and Authority in Late Antiquity*. Oksfordo: 148-61.
Greatrex, G. 2003. 'Recent work on Procopius and the composition of *Wars* VIII', *Byzantine and Modern Greek Studies* 27: 45-67.
Greatrex, G. 2005a. 'Byzantium and the East in the Sixth Century', en Maas, red.: 477-509.
Greatrex, G. 2005b. 'El paganismo en el siglo VI', *Debats* 90 (aŭtuno 2005), 79-85.
Greatrex, G. 2006a. 'Pseudo-Zachariah of Mytilene: the context and nature of his work', *Journal of the Canadian Society for Syriac Studies* 6: 39-52.
Greatrex, G. 2006b. 'Pseudo-Zacharie de Mytilène et l'historiographie du VIe siècle' en *Proceedings of the 21st International Congress of Byzantine Studies*, vol.3 (Londono, 2006), 160-1 (resumo); la tuta artikolo troviĝas je http://www.byzantinecongress.org.uk/comms/Greatrex/
Greatrex, G. kaj Lieu, S.N.C. 2002. *The Roman Eastern Frontier and the Persian Wars, A.D. 363-630*. Londono.
Haarer, F. 2006. *Anastasius I. Politics and Empire in the Late Roman World*. Kembriĝo.
Heather, P.J. 1991. *Goths and Romans, A.D. 332-489*. Oksfordo.
Herrin, J. 2008. *Byzantium*. Princeton.

Holum, K. 2005. ‘The Classical City in the Sixth Century: Survival and Transformation’ en Maas, red.: 87-112.
Honoré, T. 1978. *Tribonian*. Londono.
Horden, P. 2005. ‘Mediterranean Plague in the Age of Justinian’ en Maas, red.: 134-160.
Humfress, C. 2005. ‘Law and Legal Practice in the Age of Justinian’ en Maas, red.: 161-184.
Jeffreys, E. kaj aliaj, red. 1990. *Studies in John Malalas*. Sidnejo.
Kaldellis, A. 2004. *Procopius of Caesarea. Tyranny, History and Philosophy at the End of Antiquity*. Filadelfio.
Keys, D. 1999. *Catastrophe*. Novjorko.
Koder, J. 1996. ‘Climatic Change in the Fifth and Sixth Centuries?’ en P. Allen kaj E. Jeffreys, red., *The Sixth Century. End or Beginning?* Brisbane: 270-286.
Krueger, P. 1967, red. *Codex Justinianus*. Berlino.
Laing, M. 1973. *Josephine and Napoleon*. Londono.
Little, L., red. 2006. *Plague and the End of Antiquity*. Kembriĝo.
Maas, M. 1992. *John Lydus and the Roman Past*. Londono.
Maas, M., red. 2005. *The Cambridge Companion to the Age of Justinian*. Kembriĝo.
Maraval, P. 1999. *L’empereur Justinien*. Parizo.
Matthews, J.F. 1989. *The Roman Empire of Ammianus Marcellinus.* Londono.
Mazal, O. 2001. *Justinian I. und seine Zeit*. Kolonjo, Vajmaro, Vieno.
Meier, M. 2003a. *Das andere Zeitalter Justinians*. Göttingen.
Meier, M. 2003b. ‘Die Inszenierung einer Katastrophe: Justinian und der Nika-Aufstand’, *Zeitschrift für Papyrologie und Epigraphik* 142: 273-300.
Meier, M. 2004. *Justinian. Herrschaft, Reich und Religion*. Munkeno.
Mitchell, S. 2007. *A History of the Later Roman Empire*. Oksfordo.
Moorhead, J. 1994. *Justinian*. Londono.
O’Flynn, J.M. 1983. *Generalissimos of the Later Roman Empire*. Edmontono.
O’Meara. D. 2003. *Platonopolis. Platonic Political Philosophy in Late Antiquity.* Oksfordo.
Pazdernik, C. 2005. ‘Justinianic Ideology and the Power of the Past’ en Maas, red.: 185-214.
Rapp, C. 2005. ‘Literary Culture under Justinian’ en Maas, red.: 376-397.
Remnick, D. 1993. *Lenin’s Tomb. The Last Days of the Soviet Empire*. Novjorko.
Roddaz, 2000. ‘L’héritage’ en F. Hinart, red., *Histoire romaine*, vol.1. Parizo: 825-912.
Rosen, W. 2007. *Justinian’s Flea. Plague, Empire and the Birth of Europe.* Londono.
Sarris, P. 2002. ‘The Justinianic Plague: Origins and Effect’, *Continuity and Change* 17: 169-82.
Scott, R. 1981. ‘The Classical Tradition in Byzantine Historiography’ en M. Mullett kaj R. Scott, red., *Byzantium and the Classical Tradition*. Birmingham: 61-74.
Scott, R. 1985. ‘Malalas, *The Secret History*, and Justinian’s Propaganda’, *Dumbarton Oaks Papers* 39: 99-109.
Von Simson, O. 1987. *Sacred Fortress*. Princeton.
Stathakopoulos, D. 2004. *Famine and Pestilence in the Late Roman and Early Byzantine Empire*. Aldershot.
Stein, E. 1949-59. *Histoire du bas-empire*, 2 volumoj, la unua 1959, la dua 1949. Amsterdamo kaj aliloke.
Tate, G. 2004. *Justinien*. Parizo.
Treadgold, W. 1997. *A History of the Byzantine State and Society*. Stanford.
Treadgold, W. 2007. *The Early Byzantine Historians*. Londono.
Ure, P. 1951. *Justinian and his age*. Harmondsworth.
Vasiliev, A. 1950. *Justin I. An introduction to the Age of Justinian the Great.* Kembriĝo, Masaĉuseco.
Volkogonov, D. 1998. *Autopsy for an Empire. The Seven Leaders who built the Soviet regime*, tr. de la rusa, Shukman, H. Novjorko.
Ward-Perkins, B. 2005. *The Fall of Rome and the End of Civilization*. Oksfordo.
Watts, E. 2004. ‘Justinian, Malalas and the End of Athenian Philosophical Teaching in 529’, *Journal of Roman Studies* 94: 1-15.
Whitby, M. 1995. ‘Greek historical writing after Procopius: variety and vitality’ en A. Cameron kaj L. Conrad, red., *The Byzantine and Early Islamic Near East. I. Problems in the Literary Source Material*. Princeton: 25-80.
Wildberg, C. 2005. ‘Philosophy in the Age of Justinian’ en Maas, red.: 316-340.

Kuba metodo de alfabetigo: sociaj sekvoj en Latinameriko kaj la rolo de la amaskomunikiloj

Maritza Gutiérrez González
Ĵurnalistino, diplomiĝis pri ekonomiko en 1983 en la Havana Universitato. Aktivas ekde 1981 kiel E-instruanto. Ekde 1985 estrarano de Kuba E-Asocio. Ekde 1988 estras la E-redakcion de Radio Havano Kubo. Gvidis kursojn pri tradukarto. La kuba fremdlingva eldonejo "Jose Marti" publikigis ŝian libron de krimrakontoj *La forto de l'silento* elhispanigitan en 1990. Prelegis en klerigaj eventoj tutlandaj kiel EXPOLINGUA. Kunlaboras kun pluraj E-gazetoj, i.a Monato. Ekde 2006 respondecas pri la E-lingva servo kaj retejo de la kuba informagentejo ACN. Estrarano de UEA 2004-2007. Komitatano A de UEA ekde 1999. Kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA ekde 2007.

Resumo

La noveca alfabetiga metodo kuba "Mi ja povas" baziĝas esence sur aŭdvida materialo; ĝi gajnis la internacian premion de edukado de Unesko en la jaro 2006.

Unesko agnoskis ke la internacie proklamita celo por redukti analfabetecon en la jaro 2015 ne realigeblas, tiel ke oni alvenos al tiu jaro kun sama kvanto da analfabetoj sur la planedo.

La nova sistemo kuba faciligas solvon de universala problemo por tiuj landoj kun plej granda nombro da analfabetoj, tio estas, manko da instruantoj, eĉ por alfronti la elementan edukon; ĝi uzatas nuntempe en dudeko da landoj, inter ili, Bolivio, Haitio, Argentino, Brazilo, Venezuelo, Nikaragvo, Meksiko, Mozambiko, Salvadoro, Kolombio, Gvatemalo, Gujano, Sudafriko kaj Nov-Zelando.

Tiu laboro efektiviĝas je tutlanda skalo aŭ en lokaj unuoj tra diversaj regionoj de la koncernaj landoj, interalie, ĉe loĝlokoj de indiĝenaj etnoj, ofte forgesitaj de la edukaj programoj.

Kiun socian sekvon havas en Latinameriko la kuba alfabetiga metodo? Kian rolon ludas la amaskomunikiloj en tiu ĉi proceso? Faktoj kaj perspektivoj de ties apliko en regiono kiu serĉas sian integriĝon socian, ekonomian kaj kulturan favore al daŭripova evoluo.

A Cuban literacy method: social consequences in Latin America and the role of the media

Abstract

The novel Cuban literacy method "Yes, I Can" is based essentially on audiovisual material; it won UNESCO's international education prize in 2006. UNESCO has recognised that the internally proclaimed target for reducing illiteracy by the year 2015 cannot be achieved, so that we will arrive in that year with the same number of illiterate people on the planet.

The new Cuban system facilitates a solution for a universal problem for those countries with the greatest number of illiterate people, that is, the lack of teachers, even for tackling elementary education; it is now used in about twenty countries, among them Bolivia, Haiti, Argentina, Brazil, Venezuela, Nicaragua, Mexico, Mozambique, Salvador, Colombia, Guatemala, Guyana, South-Africa and New Zealand.

The work is being carried out on a national scale or in local units in various regions of the countries concerned, including places inhabited by indigenous ethnic groups which are often forgotten by education programmes.

What social consequences does the Cuban literacy method have in Latin America? What role do the media play in this process? Facts and perspectives on its application in a region which is searching for social, economic and cultural integration that supports sustainable development.

Méthode cubaine d'alphabétisation: conséquences sociales en Amérique Latine et le rôle des médias

Résumé

La méthode innovante cubaine d'alphabétisation "Oui, je peux" est essentiellement basée sur du matériel audiovisuel; elle a remporté le prix international de l'éducation de l'UNESCO en 2006.

L'UNESCO a reconnu que le but internationalement proclamé de réduire l'analphabétisme d'ici à 2015 n'est pas réalisable, si bien que l'on atteindra cette année-là avec le même nombre d'analphabètes sur la planète.

Le nouveau système cubain facilite la résolution du problème universel pour les pays qui ont un très grand nombre d'analphabètes, c'est-à-dire le manque d'enseignants, ne serait-ce que pour affronter l'enseignement élémentaire; il est actuellement utilisé dans une vingtaine de pays, parmi lesquels la Bolivie, Haïti, l'Argentine, le Brésil, le Venezuela, le Nicaragua, le Mexique, le Mozambique, le Salvador, la Colombie, le Guatemala, le Guyana, l'Afrique du Sud et la Nouvelle-Zélande.

Ce travail est réalisé à l'échelle nationale ou dans des unités locales à travers diverses régions des pays concernés, entre autres dans les secteurs où habitent des peuples indigènes, souvent oubliés des programmes éducatifs.

Quelle conséquence sociale la méthode cubaine d'alphabétisation a-t-elle en Amérique Latine? Quel rôle jouent les médias dans ce processus ? Faits et perspectives de son application dans une région qui cherche son intégration sociale, économique et culturelle dans le sens du développement durable.

De Cubaanse alfabetiseringsmethode: sociale gevolgen in Latijns America en de rol der massamedia

Samenvatting

De vernieuwende Cubaanse alfabetiseringsmethode « Ik kan best » is in essentie gebaseerd op audiovisueel materiaal; hij won de internationale onderwijspremie van UNESCO voor 2006. UNESCO heeft erkend dat het internationaal gestelde doel voor de reductie van analfabetisme in 2015 niet te realiseren valt, zodat men dat jaar weer aankomt op hetzelfde aantal analfabeten op onze planeet.

Het nieuwe Cubaanse systeem vereenvoudigt de oplossing van een algemeen probleem voor de landen met het hoogste aantal analfabeten, dwz het ontbreken van onderwijzers voor zelfs het meest elementaire onderricht; momenteel wordt het toegepast in een twintigtal landen, o.a. Bolivia, Haïti, Argentinië, Brazilië, Venezuela, Nicaragua, Mexico, Mozambique, El Salvador, Colombia, Guatemala, Guyana, Zuid-Afrika en Nieuw-Zeeland.

Dit werk wordt op nationale schaal geëffectiveerd of lokaal in verschillende regio´s, o.a. op plaatsen waar inheemse volkeren wonen die doorgaans vergeten worden in educatieve programma´s.

Welke sociale gevolgen heeft in Latijns Amerika deze Cubaanse alfabetiseringsmethode ? Welke rol spelen de massamedia in dit proces ? Feiten en perspectieven van de toepassing in een regio die sociale, economische en culturele integratie zoekt voor duurzame ontwikkeling.

Kuba metodo de alfabetigo: sociaj sekvoj en Latinameriko kaj la rolo de la amaskomunikiloj

Enkonduko

Unesko agnoskis ke la internacie proklamita celo redukti analfabetecon en la jaro 2015 estas nerealigebla, tiel ke oni alvenos al tiu jaro kun simila nombro da analfabetoj sur nia planedo, tio estas, pli ol 774 milionoj el kiuj 72 milionoj estas infanoj sen lernejoj kaj bezonatas pli ol 30 milionoj da instruistoj.

En sia raporto pri apliko de la Internacia Agadplano por la Jardeko de Alfabetigo de UN, laŭ la rezolucio 59/149 de la Ĝenerala Asembleo, la ĝenerala direktoro de Unesko esprimis:

"La (kuba) programo 'Mi ja povas' estas kunuzata de kelkaj landoj de Latinameriko kaj Karibio por impulsi alfabetigon efikan kaj je malalta kosto. La metodo estas uzata en Bolivio, Brazilo, Kubo, Ekvadoro, Grenado, Gvineo-Bisaŭo, Honduro, Meksiko, Mozambiko, Nikaragvo, Nov-Zelando, Paragvajo, Peruo, Dominika Respubliko, Sudafriko, Orienta Timoro kaj Venezuelo. Ĝi uzas kombinon de edukado je distanco kaj ĉeesta instruado kun personigita karaktero".

La noveca alfabetiga metodo "Mi ja povas" kreita en la jaro 2000, nuntempe uzatas en dudeko da landoj el ĉiuj kontinentoj kaj baziĝas esence sur aŭdvida materialo; ĝi gajnis la internacian premion de edukado Reĝo Sejong de Unesko en la jaro 2006.

La sistemo faciligas solvon de universala problemo por tiuj landoj kun plej granda nombro da analfabetoj, tio estas, manko de instruantoj, eĉ por alfronti la elementan edukon.

Unu el la gravaj problemoj de la alfabetiga laboro en la diversaj landoj konsistas en la kielo alfronti analfabetecon en lokoj kie analfabetoj tre dise loĝas aŭ en regionoj izolitaj kaj ofte malfacile alireblaj.

Kaŭze de analfabeta kresko, pro konataj kialoj, estas tre necese eltrovi alternativojn por aliri plej grandan nombron da tiaj personoj, kaj sendube edukado je distanco proponas multajn eblecojn por respondi al tiu problemaro.

Pro tio, alfabetiga metodo kiu uzas la amaskomunikilojn povas tre efike kontribui al redukto de la altaj analfabetec-indicoj, esence en landoj subevoluintaj aŭ evoluantaj.

Alfabetigo per radio-kaj-televido konsistigas edukajn formojn profitdonajn, ĉiam kiam oni prikonsideras, dum la tuta procezo alfabetiga: organizadon, planadon, kontrolon kaj taksadon.

Por landoj kies ekonomiaj, kaj ofte teknikaj rimedoj malmultas, alfabetigo per radio-kaj-televido, povas iĝi favora vojo por konsiderinda redukto de tiu vipo skurĝanta nian mondon: analfabeteco.

Antaŭaĵoj

Kreita de la kuba profesorino Leonela Relys, la metodo pri kiu ni parolas iras de konitaĵoj (numeroj) al nekonitaĵoj (literoj) kaj bazitas sur sperto. Temas pri integriga metodo kiu konsistas el tri etapoj:

Trejnado,
Instruado lego-skriba kaj
Solidiĝo.

Jen klarigo pri la metodologio sekvata de la metodo "Mi ja povas":

Ĉiu leciono havas ĝeneralan karakteron, tial oni rekomendas ke la partoprenantoj unue observu ĝin komplete. La baza tenilo de la instruado por lego-skribo estas aŭdvida instrumento kombinita kun lernolibro, kiu sekvas la vojon de tri signoj: aŭdo-okulo (aŭskulti vidi), aŭdo-libro (aŭskulti legi), aŭdo-skribilo (aŭskulti skribi).

ALFABETIGO PER TELEVIDO

I. Etapoj de la instrumetodo lego-skriba

Unua: trejnado

Trejni estas praktiki, prepari, gvidi, ĉi-kaze prepari la homon por lerni legi kaj skribi.

Tiu ĉi unua etapo inkluzivas la 10 unuajn lecionojn de la metodo, kies kvin unuaj permesas familiariĝon, evoluigon de parola esprimo kaj kapabloj psikomotoraj; kaj certigon de grafika numer-reprezento inter nulo kaj trideko. La aliaj kvin lecionoj celas studadon de vokaloj.

Dua: lernado de lego-skribado

Tiu ĉi dua etapo inkluzivas 42 lecionojn en kies unuaj 23 oni lernas ĉiutage novan literon aŭ fonemon.

En la ceteraj 19 lecionoj oni enkondukas la malfacilaĵojn prezentatajn de la koncerna lingvo. (esence pri fonetiko);

- Oni lokas la lernanton en numero konata akompane de nekonata litero;
- Rekono de facila figuro kaj sube, la vorto lernata;
- Prezento de ideo aŭ frazo, eltirado de kerna vorto, divido en silaboj, normalaj kaj inversaj kombinoj, parola kreado de novaj vortoj kaj ideoj.

Kiam la lernantoj regas la grafiojn, oni enkondukas iom post iom, la kursivan literon, kio estas celo de postalfabetigo.

Tria: solidiĝo

La celo estas fiksi konitaĵojn, certigi ĉion lernitan en difinitaj momentoj kaj kontroli ĝis kioma grado oni bone lernis. Ĝi enhavas 11 lecionojn plus du lastajn pri redaktado; plifirmigi la lernitaĵojn surbaze de la grafioj per ludoj, kaj evoluigi la skribadon kaj legadon inteligentan ĝis tre elementa nivelo.

La lernanto devas organizi la vortojn ĝis eltrovi logikan sencon; per diversaj bildoj li/ŝi devas eldiri la nomon kaj skribi ĝin helpe de la numeroj, ankaŭ eltrovi la literojn en tabelo sur la koncerna broŝurpaĝo.

La rolo de la faciliganto devas centriĝi en tiuj konoj bezonantaj iaspecan klarigon petatan de la lernantoj kaj cele al plifortigo de la diversaj skribaj ekzercoj.

II. Ĉeesta renkontiĝo

Tre gravas ke ĉiu faciliganto bone konu la partoprenantojn kaj sciu kiel helpi ilin, pro tio oni devas taŭge klasifi la lernantojn:

1. pure analfabetaj: personoj kiuj neniam ĉeestis lernejon.
2. duon-analfabetaj: personoj kiuj iam ĉeestis lernejon, ankaŭ inkluzivendas personoj kiuj rekonas la literojn kaj scipovas skribi kelkajn vortojn.
3. specialaj analfabetoj: personoj kun edukaj bezonoj specialaj kaj pro tio oni devas prikonsideri fizikajn handikapulojn.

Ĉeestaj renkontiĝoj:

- Oni uzas la unuajn kvin minutojn por motivi la partoprenantojn, kontroli ĉeeston kaj koni la malfacilaĵojn prezentatajn dum la lernado aŭ en la persona vivo.

- tridek minutoj de televida leciono kaj poste 15 minutoj por aktiva interŝanĝo plus dek minutoj por paŭzo aŭ ŝanĝo de aktiveco.

- tridek minutoj de la venonta leciono kaj 15 minutoj por interŝanĝo kaj analizo; laŭeble oni uzos laborsesion sabatan aŭ dimanĉan por re-studo aŭ solidigo de la lernitaĵoj de konkreta televida leciono. Tion oni antaŭe kunordigas kun la gelernantoj.

- la faciliganto ne devas transiri al nova ekzerco sen kontroli regadon de la antaŭaj.

- estas necese ke la faciliganto observu kaj trastudu la lecionojn antaŭe kun la celo starigi taŭgajn rilatojn inter ili kaj la ĉeesta renkontiĝo.

III. La lernolibro “Mi ja povas”

Ĝi prezentas la saman formaton sur ĉiu paĝo kaj oni ĝin konceptis surbaze de rekta ligo inter numeroj kaj literoj, tiel ke la lernanto starigu asociigan procezon inter la konitaĵo (numeroj) kaj nekonitaĵoj (literoj). Tio signifas ke en la lernolibro oni donis al ĉiu litero numeron.

En la centro de la lernolibro aperas tabelo kiu celas resumi ĉiujn literojn aŭ fonemojn lernitajn, kun la celo ke la lernanto plenumu la taskojn en ĉiu ekzerco indikita plej facile kaj rapide.

Sur la lastan paĝon de la lernolibro oni enmetis kelkajn kombinojn triliterajn aŭ eĉ pli, ankaŭ konatajn kiel miksitajn silabojn.

La spacoj signitaj per krajono en la lernolibro celas ke la gelernantoj skribu, sed nesufiĉas, do oni devas uzi aldonan kajeron.

Estas kerne grave ke la faciliganto laboru en la ekzercigado cele evoluigi kapablojn psikomotorajn, antaŭviditajn en diversaj paĝoj tiucelaj aŭ per fizika ekzercado aere.

ROLO DE LA AMASKOMUNIKILOJ

Nuntempe la aŭdvidaj amaskomunikiloj ebligas optimumigon de la homaj kaj materiaj rimedoj disponeblaj per la strategio atingi plimulton kun malpli da rimedoj, tamen, grava problemo restas manko de monrimedoj por evoluigi tiujn projektojn.

Ekzistas manieroj mildigi la problemon financan, kaj unu ekzemplo estas la alfabetiga metodo uzanta la amaskomunikilojn aŭdvidajn, evoluigita de la kubaj pedagogoj, kiu kontribuis kaj kontribuos renversi tiun realon en malplia tempospaco kaj je malaltaj kostoj.

Per tiuj programoj uzantaj televidon kaj videokasedojn, oni intencas influi reduktiĝon de analfabeteco inter la gejunuloj kaj adoltoj, surbaze de komunikad-utiligo kiel instrumento alfabetiga.

Oni instruas 65 horojn-lecionojn, po 30 minutoj, kvinfoje semajne. La partoprenantoj ricevas lernolibron senpagan kombinantan numerojn kaj literojn plus la agadon de la faciliganto. La lecionoj ankaŭ posedas informan enhavon kontribuanta al kono kaj kresko de la kultura nivelo de la gelernantoj. La tuta lerno-procezo en la unua etapo, lego-skriba, daŭras tri monatojn.

La koncepto prezentata de tiu alfabetiga metodo iras preter la simpla akirado de kapabloj kaj ecoj en scipovo de literoj kaj numeroj, tial ke ĝi ankaŭ celas plibonigon de la funkcioj bezonataj ĉiutage en la normala homa vivo (funkciiva) kaj kreskon de konsciiĝo kapabla transformi la vivon kaj agadon homan (konsciiga).

Temas pri konceptado kun integriga karaktero, favoranta konstantan dialogon (dialogiko); oportunan cerbumadon fronte al temoj kaj situacioj objektivaj kaj subjektivaj (cerbuma), kaj faciliganta debaton kaj diskutadon (problemiga).

En ĉiu leciono oni pritraktas tre interesajn temojn, surbaze de la plej komunaj bezonoj de la regiono: sano, familia kunvivado, atento al maljunuloj, konservado de la naturo kaj medio, historio kaj kulturo de niaj popoloj.

En tiaspeca organizado de alfabetigo, la televido iĝas ĉefa dissendanto de la starigita koncepto kaj konsistigas bazan tenilon de la tuta procezo instru-lerniga.

La evoluigita metodo per televido kaj video estas eklektika, miksita, kunmetita aŭ ĉioenhava; oni ankaŭ uzas teknikojn kaj procedojn aŭd-vidajn kaj motorajn en kombino kun analizo kaj sintezo.

La kubaj pedagogoj kreis ankaŭ programon postsekvan ĝis la sesa grado. La graveco de tiu postsekvo estas kerna por forigi analfabetecon pro neuzo.

Estas sciate ke landoj efektivigintaj naciajn kampanjojn por alfabetigo, suferis, kelkajn jarojn poste, rapidan kreskon de analfabeteco, ĝuste pro manko de programoj postsekvaj kontraŭ tiu situacio.

La postsekva kontrolado ne povas elĉerpi ĉiujn temojn de la fakoj studataj en la Ĝenerala Edukado por infanoj kaj junuloj. Ili lernas nur esencaĵojn utilajn por estontaj studoj, kiuj ebligu al ili pli efike roli en la socia kaj labora vivo ĝenerale. Pro tio oni evitu troajn difinojn.

ALFABETIGO PER RADIO

Ĉi-kaze ripetiĝo transformiĝas en labor-algoritmon por la analfabetoj. En la tuta proceso oni atingas streĉan rilaton inter la radiofonia leciono kaj la lernolibro de la lernanto.

Tiu ĉi ekzakta rilato inter la leciono kaj la lernolibro permesas ke la lernanto plenumu ĉiun postulon de la radio-instruisto tiel ke la analfabeto estu kapabla agi per si mem kiam li/ŝi ne posedas alian subtenon ol la radioaparaton.

Organizo de la procezo.

Dekomence okazas du per-radiaj disaŭdigoj por estigi motivadon, reklamadon kaj familiariĝon. La celoj de la disaŭdigoj estas transformi la radion en mobiliza aganto de la analfabetaj personoj, kiujn antaŭe oni kontaktis per laboro de diagnozo, dum vizitoj realigitaj aŭ pere de institucioj religiaj, laboraj aŭ sociaj.

Dum tuta semajno oni informas pri la maniero kiel evoluos la tuta programo, kiom da tagoj semajne, horoj, partoprenantoj, oni sciigas la nomon de la radio-instruisto, la organizon de la lernolibro, kiel eltrovi la enhavon studotan ĉiutage kaj la signo-sistemon uzotan por interkomunikado.

Krome, dum la semajno oni invitas la eblajn partoprenontojn ĉeesti renkontiĝon kun la faciliganto aŭ gvidanto, ĉefrolulo en la tuta procezo, pro tio ke ĝi plenumos la kontroladon de la laboro realigota de ĉiuj 25 personoj partoprenantaj en la programo, pliklarigas la ekzercojn prezentitajn per la radio dum la semajno, efektivigas individuan atenton al la lernantoj kaj sisteme pritaksas la evoluon de la lernado.

La unua renkontiĝo estas kerna por efektivigi gravajn paŝojn:

1. Enskribiĝon de lernantoj kiuj tute volonte prezentiĝas en difinita loko antaŭe anoncita.
2. Klarigojn pri la graveco lerni skribi kaj legi kaj detalojn pri la tuta programo alfabetiga.
3. Antaŭteston por klasifi la lernontojn: kapablaj aŭ nekapablaj, plene analfabetaj aŭ duonanalfabetaj.
4. Transdonon de la lernolibro.
5. Informi pri la tago kiam komenciĝas la lecionoj, horoj kaj la radiostacio.

La alfabetigo per radio

Por ĉiu ekzerco de la lernolibro okazas radia leciono. Per sistemo de logotipoj en ĉiu leciono oni indikas la agadon de la partoprenanto. Tiuj logotipoj celas krei aŭtomatigon, tiel ke kiam ili aperas, ekzemple, okulo kaj libro, la lernanto agas mekanike, sciante ke unue li/ŝi devas observi kaj poste legi. Por tio, la radio-instruisto indikas la taskojn farendajn. Poste, kaj per ripetado, kreiĝas la kutimo kaj la partoprenanto kapablas progresi rapide per si mem kaj ofte helpate de familianoj neanalfabetaj.

La metodologio baziĝas sur konstanta praktika agado kaj motivado por lerni. Oni devas kalkuli je la diversaj trajtoj de la lernantoj, gejunuloj kaj adoltoj kiuj prezentas malsamajn obstaklojn al la lernado pro diversaj kialoj, foje ĉar ili aniĝas al la klaso malfrue.

La metodologio estas aktiviga kaj favoras la jenajn aspektojn:

A.- Aŭskultadon de la radio-lecionoj.

La aŭskultado permesas progresadon de la lernantoj kiel individuoj, formadon de kutimoj kaj evoluigon de kapabloj. Oni disaŭdigas la lecionojn kvarfoje semajne dum tridek minutoj. En kontraŭa sesio oni reaŭdigas ĉiun lecionon.

B.- Realigon de la lernolibraj taskoj.

La lernado baziĝas sur la agado lerni agante kaj laborante.

C. Laboron en grupo.

Evoluo de la partoprenantoj kiel sociaj estaĵoj, aktivaj agantoj en la dialogo kaj pripensado. Temas pri ĉeestaj renkontiĝoj unufoje semajne.

Ekzistas tri elementoj kiuj difinas bonan lernadon per tiu ĉi metodologio:

a. La persona strebado de la lernanto.
b. La kvalito de la lecionoj radiaj kaj ties kongruo kun la lernolibro.
c. La subteno de personaro, plej parte ne profesia, sed bone preparita en la apliko de la metodo kaj la maniero trakti la lernantojn.

Per regula aktivado oni plenumas didaktikajn principojn de alirebleco. Oni startas de konataj, konkretaj elementoj kiuj atingas universalan valoron per kiu estiĝas komunikado kun personoj analfabetaj. Ĉiu ekzerco de la lernolibro havas elementojn rekoneblajn de la lernantoj cele al starigo de taŭga komunikado.

SEKVOJ EN LATINAMERIKO

Tiu ĉi metodo kies rezultoj estas nekontesteblaj estis unue aplikata en Haitio, Nikaragvo, Nov-Zelando, Salvadoro, Honduro, Mozambiko kaj en Venezuelo. Oni adaptis ĝin por uzo en Paragvajo en la gvarania lingvo kaj ekis en Meksiko en la ŝtato de Michoacán; en Haitio pro konkretaj cirkonstancoj de la lando oni aplikis la metodon per radio. En Bolivio oni ĝin aplikas ankaŭ en la keĉua kaj ajmara lingvoj dum ankaŭ en Nikaragvo oni ĝin enkondukis ne nur en la hispana lingvo.

Jen kelkaj statistikaj datumoj el la jaro 2007.

LANDOJ	**FACILIGANTOJ**	**ALFABETIGITOJ**
ARGENTINO	1500	9 500
VENEZUELO	101 000	1 482 543
BOLIVIO	22 153	106 546
HONDURO	827	9 014

Inter la jaroj 2005-2007 en Argentino kreiĝis pli ol 400 alfabetigaj centroj kie studas kelkaj miloj da personoj; en Nikaragvo estas alfabetigitaj pli ol 70 mil personoj; en Venezuelo ĝi funkcias sub regado de la nomata Misio Robinson kiu nun transiras al superaj etapoj; en Honduro partoprenas la programon pli ol 10 mil personoj dum aliaj cent miloj aliĝos iom post iom laŭ la planoj; en Gvatemalo jam estis alfabetigitaj dekomence pli ol milo da personoj kaj oni ĝin etendas tra 11 komunumoj. En Meksiko jam alfabetiĝis pli ol 204 160 personoj kaj dume, en Ekvadoro reduktiĝis la indico de analfabetoj de 11,9 % ĝis 3,9 % tial ke jam estas alfabetigitaj pli ol 37 500 personoj.

Ankaŭ landoj kiel Kanado kaj Hispanio interesiĝas pri utiligo de la kuba programo.

FAKTOJ KAJ PERSPEKTIVOJ

La kuba Latinamerika kaj Karibia Instituto Pedagogia (IPLAC) estas institucio de supera edukado kun sidejo en Havano, kies rolo estas vastigi la rezultojn de la insula edukado je internacia skalo, impulsi la sciencajn kaj akademiajn rilatojn kun institucioj landaj kaj eksterlandaj kaj kontribui al pliklerigo de instruistoj kaj profesoroj de la regiono per diversaj formoj de postdiploma eduko.

La katedro de Alfabetigo kaj Edukado por Gejunuloj kaj Adoltoj de tiu instituto, posedas pli ol 400 fakulojn preparitajn por asesorado kaj kontrolado de alfabetigaj projektoj per radio kaj televido.

La Centro de Alfabetigo kaj Edukado por gejunuloj kaj adoltoj posedas pli ol 400 kunlaborantojn, selektitajn el la provincaj centroj de edukado kaj 15 katedroj de tiaspeca edukado ekzistantaj en ĉiuj pedagogiaj universitatoj de la lando.

Pro la fakto ke ekzistas landoj kie regas altaj indicoj de analfabeteco kaj bezonatas evoluigi kursojn postsekvajn, Kubo proponis tiujn kursojn per radio kaj televido aŭ per videokasedoj aplikeblaj eksperimente aŭ teste, en komunumoj, kaj poste ampleksigi ilian aplikon al regiono aŭ tuta lando. Tiamaniere ĝi evoluadis tra dudeko da landoj.

La alfabetigaj programoj per radio kaj televido, laŭ konkretaj cirkonstancoj kaj laŭ landoj, plenumis la celon kontribui en la redukto de analfabeteco kaj faciligi aliron al elementa edukado kaj permanenta edukado, celo kolektive akceptita en la Kadro de Agoj de Dakaro, kaj la interkonsentoj de la Konferenco de Ministroj de Cochabamba, Bolivio, en tiu ĉi kampo.

Pli ol tri milionoj da personoj en 28 landoj lernis legi kaj skribi per tiu ĉi metodo, kiu transdonas metodologion kun plena respekto al la originaj lingvoj de la komunumoj kie ĝi funkcias. La kurso posedas versiojn en 12 lingvoj, inter ili gvarania, keĉua, ajmara. Inter ĝiaj celoj por la nuna jaro estas deklari Bolivion teritorio libera je analfabeteco kiel antaŭe okazis en Venezuelo.

Kiel parto de la novaj perspektivoj kreitaj pro la pozitivaj rezultoj de la alfabetiga metodo, la kuba instituto IPLAC proponis daŭrigan programon nomitan “Mi ja povas plu” kies apliko komenciĝis en Venezuelo kun la celo doni kontinuecon al la alfabetiga procezo. La nuna programo permesas solidigi la lernitaĵojn kaj avanci ĝis la kvara grado de la elementa edukado.

Alia celo estas eduki la homojn lerni sendepende kaj konstante kaj konsciigi ilin pri civitana identeco per lernado de kulturo kaj historio de la propra lando.

Sendube restas obstakloj kaj la kubaj fakuloj daŭre pritaksas la realigon kaj funkcipovon de la programo, adaptas ĝin laŭ la konkretaj kondiĉoj de la diversaj landoj kaj postsekvas ĝin konstante.

La alfabetiga programo konsistigas parton de interkonsentoj inter la diversaj landoj kaj estas aparte impulsata de la regiona integriga projekto konata kiel Alternativo Bolivara por nia Ameriko (ALBA) iniciatita de Venezuelo. Ĝi daŭre havas subtenon de Unesko tial ke la programo tute kongruas kun la celoj de tiu ĉi internacia organo cele al redukto de analfabeco sur nia terglobo.

Bibliografio

1. CEDES. Centro de Estudios para Desarrollo Sociocultural. El método cubano de Alfabetización, 2007.
2. Boletin U.M.M.E.P. Argentina. Campañas de Alfabetización.
3. IPLAC. Alfabetización por radio y televisión. Leonela Relys
4. Castañeda Yánez, Margarita: Los medios de comunicación y la Tecnología Educativa. México, Ed. Trillas, 1985.
5. Coordinación Nacional Programa de Alfabetización, Bolivia, 2007.
6. Misión Robinson Yo si puedo, Venezuela.

Kiel savi lingvo-variecon per interlingva edukado?

Maŭro La Torre
Instruas al estontaj bazlernejaj instruistoj en la Tria Roma Universitato (Italujo) pri lernotaksado kaj pri komputika logiko. Liaj sciencaj esploroj koncernas pedagogian eksperimentadon pri planlingvoj, aŭtomatan analizadon de testoj, terminologion. Prezidinto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), nun li membras en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) kaj en Akademio de Esperanto.

Resumo

En multaj landaj instrusistemoj oni reformas en la direkton de drasta unulingvigo de la infanaro, kun sekvonta mondskala kultura (kaj mensa?) unuformigo.

Tamen, malgraŭ la kreskantaj migradoj, tele-kunlaboradoj, kaj vojaĝadoj, multaj homoj emas ankaŭ flegi siajn kultur-geografiajn radikojn.

En tiaj kondiĉoj ĉu penseblas novaj edukplanoj, kiuj kapablas kontentigi samtempe ambaŭ menciitajn emojn (tutmondecan kaj individu-identecan)?

Ĉu lernado de aliulaj lingvoj en si mem valoras kaj ĉu tio utilas helpe al alispecaj lernadoj?

Ĉu la lingvoj estas enhave neŭtraj komunikrimedoj aŭ ili estas iaj kulturportantoj? Jen demandoj defiaj por la edukontoj (instruistoj kaj gepatroj) en la nuna "komunikema" socio!

How can language diversity be saved by interlingual education?

Abstract

Many national education systems are being reformed in the direction of a drastic monolingualisation of children, with a consequent worldwide cultural (and mental?) uniformisation.

However, despite increasing migration, distance working and travel, many people are inclined to foster their cultural and geographical roots.

In such conditions, is it possible to think of new education plans that could simultaneously satisfy both of the inclinations mentioned (globality and individual identity)?

Is the learning of other people's languages a value in itself and does it help with other kinds of learning?

Are languages, with respect to their content, neutral means of communication, or are they carriers of culture?

These are challenging questions for future educators (teachers and parents) in the new "communication" society.

Comment sauver la diversité des langues par l'éducation interlinguistique ?

Résumé

Dans les systèmes éducatifs de nombreux pays, on réforme dans le sens d'un monolinguisme drastique des enfants, avec pour conséquence une uniformisation à l'échelle mondiale de la culture (et des esprits ?).

Cependant, malgré l'augmentation des migrations, de la télé-collaboration et des voyages, beaucoup sont aussi enclins à cultiver leurs racines culturelles et géographiques.

Dans de telles conditions, peut-on envisager de nouveaux plans éducatifs, qui soient capables de contenter en même temps les deux tendances mentionnées (mondialisation et identité individuelle) ?

L'apprentissage des autres langues a-t-il une valeur intrinsèque et cela est-il utile pour aider à d'autres sortes d'apprentissages ?

Les langues sont-elles des moyens de communication neutres quant à leur contenu, ou sont-elles d'une certaine manière porteuses de culture ?

Voilà des questions en forme de défis pour les éducateurs de demain (enseignants et parents) dans la société "de communication" actuelle !

Hoe de taalvariatie te redden door intertalige opvoeding?

Samenvatting

In onderwijssystemen van vele landen voert men hervormingen door in de richting van een drastisch sterkere eentaligheid van de jeugd, met als gevolg een wereldwijde culturele (en geestelijke?) uniformering.

Toch neigen, ondanks toenemende migratie, tele-werken en reizen, veel mensen ertoe hun eigen cultureel-geografische wortels te benadrukken.

Valt er in dergelijke omstandigheden te denken aan een nieuwe onderwijsopzet om tegelijkertijd beide genoemde doelstellingen te bereiken (zowel het wereldwijde als de individuele identiteit)?

Heeft het leren van andermans taal op zich waarde, en helpt het bij anderssoortig leren?

Zijn talen neutrale communicatiemiddelen, of in zekere zin ook cultuurdragers?

Uitdagende vragen voor opvoeders (leerkrachten en ouders) in de huidige communicatieve samenleving!

Kiel savi lingvo-variecon per interlingva edukado?

1 Lingva diverseco

1.1 Lingvoj

Lingvo estas signa sistemo, dunivele artikiĝanta, per kiu – diverse laŭ homgrupoj – la homa sperto estas analizata kaj esprimata.

La diverseco inter du lingvoj povas esti tre malgranda (ekzemple, nur akĉenta nesameco inter du apudregionaj lingvovarioj), mezgranda (ekzemple, inter du slavaj aŭ du ĝermanaj lingvoj), aŭ tre granda (kiam temas pri neniom interkompreneblaj aŭ eĉ malfacile intertradukeblaj idiomoj).

Sed jen principa demando: kiom diversaj estu la parolmanieroj de du homoj, por ke oni rajtu diri ke tiuj homoj parolas 2 **diversajn lingvojn**? Fakte tiu demando estas teorie ne respondebla, ĉar ofte lingvaro (aŭ dialektaro) estas aro kontinueca kaj ne disereca (diskreta).[61]

Tamen, praktike konsultante atlason aŭ geografian enciklopedion, ni legas la nomojn de dekoj – aŭ eĉ centoj – da lingvoj. Sed, fakte, se tiuj lingvoj estas iel nombreblaj, kiom multaj ili estas?

1.2 Kiom da homaj lingvoj?

La respondo je ĉi tiu demando dependas de la sekvata distingo-kriterio kaj de la dezirata precizeco.



Plej ofte en la geografiaj verkoj oni rekonas la oficialajn ŝtatajn lingvojn, kaj apenaŭ mencias tiujn de plej gravaj etnaj malplimultoj. Cetere la distingemo povas tre varii eĉ interne de la sama geografia libro, inter la politike pli sentataj kazoj de okcidenteŭropaj landoj (kiel ekzemple Hispanujo aŭ Francujo, kie eble menciatas la kataluna aŭ la okcitana) kaj aliflanke la por ni politike pli foraj kazoj (kiel ekzemple granda mezafrika lando, pri kiu menciiĝas nur la ekskolonia lingvo, lakone aldonante la diron «plus lokaj paroloj», kvazaŭ ne temas pri veraj lingvoj kun multaj milionoj da parolantoj, sed pri nuraj malgravaj ĵargonoj).

Tamen se oni volas honeste, egalrajte, konsideri ĉiujn parolatajn lingvojn, kie staru la limo inter menciende gravaj lingvoj kaj nemenciindaj “dialektetoj”?[62]

Objektive uzeblaj dislimaj kriterioj povas esti la jura **oficialeco**, aŭ la **skribeco** kaj **normiteco**; cetere laŭ tiuj ĉi kriterioj la statusoj de iuj idiomoj povas subite ŝanĝiĝi de unu jaro al la alia, precipe pro politikaj kialoj, kiel la sendependiĝo de iu lando aŭ akiro de memstaraj rajtoj fare de iu regiono interne de pli vasta ŝtato.

---

[61] Se, ekzemple, ni komparas en la itala lando iun plej nordan dialekton kun iu plej suda dialekto, ni konstatas ke ili evidente kaj rimarkinde diversas, dum dialektoj de najbaraj provincoj povas esti tre similaj. Tamen, komparante la idiomojn interne de unu provinco, la enloĝantoj rimarkas klarajn diferencojn. … Kie halti en la harfendado?

[62] Uzante la terminon “dialekto” en la senco de lingvovariaĵo, sen ia ajn kultura aŭ socipolitika malplivaloriga nuanco.

El pure lingvoscienca vidpunkto, la etnolingvistoj povas agnoski aŭ ignori (laŭ la sekvataj kriterioj) dialektajn diversecojn en lingve kontinua lando; sed malfacile ili povas malagnoski la **lingvan diversecon**, kiam temas pri idiomoj tre malsamaj unu de la alia eĉ en geografia proksimeco: pensu, ekzemple, pri la multaj centoj da lingvoj en la valoj de la sola insulo Novgvineo, norde de Aŭstralio.

Por konkretigi nian atenton, ni vidu kelkajn ekzemplajn lingvo-nombrojn:

a) *Landoj kaj lingvoj de la mondo* (Bertilo Wennergren): ĉ. 300
b) *Kembriĝa Enciklopedio de Lingvosciencoj* (David Crystal): ĉ. 1000
c) *Lingvo-geografio* (Roland Breton, 1976): ĉ. 3000
d) *Ethnologue: Languages of the World* (www.ethnologue.com): ĉ. 7000

Cetere, parolante pri lingva diverseco, pripensindas, ĉu eblas difini "distancon" en la "spaco" de la lingvoj de la mondo, kiel en la klasikaj geometriaj spacoj oni uzas Eŭklidan distancon, aŭ en statistikaj sciencoj difiniĝas multaj aliaj specoj de distancoj kaj proksimecoj inter datumoj. Kompreneble temas pri demando malbagatela, tamen esplorinda. Ekzemple – limiĝante je iuj tavoloj de la lingvara sistemo – oni povus eksperimenti difinojn de leksikaj (aŭ semantikaj, morfologiaj, fonologiaj, ktp.) mezuroj de inter-lingva (mal)proksimo.

1.3 Ĉu lingva varieco estas problemo aŭ oportuno?

Ni pensu ekzemple pri la Biblia mito de la Babela Turo, por kies konstruo multaj homoj bone kunlaboris per komuna lingvo. Poste – pro dia puno – la lingva diversiĝo malebligis pluan kunlaboradon. La ekzisto de tiaj mitoj en pluraj homaj kulturoj aludas al la koncepto ke optimuma homa mondo estus unulingva, kaj ke pro katastrofo ĝi displitiĝis en ne-plu-interkompreneblajn sociojn. En la sama Biblio (sed ankaŭ indus kompari kun ali-religiaj kulturoj) la rakonto de Pentekosto – male – aludas al la mirakla utopio, ke la homoj de diversaj etnoj interkompreniĝu per unu komuna lingvo. Sur ĉi tiu vojo tuta vico da grandaj filozofoj kaj utopiuloj – de Lullus (Ramón Llull) al Zamenhofo cerbumis, celante la konstruadon de "**perfektaj**" kaj **universalaj lingvoj**, por la (re)unuigo de la homaro.[63] En tiu multjarcenta strebado la lingva diverseco estas vidata kiel la solvinda problemo, kaj la **lingva unueco** konsideratas kiel grava atinginda valoro.

Sed ĉu ekzistas ankaŭ alia mala perspektivo, laŭ kiu **varieco** estas konservinda valoro, kaj la plata unuformigo estas evitinda danĝero?

Ni pensu ekzemple pri la natura varieco de bestoj kaj plantoj. En la zoologia kampo la natursciencistoj nombris kaj priskribis milojn da vertebrulaj specioj kaj milionojn da insektaj specioj. En la botanika esplorado oni distingas eĉ pli multenombrajn vivulojn (pensu nur pri kiom da fungoj aŭ bakterioj oni konas).

Koncerne la variecon de biologiaj estaĵoj, nuntempe (preskaŭ) neniu dubas ke ĝi estas konservinda riĉeco por la mondo, kaj sekve por homaro. Jam de pluraj jardekoj disvastiĝas ekologiismaj movadoj kiuj, studante la interagadon de la diversaj faktoroj kiuj konsistigas iun

[63] Vidu, ekzemple, Eco U. (1994), *La serĉado de la perfekta lingvo*, Pizo.

specifan naturmedion, atentigas nin (kaj la regantojn) pri bestaj aŭ plantaj grupoj, kiuj riskas malaperi, kaj pri la negativaj efikoj, kiujn tiuj malaperoj alportus. Tial en ĉiuj mondopartoj oni kreas naturajn rezervejojn (eĉ submarajn), por protekti la biologian variecon, konsiderata kiel nepra valoro por la pluvivo de nia planedo.

Kompreneble tiuj ekologiismaj movadoj ne nur influas sciencon, administradon kaj politikon, sed ili ankaŭ plimalpli influas la enhavojn de la edukado. Por rimarki tion, sufiĉas kompari pri tiuj temoj la nunajn instruprogramojn kun tiuj de antaŭ 50 jaroj.

Ĉu paralele montriĝas analogiaj tendencoj en la kampo de kulturoj kaj lingvoj?

Se oni analizas el tiu vidpunkto la lernejajn programojn, oni eble trovas ion tiu-direktan (pri valorigo de **kultura diverseco**), sed oni povas trovi ankaŭ multon plian kontraŭdirektan: t.e. signoj de tutmonda platiĝo al unu sola venkanta (etna) kulturo, kiu rapide superregas kaj subfosas la ceterajn lokajn kulturojn.

Tia **unuisma tendenco** vidiĝas pleje en du lernofakoj: historio/geografio kaj fremdlingvoj, sed la detalojn pri tio ni traktu poste. Ĉi tie ni rimarku strangan (paradoksan) kontraŭtendencon: dum oni (almenaŭ la politikaj avangardoj) strebas savi la grandajn pandojn de Ĉinujo aŭ la malgrandajn ĉimpanzojn de Gabono, "rekonstrui" la eŭropajn pra-ĉevalojn, eviti la malaperon de cerealaj varioj ekonomie malpli profitigaj, aliflanke oni rigardas kiel normalaĵon ke la homidoj migrintaj alilanden perdas la kapablon lingve komuniki kun siaj geavoj, pro sia "**lingva integriĝo**" en la gastiganta lando.

Do ŝajnas ke, dum la intektuloj plejmulte konsideras savinda valoro la naturan biologian variecon de la mondo, la samaj intelektuloj trovas tute "natura" – sur la kultura ebeno – la fakton ke la lingvo de unu popolo (kun siaj mondperceptoj kaj vidpunktoj) voru la lingvojn kaj la identecojn de la aliaj etnoj.

Cetere tia kultura tendenco bone kongruas kun la politika unu-model-emo ("**unu-pens-ismo**") de la nova 21a jarcento.

1.4 Lingvo-rolaj modeloj

Revenante al nia lerneja vidpunkto, ni demandas nin: kiuj estas nuntempe la roloj de la **lernolingvoj** ("L1"?) en la instruprogramoj? Observante la internacian panoramon, ni povas rekoni esence 3 specojn de landoj.

Landoj A-klasaj:
en kiuj la civitanoj ekvizitas la bebvartejojn, poste vizitadas lernejojn infanan, mezan, superan (inkluzive la universitatojn), lernante ĉiam pri ĉio en sia **gepatra lingvo**.

Landoj B-klasaj:
en kiuj la infanoj lernas en sia (gepatra aŭ nacia) lingvo ekde la 1'a klaso ĝis iu lerneja ŝtupo X; sed post tiu nivelo ili povas daŭrigi sian lernadon nur uzante la lingvon de la A-klasaj landoj. Rimarku ke tiu limŝtupo X ne estas fiksita unu fojon por ĉiam kaj por ĉie, sed ĝi ŝoviĝas iom post iom malsupren, laŭ la politikaj decidoj de la unuopaj landoj, kaj iam ankaŭ kun sociklase diversaj solvoj.

Landoj C-klasaj:
kie la kompatindaj lernantoj [64] neniam (en neniu lerneja ŝtupo) lernas per sia (gepatra aŭ nacia) lingvo. Jam ekde la unua tago de la unua bazlerneja klaso ili devas konstante lernadi ĉion **fremdlingve**, per la idiomo de la ekskolonianta lando aŭ de iu A-klasa lando.

Kompreneble la diritaj 3 instrusistemaj modeloj ne precize kovras ĉiajn realaĵojn[65], interalie pro la ekzisto de multnivelaj plurlingvecoj kaj diglosiaj[66] situacioj. Tamen – eĉ se skemigite –

[64] Vidu pri tio la deklarojn pri la infanaj rajtoj, ekde la UN-konvencio de 1989 [*http://www2.ohchr.org/french/law/crc.htm*].

[65] Malsimplajn socilingvajn realaĵojn priskribatas, ekzemple, en Cardona/Corsetti/La Torre (1974), *Lingvistiko kaj politiko*, en TEJO, Seminario "lingvo kaj socio", Münster.

tiuj modeloj pentras mondon tavoligitan en 3 “vojaĝ-klasoj”, kiel la etaĝoj de ŝipego pasintjarcenta.

Kaj kion ni povas antaŭvidi por la baldaŭa estonteco?

Se la tendenco restos tiu ĵus dirita, pro la malaltiĝo de la supre menciita limo *X* (la ŝtupo, ekde kie la infanoj devas eklerni A-lingve), la B-landoj ĉiam pli similos je la C-landoj, ĝis kiam la B-klaso tute malaperos, kaj restos nur 2 kategorioj: tiu de la regantaj lingve rajtaj landoj (A) kaj tiu de la ceteraj regataj senrajtaj landoj (C).[67]

Kompreneble ni skizis la nuntempajn plej ofte videblajn modelojn; ankaŭ ali-specaj modeloj eblas, kiel ni vidos pli poste.

2 Interlingva eduko

2.1 Kio estas “interlingva eduko”?

Per terminoj iom variantaj laŭ landoj kaj laŭ pedagogiaj skoloj, oni nomas **lingvo-didaktiko** la fakon, kiu okupiĝas pri la teorioj, la teknikoj kaj la rimedoj, koncernantaj la problemojn de lingva instruado.

El la lerneja vidpunkto temas pri tre diversa problemaro kiam temas pri plu-lernado de sia **gepatra lingvo** *(L1)*, eklernita en la familio kaj socio jam ekde la naskiĝo, ol kiam temas pri eklernado de alia pli nova **fremda lingvo** *(L2)*, kiun la lernanto akiras (post *L1*) je iu aĝo *Y*-a.

Krome, jam de kelkaj jardekoj, la instrufakuloj (instruistoj, edukistoj, psikologoj, ktp.) parolas pri “**lingva eduko**”, kiel pedagogia sektoro tre pli vasta ol la nuraj didaktikoj de lingvoj gepatra kaj fremdaj, kiu celas formi en la lernulo ankaŭ aliajn konojn pri la homaj lingvoj ĝenerale, pri la paralelaj komunikaj kodoj (kiel gestado, mimado, spaca rilatado, ktp.), kaj pri la multaj aliaj **signaj sistemoj** grafikaj, muzikaj, formulaj, amaskomunikilaj kaj retkomputilaj. Kompreneble ĉio tio povas koncerni ne nur la homan komunikadon, sed pli ĝenerale la bestan kaj la maŝinan kodaron. La termino “lingva eduko” implice aludas ankaŭ pri tio ke oni ne nur celas la akirigon de lingvaj kapabloj, sed ĉefe la konsciigon pri la kompleksa komunika problemaro (lingva kaj ne-lingva).

En tiu tiel ampleksa kadro (kiu memkompreneble adaptiĝas je la celataj aĝoj kaj klerigo-ŝtupoj), kio estas la “**interlingva eduko**”menciita en nia titolo?

Ĝi estas freŝa branĉo de la ĝenerala lingva eduko, kiu aparte prizorgas:

- la **lingvajn homajn rajtojn**;
- la **lingvan plurecon** kaj la rilatojn inter la lingvoj;
- la lingvajn aspektojn de **interkultura eduko**.

Evidente la interlingva eduko estas pedagogia subbranĉo, profesie ankoraŭ maltre populara kaj aprezata inter la instruistoj kaj edukistoj, ankaŭ ĉar ĝi apenaŭ estas konata. Ĝuste tial pri ĝi ni volas diskuti!

2.2 Lingva scivolemo kaj lingva ludemo

Dum oni konas nur unu sistemon, eĉ se oni lerte moviĝas en ĝia interno, oni ne povas komplete kompreni ĝian funkcimanieron kaj ĝiajn limojn kaj eblajn evoluojn, ĉar oni ne vidas ĝin de ekstere. Pensu pri kiam ni – grimpinte apudan monton – vidas la urbon de supre kaj povas fizike percepti la rilatojn inter ĝiaj lokoj; aŭ pri la unua fojo kiam homoj fotis nian planedon de

[66] Ni konsideru ke la plejmulto de la nuna homaro ne estas unulingva, sed almenaŭ dulingva. Plej ofte la sama homo uzas siajn konatajn lingvojn ĉiu por diversa funkciaro (ekzemple: unu lingvo por kampara laboro kaj en la vilaĝa vivo, kaj alia por la oficejoj kiam li iras en la urbon). Tian dulingvecon oni nomas “diglosio” (aŭ funkcia dulingveco).

[67] Kondiĉe ke dume la gepatraj lingvoj de la C-klasaj landoj ne tute formortis.

ekstere. Simile, kvankam pli abstrakte, nur uloj, kiuj konas plurajn lingvojn (almenaŭ du), povas vere kompreni, kio estas gramatiko kaj semantiko.

Sed por tia konsciiĝo ne nepre oni devas bone, komplete, ellerni lingvojn. Ekzemple, jam nur scii ke ekzistas lingvoj sen pluralo (aŭ eventuale kun singularo/dualo/pluralo), kaj imagi kiel oni povas bone interkompreniĝi kun pli aŭ malpli da "gramatikaj nombroj", tre utilas por vere kompreni kio estas nia "pluralo".

En landoj, kie apenaŭ ekzistas konscio pri la kultura valoro de fremdlingva lernado, naskiĝis edukaj projektoj[68], kiuj celas veki en la infanoj la intereson, la scivolon pri aliaj lingvoj ol la tiea.

Springboard... to languages

Per la esprimo "**lingva scivolemo**" ni celas la plimalpli spontanan starigon de demandoj, kiaj:

e) Kiel oni diras "*kolbaso*" en lingvo X?
f) Ĉu ekzistas lingvo kun aliaj "genroj" ol vira/ina?
g) Kiu lingvo havas plej longajn (aŭ plej mallongajn) vortojn?
ĝ) En kiu lingvo troviĝas pli da personaj pronomoj ol la niaj *(mi, vi, ...)*
h) Ĉu verbaj tempoj enestas en ĉiuj lingvoj de la mondo?
ĥ) …:

La spertoj pruvas ke tia lingva scivolemo estas facile vekebla en junaj infanoj (ekzemple 10-jaruloj), se la edukanto trovas la ĝustan stimulan alkroĉon, kaj li/ŝi kapablas evoluigi **ludmanieran aliron**.[69]

Tipa ludmaniera aliro estas tiu, kiam oni imagas metiĝi en la situacio de eltrovantoj de solvo por la metitaj problemoj. Ekzemple::

A) Kiel komuniki inter surduloj? Se ni *ne* havus surdulan lingvon, per kiu rimedo ni povus konstrui ĝin, ne disponante pri sona parolo? Teorie solvinte tiun problemon, naskitan kiel ludan, oni povas poste ĝin alfronti el la vidpunkto de la historie jam disponeblaj realaj solvoj (gestolingvoj)!
B) Simile pri por-blindula skribado kaj legado. Evidente, malgraŭ certa analogio kun la antaŭa, ĉi tiu problemo bezonas tute aliajn solvo-rimedojn.
C) Bedaŭrinde ekzistas ankaŭ infanoj samtempe blindaj kaj surdaj.[70] Kio fareblas (kaj fakte faratas) por eduki kaj klerigi ilin? (…)

Ĉu la konsidero de problemoj kiel la ĉi-supre menciitaj kontribuas al "inter-lingva edukado"?

Rimarku ke, diskutante pri tiaj situacioj de interhoma komunikado en kondiĉoj de "kanala" limigo (kiel la manko de la aŭda aŭ de la vida komunikkanaloj), oni vole-nevole ekkonsciiĝas pri la rilatoj inter – unuflanke – la disponataj fizikaj kaj fiziologiaj rimedoj kaj – aliflanke – la enlingvaj strukturoj (lingvaj soneroj kaj skriberoj[71], vortoj, fraz-melodio) kaj la apudlingvaj kodoj (de gesta parol-akompano, palpado, referencado al la ĉeestantaj objektoj, ktp.).

Cetere, dum multaj Esperanto-parolantoj havas ian kutimecon kun Brajla skribo kaj preso, kiom da ili povus respondi je la demandoj: *ĉu ekzistas Esperanto-baza gesto-lingvo por surduloj? Kaj ĉu ie/iam ĝi estas uzata?*

---

[68] Vidu la ekzemple Esperanto-bazitan projekton de EAB: *Springboard... to languages* [http://www.springboard2languages.org]

[69] Tiudirekta propono la itallingva libro: Lombardo-Radice L. (1981), *Parliamo indoeuropeo*, Florenco, Giunti Marzocco

[70] Itala asocio kiu okupiĝas pri ili estas: *La lega del filo d'oro* [http://www.legadelfilodoro.it]

[71] aŭ, se vi preferas, "fonemoj kaj grafemoj".

Fame konatas la infana emo ludi per/pri lingvoj. Fakte tio povas okazi divers-nivele:

1. Infanoj kiuj ĵonglas per lingvaj ludoj (vokalŝanĝoj, divenaĵoj, ŝaradoj, krucvortenigmoj…) kaj kunlige kun tio eĉ inventas nomojn, vortojn, dirmanierojn;[72]
2. Infanoj kiuj inventas kaŝlingvajn transformojn kaj lerte aplikas ilin inter si;[73]
3. Infanoj kiuj ludcele inventas eĉ tutajn lingvojn.[74]

Ĉu la plenkreskuloj kapablas ekspluati tiun pli-malpli spontanan lingvan kreemon de la infanoj, por stimuli kaj evoluigi ilian lingvan scivolemon, anstataŭ – kiel ofte okazas – ignori (aŭ eĉ primoki) tian kreivan ludadon?

Eĉ kun la pli aĝaj studentoj de kurso pri Interlingviko oni povas sekvi problemecan kaj konstruan aliron.[75] Anstataŭ simple historie rakonti la ecojn de unuopaj lingvo-projektoj, oni povas ekzercocele meti al la studentoj konkretajn lingvoplanajn problemojn:

i) Ĉu povas funkcii lingvo sen prepozicioj? Kiel?
j) Kiel konstrui lingvon sen konjugaciaj "tempoj"?
Ktp.

2.3 Malkovro de lingva plureco

Per la supraj ekzemploj respektive de handikapa (surdula aŭ blindula) komunikado kaj de planlingva eksperimenta inventado, ni okupiĝis pri iel ne-normalaj situacioj, ĉar ĝuste tiaj imagataj situacioj povas pli efiki, por komprenigi kiel funkcias (normale!) la homaj lingvoj.

Tamen memkompreneble ankaŭ scivoliga povas rezulti la rekta renkonto kun normalsituaciaj etnaj lingvoj, des pli se ili estas iom "ekzotaj" kompare kun nia ĉiutaga lingvo. Por favori tiajn renkontojn en plaĉa, malteda maniero, en pluraj landoj oni aranĝas specialajn eventojn, nomitaj **LINGVAJ FESTIVALOJ**.[76]

Mallonge dirate, temas pri aranĝoj kiuj altiras centojn aŭ miljon da homoj al loko, kie dum mallonga tempo (unu tago aŭ tagduono) oni specimene prezentas multajn lingvojn, sinsekve aŭ samtempe. Tipa lingva prezento disponas je nura horduono, en kiu denaska parolanto de tiu lingvo (ekzemple studento de la loka universitato) konkrete montras kelkajn ecojn de sia idiomo. Eble li dum la unuaj 5 minutoj lernigas al la ĉeestantoj kiel saluti aŭ simple nombri. Poste li aŭskultigas specimenan kanzonon aŭ poemeton kaj sur tiu bazo klarigas kelkajn fonetikajn, ortografiajn aŭ gramatikajn trajtojn. Iam li eĉ amuze defias la partoprenantojn per proponado de langostumbliloj. Tiaj festivalaj aranĝoj – entute jam elprovitaj dekojn da fojoj, ankaŭ en lernejoj, universitatoj, internaciaj konferencoj – montriĝis vere **interlingve edukaj** en amuza kaj interesveka maniero. Krome, iam la spertoj rezultas edukaj eĉ por la lingvo-prezentanto, kiu eble neniam ludis tian rolon, resumi sian lingvon en 30-minuta "butikeca" elmontro.

---

[72] Pri tio ekzistas eta internacilingva literaturo: Fjodorov A. (1985), *Didaktikaj lingvaj ludoj*, Sofio (BG); Kühl E. (1980, red.), *Lingvaj ludoj de GEJ*, Paderbono (DE), GEJ; Faux.P. (s.d.), *Vortludoj*, Bicester (UK); Marĉek S./Markoviĉ S. (1979), *Instrua amuzo*, Martin (SK); Bennemann P. (1950), *Miru pensu ridu!*, Heroldo de Esperanto.
[73] Ekzemple: A->ATA, O->OKO, I->IĜI, ktp.
[74] Kiel rakontas pri si la fama interlingvisto A. Bausani (1970), *Geheim- und Universalsprachen*, Stuttgart (DE), Kohlhammer; (1970), *Le lingue inventate*, Roma, Ubaldini
[75] Ion similan eksperimentis ekzemple K. Kovats en la Universitato de Szombathelyi (HU).
[76] Vidu ĉe *LinguaFest* [http://www.linguafest.info] kaj en TEJO-paĝo *Lingvaj festivaloj* [http://www.tejo.org/lf]

Revenante al la interlingva eduko en lerneja instruado, granda oportuno povas veni de la situacioj, kiam en la sama klaso ĉeestas lernantoj kun diversaj gepatraj lingvoj. Ĉiam pli oftas nun la kazoj de la enmigrintaj lernejanoj, filoj de gastlaboristoj.[77] En tiaj kondiĉoj, vigla kaj lerta instruisto povas aranĝi en la klaso mem (aŭ ĉe la familioj) et-skalajn etnolingvajn esplorojn pri kelkaj ecoj de tiuj "fremdaj" lingvoj, reprezentataj en la klaso de la kamaradoj mem (aŭ de iliaj geparencoj, hejme). Temoj povas esti, ekzemple:

ĵ) skribmanieroj kaj prononcoj;
k) bestoj kaj plantoj;
l) koloroj aŭ sonoj;
m) kiel oni faras superlativon aŭ kiel oni transformas prezencon en futuron aŭ paseon (kaj simile).

Alia granda rimedaro povas veni de Interreto, almenaŭ en 2 formoj:

a. Oni povas per simpla klako de komputila klavo vidi retpaĝon skribitan en iu celata lingvo (ne gravas ĉu de Svislanda malplimulto ĉu de suda Barata regiono), kaj eventuale ion deĉifri el tiu paĝo. Ie disponeblas ankaŭ tuja tradukilo, kiu, eĉ se malbonkvalite, povas helpi vin kompreni la signifon de … ĉina ideogramo.
b. Troveblas prilingvaj rimedaroj, kelkaj eĉ ĝuste pretigitaj por infanoj[78], kiuj liveras multlingvajn tradukvortarojn, konjugaciilojn, (eĉ sintaksajn analizilojn, sed tio … ne por infanoj), ĝis proverbaraj kolektoj. Taŭge uzinda en nia perspektivo estas la retejo LINGVA PRISMO[79] kun informoj, ludoj, scivolaĵoj pri la lingvoj de la mondo.

Memkompreneble ni ne povas nun, eĉ se nur panorame, priskribi la tre variajn eblajn metodojn por esplori, kompari, eklerni kaj kontentigi siajn lingvajn scivolemojn (kiel pri la langostumbliloj en aliaj lingvoj). Ni volas nur levi la ideon ke, kvankam ni vivas en mondo kun fortaj kaj mondskalaj unulingvigaj tendencoj, tamen ankoraŭ eblas (eĉ pli facile ol antaŭe) interlingve eduki la lernantojn, antaŭ ĉio vekante en ilia menso interesojn pri la lingva fenomenaro, t.e. pri la bunta esprimiĝ-maniero de la homaro.

2.4 Ĉu inter la universalaj homaj rajtoj enestu la lingvaj?

Esplorante kun etaj lernejanoj aŭ kun pli aĝaj studentoj pri la lingva bunteco de la mondo (sufiĉu ekzemple vidi en Interreto, en kiom da lingvoj aperas Vikipedioj kaj kiom da volontuloj laboregas por kreskigi tiujn diversajn eldonojn[80], vole-nevole, plimalpli frue, oni "stumblas" en

[77] La Torre M. (1995), "Kiel difini lingvokonajn sojl-nivelojn?", Tampereo, IKU '95
[78] Vidu ekzemple ĉe *Logos* [http://www.logos.it/language/translations_eo.html]
[79] *Lingva prismo* [http://www.lingvo.info]
[80] *Vikipediaj statistikoj*: [http://stats.wikimedia.org/EO/Sitemap.htm]

la demando: «ĉu tia varieco ne estas balasto, ĉu ne deziri … novan "Pentekostan miraklon", eĉ se per la malpli idiliaj manieroj de la nuna tutglobisma epoko». Tiam objektive, senpasie rigardante la mondan scenaron, renkontiĝas kaj interbatalas 2 bazaj postuloj:

a) la postulo de senbara kaj efika **tutmonda komunikeblo**;
b) la postulo de la **lingvaj rajtoj**.

Kvankam en la **Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj**[81], formulita ĉe UNO tuj post la dua mondmilito, apenaŭ havas lokon la kulturaj kaj lingvaj aspektoj, tamen en la postaj jardekoj oni aranĝis specialajn internaciajn konferencojn, por interkonsenti kaj aserti la homajn rajtojn en la lingva sfero de la **Universala Deklaro de lingvaj rajtoj**[82] ĝis la lastatempa simpozio (2008) *Lingvaj rajtoj en la mondo: la nuna situacio*[83]**.** Pri la detaloj (kiom ampleksajn lingvajn rajtojn oni havu, kaj en kiaj kondiĉoj) oni povas havi plurajn opiniojn, sed multaj homoj, interalie la esperantistoj, komune akceptas la principan subtenindon de iomaj lingvaj rajtoj.[84] Plej bona ekzemplo de tia starpunkto estas la **Praga manifesto**.[85]

Traktante ĉi tie pri interlingva eduko, ni supozas ke la temo de lingvaj rajtoj estu grava parto de tiu eduko. Eble ne klarvorte sed prefere implice; eble ne aksiome, sed problemece. Ĉu vere ĉiuj homoj havu iujn lingvajn rajtojn? Kaj eventuale ĝis kioma grado? Kiel povas konkrete realiĝi la teorie postulataj principoj? Kiel la instru-sistemoj kontribuas al tiuj celoj?

2.5 Lernolingvoj

Fokusigante nian atenton al la ebla kontribuo de la instrusistemoj, konvenas distingi 3 interven-nivelojn.

1) La unua nivelo, senpere ligita al la aktualigo de la lingvaj homaj rajtoj, koncernas la elekton de la lernejaj lingvoj: ne nur de la **fremdaj lingvoj** kiel studobjektoj, sed ankaŭ de la bazaj "**lernolingvoj**", uzataj por instrui ĉion alian. Tiucele, krom la menciitaj tendencoj (v. par. 1.4) de la "B-klasaj landoj" (ĉiam pli instrui per la hegemoniaj lingvoj de la A-landoj en la ĉiugradaj lernejoj), konsiderindas ĉi tie ankaŭ alternativaj proponoj, emantaj al demokrataj modeloj.[86] Temas pri lernoplanoj, laŭ kiuj **ĉiuj infanoj** komencas en la unua elementa klaso lerni ĉion per sia loka (gepatra) lingvo; iom poste (eble en la 3-a klaso) ili eklernas la Internacian Lingvon (kiel etne neŭtran komunikilon, kiu malfermas la mondan komunikeblon); pli poste (eble en la 5-a klaso) ili eklernas alia(j)n etna(j)n lingvo(j)n, kun relativa elekto-libero, laŭ kulturaj kaj aŭ ekonomiaj kriterioj.
2) La dua nivelo (aŭ pli ĝuste "maniero"), kiel la instruprogramoj povas kontribui al la konsciigo kaj plenumo de lingvaj rajtoj, estas la stimulado en la lernejanoj de **intereso por la lingvoj**, kiel komuniksistemoj kun buntaj konstru-materialoj (leksikoj) kaj regularoj (gramatikoj). Tian interesiĝon oni povas pacience konstrui multmaniere, komencante per veko de la lingva scivolemo, kiel ni iomete montris supre (par. 2.2).
3) Tria maniero, por kontribui al la realigo de la homaj rajtoj en la lingva kaj kultura kampo, estas la t.n. "**interkultura eduko**".

2.6 Interkultura eduko por egalrajteco: lernejaj projektoj

Ĉi tie, parolante pri "interkultura eduko", ni *ne* celas la plej konatajn konceptojn, kiuj limiĝas je la integrado de la fremd-devenaj lernejanoj en la gastiganta lando, helpante ilin al akceptiĝo, kaj al pli efika lernado de la lerneja ĉeflingvo. Nia koncepto koncernas ĉiujn klasanojn, sendepende

[81] *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* [http://www.unhchr.ch/udhr/lang/1115.htm]
[82] *Universala Deklararo de Lingvaj Rajtoj* [http://www.linguistic-declaration.org]
[83] Simpozio 2008.04.24 [http://www.lingvaj-rajtoj.org]
[84] *Nitobe-centro por lingva demokratio* [http://eo.nitobe.info]
[85] *Manifesto de Prago* [http://lingvo.org]
[86] Vidu, ekzemple, tiun de M. Grosjean (2001), *Koncepto de edukprogramo celanta edukadon pacen*.

ĉu ili apartenas al malplimultula aŭ plejmultula parto de la socio, ĉu ili naskiĝis en malpli aŭ pli riĉa lando: ĉar *ne* temas pri la alsimiligo de fremduloj, sed pri *ĉies* kompreno pri la plureco kaj **egalrajteco de la kulturoj**.

Tiajn principojn oni iam esprimas ankaŭ sub la nomo de "**interlingvismo**"[87], kiel oni povas legi (kaj pridiskuti) en la retejo **LINGVA PRISMO:** [88]

Kio estas interlingvismo?

En la mondo ekzistas multaj lingvoj, parolataj de diversaj nacioj kaj popoloj. El pluraj vidpunktoj ne ĉiuj (naciaj) lingvoj estas praktike samvaloraj hodiaŭ. Ekzemple multaj devas (foje kontraŭ sia volo) lerni fremdan lingvon por povi akiri laboron aŭ studi, kaj ĉe Unuiĝintaj Nacioj ne ĉiuj delegitoj povas paroli sian gepatran lingvon. *En "interlingvisma" mondo ekzistas*: **lingva diverseco** (multaj malsamaj lingvoj), **lingva egaleco** (neniu nacia lingvo estas pli grava ol alia nacia lingvo), **lingva integriĝo** (diversaj lingvoj funkcias kune kaj egalrajte), **lingva efikeco** (ĉiuj povas komuniki kun ĉiuj) kaj **lingva stabileco** (sistemo kiu ebligas daŭran funkciadon laŭ la unuaj kvar principoj).

En la lasta jardeko ekfloris pluraj projektoj, celantaj kontribui al **interkultura eduko** per pli aŭ malpli evoluintaj metodoj kaj rimedoj. Ni birdofluge trarigardu kelkajn el tiuj spertoj (ankaŭ tiujn jam elĉerpitajn aŭ nun dormantajn), ĉar ili entenas proponojn valorajn enhave aŭ metode, kiuj ankoraŭ povas liveri utilajn sugestojn por edukantoj kaj edukontoj.

"Prahistoria" ekzemplo de interkultura eduka aranĝo estas **INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO**[89], naskita en Usono; en tiu organiza kadro la infanoj lernis la Internacian Lingvon kaj samtempe uzis ĝin por korespondi kun alilandaj samaĝuloj, ekzemple sendante poŝtkartojn, desegnojn, fotojn, kun propraj klarigoj kaj aldonaj komentoj. Imagu ke tio ne okazis inter najbaraj landoj, sed – ekzemple – inter usonaj kaj ĉinaj infanetoj.

Ne lerneja, tamen tre interesa kaj malkutima aranĝo estis la sistemo **INDIĜENAJ DIALOGOJ**[90], en kiu kolektiĝis junaj anoj de organizoj, reprezentantaj "primitivajn" popolojn, lernante Esperanton kaj la uzon de komputilaj retoj, cele al pli efika kaj konscia kunlaborado inter siaj etnaj organizoj.





En 1998 okazis en Montpeliero (FR) internacia simpozio pri *Lingva politiko kaj interkultura edukado*[91], el kiu naskiĝis la interlerneja projekto, nomata **INTERKULTURO**, en kiu partoprenis dekoj da klasoj apartenantaj je lernejoj el ĉiuj kontinentoj kaj latitudoj, tra la interreta KVAZAŬLERNEJO TIBOR SEKELJ[92].
En tiu virtuala "lernejo" ili kunlaboris pri elektitaj temoj (ludoj, festoj, naturmedio, lerneja vivo...),

[87] Pool J. / Fettes M. (1998), *La interlingvisma defio*, ESF [http://www.esperantic.org/esf/ismo.htm].
[88] *Lingva prismo* [http://www.lingvo.info/interlingvismo]
[89] IĈLM [http://icxlm.org]
[90] Spuro de la iama *Indiĝenaj dialogoj* ĉe [http://www.xs4all.nl/~pilger/id]
[91] ILEI/UEA (1999), *Projekto INTERKULTURO* [http://host.uniroma3.it/progetti/kler/info/ikbr1_.htm]
[92] Kopio de la iama *KLER* videblas ĉe [http://host.uniroma3.it/progetti/kler/]

prilaborante skribajn/bildajn/sonajn materialojn, kiujn ili ekspoziciis en sia virtuala "lernoĉambro" (propra retpaĝo), kune kun informoj pri si mem (fotoj, nomoj, ktp.). Kadre de Projekto Interkulturo okazis ankaŭ kelkaj fizikaj renkontiĝoj en Jugoslavujo kaj Polujo, krom porinstruistaj seminarioj. Krome, la hiperlerneja reta medio enhavis fakajn laboratoriojn kaj instruistan diskutejon.
Pli poste la projekto renaskiĝis en nova vesto, teknologie pli efika, kaj kun aliaj metodaj modeloj.[93]



Krom (aŭ sub) tiuj tegmentaj kadroj vivis/vivas pluraj aliaj interkulturaj kunlabor-programoj, kiel LUDEŬREJO (itala, rumana kaj franca bazlernejoj) kaj la nuna AKEL2[94] (inter itala / bulgara / hispana / brita mezlernejoj), kun loka laboro kaj jaraj ĉeestaj renkontiĝoj.
Nuntempe oni klopodas aranĝi novajn lernejajn edukprojektojn, kun interkultura fono, en la retmedia kadro LINGVOLANĈILO[95,] kunligita ankaŭ kun la supremenciita (par. 2.2) interlingvema SPRINGBOARD... TO LANGUAGES.

Aliaj interkulturaj realigoj aŭ planoj mencieblus, ankaŭ alispecaj, kiel ekzemple la Palestina PACOAZO, kie oni edukas kune hebreajn kaj arabajn infanojn, laŭ komunaj programoj.[96]

2.7 Interlingvaj rimedoj kun interkultura valoro

En la supraj linioj ni panorame priskribis plurajn ekzistantajn interkultur-edukajn projektojn kaj aranĝojn. Nun, por fini, ni iom traktu iujn enhavojn de tiuj projektoj. Sed, ĉar la kampo estas vastega kaj nia spaco limigita, ni nur tuŝu kelketajn ekzemplajn temojn.

---

[93] La nuna *INTERKULTURO (inter vi, mi, kaj niaj kulturoj)* situas en [http://www.interkulturo.net]
[94] AKEL2 [http://scuole.monet.modena.it/cavour/Comenius%20AKEL2] kaj en [http://sou-pt.hit.bg]
[95] LINGVOLANCILO [http://egalite.freeweb.hu/salto].
Artikolo de R. Corsetti pri *La motivaro de la projekto* legeblas ĉe [http://www.bonalingvo.it]
[96] PACOAZO [http://nswas.org/esperanto]

A. PERSONNOMOJ

Pensiga sperto, reale plurloke okazinta, estas la jena. Mezlernejanoj kolektas liston de personaj nomoj (de amikoj, parencoj, famuloj, literaturaj personoj). Ju pli enestas eksterlandaj kaj fremdlingvaj materialoj (ekzemple de enmigrintaj kamaradoj aŭ najbaroj), des pli bone. Oni komencas klasigi tiun materialon laŭ la deveno de tiuj nomoj (sanktuloj, naturaĵoj, famuloj,...); eĉ povas troviĝi simplaj numeraloj (Unua, Dua,..., Oka) aŭ hazardaj nomoj. Se la nomoj apartenas de diversaj lingvoj, tiam oni povas serĉi laŭeble ekvivalentojn:

Johano, Jean, John, Giovanni, Ivan, Juan, Hans,...

Se en la medio troviĝas anoj de aliaj foraj tradicioj, oni povas fari interesajn malkovrojn pri la manieroj de nom-elektado (ekz. en iu kulturo fonto estas la sanktula kalendaro, sed en alia tradicio eble la inspiro venas de tute alia fonto, kiel arbaj aŭ floraj nomoj). En tia eta esplorado interplektiĝas interkulturaj faktoroj (nom-elektado), interlingvaj transformoj (ekz. ĉu estas lingva "proporcio" en la jena kvaropo?)

Jean: Giovanni = Joseph: Giuseppe

kaj socilingvaj aspektoj (ekz. pri la uzado de karesformoj)

Ekaterina > Katja > Katjuŝa...; Johan > Hans, Hänsel...

B. BLEKOJ

Eĉ en Interreto oni povas trovi belajn paĝojn, kie oni kolektas kaj tabeligas la respondojn je jenspecaj demandoj:

c) kiel kokerikas franca koko?
d) kiel miaŭas japana kato?
e) kiel... blekas suoma muso?

Ankaŭ tia serĉado (kiu povas tre plaĉi en iomaj aĝoj) limas inter lingvaj kaj kulturaj aspektoj! Unue ĝi detruas la falsan (sed oftan) opinion, ke blekvortoj kaj onomatopeoj estas simple meĥanikaj fonetikaj transkriboj de aŭdataj sonoj. Due ĝi povas malkovrigi kulturajn vidmanierojn (aŭdmanierojn).

C. KOLOR-NOMOJ

«Kiel oni nomas (en via lingvo) tiun koloron?»
«Kiun el la ĉi tie farbitaj koloroj signifas la vorto "bruna" (aŭ "blua")?»

Per tiaj demandoj provu aranĝi belan "ludon" en grupo da diverskulturaj homoj (ekz.e en paŭzo de internacia konferenco). Tiel ludante, iuj homoj eble malkovros, kiel la semantikoj de lingvoj diversaj povas havi ne-interrespondajn nociojn, kaj ili eble eĉ emos diskuti pri la kialoj de tio.

D. PROVERBAROJ

Laste ni aludu[97] pri kiel la kampo de proverboj, devizoj, dirmanieroj, kaj ĝenerale t.n. "frazeologio" povas estis vere riĉa minejo por interkultura edukiĝo. Spertoj pri tio estas faritaj en internaciaj homgrupoj[98] kaj en interlande kunlaborantaj klasoj. Por instru-metode konkretigi nian ekzempladon, ni imagu specifan laborplanon pri tio:

[97] Pli ampleksajn pritraktojn legeblas en La Torre M. (2000), *Proverbante... oni lernas*, en IPR 2000/4; pliaj materialoj troveblas en la *Proverbejo de la Kvazaŭlernejo* [http://host.uniroma3.it/progetti/kler/proverb].
[98] *PSI* de GEA (St. Andreasberg, 2001) kaj *Lingva ĉielarko* de TEJO (Budapeŝto, 2001)

a1) Klaso X kolektas 50-on da proverboj en sia X-a lingvo.

a2) La klasanoj klasigas la kolektitajn diraĵojn kelkmaniere (ekz. laŭ speco de menciataj aĵoj, laŭ morala instruo por la vivo, laŭ lingva stilo kaj sintakso,...).

a3) Eventuale oni grupigas sam- aŭ simil-signifajn proverbojn.

a4) La lernantoj laŭvorte tradukas po-kelke tiujn esprimaĵojn de sia X-a lingvo al elektita pontolingvo P (ekz. Esperanto).

b1-b4) Samtempe kun la supraj paŝoj a1-a4, klaso Y de alia plimalpli fora regiono faras la samajn paŝojn en sia Y-lingvo (kun fina traduko al la komuna pontolingvo P).

5) La du klasoj interŝanĝas la proverb-kolektojn (originaloj + tradukoj).

6) Ĉiu klaso legas kaj analizas la proverbaron ricevitan de la partnera klaso, notante ĉiajn interesajn konsiderojn, sed ĉefe serĉante eventualajn ekvivalentojn inter la du kolektojn.

7) La rezulton de tiuj komparadoj oni povas aperigi en bela plurkolumna tabelo, kun originaloj, tradukoj, temoj, ekvivalentoj, ktp.

8) Ankaŭ la tiel produktitajn tabelojn la du klasoj povas interŝanĝi, por komparo kaj por laŭebla kompletigo.

Imageble la “ludon” oni povus daŭrigi, laŭplaĉe, sed tio kio por ni plej gravas estas pripensi, ĉu kaj kiel tia agado povas interkulture eduki.

3. Malferma konkludo

Ĉi tie ni legis divers-tipajn specimenajn konsiderojn pri interlingva kaj interkultura eduko. Kredeble multaj el la proponaĵoj validas ankaŭ sen la elekto de Esperanto kiel pontlingvo aŭ metalingvo. Tamen mi subkomprenas ke la laboro per etne neŭtra planlingvo Esperanto rimarkinde plivalorigas la edukadon pro almenaŭ du kialoj:

f) la komunika efikeco (rapida akireblo de la lingvo);
g) la simbola valoro (ĉar eduko al kultura egalrajteco, farata per unu hegemonia etna lingvo estas implica kontraŭdiro).

Eble restas diskutota la titola demando:

«ĉu per interlingva eduko oni savos la mondan lingvo-variecon?»

Popola kaj malpopola posedo de la lingva riĉo: la dunormeco sub kogna lupeo

Probal Dasgupta
Doktoriĝis en 1980, instruis lingvistikon en Nov-Jorko, Melburno, Kolkato, Puneo, Hajderabado, kaj Esperanton en Barlastono (Britio) kaj San-Francisko. Kunredaktas la revuon *Language Problems and Language Planning*. Ĉefaj verkoj *Kathaar kriyaakarmo* (1987), *The Otherness of English* (1993), *After Etymology* (2000), tradukis kvar romanojn en Esperanton kaj unu el Esperanto. Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto de 2001, honora membro de la Lingvistika Societo de Usono de 2004, prezidanto de UEA ekde 2007. Laboras en la Lingvistika Esplorejo en la Barata Statistika Instituto, Kolkato de 2006.

Resumo

Iuj lingvoj tre evidente, kaj multaj aliaj malpli evidente, faras distingon inter tiu facila aŭ malalta lingvonormo, kiun kapablas uzi ankaŭ la infanoj kaj la malkleraj anoj de la publiko, kaj tiu malfacila aŭ alta lingvonormo, per kiu plene funkcias la skribaj diskursoj sur la fakaj terenoj.

La termino diglosio, aŭ dunormeco, indikas tiun terenan diversecon ene de ĉiu lingvo. En iuj ekstremaj kazoj, kiel la araba aŭ la greka aŭ la tamila, la alta normo tiel frape disiras de la malalta, ke ĉiuj devas eksplicite paroli pri tiu diverĝo kaj pritrakti ĝin en la pedagogia sistemo. De tiaj ekzemploj ni ricevas la terminon kaj la plej bazan kaj forman komprenon de la fenomeno diglosio. Sed postaj esploroj montris, ke la diglosio sur la nivelo de la lingva substanco estas io universala. Tiu ĉi fakto estas tre grava por la kognoscienca aliro al la lingvaj fenomenoj. Laŭ tiu aliro, aparte gravas la rilato inter la facila parto kaj la malfacila parto de la lingvoscio de ĉiu individuo, ĉar tiu lingvoscio sin ankras en la facila parto. Ni devas evoluigi socisciencan aliron, kiu donas taŭgan rolon al tiu ĉi nun esplorata kognoscienca perspektivo; la nunaj rimarkoj faras unuan kontribuon en tiu direkto.

Se ni enfokusigas la multe priskribitan kazon de la diglosia rilato inter la angla kaj la barataj lingvoj, ni trovas dividon de laboro, kiu ligas la anglan kun la eduka sistemo, precipe kun la supera eduko, kaj la baratajn lingvojn kun la emocia kaj kultura partoj de la spektro. Por preteriri tiun ĉi laŭimpresan legon de la faktoj, ni bezonas apliki al ili teorian ilaron, kiu kombinas la socilingvistikon de la diglosio kun la diferencigita leksikologio en la kadro de la genera lingvistiko. Devus ne esti seninterese al la aŭdantaro, ke en tiu ĉi teoria aliro aperas ankaŭ Esperanto kiel interleksika glosilo. La lingvo-kultivado ofte okupiĝis pri la plurlingvaj socioj, sed nesufiĉe intense pri la rolo de la diglosio en la lingvo-kultivado. Ĉi tiu prezento evoluigas la proponon, ke modernaj socioj, por kultivi la tuton de sia lingva trezoro, bezonas naĝi kun kaj ne kontraŭ la diglosio.

Linguistic wealth, of the people and otherwise: a cognitive approach to diglossia

Abstract

A few languages make an obvious distinction, and many others make a less obvious distinction, between an easy or low norm accessible even to children and to uneducated adult speakers and a difficult or high norm that supports the full-fledged functioning of the written discourses in specialized domains.

The term diglossia denotes this diversity on the ground within each language. In certain extreme cases such as Arabic or Greek or Tamil the High norm so strikingly fails to resemble the Low norm that everybody is compelled to refer explicitly to this divergence and to take it on in the educational system. It is these examples that are responsible for the term diglossia and for our initial, form-focused understanding of the phenomenon. But later studies have argued that diglossia is a universal at the level of linguistic substance. This finding is of great importance for the cognitive approach to the study of language. The cognitive approach prioritizes the relation between the easy and the difficult component of the individual's knowledge of language, for that knowledge is anchored in the easy component. It becomes necessary to develop a social science approach capable of fashioning an appropriate niche for this cognitive science perspective of current interest; the present remarks make an initial contribution to this enterprise.

When we focus on the much discussed case of the diglossic relation between English and the Indian languages, we find a division of labour that associates English with the system of (especially higher) education and the Indian languages with the affective and cultural parts of the spectrum. To go beyond this impressionistic reading of the facts we need to bring to bear on them a theoretical toolkit that combines the sociolinguistics of diglossia with differentiated lexicology in the framework of generative grammar. It may be of some interest that this theoretical approach also features Esperanto as an interlexical glossing device. Approaches to language cultivation have often considered plurilingual societies but have tended to ignore the role of diglossia in cultivation. The present intervention articulates the proposal that modern societies, in order to cultivate their linguistic treasure in its entirety, need to swim with and not against the diglossic current.

Possession de la richesse linguistique par le peuple et par l'élite: la diglossie sous la loupe cognitive

Résumé

Certaines langues de façon très évidente, et beaucoup d'autres de façon moins évidente, font une distinction entre la norme linguistique facile ou basse, que sont capables d'utiliser même les enfants et les adultes sans instruction, et la norme linguistique difficile ou élevée, qui permet le fonctionnement des dissertations écrites dans des domaines spécialisés.

Le terme diglossie, ou dualité de normes, désigne cette diversité de terrain au sein de chaque langue. Dans quelques cas extrêmes, comme l'arabe, le grec ou le tamoul, la norme haute s'écarte de la norme basse de façon si frappante que tout le monde doit parler explicitement de cette divergence et la prendre en compte dans le système éducatif. Ce sont de tels exemples qui nous fournissent le terme et la plus élémentaire et formelle compréhension du phénomène diglossie. Mais des recherches ultérieures ont montré que la diglossie au niveau de la substance linguistique est une chose universelle. C'est un fait très important pour l'approche cognitive des phénomènes linguistiques. Selon cette approche, la relation entre la composante

facile et la composante difficile de la connaissance de la langue par tout individu est particulièrement importante, car cette connaissance est ancrée dans la composante facile. Nous devons faire évoluer cette approche socioscientifique, qui donne un rôle adéquat à la perspective cognitive étudiée ici; les présentes remarques constituent une première contribution en ce sens.

Si nous examinons le cas mainte fois décrit de la relation diglossique entre l'anglais et les langues indiennes, nous trouvons une division du travail, qui lie l'anglais au système éducatif, et plus précisément à l'éducation supérieure, et les langues indiennes aux composantes émotionnelle et culturelle du spectre. Pour dépasser cette lecture impressionniste des faits, il convient de leur appliquer une panoplie théorique, qui combine la sociolinguistique de la diglossie et la lexicologie différenciée dans le cadre de la linguistique générative. Il ne devrait pas être inintéressant pour l'assistance, qu'apparaisse également dans cette approche théorique l'espéranto en tant que médiateur interlexical. La culture de la langue a souvent traité des sociétés plurilingues, mais a eu tendance à négliger le rôle de la diglossie dans la culture de la langue. La présente intervention développe la proposition selon laquelle les sociétés modernes, pour cultiver l'intégralité de leur capital linguistique, doivent nager avec, et non contre, le courant diglossique.

Taalkundige rijkdom van 't volk en anderszins: cognitieve benadering van diglossie

Samenvatting

Sommige talen maken een evident onderscheid, andere iets minder, tussen de simpele lage taalnorm, die ook kinderen en minder ontwikkelden van het publiek kunnen toepassen, en de moeilijke hogere taalnorm, volgens welke de schriftelijke discours op vakgebieden volledig functioneert.

De term diglossie duidt deze diversiteit binnen de taal aan. In sommige extreme gevallen, zoals Arabisch, Grieks of Tamil, is het verschil tussen hoge en lage norm zo frappant, dat iedereen expliciet deze verschillen moet benoemen en in het onderwijssysteem meenemen. Deze voorbeelden zijn verantwoordelijk voor de uitdrukking diglossie en voor ons primaire, op vorm gefocuste verstaan van dit verschijnsel. Maar latere studies hebben aangetoond dat diglossie universeel is op het niveau van de taal zelf. Deze ontdekking is uiterst belangrijk voor de cognitieve benadering van taalstudie. De cognitieve benadering geeft prioriteit aan de relatie tussen de makkelijke en de moeilijke componenten van de individuele taalkennis, want die kennis ligt verankerd in de makkelijke component. Het wordt noodzakelijk, een sociaalwetenschappelijke benadering te ontwikkelen die in staat is een passende rol te bieden voor dit thans onderzochte cognitieve perspectief; de huidige opmerkingen bieden een eerste bijdrage in deze richting.

Als we focussen op de vaak besproken diglossische relatie tussen Engels en de talen van India, vinden we een werkverdeling die het Engels associeert met het (vooral hogere) onderwijssysteem en de Indische talen met de gevoelsmatige en culturele delen van het spectrum. Om verder te komen dan dit impressionistisch lezen der feiten, moeten we hier een theoretisch gereedschap op toepassen, waarbij de sociolinguistiek der diglossie gecombineerd wordt met de gedifferentieerde lexicologie in het kader van de generatieve grammatica. Het zou niet oninteressant moeten zijn voor ons publiek, dat bij deze theoretische benadering ook het Esperanto in zicht komt als interlexicaal middel. Taalcultivatie heeft zich vaak bezig gehouden met meertalige samenlevingen, maar vaak met de neiging de rol van diglossie hierbij te verwaarlozen. Deze lezing formuleert het voorstel dat moderne samenlevingen, om het geheel van hun taalrijkdom te cultiveren, moeten meezwemmen met – en niet tegen de stroom der diglossie in.

Popola kaj malpopola posedo de la lingva riĉo: la dunormeco sub kogna lupeo

Oni povas facile konsenti, ke la lingvoj estas trezoro de la homaro. Sed la riĉon, en dividita mondo, iuj posedas pli, kaj aliaj malpli. Ĉu la lingvon de la bengala, aŭ la joruba, aŭ la flandra komunumo posedas egale ĉiuj ĝiaj parolantoj? Se ne, kiamaniere ni komprenu kaj traktu tiujn malegalecojn, por ke la modernaj socioj scipovu prudente mastrumi sian lingvan trezoron kaj disponigi justajn porciojn al ĉiuj?

Ene de tiu relative vasta temo – la malegala posedo de iu lingvo fare de diversaj ĝiaj komunumeroj – utilas elekti unu konkretan subtemon, nome, la diglosion aŭ la dunormecon. En diglosia sistemo, kutime unu el la du normoj ene de difinita lingvo estas pli tutpopola – ĝi nomiĝas la malalta normo – kaj la alia, la alta normo, sin pli ligas al la elito aŭ al elitecaj (ekzemple, erudiciaj) uzmedioj. Kia esplormetodo plej taŭgas al tiu ĉi fenomeno? El la diversaj aliroj al nia esplorobjekto, ni elektas la substancisman lingvistikon, kiu aplikas kriteriojn de la kognoscienco al diversaj (ankaŭ al sociaj) terenoj de la prilingva esplorado.

Kio do estas la diglosio? Iuj lingvoj tre evidente, kaj multaj aliaj malpli evidente, faras distingon inter facila aŭ malalta lingvonormo – kiun kapablas uzi ankaŭ la infanoj kaj la malkleraj anoj de la publiko – kaj tiu malfacila aŭ alta lingvonormo, per kiu plene funkcias la skribaj diskursoj sur la fakaj terenoj. La termino *diglosio* (en la pli naturalisma "babela" strio de Esperanto), aŭ *dunormeco* (en la pli skemisma "tabela" tendenco de nia planlingvo), indikas tiun terenan diversecon ene de ĉiu lingvo. En iuj ekstremaj kazoj, la alta normo tiel frape disiras de la malalta, ke ĉiuj devas eksplicite paroli pri tiu diverĝo kaj pritrakti ĝin en la pedagogia sistemo – ekzemple, en la araba, la greka aŭ la tamila. De tiaj ekzemploj ni ricevas la terminon kaj la plej bazan kaj forman komprenon de la fenomeno diglosio. Ni uzos la esprimon "forma diglosio" por identigi tiajn kazojn.

La bengala lingvo, antaŭ nur unu jarcento, estis forme diglosia. En tiu tempo ekzistis delonge kultivata alta normo en la skriba lingvo. Staris kontraste al ĝi la apenaŭ flegata malalta normo en la skriba lingvo, kiu respondis al la parola normo. En tiu tempo oni kutimis paroli en la altbengala nur kiam oni laŭtlegis tekstojn aŭ prelegojn. La homoj neniam dialogis en la altbengala, sed ĉiam nur en la malalta varianto.

Kiel la du normoj diferencis? Ni prenu konkretan ekzemplon. La malaltbengala frazo "Beraaler piĉhu dhaaoaa korlo kukurtaa" portas la signifon 'La hundo postkuris la katon' kaj respondas al la altnorma "Kukurti maarĝaarer paŝĉaad-dhaabon korilo". Ni iom rigardu la diverĝojn de la ordinara, forma vidpunkto.

La subjekto 'la hundo' rajtas stari frazofine en la malaltbengala, "kukurtaa". Sed la alta normo preferas rigore konservi la frazfinan pozicion de la verbo. Ĉi tie, la altbengala varianto de la frazo komenciĝas per la subjekto "kukurti". La kutima vorto por la katoj en la malaltbengala, "beraal", estas vorto pleba; la alta normo preferis la sanskritan vorton "maarĝaar". Pri preskaŭ ĉiuj konjugaciaj formoj la du normoj nete diverĝas; tion ilustras la altbengala formo "korilo" kaj la malalta formo "korlo" por 'faris'. La objekton de la farado oni esprimas en la altbengala per la sanskrita kunmetaĵo "paŝĉaad-dhaabon", 'post-kuro'. Sed la malaltbengala uzas "piĉhu, dhaaoaa" – do la hodiaŭajn, diakronie ŝanĝiĝintajn formojn de 'post' kaj de 'kuro'.

Temas do pri multe da formaj diferencoj. La strukturisma aliro tial priskribas la diglosiajn fenomenojn ĉefe sur la forma nivelo, nur eksterkadre aldonante komentojn pri la socihistoria niĉo, kiun la alta normo okupas. Sed la substancisma aliro, kiu ŝoforas la nunan analizon, donas prioritaton al la rilato inter la kognaj sistemoj – do ankaŭ inter la "diskursoj" aŭ "diraĵadoj" –

respektive ligitaj al la alta kaj la malalta normoj. La unua substancisma priskribo pri la diglosio, Dasgupta (1993), emfazas, ke la diglosio estas rilato inter du diskursoj kaj intime ligita al tiu pedagogio, per kiu la posedantoj de la alta diskurso inicas la klerigantojn. Fine de la instruigo, la lerninto kapablas do alte kaj malalte rigardi al la samaj faktoj, kaj ponti inter la du rigardoj.

Oni povas demandi sin, ĉu la klerigo bezonas tian dupolusan strukturon. Tiu demando historie aperis en la bengallingva teritorio. En la fruaj jardekoj de la dudeka jarcento, pluraj bengalaj verkistoj, sub la gvido de Rabindranath Tagore, iniciatis seriozigon de la malalta normo en la skriba lingvo kaj kritikis la altan normon – aŭ pli ĝuste dirite la diglosion kiel sistemon. Post tiaj klopodoj de du-tri generacioj, fine de la dudeka jarcento la altbengala preskaŭ tute ĉesis esti uzata en la barataj gubernioj Okcidenta Bengallando, Tripuro kaj Asamlando. Sed la alta normo ne tute perdis la skribajn uzterenojn en Bangladeŝo, kies parolaj dialektoj pli ol la okcidentbengalaj parolformoj similas al la alta normo.

Kiamaniere oni konceptu ĉi tiun horizontalan unueciĝon de la bengalaj lingvonormoj? Oni ofte nomis tiun ŝanĝon progresa, moderniĝa. Oni vidis en ĝi ŝlosilan faktoron por unuecigo de la lingvanaro konforme al la bezonoj de la moderna epoko. La retoriko de tiuj, kiuj pledis kaj agis por la eksigo de la altbengala, bazis sin sur naturisma ideologio. La malnovaj komprenoj pri la lingvo estis erare emfazintaj la kulturan kontinuecon, oni diris. La veran esencon de la homa lingvo ni fakte serĉu en la spontanoj de la natura homo. Infanamika, plebamika eduko laŭ tiu vidpunkto nepre postulas unuebenan lingvon.

Estas grave hodiaŭ demandi nin, en la ĝenerala socilingvistika entrepreno, ĉu ni povas senplie akcepti tiun naturismon, kaj do la ideon, ke la diglosio entute estus patologia kultura fenomeno, kiun la normalaj procezoj de la socia moderniĝo forbalaas.

Alternativon al la naturisma vidpunkto proponis tamila socilingvisto. Tiu klerulo, Francis Britto, en konversacio kun mi en 1986, formulis la hipotezon, ke en la iompostioma arkaikiĝo de la alta normo de la tamila kaj la samtempa vastiĝo de ĝia malalta normo ni vidu ŝanĝiĝon ne en la lingvo mem, sed en la verkaj konvencioj en la ĉefa, romana ĝenro de la tamila prozo. Ĉar Britto nenie skribe prezentas ĉi tiun gravan vidpunkton, mi devas ripeti lian buŝan prezenton de 1986.

Britto rezonis, ke la klasika romanarto konvencie distingis la kadron, kiun regas la voĉo de la ĉiopova rakontista figuro, disde la enkadraj konversacioj, kie aperas la voĉoj de la agantoj. Sed, laŭ li, la leviĝo de la naturisma romanarto (ene de la realisma epoko) signifas gravan modifon en la rolo de la agantoj. De tiu momento, la rakontista voĉo enfalas en la voĉojn de agantoj, kiuj sinsekve funkcias kiel perspektivuloj por la naturisma romanarto. La konversaciajn fadenojn oni uzas por krei la novajn kvazaŭkadrojn de la romano, kaj la ĉiovida rakontisto elsceniĝas. Laŭ Britto, ĉi tiu refaro de la romanarto en la moderna epoko signifas interalie, ke la malaltnorma varianto de diglosia sistemo ŝajnas okupi la tutan lingvan spacon kaj malaperigi la diglosian duecon mem.

Sed, diris Britto, akcepti tiun ŝajnon estus miskompreni la transformiĝon. Fakte, la distingo inter la kadro kaj la konversacioj nun kreis al si apartan geometrion. Oni ne plu disponas la forman diglosion, kiun reliefigis la klasikaj rakontaj konvencioj. Tiuj konvencioj donis klare aparte ĉielan voĉon al la rakontista figuro kaj rekoneble malĉielajn voĉojn al la agantoj. Sed oni nun instalis en ekzemple la tamila novan, substancan diglosion, en kiu serioza leganto de romano devas scipovi disrekoni la kadran rolon de iuj teksteroj kaj la konversacian aŭ agadoevoluigan de aliaj teksteroj. Kaj la samo validas por la romano de la vivo mem, se tiel diri.

Britto do argumentis, ke la diglosio mem, kiel dueca principo en la lingvo, estas io universala. Estas ŝanĝiĝema la geometrio de la diglosio – ĝi aperas kiel formo-diferenciga reliefaĵo en iuj komunumoj kaj kiel fona substanca principo aliloke. Iu specifa komunumo foje

transiras de unu tipo al la alia. Evoluigante la ideojn de Britto surbaze de la substancisma kadro, alia tamila socilingvisto, Rekha Abel (1998), proponis ankri la universalan diglosion en tute ĝeneralaj principoj de la lingva funkciado. Nur lastatempe aperis taŭgaj iloj por antaŭen paŝi preter la laboroj de Britto kaj Abel.

La kognoscienca aliro al la demandoj aparte reliefigas la rilaton inter la facila parto kaj la malfacila parto de la lingvoscio de ĉiu individuo. Tiu lingvoscio sin ankras en la facila parto, kiun oni lernas en la infanaĝo. La kogna lingvistiko aparte atentas la tiel nomatan "bazan nivelon" de la vortoj kaj sencoj, kiu organizas la konceptan spacon de la individua psiko. Ni bezonas pli funde kompreni, kiel tiuj bazaj konceptoj rilatas al la periferiaj, pli malfacilaj. Tio ĉi estas tasko por la sufiĉe alte evoluinta psikologia sektoro de la kogna lingvistiko.

Troviĝas simila tasko por la sociologia sektoro. Neniu unuopulo lernas la tuton de la malfacilaj vortprovizoj de sia lingvo. Diversas la fakoj; la terminaron de ĉiu fako scias nur la respektivuloj. Pro la diverseco de la edukprocezo la fakoj horizontale diferenciĝas inter si. La klereco vertikale distingas la edukitojn disde tiuj plenkreskuloj, kiuj restas plebaj, malelitaj, lingve malpli potencaj, katenitaj al la baza vortprovizo. Oni bone konas ĉi tiun geometrion pro sia ordinara sperto. Sed neniu starigis efikan modelon de la socia geometrio de la multfaka klereco, kiu ĝin rilatigus al kognoscienca bildo pri la heterogeneco de la unuopula lingvoscio.

Eble estos utile, ke ni survoje al tia modelo konsideru unu tre ofte priskribitan regionon – la sudazian socilingvistikan mozaikon, en kiu konekte rolas la angla lingvo.

Oni argumentis, ke post la forigo de lokaj diglosioj (ekzemple en la bengala), hodiaŭ tamen retroviĝas diglosia rilato inter la angla kaj la barataj lingvoj. Tiu nova aranĝo donas al la angla altnorman rolon rilate al la diverslingvaj malaltoj. Se ni ekzamenas ĉi tiun rilaton, ni trovas dividon de lingva laboro, kiu ligas la anglan kun la kleriga sistemo, precipe kun la supera eduko, kaj la baratajn lingvojn kun la emocia kaj kultura partoj de la spektro. Ĉu la sudazia kombino de diglosio kun plurlingvismo – kies kromajn malsimplaĵojn kaj kies pasintecon ni eĉ ne tuŝas en la ĵusa skizeto – helpas nin en la laboro alcerbumi al tia teoria modelo, kian ni deziras?

Ni certe havas jedispone kelkajn ideojn jam validigitajn aliloke, kiuj helpas nin aliri la sudazian scenejon. La socilingvistiko de la plurlingveco konatigis nin kun la utilo de zorge fasonitaj modeloj de dulingva eduko, kiuj instigas ĉiun infanon kultivi la plenan regadon de sia gepatra lingvo tra la elementaj kaj mezlernejaj jaroj, kaj ankaŭ praktiki la aldonan (nepre ne la subtrahan) specon de dulingvismo. Por ke tiuj modeloj bone funkciu, la pedagogoj kaj iliaj fonaj kolegoj devas multege traduki inter la subaj kaj la supraj lingvoj de tia plurlingva diglosia geometrio, kian ni trovas en la sudazia regiono. Ĝuste la ideoj pri tia tradukado motivis la detalojn de mia substancisma priskribo de la sudaziaj diglosioj (Dasgupta 1993) – priskribo, kiu emfazis la interdiskursan rilaton inter la du normoj, kaj kiu niĉis tiun rilaton en la klerigan entreprenon, sed kiu ankaŭ notis, ke grave rolas la tradukado en la socia mastrumado de la alta normo en diglosia komunumo.

Al kio nian aktualan entreprenon konduku ĉi tiuj konsideroj? Ĉu ne al diglosie bazitaj pensoj pri la tradukarto mem? En alia eseo ni ekzamenis la intervizaĝon inter la tradukistiko kaj la diglosia teorio. El tiu rezonado ni konkludis, ke tiuj, kiuj tradukadas en malfortan lingvon por konservi ĝian lingvan riĉecon, devas prikonscii siajn celojn. Se ili tro emfazas la suverenan rajton de ĉiu lingvo reprodukti la sistemecajn, pompajn formojn de la metropole potenciĝintaj burokratioj, tiam la tradukoj odoras burokrate kaj malmulte servas al la uzantaroj. Ni notis, ke necesas okupiĝi pri la tradukecaj rilatoj inter la malfacila kaj la facila sektoroj de ĉiu unuopa lingvo. Tiavoje ĉies kultivado de sia propra lingvo fortigos la komunikan demokration. Ne utilas fortigi la eksteran suverenecon de malgranda lingvo rilate al grandaj lingvoj.

Tiuj pensoj pri la dezirindeco maksimumigi la travideblon en la tradukado – pensoj bazitaj sur la intervizaĝo inter la diglosio kaj la tradukistiko – estas eventuale utilaj por la praktikantoj de la tradukarto aŭ por ĝiaj strategiantoj. Tamen strategiaj konsiloj, kiom ajn saĝaj, ne estas scienca modelo. Nia scienca celo devas esti serioza hipotezaro pri la traduka travideblo aŭ la flua trafiko – kaj fojaj devioj de tiu ideala fluo – kiel rilato inter tekstoj kaj tekstoj, inter lingveroj kaj lingveroj, ene de unu lingvo aŭ inter du lingvoj. Scienca esplorado tiucela en la substancisma kadro, pri la diglosio, povas resti ligita al la pensoj pri la traduka praktiko ĵus menciitaj, kaj povas tiamaniere ponti inter la socilingvaj demandoj de la makrolingvistiko kaj la kerne prilingvaj esplortemoj en la mikrolingvistiko.

Allabore al tiu celo, ni, kiuj laboras en la substancisma aliro al la lingvistiko, jam rikoltis kelkajn rezultojn en la esplorado pri interrilatoj sur la intervorta tereno. Ni demonstris, ke la substancisma morfologia metodaro (Dasgupta, Ford & Singh 2000) estas ne nur uzebla, sed nepre uzenda eĉ por priskribi la Esperantan vortfaradon – surpriza rezulto por lingvo, kies ideologoj jam dekomence deklaris la afiksojn sendependaj entoj. Surbaze de tiu substancisma karakterizo de la intervortaj rilatoj en la homaj lingvoj, ni komencis priskribi en “diferenciga leksikografio” la rilaton inter facilaj kaj malfacilaj vortoj ene de unuopa lingvo.

Ĉi tiu fadeno de esplorado – kiu uzas la Esperantajn vortojn kiel intervortaran semantikan transskriban aparaton, ‘interleksikan glosilon’, paralelan al la fonetika alfabeto por la sona transskribado – estis unue lanĉita ĉe la bengala. Ĝi principe gamas tra ĉiuj lingvoj. Por atingi konvinkajn rezultojn en tiu sfero ni bezonos iom post iom kunfaski leksikojn de sufiĉe diversaj lingvoj kaj tute ĝenerale montri, ke per la Esperanta glosilo oni povas desegni mondan konceptan mapon.

Tamen ne nur pri vortoj, kaj ne nur pri la rolo de Esperanto, povas temi en serioza scienca teorio pri la rilato inter la facila kaj malfacila sektoroj de la homa lingvoscio – teorio kiu celas ponti inter la kognoscienco de la heterogeneco de la unuopula lingvoscio kaj la socisciencaj sekvoj de tiu heterogeneco. La substancisma lingvistiko estas unu varianto de la genera gramatiko, kies kernaj okupiĝoj ne povas preterlasi la sintakson. Ĉu nia modelo povas ion seriozan proponi, lige kun niaj pridiglosiaj pensoj, sur la sintaksa tereno?

Survoje al tia propono, indas noti, ke la ĉefa elemento en diglosia sistemo – la “diglosieco” – estas la kontrasto inter la pli reliefa *skribeco* de la alta normo kaj la nete laŭkunteksta *paroleco* de la malalta. Ni serĉas do kontribuon, kiu serioze ligu la sintaksan teorion, pere de kognosciencaj konsideroj, kun la kontrasto parolo / skribo. Jen kion ni volas; de kie rikolti ĝin?

Feliĉe, ni ne bezonas tre pene serĉi. Jam delonge troviĝas loko, kie oni povas relative facile pontofari inter la dekonstruisma kompreno pri la skribado kaj la generisma teorio de la sintakso. Ni nun simple bezonas konatiĝi kun tiu loko.

La teoria propono, kiu ĝisfunde modifis nian komprenon pri la rilato inter la skribaĵoj kaj la parolaĵoj, venis de Jacques Derrida (1967). Li sugestis, ke la aperon de la skribarto malfrue en la homa historio ni ne mislegu kiel duarangecon de la skriba prakapablo kompare kun la parola. Laŭ li, ankaŭ aborigenaj komunumoj senskribaj ĝis la nuna momento portas unu tute klaran indikon pri la praa skribipovo: la kutimon identigi ĉiun komunumanon per unuopula nomo. Derrida rezonis, ke tiuj nomoj principe gestas al skriberoj en tiu nocia registrolibro de la komunumo, kiu rikordas la naskojn, la mortojn kaj simile.

Kiamaniere ĉi tiu hipotezo de Derrida estas ligebla al tiu grava entrepreno en la kognoscienco, kiu okupiĝas pri la genera sintakso de la lingvo – kaj do ankaŭ de la lingvo parola?

Ni proponas, ke la genera teorio pri la sintakso de la plurpropoziciaj frazoj estas parenca al la pensado de Derrida pri la praskribipovo kaj pri nomoj. Nian prezenton de tiu parenceco ni bazas sur la ideoj de David Bleich (1988) pri la legipovo kaj la perspektivplureco.

Bleich kontestis la ideon, ke nur la konatiĝo kun la fizikaj literoj de iu skribarto lanĉas ies legipovon. Pli ĝenerale, li kritikis la komprenon, ke la parolipovo antaŭas la legipovon en la vivkariero de infano. Bleich hipotezis, ke la esenco de la pralegipovo estas la ekpovo rigardi la realon el pluraj perspektivoj. Laŭ li la fizika inico en la skribarton nur helpas al la infano ekstere esprimi tiun fundamentan kapablon. Ĉe tiuj ideoj de Bleich, la teorio de Derrida pri la nomoj povas renkontiĝi kun la kernaj ideoj de la genera sintakso sur jena ponto.

Konsideru la frazon (a), en kiu troviĝas plurobla subordigo de propozicioj: (a) *Johano supozas, ke Maria kredas, ke estas tre verŝajne, ke Vilhelmo ankoraŭ ne perdis la esperon, ke li finfine faros klopodon, pro kiu li gajnos la ludon*. En tiuj sinsekve niĉitaj propozicioj, sufiĉe ofte kaj tipe la scenejon regas la propozicia perspektivo ligita al persona subjekto (*Johano, Maria, Vilhelmo, li*).

Supozu, ke eblos forĝi teorian ligon inter la senfina plimultigeblo de la niĉado de propozicioj en propoziciojn – tiu kerna fakto, kiu ŝoforas la generan sintakson – kaj la propoziciaj perspektivoj identiĝemaj kun personaj nomoj. Se ni sukcesos serioze interligi tiujn du fenomenojn, ni rikoltos sekvojn por la kognoscienca priskribado de la unuopula lingvoscio. Siavice klariĝos pluaj sekvoj por la diglosia mastrumado de la plurperspektiveco – do de la praskribipovo – en ĉiuj socioj, ankaŭ la laŭ ekstera ŝajno analfabetaj aborigenaj komunumoj.

La faka genera sintakso, tamen, ne donas privilegian reliefecon al propozicioj kun perspektivdifina vidpunktulo. Ni konsideru la frazon (b): *Laŭ Johano, Maria atendas de Vilhelmo pluan esperon klopodi gajni la ludon*. En tiu ĉi ege kunpakita versio de la frazo (a), la sento de pluraj perspektivoj ŝrumpas – kaj la frazo perdas la kompreneblon. La parolan frazon (b) post nur unufoja aŭdo ne komprenas normala aŭskultanto. Tamen la kutimaj sintaksaj teorioj atribuas al la frazoj (a) kaj (b) preskaŭ la samajn subordigojn. La teoria sintakso kun siaj nunaj prioritatoj ne okupiĝas pri la faktoroj, kiuj igas la frazon (b) malpli facile komprenebla ol la frazo (a).

Tamen, ene de la laboriloj de la teoria sintakso, ni trafas klavojn, ĉe kiuj eblas agordi la homoprian – perspektivriĉan – propozician subordigadon kun la perspektivulaj nomoj, kiuj kernas en la dekonstruisma aliro al la teorio de la praskribipovo. Tiuj klavoj rilatas al la indicado.

Ĉiuj propozicioj kaj propozicieskoj – ankaŭ tiuj sen perspektivulo – estas egalaj en la genera sintakso. Simile, la genera sintakso donas egalan gramatikan statuson al ĉiuj nomoj. La kompara sintaksa analizo de lingvoj, en kiuj ordinara persona nomo kunportas difinan artikolon (ekzemple la parolgermana formo *der Hans* por ‘Johano’), kaj de lingvoj kiel la angla aŭ la skribgermana (kun simplaj, senartikolaj *John, Hans,* por ‘Johano’) kondukis iujn sintaksistojn al la hipotezo, ke, diference de komunaj substantivoj, la nomoj estas indicaj. Ili senpere kunagas kun la indica zono de la substantiva sintagmo, kiu demonstrative alindikas personon aŭ objekton.

Se ni inter la nomoj elektas la personajn nomojn, kaj se ni inter la subordigitaĵoj elektas propoziciojn ankritajn ĉe perspektiva vidpunktulo, tiam klariĝas por ni jena utila paraleleco inter du naturaj klasoj. La homaj indicportaj substantivoj kaj la homindicaj propozicioj havas komune tion, ke la propona perspektivo de la propozicio difinas sin ĉe nomo aŭ ĉe nompremisa pronomo.

Ĉi tiuj konsideroj pretigas nin por la formulado de la tezoj A kaj B, kiuj resumas kaj iomete preteriras la ĝisnunan diskutaĵon:

Tezo A: La rekursiveco [la kapablo enmeti propozicion en propozicion senfine] kaj la praskribipovo estas intime interligitaj ecoj de la homa lingvokapablo. Ĉi tiun kapablon oni distingu disde tiu koncepta kapablo, kiun la homoj komune havas kun la aliaj primatoj.

Tezo B: (1) La subordigado de perspektivaj propozicioj kaj la personaj nomoj intime interligiĝas al la perspektivdifina libereco de la frazkreado. (2) La praskribipovo estas identa al la kapablo plurperspektive rigardi. (3) La perspektivdifina libereco esprimas sin en la formo de la kapablo plurperspektive rigardi; alidire subtezo (B-1) egalas al subtezo (B-2); la personaj nomoj respondas al la ("skribebla, registrebla") rikordaro de la libereco.

Notu, tamen, ke la tezoj A and B, kiuj kreas fortikan ponton inter la dekonstruisma teorio pri la praskribipovo kaj la genera sintakso de propozicioj kaj de nomoj, lasas malferma la demandon de la individua lingvoscio. Kie, sur mapo desegnita surbaze de la tezoj A kaj B, aperas la facila parto de ies lingvoscio, kaj kie la malfacila parto, se pri la sintakso temas, aŭ pri la kono de nomoj? Kaj kiel nia kompreno pri tiu demando rilatu pli ĝenerale al la parola / skriba dueco de la lingvoj, kaj pli specife al la diglosio?

La tezoj A kaj B faras ion novan, kie temas pri la libereco kaj ĝiaj rikorderoj. Sed ili ne tuŝas la gravan demandon de la scioj kaj konoj. La unuopulo, kiu konas aliajn unuopulojn en sia komunumo sed nenion scias pri iliaj scioj, ne povas kunlibere konstrui kun ilia libereco strukturojn por la komunumo. Ĝuste la interkontakto inter la scioj maksimumigas la liberecon, kaj ĝuste tie rolas la skriba dimensio de la lingvo.

En la epokoj antaŭ la apero de la skribarto, la praskribipovo sin esprimis en la buŝe transdonataj tekstoj per specifaj perspektivaj indicoj – ekzemple, la indica esprimo "ĉi tiel mi aŭdis" aŭ "ĉi tiel estas dirate". Per la indiko de aŭdado, sen specifo de la fonta parolanto, oni tiuepoke signis aliron al la ĝenerala fonto de la komunuma scio – aŭ, en la kadro ĉi tie konstruiĝanta, aliron al la ĝenerala, senaŭtora verkiĝado de la komuna nocia registro enhavanta ĉiujn rikorderojn.

Temas do pri atentinde senindica indico, pri senvizaĝa perspektivo, kiu en la prahistorio de ĉiuj komunumoj superatutis ĉiujn aliajn sur la tereno de la persona scio. La individua lingvoscio markas tiun superan, abstraktan perspektivon – tiun metaperspektivon – kiel malfacile atingeblan, kiel ion rezervitan por la maljunaj aŭ ŝamanaj spertuloj en la komunumo. Jam ekde tiu epoko, la diglosio rilatas al la malsimetrio inter tiu pra-"skribeca" metaperspektivo de iuj propozicioj kaj la personaj, interparolecaj perspektivoj de la vulgaraj frazoj.

En la lastaj jardekoj, ĉiuj lingvistikaj teorioj abunde ĉerpis ĉe la fontoj de la lingvoj, kiujn parolas la indiĝenaj popoloj. Inter la teoriaj kadroj, eble plej kerne la kogna lingvistiko provis agordi siajn komprenojn pri la lingva kodigo de la natura klasigo kun la klasigiloj troveblaj en tiuj lingvoj. Tamen la kerna teoriado de la lingvistiko ĝis nun, precipe en la kogna entrepreno, nesufiĉe egale traktis la indiĝenajn lingvojn kiel sciobazojn partnerajn en nia entrepreno pli bone kompreni la lingvan fenomenaron. La nuna entrepreno klopodas meti tiun demandon sur la lingvoteorian tagordon.

Estas paradokse, ke por egalece trakti niajn gekolegojn el la indiĝenaj popoloj ni bezonas plenrajte agnoski la gravecon de la diglosio – do ĝuste de iuj malsimetrioj kaj malegalecoj, kiuj muldas la mapon de la lingvoscio mem, individue kaj komunume. Ni do konkludu, ke por vere hodiaŭiĝi nia mondo, volante kiel eble plej juste mastrumi sian lingvan trezoron, devas lerni naĝi kun kaj ne kontraŭ la diglosiaj fluoj.

Tiuj fluoj direktas la maturiĝon de la lingvoscio de la infano, dum ĝi lernas multigi siajn perspektivojn kaj celi la plenan saĝon de la maljuna homo. La serioza komunumano – post la multperspektiva plenfloro de sia junaĝa personeco kredanta sin maksimume libera sur la agada

tereno kaj interkonatiĝanta kun amaso da aliaj personoj en la komunumo – finfine lernas ankaŭ plenfrukti en la maljuna, saĝa aĝo de la senpersono. Tiu figuro, la senpersono, por trafi la vere plenan liberecon, identigas siajn diversajn junaĝe ekkonitajn vidpunktojn kun la unike senspaca aŭdpunkto de la ĉiomsaĝa komunumo kiel tuto. Tie la parolo pasas en la senvoĉan praaŭdon, kiu sin rivelas kiel praskriban.

Estas utile, en tiu ĉi fadenfina momento, reveni al la demando de la tradukado. La pedagogio, kiu peras inter la instrubezonaj infanoj kaj komencantoj situantaj nur en la malalta lingvonormo kaj la instrupovaj konantoj de la alta, devas sin okupi pri tiu tradukado, kiu evidente konsistigas parton de la pedagogiado. En la nuna teoria momento de nia laboro, ni serĉas niĉon por la tradukarto en tiu kompreno de la diglosio, kiun prezentas nia ĵusa rezonado.

Se mi bone fasonis la laborilojn de ĉi tiu prezento, la tasko de la tradukanto estas sufiĉe simple priskribebla.

Tradukante el la alta normo en la malaltan, la diglosio-pera tradukanto venas de la senpersona metaperspektivo al la vizaĝaj perspektivoj facile kapteblaj por la konkreta imago de la lernanto, kaj devas elekti modelajn rolulojn, per kiuj rakonte aŭ teatre reprezenti la povon aŭ la saĝon de la principe senvizaĝa aŭ universvizaĝa punkto de la metaperspektivo. Inverse, persono tradukanta el la malalta normo al la alta devas el la aferoj dirataj en la idiomo de individuaj, vizaĝaj perspektivuloj eltiri iujn ĝeneralaĵojn, kiuj meritas scian, principan, universalan prezenton. La tradukanto devas vesti tiujn plej ĝeneraligeblajn aferojn per la abstrakta metaperspektivo.

Kompreneble, la esprimado de la metaperspektivo nur malofte uzas evidentajn formulojn kiel “tion mi aŭdis” aŭ “la saĝuloj diras”. En la nuntempaj socioj, la objektiva stilo ofte postulas la pasivan voĉon. Foje la objektiva stilo mem – uzante esprimojn senvidpunktajn – sufiĉas por abstraktigi la lingvaĵon.

Mi finu per ekzemplo de tia tradukado fare de brita policisto. Kiam mia amiko Michael estis dekdujara, renversis lin aŭto. Dum li kuŝis en malsanulejo, la policano petinta de li priskribon de la akcidento aŭdis Michael diri “Mi venis ĉi tiel, kaj la aŭtistino venis tiel ĉi, kaj mi faris tion, tiam ŝi provis fari tion ĉi, sed fuŝ, kaj mi estis surtere”, kaj plenskribis dokumenteton, kiun la imponita Michael fiere subskribis. La raporteta teksto komenciĝis jene: “Mi estis piediranta proksimume nordokcidenten, kiam veturilo, stirata de mezaĝa sinjorino, interrompis mian trajektorion.” Ne rapidu permesi al la homoj diri al vi, ke ial via lingvo ne estus diglosia aŭ ne bezonus enlingvan tradukadon.

Referencoj

Abel, Rekha. 1998. Diglossia as a linguistic reality. Rajendra Singh (red.) *Yearbook of South Asian Languages and Linguistics 1998*. New Delhi / Thousand Oaks / London: Sage. 83-103.

Bleich, David. 1988. *The Double Perspective: Language, Literacy, and Social Relations.* Evanston, Illinois: Northwestern University Press.

Dasgupta, Probal. 1993. *The Otherness of English: India’s Auntie Tongue Syndrome*. New Delhi / Thousand Oaks / London: Sage.

Dasgupta, Probal; Ford, Alan; Singh, Rajendra. 2000. *After Etymology: Towards a Substantivist Linguistics.* Munich: Lincom Europa.

Derrida, Jacques. 1967. *De la grammatologie*. Paris: Minuit. / 1974. *Of Grammatology* (tr Gayatri Chakravorty Spivak). Baltimore/ London: Johns Hopkins University Press.

Agnoskoj

Ĉi tiun laboraĵon ebligis esplorsubvencio de la Fondaĵo pri Esperantaj Studoj, pro kiu mi dankas.

Verki poezion en Esperanto

Baldur Ragnarsson
Islandano, nask. 1930. Fakulo pri islanda kaj angla lingvoj, gimnazia instruisto, ministeria prizorganto de reviziado de la lerneja instruado de la islanda lingvo kaj lerneja ĉefinspektoro de 1962 ĝis 1967, emerito post 2000. Prezidanto de Belartaj Konkursoj de UEA 1975-1985. Estrarano de UEA pri kulturo kaj edukado 1980-1986, vicprezidanto 1980-1983. Akademiano ekde 1979. Verkis poemarojn en Esperanto kaj en la islanda lingvo, eseojn kaj faklibrojn. Abunde tradukis literaturajn verkojn el la islanda. Kompleta originala verkaro en Esperanto, *La lingvo serena*, aperis en 2007

Resumo

Lingvo estas la materialo de poeto. Ĉiu lingvo havas sian karakteron kaj sian tradicion, kiuj rekte influas verkadon de poezio en la koncerna lingvo. Tio validas pri Esperanto kiel pri aliaj lingvoj. Referencoj al poemo de komencanto kaj la Parnasa Gvidlibro de Kalocsay kaj Waringhien. Poeto, kiu verkas en Esperanto kaj ankaŭ en sia nacia lingvo havas la avantaĝon de komparo. Ĉar verkado de poezio estas esence persona afero, pritrakto de la temo neeviteble invitas al atestoj de personaj spertoj. Efikoj de strukturaj elementoj de komparataj lingvoj estas konsideritaj, ankaŭ paradoksaj efikoj de semantikaj kaj psikologiaj baroj, kiujn devas transsalti Esperanto-poetoj en sia persona esprimado.

Poetry writing in Esperanto

Summary

Language is the material of the poet. Every language has its own character and its traditions which directly influences the making of poetry in the language concerned. This is true for Esperanto as for other languages. References to a beginner's poem in Esperanto and the Parnasa Gvidlibro (Guidebook to Parnassus) by Kalocsay and Waringhien are considered. The experience of a poet who has written poetry both in Esperanto and his national language is compared. As the making of poetry is esentially a personal affair, discussion of the subject inevitably invites consideration of personal experience. Effects of the structural elements of the languages compared are considered, also the paradoxical effects of the semantic and psychological obstacles that poets in Esperanto must overcome in their effort for personal expression.

Écrire de la poésie en espéranto

Résumé

La langue est le matériau du poète. Chaque langue a son caractère et sa tradition qui influencent directement l'écriture poétique dans la langue concernée. Cela vaut pour l'espéranto comme pour les autres langues. Références à un poème de débutant et au Parnasa Gvidlibro (Guide du Parnasse) de Kalocsay et Waringhien. Un poète qui écrit en espéranto et

dans sa langue nationale a l'avantage de la comparaison. L'écriture poétique étant une affaire essentiellement personnelle, l'étude de ce sujet invite inévitablement à des témoignages d'expériences personnelles. Sont considérés les effets d'éléments structurels des langues comparées, et aussi les effets paradoxaux des barrières sémantiques et psychologiques que doivent surmonter les poètes espérantophones dans leur expression personnelle.

Poëzie-schrijven in Esperanto

Samenvatting

Taal is het materiaal van de dichter. Elke taal heeft z'n eigen karakter en traditie, die het schrijven van poëzie in die taal rechtstreeks beïnvloeden. Dit geldt voor het Esperanto net als voor andere talen. Verwijzingen naar gedichten van een beginnende esperantist en naar het Parnasa Gvidlibro van Kalocsay en Waringhien. Een dichter die in het Esperanto schrijft én in z'n nationale taal, heeft het voordeel dat hij kan vergelijken. Omdat poëzie-schrijven bij uitstek een persoonlijke zaak is, noodt de behandeling van dit thema onvermijdelijk uit tot getuigen van persoonlijke ervaringen. De effecten van structurele elementen in de beide talen, die vergeleken worden, evenals soms paradoxale effecten van semantische en psychologische barrières, die Esperanto-dichters moeten overwinnen in hun persoonlijke uitdrukkingen.

Verki poezion en Esperanto

Mia prelego portas la titolon "Verki poezion en Esperanto". Estas neeviteble, ke traktado de tia temo, fare de poeto en la koncerna lingvo, estu pli-malpli persona, subjektiva, bazita sur propraj spertoj. Iuj objektivaj observoj tamen aperos je okazoj, kaj ankaŭ aludoj al iuj eksteraj cirkonstancoj. Kaj ĉar mi, la koncerna poeto, havas sperton ankaŭ kiel poeto en mia nacia lingvo, la islanda, mi provos iom utiligi tiun sperton kompare kaj pritakse.

Estas anekdoto pri junulo, kiu ĵus komencis lerni Esperanton. Li diris tion al esperantisto iom pli sperta. "Do montru al mi viajn poemojn," tiu diris. Tiu anekdoto montras bonhumoran, kaj eble iom cinikan sintenon, al tiu laŭdira tendenco ĉe iuj novaj esperantistoj senprokraste produkti versaĵojn en la belsona kaj ŝajne facila lingvo. Nun mi tuj diru, ke neniu faris al mi tian demandon, ĉar mi lernis la lingvon sen ia ajn kontakto kun aliaj esperantistoj, ĉar ili ne ekzistis en miaj tiamaj cirkonstancoj. Tamen estas vero, ke baldaŭ post mia ekkoniĝo kun la lingvo kiel gimnaziano, mi komencis eksperimenti pri poemverkado. Kaj ĉar, okaze, mi ankoraŭ konservas mian unuan seriozan poemon en Esperanto, mi volas legi ĝin por vi jam en la komenco de mia prelego, kiel ateston pri la poetika altirpovo de la lingvo, kiu tuj sentigas pri si, eĉ ĉe senspertulo. Ĝia temo estas la lingvo mem, kiu min tiel absolute ravis.

Mirinda Esperanto, amlingvo de l´jarondo,
kreonta homfratecon per klaro fundamenta,
al paco procedanta en firmo ĉirkaŭventa,
homaron kondukanta al frata komprenrondo.

Esper´ de l´esperulo, al homo animsondo,
venkonta malŝatemon de l´koro malamsenta,
antaŭen progresadu laŭ ordo regimenta,
donante interpacon al lacigita mondo.

Amata esperlingvo, al mi vi estas lum´,
brilanta amostelo sur arta firmament´.
varmiga sanktofajro, brulanta en la kor´.

Espere altkreskaĵ´el de vi farita hum´
ĉielen supreniĝu en daŭra monument´,
silente atestante pri via lingva or´.

Tiu poemo, kiun mi ĵus legis por vi, verkita laŭ la tradicia formo de la soneto, do estas mia unua serioza poemo en Esperanto, verkita antaŭ pli ol 60 jaroj. Oni ja povas diri, ke tiu junula ampoemo al Esperanto estas ja kliŝeca enhave, esprime kaj rime kiel atendeble ĉe junulo, enamiĝe absorbita de la nova lingvo. Mi tamen kuraĝis legi ĝin por vi kiel ateston pri la tujkapta poetika altirpovo de Esperanto ĉe poeziema novulo. Sed ja ankaŭ kiel ateston pri influo de certa poezia tradicio ĉe komencanto, tradicio koncerne formon kaj aliajn poetikajn rimedojn, tradicio pli-malpli komuna almenaŭ al la okcidentaj lingvoj. Kaj eble iuj rimarkis, ke tiu junula poemo pri la lingvo havas evidentan parencecon al poemoj verkitaj en la fruaj jaroj de Esperanto. Ni havas ĉi tie imiton de tradiciaj rimedoj kiel regulaj verspiedoj kaj rimoj, por ne mencii la sonetan formon. Tiuj tradiciaj form-imitoj havas sian originon en la poezio de la naciaj Eŭropaj lingvoj, kiun esperantistaj poetoj, ekde Zamenhof, nature enkondukis kaj adaptis al la Esperanta versarto

Jes, la tradicio. Antaŭ pli ol sesdek jaroj islanda filologo kaj poeto, tiama direktoro de la Biblioteko de Islandaj Mezepokaj Manuskriptoj en Kopenhago, faris prelegon en kunveno de la Societo de Islandaj Studentoj en Kopenhago. La titolo de tiu prelego, kiu poste aperis esee en plivastigita formo, estas *Verki poezion en la islanda lingvo*. En tiu tempo la kontraŭtradicia modernismo jam komencis sentigi pri si ĉe islandaj poetoj, precipe la junaj, kio vekis miksitajn reagojn kaj eĉ akrajn kontraŭstarojn ĉe tiel tradici-konscia popolo, kia tiam estis kaj ja ankoraŭ estas la islanda. Tradici-konscia en la senco, ke ĝi estas kondiĉita de pli ol miljara uzado de striktaj reguloj de aliteracio kaj rimoj, kaj de poemaj konstruoj laŭ mezuritaj versoj kaj strofaj dividoj La menciita prelego de la islanda filologo estis erudicia analizo de la intimaj rilatoj inter la islanda poetika tradicio kaj la karaktero de la islanda lingvo mem, prezentita kun vigla humuro kaj trafaj ekzemploj. La preleganto insistis pri la graveco de tiu tradicio el kultura kaj historia vidpunktoj, kvankam li ne evitis averti kontraŭ la insidoj, kaptiloj kaj danĝeroj implikitaj en la tradiciaj poetikaj rimedoj. Tiu prelego tamen ne rekte celis kontraŭagi la ekkreskantan influon de modernismo en la islanda poezio en tiu tempo. Ĝi estis unuavice profunda pritrakto de la rilatoj inter la tradiciaj poetikaj rimedoj kaj la islanda lingvo mem. Ĉar la lingvo estas la materialo de la poetoj. Ĉiu lingvo havas siajn apartajn karakterizaĵojn, kiuj influas poezian kreadon. Mi menciu nur du distingajn karakterizaĵojn el multaj de la islanda lingvo: la neflekseblan regulon pri ĉefa akcento sur la unua silabo de vorto, kaj la eksterordinaran riĉon de gramatikaj fleksioj. Tiuj du rekte influis la regulojn de aliteracio kaj la vortordon de la tradicia islanda poezio. La aliteracio ankoraŭ konservas sian validon en la nuntempa islanda poezio, kvankam nur sporade kaj diference laŭ poetoj, – kaj la ebleco de variigebla vortordo helpe de fleksioj estas ĉiam aktuala kaj utiligebla laŭ la artismaj bezonoj de la moderna islanda poezio. Per tiuj aludoj al la karaktero de la islanda lingvo kaj kiel ĝi influis kaj daŭre influas la islandan poezion mi volas tuj aparte atentigi pri la rilatoj inter tradicio kaj lingvo en poezio. Tiuj rilatoj ekzistas ja en ĉiuj lingvoj, kvankam diversaj eblecoj de modifoj kaj liberigaj esploroj kaj eksperimentoj ĉiam sin prezentas en la evoluo de la poezia arto. Kaj kiel ĉiuj vivantaj lingvoj ankaŭ Esperanto havas sian tradicion, kaj propran kaj pruntitan, kaj sian propran karakteron kaj sian propran evoluon. Mi nun turnas min al miaj propraj spertoj pri verkado de poezio en Esperanto en rekta rilato kun tiuj tri efikantoj: la tradicio, la lingvo kaj la evoluo.

La klasikan tradicion, plivastigitan kaj variigitan, sisteme evoluigis Kalocsay kaj Waringhien en sia Parnasa Gvidlibro, kies unua eldono aperis en 1932. La detala disvolviĝo de Esperanta Metriko prezentita en tiu Gvidlibro estas interesa kaj estis certe valora por plifirmigi kaj plialtigi la rangon de Esperanto kiel instrumento por versa esprimado. Mi tamen tuj diru, ke la Parnasa Gvidlibro neniom influis mian poemadon en Esperanto, fakte mi ekkonis ĝin nur per ĝia tria eldono en 1984. Verspiedan ritmon mi trovis mem je mia unua provo verki poemon en la lingvo, la ritman sekvon de pezaj kaj malpezaj akcentoj, kiuj ja estas la esenco de la metriko, mi sentis tute nature. Kaj fakte mi opinias, ke tiel estas ĉe ĉiuj, kiuj serioze provas verki en Esperanto. Tio ŝuldiĝas al la absoluta regulo pri ĉefakcento sur la antaŭlasta silabo, kiu kombine kun konvena vortordo gvidas la orelon al taŭga versritmo. Konscio pri eblaj kromakcentoj ja ankaŭ gravas por versa ritmo. En mia poemo de komencanto, jam citita, oni povas ja distingi ĉefe inter duspecaj verspiedoj: trokeoj kaj amfibrakoj, kiel ja oftas en versaĵoj. Apenaŭ necesas diri, ke mi tiam havis nenian scion pri tiuj verspiedoj. Kaj fakte ne gravas, ĉu oni povas nomi la verspiedojn, kio gravas estas tia disdivido de akcentoj, kia nature kongruas kun voĉa deklamo de poemo. Tio same validas kaj pri metrikaj kaj pri liberversaj poemoj.

Alia tradicia rimedo estas kompreneble la rimoj. Nu, rimoj estas iom strangaj bestoj, kaj mi neniel emas enmergiĝi en tiun zoologion. Mi nur menciu, ke la Gvidlibro de Kalocsay-Waringhien konsideras kiel puran rimon nur la samecon de la lasta akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj sonoj, ekz-e *duajn – ĝuajn* aŭ *ekstra – dekstra*. Iliajn konsiderojn pri tiel nomitaj

viraj kaj virinaj rimoj, rimoidoj, agordoj kaj asonancoj mi preterlasas. Ilia Gvidlibro malrekomendas malsurprizajn rimojn kiel *mi – ni*, / *Di' – Li*, / *ĉielo – anĝelo*, kaj rekte eldiras, ke estas malpermesite rimi per sufiksoj, kiel ja abunde faris Zamenhof kaj la poetoj de la unua periodo de nia literaturo. Tion tute eviti ŝajnas al mi iom tro strikta malpermeso, sinsekvaj sufiksrimoj povas ja efiki kiel elvoka rimedo. Ni certe ne volas kritiki ĉe Zamenhof en lia kortuŝa poemo *Mia Penso* la rimojn "kompatante – resangante", "detruita – refrapita", "ploranta – ripozanta", "parolado – promenado", ktp.

Parenca rimedo al rimoj estas la aliteracio aŭ literrimoj. Per tradicia aliteracio mi celas uzadon de samaj konsonantoj kaj samaj aŭ diferencaj vokaloj por kunligi versojn kiel estis devige en la antikvaj poemoj en ĉiuj ĝermanaj lingvoj. Tiu konvencio formortis antaŭ jarcentoj en tiuj lingvoj, krom en la islanda, kie ĝi daŭras ĝis nun en poemoj verkitaj laŭ tradiciaj stiloj. Aliteracio laŭ tiuj tradiciaj reguloj estas ligita al ĉefakcentaj silaboj de gravaj vortoj, ĉefe substantivoj kaj verboj, okaze al adjektivoj. Ĉar la ĉefakcento en la malnovaj ĝermanaj lingvoj ĉiam falis sur la unuan silabon de vorto, kiel estas ankoraŭ senescepte en la islanda, aliteracia sono ĉiam aperas komence de vorto, neniam interne de vorto. Tial aliteracio, laŭ la reguloj de la malnova ĝermana poezio, ne estas strikte aplikebla en Esperanto krom en dusilabaj vortoj. En miaj tradukoj de islandaj tradiciaj poemoj, ekzemple de poemoj de la fama *Edda*-kolekto, mi tial devis cedi pri transdono de tiu konvencio. Alia afero estas, ke okazaj uzoj de aliteracio ĉe vortkomencaj ĉefakcentoj estas ja aplikebla en Esperantaj poemoj, kiel en aliaj lingvoj, kaj tiam ĉefe por emfazo de signife gravaj vortoj. Estas menciinde, ke la verkintoj de Parnasa Gvidlibro konsideras nur konsonantojn taŭgaj por aliteracio, kio ne kongruas kun la aliteracia tradicio de la ĝermanaj lingvoj, kie vokaloj, prefere diferencaj, havas funkcion egalan al la konsonantoj.

Mi jam iom parolis pri influo de iuj tradiciaj konvencioj en poezio. Kaj certe Esperanta poeto estas pli-malpli influata de tiaj poetikaj konvencioj en sia nacia lingvo. Persone, mi agnoskas certan nostalgion por tiuj ankaŭ en mia kazo, kvankam la pli granda parto de miaj poemoj estas influata de modernismaj tendencoj. Humphrey Tonkin finas sian eseon pri mia poezio, akompanan al la eldono de miaj kolektitaj verkoj, *La lingvo serena*, per interesa demando koncerna al mia tradiciemo: Mi citas liajn vortojn: "Ĉu eventuale Ragnarsson estas pli poezie konservativa ol li tiel insiste ŝajnigas?" Mi estas preta agnoski, almenaŭ parte, la pravon de lia demando. Fakte, mi tion simbole esprimas en jena poemo, verkita antaŭ nelonge:

Navigante
sur la maro
de l' antikva poezio
mi ŝatas observi la dancon
de aliteracioj kaj duonrimoj
sur la brilantaj ondokrestoj

Poste
mi trovas ilin disĵetitaj sur la bordo
inertaj
senvivaj
kiel mortintaj flugfiŝoj

Sentante kompaton
miksitan kun duonkonscia sento
de kulpo
mi kolektas ilin en faskojn
alportas hejmen

por konservo en la kelo

Okaze
post nokta maldormo
mi iras malsupren
malligas unu aŭ du faskojn
serĉas malnovajn konatojn
provas rekrei por ili meritan lokon
en la febla lumo
de nova mateno

Mi citis komence mian unuan poemon en Esperanto, verkitan antaŭ pli ol sesdek jaroj, mencieblan nur kiel ateston pri emocia produkto en lingvo eklernata. Baldaŭ sekvis plia verkado en tiu poezi-tenta lingvo, kaj ankaŭ en mia nacia lingvo, la islanda. Kelkajn ĉi-koncernajn faktojn mi opinias necesaj por plia klarigo. Mia unua poemaro en Esperanto, *Ŝtupoj sen nomo*, aperis en 1959, tri jarojn poste aperis mia unua poemaro en la islanda, *Undir veggjum veðra* – Sub muroj de veteroj. En la posta jaro, 1963, aperis miaj tradukoj de du modernaj islandaj poemaroj sub komuna titolo, *Sub stelo rigida*. Pasis de tiam sep jaroj ĝis la apero de mia dua islandlingva poemaro, *Töf* – Prokrasto, kaj kvar jarojn poste mia dua poemaro en Esperanto, *Esploroj*. El tio devas esti konstatebla, ke dum tiuj jaroj mi okupis min pli-malpli samtempe pri poezia verkado en tiuj du lingvoj. Oni povus demandi sin pri reciprokaj influoj inter tiuj okupoj. Certe tiel estis, sed neniel en la senco de intertradukoj. Ambaŭ lingvoj faras siajn apartajn postulojn kaj prezentas diferencajn eblecojn de esprimado. Estas interese noti, ke mia unua poemaro estis ja en Esperanto. Oni ja povus demandi, kial mi poste turnis min al verkado en la islanda. Tio havas i.a. sian klarigon en miaj profesiaj cirkonstancoj kiel instruisto de islanda literaturo en gimnazio baldaŭ post miaj universitataj studoj. Tiu profesio kondukis ankaŭ al verkado de kelkaj studlibroj pri la islanda lingvo kaj ĝia literaturo, kio certe instigis min esti poeto ankaŭ en mia nacia lingvo. Sed Esperanto daŭre min tenis kaj mi samtempe daŭrigis mian verkadon kaj tradukadon en Esperanto. Mia verkista duobla vojo estis tiel definitive markita, per poeziaj kaj prozaj verkoj en ambaŭ lingvoj, Esperanto kaj la islanda.

La diferenco verki poezion en tiuj du lingvoj estas kaj lingvisma kaj psikologia. La lingvoj estas tre malsimilaj, la islanda morfologie komplika, Esperanto malkomplika. Morfologia komplikeco, kun riĉa kvanto da fleksioj, agnoskinde ebligas pli-malpli liberan vortordon. Tio ja estas grava por signifaj emfazoj kaj en poezio kaj prozo, kaj tio plej certe validas pri la islanda lingvo. Sed ankaŭ Esperanto ja havas tiajn eblecojn malgraŭ sia simpla morfologio. Tio precipe dankindas al la forme signita akuzativo. Mi jam menciis la aliteracian tradicion de la islanda poezio, kiu estas nepre lingvisma. Kvankam tiu aparta tradicio jam preskaŭ malaperis en la moderna islanda poezio, la literatura tradicio ĝenerale de la islanda estas ankoraŭ tiom firma, ke la malnova literaturo ekde la 12-a jarcento estas ankoraŭ facile alirebla de nuntempaj Islandanoj sen traduko. Esperanto, malgraŭ sia juneco, havas ankaŭ sian tradicion, bazitan sur la Fundamento kaj evoluigita de Esperantaj verkistoj dum pli ol cent jaroj. Influoj el ekstero certe lasis siajn markojn sur ambaŭ lingvojn, la islandan kaj Esperanton, kaj iliajn literaturojn, kaj daŭre efikas. Modernismaj influoj draste ŝanĝis la islandan poezion ekde la dua parto de la lasta jarcento. Esperanta poezio estas markita per tradicioj hereditaj el la okcidentaj lingvoj kaj tiel same de modernismaj tendencoj. Tion abunde atestas lastatempaj poemoj de diversaj poetoj.

La psikologia diferenco de poezia esprimado inter la nacia lingvo kaj Esperanto estas pli subtila afero ol tradiciaj aŭ morfologiaj konsideroj. Post jardekoj da spertado pri ambaŭ lingvoj kiel poeziaj esprimiloj mi provas ĉi-sekve tion iom analizi:

Unue, estas agnoskita fakto, ke lingvo lernita post plena akiro de la gepatra lingvo, malofte senteblas same intima kiel la gepatra, eĉ se oni atingis plenan fluecon en la poste lernita. Tio validas precipe pri emociaj ligoj inter vortoj kaj signifoj, kiuj edukiĝe iom post iom formiĝas inter la hejma lingvo kaj la cirkonstancaj realaĵoj de la hejmlingva medio. Intelekta transporto en alian lingvon de signifoj de hejmlingvaj vortoj emocie ŝarĝitaj devas transiri psikologian baron, kiu iel izolas la homon disde la emocia ligiteco al la koncernaj, hejmlingvaj vortoj. Tiu transiro, iel paradokse, tamen ofte ebligas pli liberan, pli senĝenan, esprimadon en la alia lingvo, ol estas eble en la pli intime sentata gepatra lingvo. Almenaŭ potenciale. Marjorie Boulton aperigis poemarojn en sia nacia lingvo, la angla, antaŭ ol ŝi aperigis sian unuan poemaron, *Kontralte*, en Esperanto. William Auld, en sia antaŭparolo al tiu libro, diras, ke kvankam ŝiaj anglalingvaj poemaroj estas tre bonaj, li opinias, ke ŝi trovis sian apogean instrumenton en la internacia lingvo. "Tiu lingvo", li diras, "iel liberigis ŝian emocion kaj ŝian personecon." Ŝajnas ja paradokse, ke malpli intima lingvo povas liberigi pli intiman esprimadon. Mi havas la teorion, ke tiel ja povas okazi, – la psikologian baron, kiun mi jam menciis, transsaltas intelekte la malinhiba potencialo de la alia lingvo, kreante samtempe liberon de esprimado, kiu semantike malfermas alireblon de sentoj kaj pensoj tenitaj en konvenciaj, foje eĉ tabuaj kutimoj, esence propraj en la gepatra lingvo.

Tio rekte rekondukas al la lingva karaktero de Esperanto en la koncernaj kazoj. Antaŭ multaj jaroj Andreo Albault aperigis eseon en la tiama revuo *Esperantologio* pri la dinamiko de la Esperanta vortfarado. Tie li argumentas pri tio, ke la strukturo de Esperanto ebligas konstrui specialajn vortformojn eĉ por unikaj esprimbezonoj. Mi volus aldoni: eĉ ankaŭ por esplori kaj eltrovi esprimojn de novaj pensoj kaj sentoj malfacile elfoseblaj pere de konvenciaj nacilingvaj rimedoj. En la poemciklo *Difinoj* en mia poemlibro *Esploroj* mi iom utiligas tiujn esplorpovajn kapablojn de la lingvo, kaj por eltrovi ion novan, kaj por koncentri pensojn laŭeble dense kaj centrige. Vortoj kiel "prigamas", "diskonscie", "entas", "koordinateblas", "malblankoj", "tuŝimunaj", ", estas kelkaj malmultaj ekzemploj de tiaj esprimoj tie troveblaj. Tiaj vortoj ebligas en kombino kun stilrilataj kunteksto kaj vortordo ion ne facile fareblan en aliaj lingvoj krom per disfluemaj vortumoj, kiuj tre eble ne sukcesus plene riveli la poezian esencon de la Esperanta teksto. La bela ebleco formi adverbojn en Esperanto estas ankaŭ admirinda karaktero de Esperanto; ekzemple la adverbo "osmoze" celas koncentriĝon ne facile atingeblan per priskribo en la sekvanta kunteksto en miaj menciitaj *Difinoj*: "osmoze en la vivo profundojn / kontaktos / maturiĝo". Pro tio, kaj multo plie menciebla, estas aparte malfacile traduki kontentige Esperanto-esencajn poemojn. Tion mi mem spertis en miaj provoj traduki poemojn ekzemple de Auld, Camacho kaj Neves. La "lingva premo", esprimo uzata de d-ro G. Hamming en lia eseo "Lingva premo kaj religiaj miskonkludoj" en *Scienca Revuo* 1956, citita de Albault, ofte sentigas sin en traduko de Esperantaj poemoj, lingva premo, kiun kaŭzas la konvencioj de la cellingvo.

Mi jam menciis la barojn, psikologian kaj lingvan, kiujn necesas transsalti, ja avantaĝe, se Esperanta poeto celas liberan esprimadon en sia poezio. Sed unu plia baro estas facile konstatebla, kiun Esperanta poeto ja devas transsalti, se li entute deziras okupi sin pri poemado en Esperanto. Tio estas la eksteraj ignoro, antaŭjuĝoj kaj malakcepto de Esperanto kiel lingvo de poezio. Estas konata afero, ke kvankam multaj estas pretaj agnoski utilon de Esperanto kiel ekz-e raporta lingvo, ili kategorie rifuzas la kapablon de Esperanto esprimi sentojn kaj subtilajn penson, kiel en poezio. La argumentoj estas nebulaj kaj bazitaj sur nescio, mokoj, eĉ malamo kaj eble timo, kaj prezentas absolutan malemon objektive konigi al si la faktojn. Estas interese, ke poetoj, kiuj verkas kaj en Esperanto kaj en sia nacia lingvo, okaze povas esti agnoskitaj kiel atentindaj poetoj en la nacia lingvo, kaj samtempe ignorataj kiel Esperantaj poetoj. Tion mi mem spertis. Kvankam jam pasis jardekoj post la aperigo de miaj islandlingvaj poemlibroj, iuj miaj poemoj en la islanda estas okaze ankoraŭ nun prezentitaj en literaturaj programoj en la

islanda ŝtatradio. Kiel Esperanto-poeto mi havas la saman pozicion kiel Esperanto-poetoj ĝenerale, pozicion, kiun apenaŭ necesas priskribi. Mi tamen, ĝenerale dirite, ne partoprenas la amarajn sentojn de Kalocsay en lia poemo "En amara horo" pri la pozicio de la Esperanta poeto: "poeto sen popolo, ho animprema scio, / ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko." Ĉar, kio finfine estas "popolo"? Mia persona sperto, ke sufiĉas havi nur unu simpatian aŭskultanton, kies kompetenton oni plene fidas, por akceli la inspiron verki. Kaj, efektive kaj finfine, la pozicio de la Esperanta poeto nuntempe ne multe diferencas de tiu de poetoj en la naciaj lingvoj. Kompare kun epoko ne tro for en la tempo poetoj ne plu okupas fortan pozicion en la moderna mondo. Estis la tempo, kiam poetoj imagis sian rolon eĉ kiel idealisme leĝfaran por la homa vivo. Nuntempe la poetoj mem ne plu konsideras sin tiaj rolantoj. En nova poemo mi tuŝas tiun temon jene pri la poeta situacio en la nuntempo:

Ne strebi, eĉ ne klopodi, nur sekvi
silente lumetojn ekstervojajn
inter la rokoj, senorde dissituaj
kaj diference grandaj, sen ajna kredo
pri la rolo de poeto kiel leĝfaranto
neagnoskita, kiel noble imagis
en bela eseo Percy Bysshe Shelley,
kiun mi adoras, kvankam jam ne plu
romantikema, preferanta kredojn
malpli idealismajn...

Kompreneble la baro de nescio kaj ignoro de la ekstera mondo ne restas senefika al la Esperanto-poeto. Sed mi havas la impreson, ke plej multaj seriozaj Esperanto-poetoj rigardas tiun baron kiel defion. Defion ĝin transsalti kaj dediĉi sin refortigitaj al tiu tasko, kiun nur ili povas plenumi kiel sciantoj de lingvo malmulte konata, lingvo, kiu nepre bezonas kapablajn, sindediĉemajn verkistojn por kreskigo de sia literaturo, sia kulturo.

Mi venas al la fino de mia prelego. Kiel mi anoncis en la komenco, ĝi estis grandparte personeca, subjektiva. La hungara poeto Sándor Petőfi, diras en unu poemo, ke "La poezi' ne estas babilejo" kaj daŭrigas (en traduko de Kalocsay), ke

ĝi estas pli, jes, konstruaĵo, kiu
por ĉiu ajn malfermas siajn pordojn,
por ĉiu deziranta tie preĝi,
do: katedral', en kiun licas paŝi
kampul-sandale kaj eĉ nudpiede.

Oni konstatas la romantikan sintenon de la hungara poeto al la poezia arto, li egaligas ĝin al adorado en humileco. Tio estas persona sinteno ja akceptebla. Alia sinteno, tamen ne fremda al tiu romantika sinteno, estas rigardi poemon kiel esploron, manieron kapti disfluantan senton por ĝin fiksi en spaco kaj tempo. Tio enhavas la nocion, ke poemoj estas saviloj, saviloj de inertaj, tamen potencialaj ekzistoj al aktivaj roloj. Por mi persone tio estas la esenco de la poezia arto. Kaj mi havas la konvinkon, ke tia sinteno al la poezio estas aparte grava por tiuj poetoj, kiuj dediĉas sin al poemado en Esperanto, kaj kiuj neeviteble en mornaj momentoj sentas sin kiel Kalocsay, ke ili verkas en lingvo "sen popolo". Ĉar por la Esperanto-poetoj poemoj estas saviloj ne nur en la esplora senco jam menciita, sed ankaŭ en psika senco, konsciigas ilin pri tio, ke ili ne laboras vane. Mi volas fini per lego de nova poemo, kiu pritraktas tiun temon:

Poemoj estas saviloj, devenintaj
el dimensioj atingeblaj
nur per elsondado subtile direktata.
El psikaj grundoj ili originas,
jam ekzistantaj tie image, ombre,
elfoseblaj nur per sentemaj movoj,
ĝis levo de la vortoj konstru-taŭgaj
por pruvoj konstateblaj kiel savo
de valorajoj.
Tiaj vortoj
estas materialo por reliefo
de konkretaj formoj sur la mensa fono,
por videbligo de kontrastoj
sur ebeno seneventa, se nur siluetaj
sen detalaj trajtoj, tamen okaze
pli dense plenaj, sugestive koloraj.
Tiel poetoj vivigas al funkcio
inertajn ekzistojn, tiel savas
ilin el pludaŭra sennomeco
al aktivaj roloj, per poemoj.